Blazio Vaha
Wacha Balázs

Pri Esperanto kaj koneksaĵoj

Az eszperantóról és hasonlókról



Hungaria Esperanto-Asocio

Magyarországi Eszperantó-Szövetség 2018

Blazio Vaha
Wacha Balázs

Pri Esperanto kaj koneksaĵoj
Az eszperantóról és hasonlókról

Blazio Vaha
Wacha Balázs

Pri Esperanto kaj koneksaĵoj
Az eszperantóról és hasonlókról

Hungaria Esperanto-Asocio
Magyarországi Eszperantó Szövetség
Budapest, 2018

Ĉi tiu kolekto de artikoloj en Esperanto kaj la hungara estas plukita el la riĉa rikolto de la studado diversflanka de Esperanto kaj la hungara lingvo fare de Blazio Vaha. Ĝi aperas omaĝe al lia sepdekjariĝo.

Wacha Balázs itt közzétett eszperantó és magyar nyelvű cikkgyűjteménye az eszperantó és magyar nyelv sokoldalú tanulmányozásának néhány gyümölcse. Megjelent a szerző születése hetvenedik évfordulójának tiszteletére.

Redaktis: Jozefo Horvath
Szerkesztette: Horváth József

Eldonis: Hungaria Esperanto-Asocio
Kiadó: Magyarországi Eszperantó Szövetség

Unua eldono: 2018
Első kiadás: 2018

@ Wacha Balázs 2018

ISBN 978-963-571-496-4

REKOMENDO

Okaze de la 70a jubileo de la naskiĝo de Blazio Vaha, omaĝe al ĉi tiu multflanka lingvisto aperis la jena kolekto, libriganta en unu volumo ĉerpon el la ĝisnuna verkaro de la festato.

Lia esplora intereŝigo etendiĝas al pluraj kampoj: Esperanto, interlingvistiko (sistemo, historio de lingvoprojektoj kaj planlingvoj, dulingveco), hungara historia gramatiko (vortordo), priskriba lingvistiko (tempo kaj aspekto). Li estas aŭtoro de pli ol 60 studoj, libroj, artikoloj, aperintaj ĉe renomaj en- kaj eksterlandaj eldonejoj kaj en pluraj periodaĵoj.

Li partoprenas en internaciaj esploroj. Kiel scienca ĉefkunlaborinto de la Lingvistika Instituto de la Hungara Scienca Akademio kaj membro de ties korporacio li konigas al la legantoj ankaŭ sian lingvoprojekton Pjaspo. La lingvo Pjaspo (Korpusz státusz nélkül, p. 167) elkreskis el Esperanto, estas kongrua kun ĝi. Tio estas komprenebla en la kazo de la aŭtoro, ja la Lingvo Internacia kaj la hungara lingvo reaperadas en preskaŭ ĉiuj liaj studoj ĉe la komparado de aliaj lingvoj.

Foliumante la nun publikigitan kolekton, instruantoj, altnivelaj parolantoj de Esperanto kaj interesiĝantoj pri lingvistiko egale utile povos legi liajn trafajn observojn, esploraĵojn.

Tial mi rekomendas ĝin ankaŭ al Vi kun bonvolo, amikeco kaj kun Esperanta koro.

Debrecen, la 15an de Septembro 2018

D-ro Attila Salga
lingvisto, lingvoinstruisto

AJÁNLÁS

Wacha Balázs 70. születésnapja alkalmából, a sokoldalú nyelvész tiszteletére jelent meg ez a 27 tanulmány, amely egy kötetben foglalja keretbe az ünnepelt eddigi munkásságát.

Kutatási érdeklődése számos területet ölel fel: eszperantó, interlingvisztika (nyelvtervezetek és szerkesztett nyelvek rendszere, története, kétnyelvűség), magyar történeti grammatika (szórend), leíró nyelvészet (idő és aspektus). Több mint 60 tanulmány, könyv, cikk szerzője, amelyek neves hazai és külföldi kiadóknál, folyóiratokban jelentek meg.

Nemzetközi kutatásokban vesz részt. A Magyar Tudományos Akadémia Nyelvtudományi Intézetének tudományos főmunkatársa, a MTA köztestületének tagja saját nyelvtervezetével is megismerteti az olvasókat. A pjaszpó nyelv (Korpusz státusz nélkül, 167. o.) az eszperantóból nőtt ki, azzal kompatibilis. Ez a szerző esetében természetes, sőt a Lingvo Internacia és a magyar nyelv szinte minden tanulmányában más nyelvek összevetése, összehasonlítása során köszön vissza.

Véleményem szerint mind a nyelvtanárok és az eszperantóul jól beszélők, mind a nyelvtudomány iránt érdeklődők hasznos megállapításokat, tudnivalókat szerezhetnek a most közreadott cikkgyűjtemény elolvasása során.

Ezért ajánlom szeretettel, barátsággal és eszperantó szívvel Önnek is.

Debrecen, 2019. szeptember 15.

Dr. Salga Attila
nyelvész, nyelvtanár

Iom pri tempo kaj aspekto

(1980)

Oni ne ĉesas diskuti pri la Esperanta konjugacio, precipe pri la *kompleksaj* aŭ – se uzi la terminon de s-roj Sonnenfeld kaj Reiersøl – *duvortaj* konjugaciaj formoj de la pasivo. Oni daŭre distingas du skolojn, parolante pri *tempismo* kaj *aspektismo*. Oni analizas aŭ kvalifikas tiujn du skolojn el lingvopolitika kaj didaktika vidpunktoj; laŭ rilato al la efektiva lingvouzo kaj al klasikaj tekstoj kaj ankaŭ laŭ kohereco de la respektivaj teorioj. Sporade oni proponas precizigojn, kie la sistemo ŝajnas ne sufiĉe normohava.

Oni kelkfoje emfazas, ke traktado de ĉi tiu temo ne estas necesa aŭ ĝi estas malutila.

Mia celo estas nek juĝi pri tiuj du skoloj, nek juĝi pri la du praktikoj. La studoj aperintaj multon komprenigas; la hezitoj de la praktiko estas bone tolereblaj kiel faktoj de funkcianta lingvo.

Min interesas du aferoj. Unu el ili estas: kiom rajte oni distingas tiujn du skolojn ĝuste kiel tempisman kaj aspektisman: kia estas la rango de la lingvistikaj tempo kaj aspekto en la sistemo de Esperanto. La dua demandeto ne ŝajnas prilingva: kio motivas studadon ĝuste de ĉi tiu temo; kial iuj emas ĝin studi, kial aliaj emas kvalifiki la fakton de ĝia studado kvazaŭ moralo? Kiel ĝi kompariĝas laŭ studindeco kun aliaj temoj?

Mi ne entreprenas resumi la asertojn de la du menciitaj skoloj. Tio estas tre bone farita en la verko Participoj kaj konjugaciaj formoj en Esperanto de O. Reierøl. Ĉe La t.n. aspektisman vidpunkton bone prezentas PAG aŭ Vojaĝo inter la tempoj de K. Kalocsay; ĉe O. Reierøl[13] oni trovas ankaŭ bonan bibliografion kaj multajn referencojn pri la historio de la problemo. De Reierøl[13] mi pruntos ankaŭ la terminon *ado* por kunkovri la signifojn de ago, stato, okazaĵo, procezo.

Lingvistikaj tempo kaj aspekto estas nocioj proksimaj: apenaŭ estas eble diri ion pri la dua sen trakteti la unuan, sen karakterizi ilian interrilaton. Tial antaŭ ĉio oni devas konstati, ke ĉiu homa lingvo posedas kaj la kategorion de tempo, kaj tiun de aspekto, se oni konsideras ilin sen kvalifiki la respektivajn esprimilojn, do se temas pri *semantikaj* kategorioj sen ekskluzivigo de morfologiaj, sintaksaj aŭ leksikaj rimedoj. Kion en gramatiko oni kutime konsideras tempo, tion pli precize oni nomas *ekstera* tempo, kaj ĝi konsistas el ĉiuj, aŭ iuj el la sekvaj komponantoj: a) (rilato al) la *parol-tempo* („antaŭ nun"; „nun"; „post nun"); b) ia tempo aparte *indikata* kaj nomata *referenca tempo* (ekz. antaŭ tiu tago); c) *okazotempo*, t.e. la tempo de la *ado* mem (ekz. la dekan de decembro je la deka kaj dek). Tiuj tempo-komponantoj povas koincidi.

Ĉiuj tri koincidas, se la paroltempo kaj la okazo-tempo koincidas laŭfakte, kaj se samtempe oni ankaŭ referencas al tiu tempo eksplicite (ekz. Nun ni tajpas.) Plej ofte koincidas la referenca tempo kaj la okazo-tempo. (Ekz.: De la deka horo mi sidis ĉe la familio Bart). La tri komponantoj povas ankaŭ tute apartiĝi. (Ekz.: Jozefo por la lastaj du tagoj de la monato forverturis al la marbordo – la referenca tempo ĉi tie ne estas tiu de la ado mem). Oni povas referenci samtempe al pluraj temposegmentoj, (Ekz. en la frazo *Hieraŭ li forveturis por kvar tagoj* estas du referencaj tempoj, unu el kiuj koincidas kun la okazo-tempo). Referenca tempo povas manki, kaj la okazo-tempo ne ĉiam aperas eksplicite tamen plejparte la parolanto kaj la aŭskultanto supozas, ke la verbenhavo (ado) koncernas certan, se ne difinitan, almenaŭ difineblan temposegmenton aŭ tempopunkton. Ĉion ĉi resumitan oni (i.a. O. Jespersen, H. Reichenbach, F. Kiefer[9]) konsideras tempo ekstera pro tio, ĉar per ĉi tiuj momentoj ne kvalifikiĝas la tempa rilato de la ado al sia propra, interna tempo: el la supra tempo-framo ne konkludiĝas, kiel konkreta ado rilatas al la temposegmento determiniĝanta por ĝi pere de la skizitaj tempo-komponantoj. Pri la interna tempo-strukturo de la ado informas la *aspekto* (Kp. Comrie[6] p. 3; Kiefer[9] p. 149); mi ripetas, ke la termino estas uzata provizore sen konsideri la kvaliton de la esprimiloj. Sen profundiĝi en la temo mi mencias, ke la diverseco de la interna tempo-strukturo de adoj kontribuas kaj al esprimigo de objektivaj diferencoj en la realo kaj al eblo elekti plejeble oportunan parolstrategion produktante tekston.

Povas esprimiĝi pere de la aspekto objektivaj diferencoj. Ĉe opozicio de imperfektiva kaj perfektiva ado esprimata helpe de terminativa verbo. Ĉi tie la perfektiva ado neprigas imagon pri atingo de *leksike aludata* (kaj ne ia ajn) rezulto, dum la imperfektiva ado *permesas* ĝian ne-atingon. Sed la esprimataj diferencoj ne nepre estas objektivaj: la elekto el adoj imperfektiva kaj perfektiva ofte kvalifikas la strategion de la parolanto rilate al la okazo-tempo. Ekzemple: *Hieraŭ post la kvara horo*

Ĵakvo iris en la proksiman butikon. Se anstataŭ la ĵusa frazo la parolanto decidas diri *Hieraŭ post la kvara horo Ĵakvo estis iranta en la proksiman butikon*, tio nek ŝanĝas la eksteran tempon karakterizantan la propozicion, nek neprigas nuligon de la supozo pri rezulto, sed – kutime – antaŭsignas certan detalecon de la rakontado: la parolanto devontigas sin paroli pli abunde pri io koneksa kaj ne transiri ankoraŭ al sekva tempofazo.

Kiel kompreni la demandon, ĉu ado kvalifikiĝas aŭ ne laŭ la rilato al sia propra interna tempo? Kiel ekzemplojn ni iom ekzamenu la subajn frazojn:

a) Inter la kvina kaj sesa ŝi legis.
   Inter la kvina kaj sesa la raketo estis malproksimiĝanta.
b/ Inter la kvina kaj la sesa ŝi skribis du leterojn.
   Inter la kvina kaj la sesa li mortis.
   Inter la kvina kaj la sesa li tralegis la artikolon.

Se oni abstraktas la tempo-framon de la supraj frazoj, forigante la konkretajn predikatojn kaj konservante la okazo-tempon (referencan tempon), oni ekhavas la skemon:

inter la kvina kaj la sesa okazis ado (fare de iu)

Estas evidente, ke ĉi tie oni havas multe malpli da informoj pri la dividiĝo de la ado en la priparolata tempo, ol kiam ni havis plenvalorajn verbojn en la pozicio de la predikato, eĉ kun komplemento ktp; la skizitaj tempo-komponantoj do ne indikas la internan tempostrukturon.

La semantika (aŭ funkcia-semantika) kategorio de la tempo estas jene resumebla kaj ekzemplebla:



Ekz.

- hieraŭ vespere
- inter la 6a kaj la 7a
- dum la inaŭguro
- en la tria minuto de la komitatkunsido

- por la unuaj du tagoj de la kongreso
- ĝis la noktomezo
- antaŭ ol la prezidanto foriris

- oni ŝtelis mian horloĝon
- Joĉjo saltadis sur sia seĝo
- Eva transvestis sin
- mi skribis du leterojn
- oni elektis lin
- ili jam estis irantaj al la stacidomo
- la vetero pli kaj pli varmiĝis

} adoj (okazoj, agoj, statoj, procezoj)

Ĝis nun ĉio estas dirita sen atento al la formo de la respektivaj esprimiloj. La funkciajn-semantikajn kategoriojn karakterizas diverseco kaj kompleksеco de la esprimiloj, kvankam ili povas havi ian centran subkategorion, ofte morfologian aŭ sintaksan, kiun aliaj, periferiaj kategorioj kaj rimedoj kompletigas aŭ laŭfunkcie modifas. Se paroli denove pri la kategorio de la tempo, oni rajte povas aserti, ke la kerno de la kategorio, kiel en multaj aliaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto estas la verbotempo aŭ tenso. Sed kontribuas ankaŭ diverskonsistaj tempadjektoj (adverboj, prepozitivoj), eĉ, ekzemple, vortetoj kiel *bis, ek, for, stop, ts*, kiuj, uzate interjekcie, preferas futuron, *pum, bum,* preferantaj paseon, aŭ *jen* aludanta paseon aŭ nuntempon. Akuzativo en elipsa frazo sen verbo kutime koncernas futuron (ekz. *Laboron! Panon!*), escepte se ĝi aperas kiel kompletigo aŭ respondo al antaŭa frazo. Morfologiaj kaj sintaksaj kategorioj, kiuj primare havas tute alian funkcion, sekundare povas informi pri tempo. Estas preskaŭ evidente, ke volitivo malpreferas paseon kaj grandparte postulas

kunteksto de futuro aŭ prezenco. Leksika enhavo de certaj verboj preskribas tempan valoron eĉ por substantivaj komplementoj, ekz. objekto: „Mi *pentas* miajn *kulp*ojn" implicas, ke mi kulp*is*, „Mi *admiras* ŝian *belecon*" implicas, ke ŝi *estas bela* kaj la frazo „Ni *atendas* lian *alven*on" supozigas, ke li eble alvenos. (Alimaniere en la frazoj „Mi *plan*as novajn *kulp*ojn". „Mi memoras lian alvenon kaj ŝian belecon"). Similan tempo-implicon prezentas O. Reiersø1, (p. 13, 63-4).

Jen kelkaj ekzemploj, resume kaj ampleksige, el la esprimiloj de la funkcia-semantika kategorio de la tempo – koncerne rilaton al la paroltempo:

ĝojis, skribis	ĝojas, skribas	ĝojos, skribos
hieraŭ, ĵus	hodiaŭ, ĉiam	morgaŭ, tuj, venonte
*ĉes*as kuri	*ŝat*as promeni	intencas
(>'kur*is'*)	(~>'ade promenas')	volas
	*abomen*as trink*i*	planas veturi
	(~>'malvolonte trink*as*')	deziras (~>'veturos')
		proponas
		ordonas
		konsilas
Uf!	Jen!	Ĉit! Huŝ! Bis! Hot!
		Monon! For la manojn!
		Saltu!
/Mi/ *pent*as	Mi *envi*as lian *lertec*on	Oni *esper*as lian resaniĝon.
/mian/ kulpon	(>'li estas lerta')	(>'espereble li resaniĝos')
(>'mi *kulp*is')		

K. Kalocsay opiniis, ke la Esperanta aktivo estas tempo-prefera, la pasivo aspekto-prefera. (Kp. Vojaĝo inter la termpoj[10] p. 63-7). Tempistoj opinias, ke la pasivo tute aŭ plejparte ripetas la strukturon de la aktivo, do ankaŭ la pasivo estas tempo-prefera. Tiuj aŭ similaj asertoj estas tre valoraj, se oni ĝuste komprenas la gradon de la abstraktado fare de la aŭtoroj; sed ili povas ankaŭ misgvidi la studanton, se tiu volas apliki tiujn opiniojn al konkretaj frazoj, kie kutime aperas kunaĵo de esprimiloj de ia funkcia-semantika kategorio. Por reliefigi tiun penson, ni ekzamenu kelkajn konkretajn verbojn en simpla aktivo, en frazoj kun senŝanĝa okazo-tempo. (Koncerne aktivajn verboformojn mi povas ne pruvi, ke ili kontribuas al la esprimiĝo de la ekstera tempo, pri tio ja, kiel aludite, regas konsento: ni do ekzamenu nur la *internan* tempo-strukturon de la adoj, t.e. ilian aspekton.)

Ni elektu kiel eksteran referencan tempon „*de la unua ĝis la kvina*". Unue oni enfrazigu ĝin kun la preterito de *dormi*. Se oni ne mensogas dirante: *De la unua ĝis la kvina li dormis*, tiam estas ebla/verŝajna ankaŭ la vereco de la sekvaj asertoj:

Je la dua li dormis.
Je la tria li dormis.
Je la kvara kaj kvindek kvin li dormis ktp.

La paroltempo de la frazo *De la unua ĝis la kvina li dormis* (kaj verŝajne ankaŭ de la tri supraj frazoj) estas „iam *post* la *kvina* horo". Nun, konsiderante plu vera nian bazan ekzemplofrazon, pripensu, kion rajtus diri parolanto je la *tria* horo. Li verŝajne rajtus uzi kaj preteriton, kaj prezencon, kaj futuron, kaj tutcerte li rajtus, *jam* tiam, uzi preteriton de la sama verbo kun indiko pri iu ajn tempopunkto post la unua kaj antaŭ la tria. A1 demandoj pri diversaj tempopunktoj de la koncerna tempintervalo li povus respondi, ekzemple:

Je la unua kaj kvin li (jam) dormis.
Je la dua kaj dek li (plu) dormis.
(Ankaŭ) je la dua kaj kvardek li dormis.
*(*Kaj*: Eble ankaŭ je la tria kaj duono li dormos.)*

Se do la tempon *de la unua ĝis la kvina* ni dividas je partoj, estas eble, ke ĉiun momenton el ĝi ni povas karakterizi per la sama konjugacia formo de la sama verbo kaj eventuale kun sama komplemento (se ekz. preni la frazon... *li dormis profunde*).

Same rilatas al la priparolata tempo adoj kiel (iu) *ploris*, (iu) *estis verkanta sian komedion*, (iu) *kuris en la direkto de la ĉefurbo*, (iu) *staris ĉe stratangulo*; ktp. Oni povas diri, ke la interna tempo de la supraj adoj estas segmentebla.

Nun ni reprenu kiel ekzemplon la preteriton de *tralegi*.

Se validas la frazo *Ŝi tralegis la artikolon en unu horo, de la kvina ĝis la sesa*, ne estas eble, ke ĉiu el la subaj frazoj estu veraj:

Je la kvina horo kaj unu minuto ŝi tralegis la artikolon.
Je la kvina horo kaj dek minutoj ŝi tralegis la artikolon.
Je la kvina horo kaj kvardek kvin ŝi tralegis la artikolon.

Resume: dum la tempo, kiam *ŝi ploris*, eble ŝi ploris ĉiumomente, sed dum la tempo, kiam *ŝi tralegis la artikolon*, certe ŝi ne tralegis ĝin ĉiumomente: la ado, esprimata en ĉi lasta maniero, ne estas segmentebla. Same ne estas segmentebla ado esprimata per preterito de *morti*. Ĉe valido de la frazo *Paŭlo mortis en la daŭro de unu horo*, ne povas validi kaj la frazo *Paŭlo mortis je la kvina kaj dek* kaj *Paŭlo mortis je la kvina kaj kvardek*.

La adoj de la ekzemplo-frazoj kun preterito de *dormi*, *plori, stari, esti verkanta* estas imperfektivaj, tiuj kun preterito de *morti*, *tralegi* estas perfektivaj.

Krom ĉi tiuj du ekzistas ankaŭ aliaj abstraktindaj, esencaj ecoj de la ado, se konsideri pli detale ĝian internan tempo-strukturon. Estas diferencoj en la interna tempo-strukturo de tiaj imperfektivaj adoj kiel (iu) *staris: estis verkanta sian komedion: korespondis* kaj ankaŭ en tiu de la laŭ mi perfektivaj adoj kiel (iu) *laboris iom*: *verkis novan poemon*: *trakuradis la tagon*. Oni devas pritrakti leksikajn verbotipojn kiel tiuj de *ekiri, preni, tuŝi, forsoni, ĉesi, tralerni, konsumi, eltrinki* ks; tamen mi substrekas: kiel bazan opozicion laŭaspektan indas rigardi tiun de perfektiveco kaj imperfektiveco. Laŭ Bernard Comrie perfektiva aspekto prezentas tuton de ia ado sen aludi al la interna tempa konsisto; la tuto de la ado estas prezentata kiel unueca, neanalizebla tuto; kontraste al ĉi tiu, la imperfektiva aspekto igas la internan tempo-strukturon eksplicita (Vd. Comrie[6], p. 3-4).

En la slava fakliteraturo difinoj tre similaj al tiu de Comrie estas oftaj jam de la 50-aj jaroj sub influo de Maslov kaj poste Bondarko. „La perfektiva aspekto indikas la agon kiel nedivideblan tuton, dum la imperfektiva aspekto ne enhavas en sia semantiko indikon pri la tuteco de la ago (Bondarko – Bulan'in, p. 11). La specifo de la parto pri la imperfektiva aspekto estas, ke la aŭtoroj prezentas ĝin kiel nemarkitan membron de la opozicio: ĉar la rusa imperfektiva aspekto estas uzata ankaŭ en neŭtralaj okazoj, la rusaj kaj pririsaj aŭtoroj difinas ĝuste ĝin pli singarde. Mi konsentas pri la aserto, ke ne estas decidinde, kiu el la du aspektoj por la ĝenerala homa pensado estas pli specifa do „markinda“, kaj ke do ne estas hazarde, ke iuj lingvoj, kiel la Angla, markas la membron imperfektivan, aliaj lingvoj (ekz. la rusa) la perfektivan (Hollósy[7], p. 18-19). Sekve – se akcepti, ke la opozicio estas universale homlingva – kiel ĝeneralan karakterizon de la kategorio indas akcepti prezentadon de la du kvazaŭ markohavaj polusoj. /Hollósy[7], p. 18-19).

S. Agrell jam en 1908 substrekas la ĝeneralecon kaj gramatikecon de la opozicio perfektiva–imperfektiva, kontraste al semantikaj grupoj de verboj iterativaj, inĥoativaj ktp., kiuj, substrekinde, povas esti preferataj en iu el la du aspektoj aŭ eĉ konsistigi ĝian rimedon, sed kiuj ne aperas kiel senperaj elementoj de la antaŭe priskribita opozicio.

La opozicio de la aspektoj estas jene figurebla kaj lokebla en la ekstera tempo:





Kelkaj esprimiloj de la semantika-funkcia kategorio de la aspekto:
(kun adoj, kiuj povas esti en la sama okazotempo)

Imperfektivaj adoj	Perfektivaj adoj
Mi manĝas la supon.	Mi manĝos la (tutan) supon.
Li skribis.	Li skribis du leterojn.
Li ĝuis la freŝan aeron.	Li savis la knabon
Li povis foriri (iam ajn).	Li sukcesis foriri.
Ŝi veturis.	Ŝi alveturis.
Mi estis trinkanta kafon.	Mi trinkis iom da kafo.
Mi laboris (kaj dume aŭskultis muzikon).	Mi laboris iom (sed baldaŭ mi foriris).

O. Reiersøl el la citita verko[13] (p. 2) konstatas, ke verbaj aspektoj estas momenteco, daŭro, longa daŭro, rezulto, komenco, fino. (La listo de la aspektoj en PAG[11] estas tre simila, sed ne sama: komenca, momenta, daŭra, ripeta, fina, ĉesa.) Iom pli poste, kritikante la verbokategoriojn de Kalocsay kaj Waringhien kaj precipe la konceptojn de verbo de daŭro kaj verbo sen daŭro, li klarigas, kiom vasta skalo de diversaj daŭroj povas ekzisti de „sekundoj kaj dekonoj de sekundo" ĝis „centmilionoj da jaroj", kaj li emfazas, ke „en tiu amplekso de daŭroj ni laŭ la aspektistoj devas estigi iun dividan punkton inter daŭraj agoj…" (p. 8).

Mi, kiel skizite, akceptas tiun opinion, laŭ kiu la baza aspekta opozicio estas pli abstrakta, dupolusa. Tamen mi rekonas, ke la semantikaj markoj, kiujn li vicigas kiel aspektojn, havas gravan rolon en la vaste komprenata funkcia-semantika kategorio de la aspekto. Aliflanke mi certas, ke la plursignifa vorto daŭro (kaj ĝiaj nacilingvaj ekvivalentoj) kaŭzis multe da problemoj kaj miskomprenoj en la historio de la temo. Daŭron oni ofte komprenas kiel (tempan) longecon, do *daŭra* kvazaŭ en si mem estas *long*daŭra, kaj se oni distingas longan daŭron, do ĝi estas *tre* longa. Nur laŭ ĉi tiu kompreno oni devas estigi dividan punkton. Sed parolante pri daŭro oni ja povas konsideri ankaŭ tion, kio estas inter la komenco kaj la fino de la ado, kaj ĝi same ne bezonas esti nepre longa, kiel ankaŭ tuteco devas esti nek nepre longa, nek nepre mallonga.

Ekzistas kompreneble tia striktasenca interrilato, ke ju pli longa estas iu ado, des pli da motivoj povas esti por konsideri la internan tempo-strukturon, do insisti pri la daŭro; des pli ofte, ekzemple, oni interesiĝas pri io duma, samtempa. Sed neniel estas aserteble, ke longdaŭra ado ne estas rigardebla kaj lingve prezentata kiel sendivida tuto.

La frazoj *Mi tralegis la artikolon en dek sekundoj* kaj *Mi tralegis la trilogion en tri jaroj* prezentas same perfektivajn adojn. Kvankam aliteme, tamen tute analoge ni povas citi ĝuste Reiersøl[13], kiu parolante pri la simpla prezenco asertas: „Ju pli mallonge daŭras la ado, des pli malofte oni havas okazon paroli kun alia persono dum ĝi ankoraŭ okazas. Tio estas memkomprenebla afero kaj ne povas esti prezantata kiel gramatika regulo". (p. 66-7).

La graveco de la ado-tipoj (kaj leksikaj verbo-tipoj) de komenca, momenta, fina, ĉesa karaktero, koncerne la bazan aspektan opozicion, konsistas en tio, ke ĉiu el ili preferas la perfektivan poluson. Tamen aldonendas du konsideroj. Unu estas, ke temas substrekinde nur pri prefero. „Momenta ago, kiu estas filmata, povas fariĝi daŭra ago, kiam oni montras la filmon kun reduktita rapido" – diras prave Reiersøl[13] en la citita verko (p. 8), kaj ni aldiras, ke la percepto kaj konscio de la daŭro sufiĉas kiel motivo por insisti pri la interna tempo-strukturo. Cetere, se oni estas interesata pri la interna tempo-strukturo, oni povas insisti pri ĝi eĉ sen malrapidigo pere de filmo. La dua konsidero estas, ke la diferencoj inter komenca, momenta, fina, ĉesa karakteroj ne havas sintaksan validon – kontraste al la dupolusa aspekta opozicio. La parolanto, la lingvo-posedanto atribuas tiujn ecojn al la respondaj verboj nur laŭ permemoraj rilatoj, surbaze de leksikecaj kontaktoj. La frazo *Ŝi ekiris en la direkto de la supermarkto* enhavas, laŭ ĝenerala opinio, la komencan verbon *ekiri*, sed la samon oni ne asertus pri la frazo *Ŝi direktis sin al la supermarkto* aŭ pri *Li mortis*, ĉar la verboj en tiuj ĉi du frazoj ne estas

derivitaj el radikverboj kun la signifoj „esti iranta, iri”, kaj „esti mortinta”. Neniu interpretas la verbon *veni* kiel komencan en la frazo *Li venis finfine hejmen*, kvankam ĉiu farus tion pri *ekesti* en la iom stranga frazo *Li finfine ekestis hejme*.

O. Reiersøl[13] skribas: „estis-ata ne esprimas daŭron, ĉar -is ne esprimas daŭron” (p. 67). Mi supozas, ke li konsideras ĉi tie kiel daŭron ne „minimume unu horon”, sed kiel divideblecon de la ado, konsideron de ĝia interna tempa strukturo (eĉ se li ne uzas tiujn esprimojn). Laŭ mia opinio li pravas, asertante, ke -is ne esprimas daŭron, se emfazi, ke temas pri -is en si mem; aliflanke mi aldonas, ke -is, se kun certaj verbradikoj, ja povas esprimi daŭron, aŭ iom pli precize: ebligas imagon pri la ado kiel pri dividebla (ekz.: Tiam ili promenis laŭ la bordo de la rivereto). Kun aliaj verboj ĝi reprezentas nedivideblan adon, kies lingva formo ekvalidas nur en la lasta momento de la (priparolata) okazo-tempo. Supoze, ke oni savas iun el akvo en la daŭro de kvin minutoj, oni ekrajtas diri *Oni savis lin* nur en la lasta momento de tiuj kvin minutoj.

En la ĝisnunaj ekzemploj kun *tralegis*, *mortis*, *savis* la perfektivecon de la propozicio ni konstatis surbaze de la koncerna verbo kun konsidero de ĝia tuta morfologia konsisto, kun atento al la radiko, al la tenso, prefikso. Al la aspekta valoro de la propozicio povas kontribui ankaŭ aliaj rimedoj, ankaŭ frazelementoj ekster la predikato. Pri la frazo *Li skribis* oni povas supozi, ke ĝi reprezentas imperfektivan adon: dum li skribis, li skribis ĉiumomente. Aliflanke la frazo *Li skribis du leterojn* jam estas perfektiva, iganta valida nur en la lasta momento de la skribado de la dua letero. La preterito *laboris* en si mem havas imperfektivan valoron; tamen la sintagmo *iom laboris* jam estas perfektiva: ĝi ekestas direbla nur deposte, kaj ne pri ĉiu momento aparte. Pravas Reiersøl[13] atribuante aspektan rolon al la negacio kaj al diversaj frazelementoj (p. 8-9). La ado de la propozicio *Mi perdis ĝin* estas perfektiva, la propozicio *Mi ne perdis ĝin* povas reprezenti adon divideblan. Reiersøl en sia komento demandas, kion oni konsideru ĉe konstato de aspekta valoro. Ĉe detala priskribo oni devas priskribi ĉiujn nivelojn, do en la kunaĵo *ne perdis* la elementoj *perd'is* havas sume perfektivan valoron, sed la negado neŭtraligas ĝin.

La perfektivajn kaj imperfektivajn adojn oni povas subklasifiki ne nur en la jam traktita maniero. Mi mencias nur, ke parto de la divideblaj adoj ne estas analizebla kaj gradigebla „kvante”, pli precize laŭ pliiĝo aŭ malpliiĝo de sia intenseco aŭ rezult-proksimeco. Dum *Stefano staris sub la arbo*, li staris egalmaniere, aŭ se ne, tion la prepozicio ne spegulas. La ado estas dividebla, sed ĉiu dividaĵo konsideriĝas ne nur egale vera, sed ankaŭ laŭesence sama. Male, se oni diras *Li estis malfermanta pordon* aŭ *Li pli kaj proksimiĝis al la bordo*, oni konceptas, ke ĉiu dividaĵo de la okazo-tempo prezentas iom alian (pli kaj pli rezult-proksiman) stadion de la koncerna ado. La unua el tiuj imperfektivaj adoj estas statika, la dua dinamika kaj terminativa. Distingi verbojn statikajn kaj terminativajn tial estas tre grave, ĉar morfologiaj rimedoj redundancaj ĉe verbo statika povas esti ne forlaseblaj ĉe verbo terminativa (*estis sidanta*; *estis fermanta*).

Mi ne konsentas kun Reiersøl opinianta, ke *estas -anta* estas ekvivalenta al *-as*, kaj *estis -anta* ne estas ekvivalenta al *-is* nur tial, ĉar *-is* estas uzebla ankaŭ en pluskvamperfekta senco. Koncerne al la pasiva *-is -ata* efektive regas hezitado, kaj oni povas trovi ekzemplon por ĉio; sed pri *estis -anta* oni devas aserti, ke ĝi estas ekvivalenta al *-is* nur en okazo, se la verbradiko kun *-is* sume donas aŭ permesas imperfektivan valoron, Do la frazo *Li skribis* povas esti ekvivalenta al *Li estis skribanta*, sed la frazoj *Li mortis*, *Ĝi falis*, *Li fermis la pordon* laŭ la ĝisnuna praktiko ne *povas* esti ekvivalentaj al *Li estis mortanta*, *Ĝi estis falanta*, *Li estis fermanta la pordon*.

Ĉiu konsentas pri tiu punkto, ke la konjugacia formo *-is -inta* estas pluskvamperfekto, ke ĝi ĉiam esprimas antaŭtempecon. Tion ankaŭ mi akceptas konsente. Oni konsentas (kaj kelkfoje kontentas) ankaŭ pri tio, ke simpla aktiva preterito povas havi valoron de pluskvamperfekto. Sed estas studinde, simpla preterito de *kiuj* verboj kutime rolas pluskvamperfekte, kaj aliflanke, kiugrade la pluskvamperfekta konjugacia formo *-estis -inta* estas libera laŭ aspekta valoro; ĉu ĝi povas prezenti adon imperfektivan? Ĉu oni povas diri: *La patrino koleris la fileton*. *Li estis pli kaj pli ferminta la pordon?* Mi dubas. Tio, ke la formo *estis -inta* esprimas eksteran tempan rilaton, ne ekskludas, ke ĝi havas ankaŭ laŭaspektan preferon. Krom la licenco, ke ĉe pluskvamperfekta rilato krom la formo *estis -inta* oni permesas la unuvortan *-is*-formon, estas ekzameninda, kiam estas uzata *nur* la simpla formo, pro laŭaspekta ne-konformeco. Similajn ekzemplojn oni trovas en PAG[11] (p. 152, Rim. II.) koncerne rilaton de *estis -ata* kaj *estis -ita*; „Oni ne diras: *Li estis konita*, sed: *antaŭe li estis konata*.”

Tre ĝuste asertas Reiersøl[13] (p. 65), ke „la plej ofta maniero esprimi relativajn tempojn, kaj ĉe tempistoj, kaj ĉe aspektistoj, estas pere de la sinsekvo de la frazoj”. Tamen la aserto bezonas

pliprecizigon: sinsekvon, antaŭtempecon kaj posttempecon oni prefere esprimas pere de sinsekvo de perfektivaj propozicioj, dum pere de sinsekvo de imperfektivaj propozicioj oni prefere esprimas samtempecon.

Sinsekvon esprimas la sekvaj propozicioj:

„*Li fermis la kofron, manpremis ... adiaŭ …*"

Al la juda foririnto

Mi iom laboris kaj enlitiĝis.

Ŝi lavis sin, vestis sin, prenis sian ombrelon kaj ekiris.

Samtempecon esprimas ekzemple la sekvaj:

Li sidis kaj fumis.

Ŝi kuŝis kaj aŭskultis muzikon. Apud ŝia lito staris hundo. Regis trankvilo; lumis unusola kandelo.

Mi skribis ĉe la skribotablo; ŝi kudris; la infano ludis en la kuirejo.

Kompare al la pritrakto de la formoj *-is -ita*, *-is -ata* kaj la aktivaj paralelaĵoj, oni malmulte diskutas pri la prediktoj kaj pri la rilato de simpla prezenco kaj simpla futuro. Mi mencias, ke la formoj *estas -onta, estas -ota* laŭ la prezentita dupolusa opozicio estas perfektivaj. Simpla prezenco plej ofte estas imperfektiva (se nun preterlasi la demandon pri historia prezenco); simpla futuro povas esti imperfektiva (ekz. en *Kiam ni sidos ĉe la kameno*, sed ankaŭ perfektiva (ekz. *Mi salutos kaj foriros.*) Se la verbo estas terminativa, la perfektiva ado informas ankaŭ pri (certa, leksike aludata) rezultatingo; precipe en tiaj okazoj la opozicio imperfektiva-perfektiva iĝos bazo por elekti el la tensoj simpla prezenco kaj simpla futuro, malgraŭ la sameco de la okazo-tempo. (Kp.: *Mi manĝas la supon*: *Mi estas manĝanta la supon*; *Mi manĝos la supon*; [interalie] *mi estas manĝanta la supon kaj mi estos ĝin manĝinta*.) Oni konsideru, ke la parta „postparoleco'" de la ado ne sufiĉas kiel motivo por uzi futuron (oni ne diras, promenante: Nun ni promenis kaj promenas kaj promenos.)

Ĉio ĝis nun dirita neniom helpas solvi iajn malkonsentojn en la uzado de Esperanto, tamen, laŭ mi, devas esti klare, ke la opozicion de perfektivaj kaj imperfektivaj adoj oni ne povas eviti en la priskribo de Esperanto. Atismo kaj itismo nur proponas iom alian hierarkion de la rimedoj. (La atisma uzo de la frazo *Li estis mortigata* signifas ne ĝian senaspektecon, sed ĝian perfektivecon, kontraste al la imperfektivaj *Li estis lin mortiganta* aŭ *Iu volis lin mortigi*.)

Nun ni revenu al la demando pri la populareco de nia temo: kial oni tiom intense okupiĝas ĝuste pri la kompleksaj (duvortaj) verboformoj.

Unu el la objektivaj kaj bone konataj kaŭzoj estas, ke ekzistas pli multe da aktivaj formoj ol pasivaj. Ni resumu ilin:

AKTIVAJ			PASIVAJ	
kompleksaj		simplaj	kompleksaj	
	skribINTA			skribITA
estIS	skribANTA		estIS	skribATA
	skribONTA			skribOTA
	skribINTA	skribIS		skribITA
estAS	skribANTA	skribAS	estAS	skribATA
	skribONTA	skribOS		skribOTA
	skribINTA			skribITA
estOS	skribANTA		estOS	skribATA
	skribONTA			skribOTA

Oni povas vidi, ke la pasivo havas naŭ formojn, dum la aktivo naŭ plus tri, do sume dek du. Ŝajne dek du formoj estas pli malfacile trakteblaj ol naŭ, tamen estas konate, ke ĉe la aktivo la parolantoj de Esperanto havas malpli da problemoj ol ĉe la uzado de la pasivo. Tiuj plus tri formoj do simpligas la uzadon de la aktivo, supozoble en du manieroj. Unue kaj pli evidente: la formoj *skribis* kaj *skribos* anstataŭas, se necese, po kvar duvortajn formojn: *skribis* povas ekvivalenti al *estis skribinta, estis skribanta, estis skribonta*, *estas skribinta*; la formo *skribos* povas ekvivalenti, se en konvena kunteksto, al *estas skribonta, estos skribinta, estos skribanta, estos skribonta*. La sola ne menciita duvorta konjugacia formo estas la formo *estas skribanta*, kiu respondas al la simpla *skribas* jen samfunkcie, en parafraza rilato (*Mi ĝuste skribas leteron al mia amiko, Mi estas skribanta leteron al mia amiko*), jen opozicie (*Mi ofte skribas leteron al mia amiko, sed nun mi estas skribanta taglibron*.)

La dua fonto de la relativa simpleco de la aktivo necesigas iom da enkonduko. Malgraŭ la disopinioj, oni povas atribui ian centran funkcion kaj specialan kuntekston al ĉiu el la naŭ pasivaj formoj: temas pri funkcioj, pri kazoj de uzado, kiujn ĉiuj partioj akceptas, kaj kiuj ja estas primaraj, malpli dependaj de aliaj faktoroj de la teksto. Tiaj centraj kazoj estas *estis -ita* por ado perfektiva kaj pluskvamperfekta (*Kiam li alvenis, la supo jam*

estis kuirita); *estis -ata* pri ado imperfektiva kaj preterita (*ŝi estis amata; li estis respektata; la ĉaro estis tirata de ĉevaloj; Kiam li alvenis, la supo jam estis kuirata*). La respektivaj centraj funkcioj de *-is -ita* kaj *-is -ata* egale povas respondi al simpla *-is* en la aktivo, kaj tion oni povas trakti kiel faciligon. Sed eble pli granda faciligo sekvas el la fakto, ke la simpla aktiva formo povas kvazaŭ reprezenti sumon de du tiaj centraj funkcioj. La frazo *Inter la sepa kaj la oka horo Petro skribis leteron al sia amiko* povas esti parafrazata jene: *Inter la sepa kaj la oka horoj Petro estis skribanta kaj je la oka li estis skribinta la leteron*. La frazo *Mi manĝis la tutan supon* estas parafrazebla kiel *Mi pli-malpli longe estis manĝanta la supon kaj fine mi estis ĝin manĝinta*. Tute similan ekzemplon en pasivo Reiersøl[13] klarigas tempisme (p. 13). Temas pri la Zamenhofa frazo *La mono estis longe kolektata, sed fine ĝi tamen estis kolektita*. Reiersøl sukcese refutas la argumentojn de Kalocsay-Waringhien en Plena Gramatiko, laŭ kiuj la citita frazo kontraŭdiras la tempismajn postulojn, ĉar la formo *estis kolektita* ĉi tie evidente referencas al tempo pli posta, ol la formo *estis kolektata*. Prave Reiersøl atentigas, ke laŭ preciza tempisma trakto oni devas konsideri la priparolatan tempon de la koncerna verba sintagmo kaj ne tiun de alia: *fine* kaj la dua *estis* ne indikas, nek koncernas la saman priparolatan tempon, kiel *longe* kaj la unua *estis*.

Sed ja oni povus, kaj laŭ mi devus, demandi, kial oni bezonas ŝanĝi la priparolatan tempon en iaj, kaj oni povas ĝin ne ŝanĝi en aliaj okazoj. Tempisme estas simile ĝusta ankaŭ la frazo *Mi estis longe sidanta kaj fine sidinta*. Do *estis sidinta* kaj *estis kolektita* estas egale antaŭtempaj kompare al la priparolata tempo, sed en la dua ekzemplo la formo ne estis necesa pro tio, ke la ado de *estis sidanta* (aŭ *sidis*) estas statika kun inter si esence samkvalitaj dividaĵoj en ĉiu segmento de la priparolata tempo, dum *esti kolektata* prezentas dinamikan, terminativan adon, ĉe kiuj imperfektivaj formoj ne informas pri rezultatingo (eĉ se ili ne ekskludas ĝin). Granda merito de Reiersøl[13] estas, ke aliloke li esprimas, ke la laŭtempa komentado de la verboformoj ne klarigas ilian tutan funkciadon. Sen detale analizi ĝin, mi citos lian difinon pri la tempismo: „Tempismo estas sistemo, en kiu la konjugaciaj finaĵoj en la indikativo esprimas tempusojn, kaj en kiu X-inta (X-ita) krome signifas X-intecon (p. 68). Komparu ankoraŭ 19.10. (p. 54): *estos X-inta* signifas kaj X-is kaj la X-inteco ankoraŭ estas aktuala". 19.12. „Oni povas diri *estis X-inta,* se kaj nur se je la priparolata momento en la pasinteco povis diri *estas X-inta*". 22.20. (p. 60); *Y estas X-ita en la tempintervalo T* signifas, ke iu (io) X-is Y-on en la tempintervalo T, kaj ke la X-iteco ankoraŭ estas aktuala; 22.21.; „Oni povas diri *Y estis X-ita en la tempintervalo T* en la tempintervalo T, se kaj nur se oni povis diri je la priparolata momento en la pasinteco Y estas X-ita en la tempintervalo T"; 28.1. (p. 68); „La preciza signifo de la esprimo „la X-inteco ankoraŭ estas aktuala je la priparolata tempo" multe varias depende de la signifo de la verba radiko kaj la kunteksto"; 28.2; „Similan diversecon ni trovas kiam temas pri X-iteco" 28.3.; La X-inteco kaj la X-iteco ne estas tempusoj laŭ la difino 1, 4.; 1.4, (p. 1): „Mi uzas la terminon pri relativa tempo. Tempuso povas esti antaŭtempeco, samtempeco aŭ posttempeco rilate al la nuna momento aŭ rilate al alia priparolata tempo" (kun miaj emfazoj: B.W.).

Mi substrekas, ke la okazo-tempo permesas diversajn internajn tempostrukturojn kaj ĉe duvortaj, kaj ĉe unuvortaj konjugaciaj formoj: tial oni bezonas la koncepton de la aspekto. Se oni volas ĝin tute elimini, oni devas diri, ke ekz. la formo *falis* (kun tiu konkreta verboradiko) jam en si mem estas pluskvamperfekta, ekvalidanta nur en la lasta momento de la okazo-tempo, dum *dormis* estas simpla preterito. Tio kondukus al certa subklasifiko de la tempoj kaj finfine al retrakto de la samaj problemoj kun uzado de alia terminologio.

Oni devas iom distingi la problemojn de la maniero ion priskribi unuflanke kaj la faktojn de hezitado kaj la kaŭzojn de la hezitado aliflanke. Koncerne la unuan oni rekonu la ekziston kaj pristudendon da ĉiaj funkciaj-semantikaj kategorioj, inkluzive tempon kaj aspekton. Koncerne la duan mi ripetas, ke la bazo de la problemo estas la hezito, kiu el du formoj sekundare reprezentu la alian, kiam validas la primaraj funkcioj de ambaŭ aŭ eventuale de neniu el ili. Sekve la solvoj proponitaj (itismaj kaj atisma/j/) ne tre diferencas laŭ simetrieco. Tiu eco multe dependas de la konsiderataj kategorioj. (Se oni akceptus kiel gvidpunkton la momenton, ekde kiam la aserto validas, ĉiuj itismaj uzoj de *-is -ita* kongruus kun la postuloj de la tempismo). – Alia kaŭzo de la problemo estas ne-aspektecaj kaj ne-tempecaj signiferoj de la participoj adjektivaj. La morfemoj *-it-, -at-, -ot-* estas konsiderataj tutsame kiel participoj pasivaj, do – primare – kun aganto ne nepre konata aŭ menciata, sed nepre supozata kaj plejparte intencohava. Tamen tiurilate ekzistas neplanitaj diferencoj en la uzado de la tri morfemoj. Dum *-at-* kaj *-ot-* fakte supozigas aganton, eĉ, ofte konscian, *-it-* multfoje havas medialan valoron, sen insisto pri la volateco de la ago. Dum *fleksata vergo* estas *vergo, kiun iu fleksas*, *fleksita vergo, elfleksita rivero*^{Z}*, klare konturitaj montoj, rompita fenestro* ne nepre supozas konscian agon. Ĉi tiu tendenco emigas al formoj kun *-it-*, kiam aliaj motivoj mankas, en la pasivo.

En ĉiuj pritraktoj de la temo ŝajnas manki sufiĉa atento al la eblaj diferencoj laŭ markohavo kaj senmarkeco. Multaj lingvaj kategorioj konsistas en du- aŭ trimembra opozicio de formoj. Kiam mankas informo aŭ komunikbezono por la precizigo laŭ tiuj du aŭ tri ebloj, oni tamen uzas iun el la sama nombro da formoj. Ni, havantaj gepatran lingvon kun la kategorio de *nombro*, ne tre facile rimarkas similan komplikecon de la distingo inter ununombro kaj multenombro. Oni scias, ke en *necesejon por viroj* rajtas eniri ankaŭ unu viro (sen atendi alian), *la rajtoj de la virino* apartenas ne nur al unu virino, la validoj de la ordono *Se iu venos, diru, ke mi foriris* kovras ankaŭ la okazon de duopa veno ktp. Evidente ekzistas iaj preferoj por la elekto de la nombro-formo en tiuj okazoj, kiam ne gravas aŭ ne eblas informado pri la nombro. La situacio estas simila ankaŭ ĉe decido pri la formo de iuj lok-adjektoj: el *sur* kaj *en* la lasta iĝas kvazaŭ neŭtrala en la opozicio de ekstera-interna rilato, se ĝi ne ŝajnas substrekinda. Simile proksimigus la itisman kaj atisman tendencojn, se la formojn kun *-at-* oni

konsiderus ĝenerale tamen preferindaj ĉe rezultverboj sen atingo de laŭleksike supozebla rezulto kaj ĉe deziro emfazi samtempecon de du agoj; kaj la formon *-is -ita* oni konsiderus markohava esprimilo de antaŭtempeco kaj perfektiveco de la ado – precipe ĉe rezultverboj.

Pri la participaj epitetoj ŝajnas dirinde antaŭ ĉio, ke la formo kun *-anta* kiel epiteto respondas kaj al la predikata *–as*, kaj al la predikata *estas -anta*:

La multe legantaj infanoj evoluas rapide	La infanoj, kiuj legas* multe, evoluas rapide (legas* ≠ estas legantaj)
La leganta knabo estas mia frato.	La knabo, kiu ⎧legas ≈ ⎩estas leganta, estas mia frato.
La knabino, malfermanta la fenestron, nun estas videbla el la kontraŭa domo.	La knabino, kiu estas malferminta la fenetron, nun estas videble el la kontraŭa domo.
La vendistoj, malfermantaj sian butikon frue, havas grandan avantaĝon.	La vendistoj, kiuj malfermas* sian butikon frue, havas grandan avantaĝon. (malfermas* ≠ estas malfermantoj)

Certe ekzistas ia spontanea tendenco por neŭtraligi laŭ tempuso kaj aspekto la aktivan participon prezencan kaj la pasivan participon preteritan, se uzataj epitete. En ia grado tio estas „eraroj de lernantoj". (Kp. H.Seppik[14]: La tuta Esperanto, p. 66), sed parte tiu praktiko, kaŝanta ne malgravajn diferencojn, ŝajne kontentigas ĉiujn teoriojn. Ofte du samtempaj ago-serioj ebligas, ke unu el la du ripetataj agoj povu esti konsiderata kaj samtempa (pro la samtempeco de la du serioj), kaj antaŭtempa (pro la sinsekveco de po unu el la agoj). Tamen ĉi tiun eblon oni malsame realigas ĉe pasivaj kaj ĉe aktivaj formoj.

La enirantaj knabinoj ne fermadis post si la pordon.
La alvenantaj gastoj iom post iom plenigis la salonon.
La alportitajn donacojn ili metis, unuj post aliaj, sub la abion.
('la inflacio fontas el …')
„kaj – por kompensi la estiĝantajn malgajnojn – la perforte levitaj eksport-prezoj,
la importitaj inflacioj…" (el manuskripta ekonomia studo de J. Bognár).

Similajn preferojn oni povas rimarki, malpli ofte, ankaŭ ĉe unuopaj agoj:

„Verŝas la mastrino lakton tra filtrilo
donas trinki el ĝi al petanta filo" (J. Arany: Familia rondo Trad. T. Ujlaky-Nagy)

Mi ne kuraĝas trakti le problemojn de la substantivaj participoj. Apud la markohave tempusaj *-into* kaj *-onto*, *-anto* tendencas al neŭtraleco. Estas interese, ke ofte en la sama frazo subkompreniĝas diversaj priparolataj tempoj: „La legantoj de ĉi tiu libro eble memoros la legitan libron kun kolero" – Dum *estas-anta* substrekas aktualecon de disvolviĝanta konkreta ago, *estas-anto*, male, aludas ripeton, ĝeneralecon. (Kp.: *Mi estas instruanta*: *Mi estas instruanto*.) Ktp.

Ĉesante sen fini kaj solvi ion, mi konstatas, ke ambaŭ skoloj kaj laste Reiersøl multon komprenigis; ke la tempo kaj la aspekto restas studinda; ke la komplikecon de la problemo ne kreas ĝiaj studantoj; ke ne la participa problemo estas tro taksata, sed aliaj estas subtaksataj. Multon oni scipovas kaj multo funkcias, kion oni ne konscias: ni konsciu. O. Reiersøl[13] argumentas por sia – imitinde ekzakta – sistemo per ĝia simpleco, „facileco do lernado" (p. 69). Faciligi lernadon estas tasko de aplikata lingvistiko kaj instrumetodiko, per kreo de lerniloj, interalie didaktikaj gramatikoj, kiuj traktas nur la diferencojn inter la nacia unua kaj la lernata lingvoj; aŭ la aldonajn faktojn de konkreta lingvo kompare al tiuj de ĝenerala valido. Tiaj gramatikoj la plejparton de la lingva sistemo povas preteratenti, pro koincidoj, kaj ĉar ilia celo estas ĝuste kapabligi kaj ne komprenigi la funkciadon de homa kapablo. Oni memoru, ke fizikistoj studas faladon ne por scipovi fali: tion ili scipovis pli frue ol iri.

Parolante pri la motivoj de la studado, mi plejparte aludis al eblaj rilatoj inter elementoj de Esperanto. Same grava kaŭzo estas la diferencoj de la kategorio de la aspekto en la Eŭropaj lingvoj. Sen la diferencoj de nia spontanea aliro ni ne estus rimarkintaj la nesufiĉon de la priskribo, same kiel kutime oni ne rimarkas tion, kiam temas pri la gepatra lingvo.

El la literaturo

Detalajn bibliografiojn pri la aspekto ĝenerale oni trovas en la indikotaj verkoj de Avilova[3], Bondarko[4], Comrie[6], Maslov[12]; pri la historio de la temo koncerne Esperanton ĉe Vilborg[16] kaj Reiersøl[13].

1. Aktoj de la Akademio, 1963-67: II. 1964-74
2. Avilova,N.S. (1975): Sposoby glagolnogo dejstvija, glagolnaja semantika i vid glagola. En: Russkij jazyk za rubeĵom
3. Avilova,N.S. (1976): Vid glagola i semantika glagolnogo slova. Moskva
4. Bondarko.A.V. (1971): Vid i vremja russkogo glagola
5. Bondarko.A.V.- Bulan'in L.L. : Russkij glagol. Leningrad
6. Comrie,B. (1976): Aspect. An introduction to the study of verbal aspect and related problems. Cambidge University Press
7. Hollósy,B. (1971): Az igeszemlélet kategóriája az orosz és az angol nyelvben: elvi kérdések és megközelítési módok. Debrecen
B. Da Hoog, Gregor, Kalocsay, La Colla, Lapenna, Nakamura, Pumpr, Regulo, Schwartz, Sonnenfeld, Waringhien (1961): La Zamenhofa Esperanto, Simpozio pri -ata/-ita. Stafeto. La Laguna
9. Kiefer,F. (1983): Az előfeltevések elmélete. Budapest, Akadémiai Kiadó (p. 146-65)
10. Kalocsay,K. (1966): Vojaĝo inter la tempoj. Stafeto. La Laguna
11. Kalocsay,K., Warinhgien,G. (1980): Plena analiza gramatiko de Esperanto. Kvara, tralaborita eldono. UEA, Rotterdam (p. 133-57)
12. Maslov,J.S. (1962): Voprosy glagolnogo vida v sovremennom zarubeĵnom jazykoznanii. En: Voprosy glagolnogo vida. Moskva
13. Reiersøl,O. (1980): Participoj kaj konjugaciaj formoj en Esperanto. Oslo
14. Seppik,H. (1971): La tuta Esperanto. Sofio
15. Setälä, Vilborg, Støp-Bowitz (1965): Esperanto – Moderna lingvo. Fondumo de Esperanto. Helsinki
16. Vilborg,E. (1973): La participa problemo en la Akademio. Goteborg
17. Wacha,B. (esp. Vaha) (1960): La ag-aspekto en Esperanto, En: Miscellanea Interlinguistica. Budapest (p. 413-22)

La ag-aspekto en Esperanto[1]

(1980)

Ag-aspekto mi nomas la ekvivalenton de la germana Aspektualität, rusa aspektual'nost', tio estas signifo-sistemon, kiu koncernas interrilaton de **disvolviĝo de ago** respektive de la **tempo**. Substrekinde, ag-aspekto ne nepre identas kun **verba aspekto**. Ĉi lasta nome estas nur unu el la rimedoj de la ag-aspekto mem.

Inter la traktado de la ag-aspekto en la Esperanta fakliteraturo respektive en la ĝenerala kaj naciaj lingvistikoj estas sufiĉe gravaj diferencoj. La relative abunda Esperanta literaturo de la problemo koncentriĝas ĉirkaŭ la hezitado pri la uzado de participoj – ĉefe pasivaj – en la kompleksaj verboformoj, ĝin penetras normigemo, kaj ĝi iom malpli okupiĝas pri difino, precizigo de leĝoj, konceptoj, kiuj ne estas ligitaj kun aktualaj problemoj de normigo. Ĝi traktas plej profunde signifojn de kelkaj formoj, sed ĝi ne klopodas kvalifiki la koncernajn rimedojn. Male, en kelkaj naciaj fakliteraturoj pli kaj pli akriĝas la demando pri la naturo de la esprimiloj – ĉu ili estas de leksika karaktero aŭ de gramatika, kiel la diversaj rimedoj de ag-aspekto konsistigas, formas sistemon en iu konkreta lingvo.

La demando, ĉu en Esperanto ekzistas **gramatika** esprimsistemo verba de la menciita „ag-aspekto", estas traktata abunde ekzemple en *Bazaj principoj de Esperanto kiel internacia lingvo* de Vilho SETÄLÄ, en *Memuaro pri la Esperanta pasivo* de Ebbe VILBORG, en *Esperanto – lingvo de moderna tipo* de C. STØP-BOWITZ (ĉiuj tri aperis en la volumo: *Esperato – moderna lingvo. Studo baze de la Fundamento,* en Helsinki, 1965, ĉe Fondumo Esperanto); en *Plena Gramatiko de Esperanto* de K. KALOCSAY kaj G. WARINGHIEN, en *Perfekteco de la Esperantaj verboj* de MIMÓ), en *Simpozio pri -ATA-ITA* de kelkaj aŭtoroj (Schwartz, Pumpr, De Hoog, Kalocsay), en *Vojaĝo inter la tempoj* de KALOCSAY (1966) ktp. Se oni volas legi kompetentan, tre detalan kaj valoran kritikon de la ĝisnuna literaturo pri *-ata -ita*, mi sincere proponas la bonegan verkon de Olav Reiersø1: *La uzo de konjugaciaj formoj en Esperanto* (provizora manuskripto, finita en majo 1978.)

Mi volus mallonge okupiĝi pri la skizita problemo laŭ kelkaj vidpunktoj. Unue mi prezentos la punktojn de la Esperanta sistemo de verboformoj, kiuj ebligis la diskuton inter esperantistoj, la plej gravajn erojn de ambaŭ eblaj (proponataj) signifo-sistemoj. Poste mi provos montri iom pli larĝajn koordinatojn de la problemo helpe de kategorioj de la naciaj lingvistikoj kaj de miaj, supozataj, kategorioj, fine plej verŝajne decos ion diri ankaŭ pri la perspektivo de pli firma ol la nuna normigo.

La problemon de la semantike komprenata aspekto aŭ ag-aspekto rimarkigas al la esperantistaro la strukturo de la Esperanta pasivo. Por demonstri ĝiajn propraĵojn mi prezentos ĝin paralele kun la aktivaj formoj

AKTIVAJ			PASIVAJ	
	kompleksaj	**simplaj**		**kompleksaj**
	skribINTA			skribITA*
estIS	skribANTA		estIS	skribATA*
	skribONTA	skribis		skribOTA
	skribINTA			skribITA*
estAS	skribANTA	skribas	estAS	skribATA*
	skribONTA			skribOTA
	skribINTA			skribITA*
estOS	skribANTA	skribos	estOS	skribATA*
	skribONTA			skribOTA
	9+3 = 12	formoj		9 formoj

[1] La prelego aperis presita en la volumo: Dr. Szerdahelyi, István (red.) 1980: Miscellanea interlinguistica. Interlingvisztikai szöveggyűjtemény. Interlingvistika Antologio. Antologia interlinguistica. Tankönyvkiadó. Budapest, 413-422.

Oni povas vidi, ke pasivo havas naŭ plus tri formojn, sed tiuj plus tri ne komplikas, male: simpligas la uzadon de la aktivo. Unue kaj plej evidente ili simpligas ĝin pro tio, ke la formoj *skribis* kaj *skribos* anstataŭas, se necese, po kvar kompleksajn formojn (*estis skribinta, estis skribanta, estis skribonta, estas skribinta; estas skribonta, estos skribinta, estos skribanta, estos skribonta*). La sola ne menciita kompleksa formo estas la formo *estas skribanta*, kiu respondas al la simpla *skribas*, parte parafraze, parte kontraste. (Komparu: *Mi ĝuste skribas leteron al mia amiko – Mi estas skribanta leteron al mia amiko* – du samsignifaj frazoj. Aliparte: *Mi ofte skribas leteron, sed nun mi estas skribanta taglibron.* Due kaj – ne evidente, sed plej grave, la simplaj formoj de la aktivo faciligas la lingvouzon per tio, ke ili sendube rajtas anstataŭi SUMOJN de signifoj de po du kompleksaj formoj – almenaŭ laŭ la itismo, aspektismo kaj multaj Zamenhofaj kaj ne-Zamenhofaj tekstoj.

Nome *skribis* povas stari anstataŭ iu teoria *estis skribanta* kaj fine *estis skribinta*, ja ĉi lasta kompleksa formo devus esprimi, signante daŭron de ago kaj poste postagan staton, propre la t.n. plenumiĝon de la ago, kiun oni ja povas koncepti ankaŭ kiel transiron al postaga stato. La plej granda avantaĝo de la simpla formo *skribis* do estas ne tio, ke ĝi povas anstataŭi kvar aliajn formojn, sed tio, ke ĝi povas esti uzata, kiam eĉ unu el la kvar ne konvenas strikte.

Aliparte en la pasivo estas nur naŭ formoj, ĝeneraligo de kiuj (po tri aŭ kvar) ne estas ebla, do la parolanto devas zorge elektadi el la precizemaj formoj de la tipo *estis skribita, estis skribata*, eventuale *estas skribita* paralele kun la komuna aktiva varianto *skribis*. Laŭ ĉi tiu elektado la esperantistoj dividiĝas en du partiojn: parto de ili estas „tempuloj", parto estas „aspektuloj".

Por marki la du skolojn cetere diversaj aŭtoroj uzas diversajn terminojn (kolektitajn de VILBORG en la notoj post sia *Memuaro pri la Esperanta pasivo*), de Hoog kontrastigas Zamenhofan sistemon (ĝi estas la aspektisma sistemo) kaj ata-sitemon, Jung kontraŭstarigas aspektan respektive tempan sistemon, Kalocsay interalie zamenhofan sistemon kaj pluskvamismon. Mimó itismon kaj atismon, Pumpr aspektan sistemon kaj atismon aŭ simetriismon, Régulo Pérez, Schwartz/Sonnenfeld parolas pri aspektuloj, zamenhofanoj respektive pri atismo, simetriuloj, Støp-Bowitz distingas aspektan sistemon kaj tempan sistemon.

La du grupoj da terminoj montras, ke kelkaj en la kompleksaj verboformoj vidas unuavice eblon por esprimi relativan tempon de diversaj agoj, eble egale estintaj aŭ same estontaj (temas pri ata-sistemo, aŭ tempa sistemo, pluskvamismo, simetriismo ktp.), aliaj vidas en ili eblon por diferencigi nuran strebadon al efektivigo de ia celo, ago respektive plenumadon de la sama ago. (Mi devas en parentezoj aldoni, ke en ĝenerala kaj naciaj lingvistikoj la koncepto de la verba aspekto ne tute kongruas kun tiu ĉi tie).

Kvankam oni kompreneble ne povas manipuli samtempe pli ol dek terminojn por du nocioj, tamen estas interese iomete ekzameni ilin, ĉar ĉiu el ili enhavas gravan indikon aŭ argumenton pri iu el la du sistemoj. Uzo de terminoj kiel Zamenhofa sistemo, zamenhofanoj, Zamenhofa Esperanto pri la "aspektema" sistemo celas iom tro rekte atentigi pri tio, ke Zamenhof en siaj verkoj (nekonscie) preferis aspektecan uzadon de la participoj. La tempuloj estis pli modestaj aŭ malpli certaj pri sia Zamenhofeco, ĉar ili ne uzis la terminon „Fundamentismo", nome ili arogas sin per tio, ke Zamenhof en *Fundamento de Esperanto* la participojn nomas de estinta, estanta kaj estonta tempoj (*dejstviteln. zaloga, nastojaŝčego vremeni, ...preŝedŝ. vremeni* ktp. *Imieslów czynny czas terazniejszego, ...czasu przeszlego, ...czasu przyszlego, imieslów bierny czasu terazniejszego* ktp.) La termino *itismo* pri la sistemo nomata aspekta signas, ke ĝi preferas la formon kun *-it-* okaze de iu ajn pasinttempa ago (ĉu preterita, ĉu pluskvamperfekta), se la ago atingis sian internan limon, do tute plenumiĝis, havas aŭ havis rezulton.

La termino *atismo* atentigas, ke la tempoprefera sistemo proponas formon kun *-at-* (ekz. *la letero estis skribata*) sendepende de la rezulto, de atingo de la interna limo ktp., se la ago ne estas pluskvamperfekta, do antaŭtempa al la agserio, pri kiu propre temas. (Ekz.: *La letero estis skribata, poste portata al la poŝtkesto kaj ĵetata en ĝin*, sed: *La letero estis portata al la poŝtkesto kaj enĵetata, ĝi estis skribita dimanĉe*). La termino *simetriismo* pri la tempoprefera, atisma, pluskvamisma sistemo aludas, ke laŭ la opinio de la respektiva partio nur ĉi tiu sistemo povas starigi simetrion inter la pasivo kaj aktivo en Esperanto, ja en la aktivo *estis -inta* nepre signifas antaŭtempecon en preterito (tio estas, pluskvamperfektecon), kaj la ĉi-rilata neŭtraleco de *estis -ita* rompas la ekvilibron. Tamen, ĉiu povas rekoni, ke tuta simetrio neniel povas esti ĉe la nunaj formoj. Nome al la ĵus cititaj pasivaj formoj atismaj en la frazo *La letero estis portata al la poŝtkesto…* neniel povas respondi *Oni estis portanta la*

leteron al la poŝtkesto kaj enĵetanta ĝin, ĉar la atistoj, kvankam neas la nefinitecon, daŭrecon de *-at-*, ne faras tion pri *-ant-*, kaj – kontraste al *-at-* – la participan sufikson *-ant-* ili ne uzas en konstrukcioj, esprimantaj finitan, rezultan agon. Estas alia afero, ke en ilia teorio ĉi tiu punkto ne estas abunde traktata.

La bazo de la opinio de la atistoj – krom la menciita artikolo en La Zamenhofa Fundamento – estas la sekvanta analizo de la kompleksaj formoj mem: La participa parto de la kompleksaj verboformoj esprimas tempon, rilatan al la tempo de la kopulo, do en „*estis skribata" skribata* estas „nuna", aktuala, samtempa rilate al *estis*, la tuta konstrukcio do estas simple preterito. En la formo *estis skribita* la participo *skribita* signas estintecon, antaŭtempecon rilate al *estis*, do la tuta kompleksa formo nepre havas signifon de pluskvamperfekto. (Parenteze mi mencias, ke mi aldonis la vorton nepre, ĉar pluskvamperfektan signifon povas havi ankaŭ simpla aktivo, laŭ ambaŭ skoloj – sed ja ne devige.)

Aspektuloj permesas eventualan pluskvamperfektan kaj stat-pasivan signifon de la formo *estis -ita*, sed kiel bazan signifon ili pretendas signifon de tute, se la ago povas havi rezulton, rezulte finiĝinta ago (ĉu en la estinteco, ĉu en la estonteco). Pri *estis -ata* ili opinias jene: estas klare (ankaŭ por itistoj), ke la finaĵo *-as* de la prezenco – krom estanteco – esprimas ankaŭ nefinitecon, senrezultecon. Se oni diras *Mi nun skribas leteron*, tio ne povas signifi, ke la letero nun estas ankaŭ preta. Ĉi tiu nefiniteco inherenta, duagrada en la prezenca finitivo, laŭ atistoj fariĝas primara en la preterito, kaj en pasivo, kaj en aktivo. *La letero estis skribata* laŭ atisma klarigo povas signifi nur, ke la procezo de skribado komenciĝis, sed oni ne havas informon, ĉu ĝi finiĝis, estas certe sole, ke en la priparolata tempo ĝi daŭris, (supozeble paralele kun iu pli grava okazo, ago). Laŭ la itismo, sekve, en la strukturo „*estis -ita-*" *-ita* akcentas la finan fazon de iu ago (*La letero hieraŭ estis skribita* = (Estas certe, ke) la letero hieraŭ vespere jam estis preta) sed, iom metafore sorbas ankaŭ (aŭ povas sorbi) la signifon de la daŭro de la ago, antaŭpreparanta la rezulton. Do *estis skribita* ofte signifas kvazaŭ …*estis skribata kaj fine skribita*.

Ambaŭ partioj konsentas pri tio, ke kompleksaj formoj kun *-ata* povas signi ripetiĝon. Teorie estas interese, ke oni ne atentas pri la malsimetrio ĉi-rilata, ja la aktiva *-anta* signifas daŭron, sed ne ripetiĝon. Ĉi tiun fakton ne forigas eventuale rekono de tio, ke la signifo de ripetiĝo de *-ata* formiĝis laŭ neceso kaj sufiĉo el *-adata* kiel tro longa finaĵaro.

Mi trastudis ambaŭ sistemojn kaj mi konvinkiĝis, ke – kvankam neniu el ili sukcesis atingi la deziratan simetrion – ambaŭ estas, se ne same, almenaŭ simile konsekvencaj en si mem, ili ambaŭ estus, estas uzeblaj. Kompreneble, la tempisma sistemo (la atismo) perdas la ĝeneralan, gramatikan eblon esprimi la (semantike komprenatan) aspekton, dum la alia sistemo perdas precizecon rilate relativajn tempojn. Tamen, kiu el ili validu ŝajnas afero de interkonsento kaj (aŭ) tradicio.

Ĉefe la aspektuloj, sed parte ankaŭ la tempuloj klopodas sin apogi per interpretado de la Zamenhofa verkaro. Tio ŝajnas metodo efektive aplikebla. Tamen, ŝajnas al mi, ke Zamenhof estas ofte motivata de io alia, ol la analizantoj supozas. Nome: oni analizas plejparte laŭ la menciita finiteco-nefiniteco respektive kontrasto de (simpla) preterito kaj pluskvamperfekto, dum Zamenhof – kiel la fakton mem preskaŭ ĉiuj rekonas – estas influata de la slava – pola kaj rusa – verba aspekto. Kaj oni nepre devas atenti pri tio, ke la slava aspekta sistemo prezentas multe pli da vindpunktoj, ol la menciitaj du.

Estas same interese, ke la futuro (*estas skribota*, *estos skribata, estos skribota*) kutime ne kaŭzas gravan problemon al la analizantoj. Tion Kalocsay klarigas per tio (*Vojaĝo inter la tempoj*, 55-8), ke pri io estonta oni neniam scias detalojn (ekzemple, ĉu la respektivaj agoj estos finitaj aŭ ne ktp.). Tio estas penso konsiderinda kaj finfine prava, tamen mi pensas, ke iom pli simple estas – por trovi la senperan kaŭzon de la specialeco de la futuro – iom ekzameni la influintajn slavajn lingvojn, kaj la proponitan de Kalocsay prakaŭzon atribui al ili.

Støp-Bowitz, kiu cetere, kiel unu el la akademia triopo, refutas la aspektisman sistemon, prave opinias en sia menciita studo, ke ian aspekton (mi aldonas: semantike komprenatan) havas ĉiu lingvo, kaj ke la plej grava diferenco inter la esperantistoj aspektpreferaj kaj tempopreferaj estas rilate la signifon, kiun ili atribuas al la unuopaj verboj. Nome: laŭ tempuloj, multaj verbradikoj enhavas leksike la sencon de rezulteco, dum laŭ la aspektuloj la rezulto estas aparte – gramatike – esprimenda. Laŭ la interpretado de tempuloj *konstrui* povas nur signifi 'kunmeti brikojn (panelojn) ktp., ĝis la domo estas preta', do se la domo ne fariĝas preta, oni ne rajtas diri, ke „oni konstruis domon", nek "la domo estis konstruata", nur „oni provis, volis, klopodis, celis, komencis ktp. konstrui aŭ laboris ĉe

konstruado de domo" ks. Samtempe aliaj verboj leksike ne enhavas aludon pri rezulto (*dormi, labori, promeni* ktp.). La kontraston *Ili estis okupantaj la ĉefurbon* : *Ili okupis la ĉefurbon* tempulo esprimos certe sekvamaniere: *Ili batalis por okupi la ĉefurbon* respektive *Ili okupis la ĉefurbon : Ili sukcesis okupi la ĉefurbon* ktp. Aŭ por citi liajn proprajn ekzemplojn: aspektisme oni diras: *Hieraŭ la libroj estis vendataj, sed ne venditaj,* ĉi tie tempisme – do korekte – oni devas diri: *hieraŭ la librojn oni provis vendi, sed ili ne estis vendataj* ktp.

Ne tute hazarde mi citis – nur laŭ senco – la opinion de Støp-Bowitz. Nome – sendepende de lia opinio pri la diskuto -ATA -ITA – liaj nocioj ŝajnas tre trafaj kaj proksimaj ankaŭ al la nocioj de la moderna lingvistiko. Kion li nomas „aspekto" ĉeestanta en ĉiu lingvo, oni povas akcepti kiel ekvivalenton de la menciita aspektual'nost', Aspektualität, aŭ semantika aspekto, tio estas esprimado de interrilato de ago (verbenhavo) kaj tempopaso sendepende de la kvalito de la esprimiloj. Tia aspekto efektive ekzistas en ĉiu lingvo, ja per tiu aspekto aŭ eble „aspektualeco" ni difinis nur ion esprimendan, nur enhavon, spegulendan realon kaj ne „lingvan rimedon".

La esprimadon de tiu aspektualeco[2], semantika aspekto aŭ ag-aspekto en diversaj lingvoj partoprenas la sekvantaj kategorioj: „agmaniero", verba aspekto, aspektualeco de adverboj, konjunkcioj, subjunkcioj. „Agmaniero" estas spegulvorto de *Aktionsart* kaj *sposoby dejstvija*: eble pli esprimive oni povas ĝin nomi en Esperanto (laŭ ne sentradicia maniero) „leksika aspekto". Ĝi estas ag-aspekto, esprimata de la verba radiko mem. Diversaj verboj povas havi diversajn leksikajn aspektojn, la sama verbo ne devas havi diversajn formojn por diversaj leksikaj aspektoj. Ekzemple *dormi* havas alian leksikan aspekton, ol *preni,* sed tiu leksika aspekto ne influas iliajn gramatikajn formojn.

Eble tiu leksika aspekto estas la kaŭzo de tio, ke por esprimi la saman samtempecon, por la esprimo de kiu okaze de la verbo *konstrui* ni preferas la formon *estas konstruanta*, okaze de la verbo *dormi* plene sufiĉas la formo dormas. Diferencas laŭ leksika aspekto la verboj de la tipo *venas*, *proksimiĝas, evoluas, legas* – kiuj povas atingi ian ekstremon, limon de sia „disvolviĝo" kaj estas konsideratajkiel prezentantaj agon, kiu evoluas direkte de io – kaj verboj de la tipo *staras, vidas*, *aŭdas*. La unua grupo prezentas t.n. evolutivajn verbojn, la dua – statikajn. Laŭ leksika aspekto estas kontrastigeblaj la verboj *preni* kaj *teni*, aliparte *preni* kaj *kolekti* (komparu: ekteni kaj prenadi). Mi pensas, ke mi nun donis ekzemplojn de leksikaj aspektoj „daŭra", „komenca", „statika", „evolutiva", sed ne estis mia celo denombri ĉiujn aŭ difini ilin. Mi ne scias, kiom da leksikaj aspektoj estas supozeblaj en Esperanto, sed mi pensas, ke pluraj.

Povas esti leksika karakterizaĵo de iu verbo, ke ĝi estas uzebla nur por esprimi ripetan agon (kolekti), sed povas iun verbon karakterizi tio, ke ĝi uzeblas kaj „aktuale", kaj por esprimi ripeton (*La hundo manĝas viandon*) ktp.

Ĉe la leksika aspekto (*Aktionsart*) ni vidis, ke ĉiun leksemon ni devas aparte kvalifiki laŭ ties aspekta valoro. Ĉe verba aspekto oni eble povas aserti, ke al la sama leksemo povas aparteni diversaj aspektaj valoroj laŭ diversaj gramatikaj esprimiloj, rilataj kun la sama leksemo, vorto. A1 ĉi tiu kategorio apartenas ekzemple la opozicio rusa *On proverjal* : *On proveril*, sed ankaŭ la Esperantaj *Ĝi estis kontrolata* kaj *Ĝi estis kontrolita* (laŭ la aspektisma koncepto). Certe havas karakteron de opozicio laŭ verba aspekto ankaŭ la formoparo *Li kontrolis* kaj *Li estis kontrolanta*. Estas pli da problemoj pri la paro *Li trinkis la akvon* (duaspekta verbo) kaj *Li eltrinkis la akvon* (kun unu, perfektiva aspekto, sed ĉu verba, gramatika?).

Kvankam eble oni povus aŭ eĉ devus pri la sekva afero paroli pri la leksika aspekto, mi preferus aparte mencii diferencon inter diversaj verboj laŭ koncerno-grado al la objekto aŭ subjekto. Ni scias, ke objekto, subjekto povas esti tutaj aŭ partaj, sed tion kelkfoje esprimas mem la verbo. (Ekzemple: *Mi travidas la situacion*). Eble meritas atenton la fakto, ke tia tut-koncerno de la verbo + ĝia samtempa evolutiva leksika aspekto rezultigas perfektivan aspektualan (gramatike-aspektan?) valoron.

Laŭ verba (gramatika) aspekto certe ne ekzistas tiel multe da grupoj kiel laŭ leksikaj aspektoj. Plej verŝajne nur du gramatikajn "verbajn" aspektojn oni povas rajte supozi en Esperanto – ĝuste laŭ la participoj respektive kompleksaj formoj kun *-ata* kaj *-ita*. Estas atentinde, ke la diversaj laŭ leksika aspekto verboj diverse laŭ kvanto kaj kvalito rolas en la verbaj, tio estas gramatikaj aspektoj. Ja *-ata* ekzemple povas signifi daŭron, samtempecon, respektive ripetiĝon, kion el tiuj eblaj signifoj ĝi realigas, tio dependas de la leksika aspekto de la verbo.

[2] Tamen, „aspektualeco" ĉi tie estas mia „unufoja", provizora vorto prefere ne imitinda, kiun mi uzis nur por speguli alilingvajn terminojn pri la kompleksa semantika kategorio ne konsideranta specifan esprimrimedon.

Estas, mi pensas, evidente, ke adverboj povas havi diversajn aspektajn valorojn. Se ni supozas, ke la du „rajtaj" gramatikaj aspektoj de la verbo estas la perfektiva kaj la imperfektiva, tiam certe la adverba konstrukcio *tuj post -o* preferas perfektivan, la pli kaj pli imperfektivan aspekton, do ankaŭ ili mem estas aspekte karakterizeblaj. Same mi opinias pri la konjunkcioj kaj subjunkcioj. Kaj toleras ekzemple kaj sinsekvon, kaj samtempecon: *Li kuŝis kaj legis*, respektive *Li stariĝis kaj foriris*. Aliparte *dum* ekskludas sinsekvon: *Dum mi parolis, li skribis*. Ankaŭ adjektivo, eĉ substantivo + epiteto povas havi apartan aspektan valoron.

Certe vi rimarkis, ke rilate propre la verban, gramatikan aspekton mi restis hezitema, pli precize mi konstatis nur ĝian ekziston en Esperanto. La kaŭzo de tio estas, ke mi volus ankoraŭ mallonge ekzameni la ofte aludatan slavan influon al ĉi tiu kategorio.

Esperantologoj grave eraras pensante, ke la slavaj imperfektiva kaj perfektiva aspektoj opozicias nur laŭ finiteco-nefiniteco kaj unufojeco-ripetiĝo. Grava signifo estas ekzemple de la perfektiva aspekto la sinsekveco de la koncernaj agoj, sed perfektiva povas signi unuopan, unufojan agon kiel „ekzemplon de ripetiĝanta ago" kun iom forta stilistika valoro. (*On tebe kogdanibud' pokaĵet, kak eto delajetsja*). Perfektiva aspekto povas esprimi – sendepende de samtempeco, sinsekvo, rezulteco ktp.) kapablon, povon, aŭ senkapablon. (*Dengi najdutsja, Tuda ne vojd'oŝ* ktp.). La imperfektiva aspekto estas konsiderata de multaj lingvistoj kiel nemarkita membro de la aspekta opozicio, do oni povas uzi imperfektivan aspekton teorie ĉiam, se oni ne volas esprimi ion, kion oni povas esprimi per la perfektiva aspekto (sinsekvo, rezulteco, povo ktp.).

Eble estas alia interpreto de la sama afero, kiam slavaj lingvistoj parolas pri imperfektiva aspekto de konstatado pri fakto. Jen unu afero, kiu klarigas multe da ekzemploj, pri kiuj oni konsideris, ke laŭ la aspekta sistemo ne estas klarigeblaj. Simila fenomeno estas, ke en la rusa ekzemplo oni povas uzi imperfektivan aspekton en volitivo por hastigo, refoja ordono pri konata afero, por esprimi nevolon en futuro ktp. Ĉi tiuj konstatoj, mi pensas, helpas kompreni multajn Zamenhofajn uzmanierojn, aliflanke ili proksimigas la tempan kaj la aspektan sistemon. Ja se ni konsideras nur tiun propraĵon de la slavaj lingvoj, ke ili malgraŭ finiteco de la ago permesas, eĉ preferas imperfektivan aspekton, se gravas en la frazo adjekto de maniero aŭ la subjekto aŭ iu ajn rilata cirkonstanco, eĉ ne signita en la frazo, tiam evidentiĝas, ke imperfektiva aspekto estas akceptebla preskaŭ ĉiam, se ne gravas la rezulto kaj ne temas pri rakonto de strikte sinsekvaj agoj. Kelkaj citas frazojn de Zamenhof (por argumento kontraŭ la aspektismo) kun imperfektiva aspekto kun neado, sed ja neado en la slavaj lingvoj kutime postulas imperfektivan aspekton, escepte, se temas pri nepovo, neokazo de io atendita aŭ atentigo pri ebla hazarda malagrablaĵo.

Danke al Støp-Bowitz mi havas liston da Zamenhofaj frazoj, kiuj laŭ lia opinio kontraŭdiras al aspektisma uzado de la kompleksaj verboformoj – tamen, ili almenaŭ laŭ slava aspekto estas kompreneblaj, kaj se nun aŭ poste ni havos ankoraŭ tempon aŭ iun aparte interesas, ni povas ilin analizi. Nun mi nur citos kelkajn el la ekzemploj. p.17.1.7: „La nun proponatan broŝuron la leganto kredeble prenos en la manojn kun malkonfido, kun antaŭe preta penso, ke al li estos proponata ia neefektivigebla utopio." p. 26.1.17-18: „Ŝercojn, kiuj de illaj legantoj estis eble prenataj por kritiko." p. 46.1.16: „la unueco de Esperanto neniam estos rompata." p. 59.1.13: „Ili volas, ke tia aŭ alia ŝanĝo estu farata nun."

Ofte la miskomprenon kaŭzas simple tio, ke oni konsideras diversajn signifojn (leksikajn aspektojn) de la sama verbo. Klasika ekzemplo de tio estas la verbo okupi en diversaj – same rajtaj – uzoj. „*Okupi*" nome signifas kaj *ekesti ie, ekhavi ion* (kiel lokon), kaj *esti ie*, *posedi ion kiel lokon*. Komparu: *Ĝi okupis grandan lokon* kaj *Li okupis la pli grandan ĉambron* en la signifo: 'li prenis por si'. Pro tio same eblas *La ĉambro estas okupita de li* kaj *estas okupata de li*. Same la verbo *akcepti* povas signifi ian ŝanĝon ('ekhavi ekz-e la saman opinion, konsentigi'), sed ankaŭ ian staton ('havi la saman opinion, konsenti'). Sed tion alirilate ni jam menciis.

Teo Jung mencias en *La Esperanta Konjugacio*, ke Esperanton post *Plena Gramatiko* de Kalocsay-Waringhien la itistoj ekuzis pli itisme, ol pli frue. Tio estas vero, ja laŭ la slava analogio, kiu influis doktoron Zamenhof, la reala opozicio (malgraŭ la terminoj) ne estas perfektiveco : imperfektiveco, sed perfektiveco : neŭtraleco, kiu inkluzivas eblan imperfektivecon.

Oni kelkfoje eksperimentis por krei kompleksan verboformon pasivan, kiu nek esprimus staton, nek estus komprenebla kiel pluskvamperfekto. La rezultojn de tiuj provoj bone resumas Kalocsay en *Vojaĝo inter la tempoj* (1966), p. 189-90. La plej gravaj proponoj estas: krei neŭtralan pasivan participon (*-aita, -aŭta),* uzi kiel kopulon *iĝi* anstataŭ *esti*, uzi alian kopulon, ekzemple *veni*. Al mi

ŝajnas plej facile realigebla ĉi-senca kopuliĝo de *iĝi*, ja ekzistas analogaj konstrukcioj *iĝi bela, iĝi populara*.

Ankoraŭ pri unu afero mi volus atentigi, kiu eble „mortigos" preskaŭ ĉion diritan ĝis nun. Nome mi ne estas certa, ĉu en Esperanto – se oni distingas aspektojn – oni devas distingi nepre du. Anstataŭ longa klarigado provizore mi prezentos analogion. Kvankam en la rusa en la opozicioj *konĉik : konĉika* kaj *mal'ĉik : mal'ĉika* kontraŭstaras po du formoj, ili evidentigas tri kazojn. Nome la funkciolimo inter *konĉik* kaj *konĉika* estas ali-loke, ol inter *mal'ĉik* kaj *mal'ĉika*, oni do povas klare distingi nominativon, akuzativon kaj genitivon. Simile estas konceptebla la aspekta sistemo en Esperanto:

Aktivaj	kopulo + -anta -as, -is, -os	(-ad)as, -is, -os	-as, -is –os
Pasivaj	kopulo + -ata	kopulo + -ata	kopulo + -ita
	Imperfektiva (pri samtempeco)	Ripeta	Perfektiva

Esperanto kaj ĝia uzado en familio

(1986)

Persona enkonduko

Iom pasiva en aliaj sferoj de la Esperanto-movado, mi aplikas Esperanton – subtenate kaj helpate de mia edzino – en nia „biologia kaj socia reprodukto"; pli simple kaj klare: mi instruas al miaj tri infanoj Esperanton pere de ĝia ekskluziva uzado en nia interrilato. Kiom ajn tio ŝajnas fortostreĉo de solulo, la afero apenaŭ estus ebla sen tradicio stabiliĝanta, sen kunsento, kunlaboro, modelo de tiu kelklanda kolektivo spontanea, kies membroj plenkreskaj, agantaj simile, decidis kunvenadi kaj kunvenigadi siajn infanojn por ĉiujara retrovo de emo kaj energio por la plua laboro. Ernő Csiszár, Aleš Bednařik, Barbara kaj Stanislao Pochanke estas kvazaŭ fondintoj de tiu kolektivo, kiuj per sia ekzemplo ankaŭ min grave influis. Mi ne scias, kiuj estis iliaj senperaj antaŭuloj, sed estas menciinde, ke la unuaj denaskaj esperantistoj – laŭ *Esperanto en perspektivo* – estis la infanoj de Butler, kaj la sama fonto scias pri ĉ. 200 esperantistoj denaskaj.

Eble la supra alineo ŝajnigas mian rilaton al la temo emocia, tamen mi pensas, ke emocia estas nur mia praktiko. Sube mi prezentos konsiderojn, laŭ kiuj studado de Esperanto uzata kaj instruata en familioj povas liveri utilajn konojn parte al la ĝenerala lingvistiko kaj psikolingvistiko, parte al esperantologio kaj la Esperanto-komunumo mem. Poste mi liveros malgrandan korpuson por ebligi ĝian ekzamenon al mi kaj al aliaj; tekston notitan kun fonemnivela precizeco laŭ magnetofona registraĵo farita en nia hejmo antaŭ kvar jaroj. Fine mi iom komentos tiun tekston kaj resumos miajn pli ĝeneralajn observojn – sen pretendi sciencan ekzaktecon kaj nepran ĝustecon.

Konsiderindeco de la temo por ĝenerala lingvistiko

Chomsky opinias, ke kunnaskitecon de kodo por lingvoalproprigo atestas la fakto, ke infanoj en tre mallonga tempo, surbaze de relative malgranda nombro da samtipaj frazoj, lingvaj unuoj, kapablas ellerni ĉiun gravan strukturon, frazotipon de sia lingvo – malgraŭ tio, ke multaj frazoj, lingvaj formoj de la ĉirkaŭo estas eraraj. Spontanea alproprigo de Esperanto povas, eĉ se ne pruvi, iom subteni lian tezon ankaŭ tial, ĉar ĉe la gepatroj oni povas supozi eĉ pli da eraroj, ol estas kutime en parolo etnolingva. Kompreneble temas nur pri alproprigo de modeloj, strukturoj kaj elementoj, kiuj tamen estas aŭdataj: morfemon neniam aŭditan nenia kunnaskita lernomekanismo povas gravuri en la memoron.

Eĉ pli da sukceso ol en la kampo de la sistem-alproprigo oni povas atendi en la ekzamenado de la lingvo-apliko de la infanoj. Psikolingvistoj pli klare ol cetere povus kompari evoluon kaj staton de kapablo uzi la rimedojn de la konata lingva sistemo ĉe persono lerninta la lingvon de beba aĝo kaj ĉe persono, kiu lernis ĝin post la ideala aĝo, kiel duan lingvon. Estas studinda la interrilato de parolo kaj agado, gestado: parolo kaj atento al la ĉirkaŭo.

Kvankam mi kaj aliaj esperantistoj ne estas sufiĉe preparitaj por psikolingvistikaj esploroj, partopreno de esperantistoj en la plua prilaboro de ĉi tiuj, pli larĝvalidaj temoj havas tre klaran avantaĝon: temas pri la evidenta pli-konscieco de la Esperantlingva parolo kaj de aŭskulto fare de esperantistoj, kompare al la konscieco lingva de edukantoj en etna lingvo.

Konsiderindeco de la temo por Esperanto kaj esperantologio

Ĉiu konkreta lingvistiko en sia sfero devas rilati iel al la demandoj de la ĝenerala lingvistiko, al ĝeneralaj prilingvaj problemoj. Tial studantoj de Esperanto, ekzemple, devus iel kvalifiki la dulingvecon de denaskaj esperantistoj: ĉu ĝi estas dulingveco koordiniĝa, ĉu dulingveco kompunda, ĉu de tria speco, ĉu de nekonata, ĉu de nova speco?

Kaj specialistoj de ĝenerala lingvistiko, psikolingvistiko kaj esperantistoj povas postuli respondon pri la demando, ĉu la ritmo kaj la maniero da la etinfana alproprigo de Esperanto diferencas de tiuj faktoroj en aliaj lingvoj? Se jes, kiom la afero dependas de la kvalito de la lingvo, kiom de la eduksituacio?

Kaj esperantistoj kaj studantoj de socilingvistiko, dialektologio povas demandi, kiel la gepatroj de denaskaj esperantistoj rilatas al la lingva normo, al eventuala nestabileco de normoj, al eventuala diverseco de lektoj en la lingvo?

Kaj fine ĉiu povas demandi: ĉu vere eblas tiel instrui Esperanton? Antaŭ ol respondeti, ni vidu la ekzemplan tekston!

Konsiderindeco de la temo por Esperanto kaj esperantologio

Sube estas presita spontanea dialogo de ludantoj, registrita magnetofone en la jaro 1982, nemulte post la renkontiĝo da esperantistaj familioj en Žilina (ĈeĥoslovakioO). Ludas Marta (5-jara), la patro (35-jara), kaj kelkfoje ĝenetas Borinjo (2-jara).

Ni fiksu la komencan situacion: la patro kaj Marta ludas en hejma ĉambro. Laŭ la ludo, ili intencas veturi en ĈeĥoslovakioN, por partopreni familian renkontiĝon. Marta preferas flugveturi, tranokti en supra ĉambro de alta hotelo kun lifto…

Marta: Ni eniru en la flugmaŝinon!

Patro: Sed ni ja estas enirintaj!

Marta: Bone. Ho kiel alte ni estas! Tie estas kuseno, malsupre!

Patro: Ĉu kuseno? Tio ne estas kuseno, sed ĝi estas granda fabriko.

Marta: Ha-ha-ha! (...)

Patro: Kiu venis?

Marta: Venis Palmeto kaj Nora.

Patro: Bone… Borinjo pisos, poste mi revenos, ĉu bone? Dume vi diru, kio okazas.

Marta: Paĉjo! Ĉu ne ni veturos duonhoron ankoraŭ! (...)

Patro: (de malproksime) Venu, ĉar je la dek-dua horo ni jam devos esti … en la centro de la urbo!

Marta: Jes! Jes! Nun iomete mi flaĝoletos! (Ŝi ludas flaĝoleton.)

Marta: Suficas! Nu ... nun ni jam estas ĉi tie! Nun ni devos iri iomete ankoraŭ.

Patro: Ĉu venis jam la ĉiĉerono? Kiu montros al ni la urbon?

Marta: Jes. Nun ni iros ankoraŭ iom. Ne! Tie estas nia domo, rigardu, apud tiu montrilo! Tio estas montrita: verda stelo. Do. – Venu! Ni jam estas en la domo! Ni jam est ...

Patro: Tuj ni iru al la akceptejo, kaj ni demandu tiun sinjorinon, kie estas nia ĉambro.

Marta: Ho! Ĉi tie estas nia lifto (...) Vitra lifto!

Patro: Ĉu travidebla?

Marta: Jes.

Patro: Nu bone, ni provu ĝin. Iomete ni liftadu.

Patro: Borinjo!! Kondutu bone! Venu ankaŭ vi en la lifton!

Marta: Prem prem prem prem prem prem prem prem! (Ŝi premas imagatan butonon.) Nu-u! Sidiĝu jam!

Patro: En kioman etaĝon ni iros?

Marta: Plej supren. Ĝjĵĵ (Imito da funkci-bruo.)

Patro: Ahaa!

Marta: Ni estas plej supre!

Patro: Jes, rigardu! Dek-dua etaĝo. Estus bone iri sur balko...

Marta: Samtempe: Dudek-dudek-dudek-dudek… (Supozeble ŝi pensas, ke tiel estas pli multe.)

Patro: Dudek … eble dudek-dua. Estus bone iri…

Marta: Ne. Cent dek, cent dek cent dek kaj kvindek.

Patro: Tio ne ekzistas.

Marta: Sed, sed…

Patro: (samtempe): Diru: dumil-ducent-dudeka!

Marta: Dumil-ducent-dudeka.

Patro: Do bone.

Marta: Ni... ni rigardu… (Borinjo flaĝoletas).

Patro: (samtempe): Tiel alta estas ĉi tiu domo, ke oni eĉ ne povas vidi la teron! (Borinjo flaĝoletas.)

Marta: Ni rigardu malsupren! (Vere ŝi iras sur la balkono.) Venu ĉi tien! Ho kiel alte ni estas! Jes, jes. En du – ni povas dormi. Venu, transvenu, ni havas kuirejon. Diru ĉi tie, en la kuirejo, kion vi volos manĝi.

Patro: mmm.

Marta: Sed ne ĉi tie! Vi pensas tion? Venu! Ĉi tie.

Patro: Do eble mi manĝos fazeolan supon, kaj poste knelojn kun kazeo, kaj poste ian deserton. Torton ... torton.

Marta: Torton vi devas bele peti!

Patro: Jes. Bonvolu fine doni ankaŭ torton!

Marta: Nenion alian vi devas jam manĝi. Tiel multe estas.

Patro: Kaj ĉu mi povas ricevi sukon?

Marta: Jes, vi povas. Jen estas la torto, ĉi tiu bonega kaj ... Ĉu ni iros supren? (Borinjo faras ion malbonan.)

Patro: Ej, Borinjo. hontu ... Do ni daŭrigu! Kie nun ni estas?

Marta: Ni estas supre.

Patro: Jes ... eble sur la tegmenton de la domo! Kaj de ĉi tie oni povas vidi tre malproksimen.

Marta: Sed mi iros supren kun lifto.

Patro: Bone, voku ankaŭ la aliajn, kaj ĉiuj kune veturos per lifto.

Marta: Sed ne povas ĉiuj veturi kun lifto, en ĉi tiel malgranda lifto.

Patro: Nu bone. Ni triope, ĉu bone. Vi, mi, kaj ankoraŭ Pal…

Marta: Palmeto kaj Nora.

Patro: Do bone.

Marta: Venu, venu, venu, venu, venu!

Patro: Ni leviĝas, ni leviĝas, ni leviĝas. Ho, mia kapo trafis la plafonon, ve!

Marta: Ne ploru, tiel malbone estas, ke ĉi tiel granda paĉjo ploras!

……..

Patro: Do nun ni estas supre, sur la tegmento de la domo, kaj…

Marta: Kaj kredu, kredu min, dek vintrojn ni devos resti ĉi tie!

Patro: Ĉu dek vintrojn, ĉi tie, sur la tegmento, kaj dume ni ne rajtos iri en ĉambron? Ĉu ne estos tro malvarme?

Marta: Ne. Ĉiam dek vintrojn, ĉar unue vintro, poste somero, kaj poste aŭtuno, vintro, tiel. Tiel.

Patro: Aha. Do dek jarojn ni sidos ĉi tie. Kaj ni ĝuos la belan panoramon.

Marta: Ne! Unue vintro estas, poste somero estos, kaj poste aŭtuno.

Patro: Aha. Kaj nun kio estas, kiu sezono?

Marta: Somero.

Patro: Bone. Kiel agrable estas, ni povas ĝui la sunon.

Marta: Sed kial ni sidas en la ĉambro?

Patro: Sed ĉi tio estas la tegmento, ĵus vi diris!

Marta: Ne, ni estas en la ĉambro, ni devas eliri.

Patro: Bone, ni iru! Kaj kio estas ĉi tio?

Marta: Ho, mi trovis biciklon, do ni bicikladu! Ankaŭ mi havas mian propran grandan biciklon kun mi.

Marta: ... ni havas ... kiel estas Esperante „csónak”?

Patro: Boato.

Marta: Boaton.

Patro: Do bone, ni sidiĝu en la boaton, kaj ni remu!

Marta: Sed ni devos elporti ĝin! ...

Patro: Unue remos mi, kaj nur poste vi, ĉu bone?

Marta: Bone, bone, bone, kiel bone, bone, bone. Sed ĉi tie estas la rivero? ... Ni fiŝhokos ... Sed ankoraŭ ni ne komencis. Rem… – vi povas fiŝhoki – rem rem rem ... ni jam estas ĉi tie. (Ili jam elsaltis el la boato.) Mi montros, kiel mi elsaltis: Mi kuris, kuris ...

Patro: Nu kion ni faru? Ni grimpu sur ĉi tiun arbon!

Marta: Rigardu, kiel rapide mi grimpis! Kaj! – plej alten! Ĉi tie oni povas ankaŭ sidi! Oj! Eble ĉi tie mi transvenos. A, mi demetos la pantoflojn.

Ni nun revenu al kelkaj el la demandoj. La plej grava, sed ankaŭ la plej simpla demando estis, ĉu oni povas instrui sukcese Esperanton al infano tiel, ke iu komunikiĝas kun ĝi nur en la lingvo Esperanto. Ĉe ni la situacio estis tia, do bone pruvas, ke kvinjara infano, se dekomence edukita en Esperanto, posedas preskaŭ la kompletan formologion de Esperanto, kapablon flue paroli, sufiĉe vari-

an kaj riĉan vortostokon, elparolon kun klaraj diferencoj disde la prononco-kutimoj de la posedata etna lingvo en la punktoj, kie la normoj de Esperanto estas firmaj; sed ĝi montras ankaŭ, ke la infano povas havi iajn spurojn de nacilingva influo. Tiaj estas ĉe Marta kvinjara: nesufiĉa distingo en la uzo de la prepozicioj *kun* kaj *per*, uzo de formo *ne devi* anstataŭ la Zamenhofa *ne bezoni*, forlaso de *ĉu* en kelkaj tutecaj demandoj. La teksto cetere montras ankaŭ specon de gepatra maniero influi: nerektajn korektojn, enŝovadon de modeloj. Estas klare: esti lerninta la lingvon en spontanea maniero ne signifas ankaŭ koni ĉiun detalon de la sankciita normo. Aliflanke, ŝajnas al mi, la teksto pruvas ioman superecon de la infana fantazio kaj aplikemo kompare al la patra parolo: ĉe la infanoj oni povas rimarki pli sukcesan, pli senperan kunordigadon de agoj kaj parolo.

Estas evidente, ke Marta kaj ŝiaj samsortanoj nete distingas siajn du lingvojn; ĉiu el ili jam en etinfana aĝo havas ellaboritan skemon de lingvo-elekto. (Tio, laŭ la registraĵo, ne validis ankoraŭ por Borinjo dujara.)

Se oni kvalifikas la elementojn de la teksto – ekzemple, se oni konstatas, ke iu vortoformo estas laŭnorma, subnorma, erara aŭ de literatura stilo – oni povas demandi ankaŭ pri la kaŭzo. Ĉu laŭdindas aŭ kulpas la lernomekanismo aŭ eventuale la gepatra modelo? Aŭ io tria? Por pli bone orientiĝi, ni transiru al alia demando:

Al kiu tipo de dulingveco apartenas la dulingveco de niaj infanoj?

Surbaze de la opinioj de L.V. Ŝĉerba, Ch. Osgood, S. Erwin, A.P. Klimenko disvastiĝis la supozo, ke ekzistas du gravaj tipoj de la dulingveco; la dulingveco *kompunda* kaj la dulingveco *koordiniĝa*. Kompundan dulingvecon karakterizas, ke ĝi baziĝas sur unueca sistemo de asociado de formoj kaj uzreguloj. Al po unu uzregulo, funkcio, signato apartenas po du formoj. Tian dulingvecon bone komprenigas kaj povas malkaŝi eraraj formoj: se Hungara esperantisto diras: *mi devas iri* aŭ *al mi devas mono*, tio nepre montras la komunecon de la skemo por la Hungara kaj por la Esperanta (frazo)formoj. Tamen mi mencias, ke tute ne estas certe, ke tia posedmaniero de du lingvoj rezultigas malĝustajn frazojn. Ofte strukturoj estas vere analogaj eĉ en tute ne parencaj lingvoj. Krome la komuna funkcio, „signifo", al kiu ligiĝas du diverslingvaj formoj, ne nepre estas identa, samampleksa kun funkcio, signifo apartenanta al iu el la du lingvoj: ĝi povas esti kvazaŭ ilia komuna kovraĵo; en tia okazo oni neniam rimarkas ĉe la parolanto ian misaplikon. Ĉe ideala kompunda plurlingveco al unu „enhavo" povas aparteni tuta serio da – diverslingvaj – formoj: sekve ankaŭ tiuj formoj asocias unuj la aliajn. Jen la bazo, laŭ kiu Ŝĉerba asertas, ke homo kun kompunda dulingveco facile tradukas.

La alia konata speco de dulingveco estas nomata dulingveco koordiniĝa. Ĉe tia regado de du aŭ pluraj lingvoj ĉiu formo havas sian propran funkciad-mekanismon, propran signifon. Koordiniĝan dulingvecon akiras, laŭ Ŝĉerba, homoj, kiuj ekposedis kaj uzas la du lingvojn en tute apartaj medioj, ekz. hejme kaj en la lernejo, se paroli pri infanoj. Suprun helpas kompari la du manierojn per jenaj skemoj:

Kompunda dulingveco



Koordiniĝa dulingveco



Per la interligo de r_m (=reago-komplekso) kaj s_m (=signo-komplekso) oni prezentas, kion simple oni nomas signifoj; oni do bone vidas laŭ la skemoj, ke en la kazo de kompunda dulingveco (ĉe klara distingo de *du* formoj: S_A; S_B) peras al la reago nur *unu* signifo. Ĉe koordiniĝa dulingveco inter la signo kaj la reago peras du – supozeble proksimaj sed ne identaj – signifoj: respektive r_{m1} – s_{m1} kaj Rm_2 – S_{m2}. Mi substrekas klaran distingon de la formoj por reemfazi, ke ne temas pri ia perceptebla miksado de lingvoj, pri uzo de ĵargono makaronia.

Pri miaj filinoj kaj aliaj denaskaj esperantistetoj mi opinias, ke ilia lingvoscio enhavas elementojn kaj de la koordiniĝa, kaj de la kompunda tipo.

Simpla ekzemplo de koordiniĝo estas, ke denaskaj esperantistoj ĉirkaŭ la ago de 4 aŭ 5 jaroj bone kalkulas ĝis 10, 20 aŭ eĉ pli, ili kapablas bone eldiri nombroseriojn, sciante ke post *kvin* sekvas *ses* kaj post hungara *öt* sekvas *hat*, ili facile adicias, ekzemple *ses* kaj *du*, sed nur post pena kalkulado laŭ fingroj ili kapablas traduki la sumon en la alian lingvon. (La fenomenon mi cetere observis ĉe mia filino Borinjo, eble mi tro ĝeneraligas.) Atestas koordiniĝon, ke iajn ordonojn samesencajn ili entuziasme aŭ malvolonte plenumas, sed la samajn ordonojn ili ne kapablas aŭ ne ŝatas traduki en la alian lingvon. Ili pli facile rakontas, kio okazis al ili, ol kio estas rakontita al ili en la alia lingvo. La koordiniĝon en la okazo de miaj filinoj povas kaŭzi la konstanteco de la personoj, pli precize de la lingvodivido inter la gepatroj.

Fonto de kompunda alproprig-maniero estas fazaj diferencoj en la lingvolernado, en la ekkono de konceptoj. Kiel ekzemplon mi povas rakonti aventuron de Marta kaj mi ĝuste en Slovakia urbo Žilina. Dum Marta kun aliaj infanoj balanciĝis, mi demetis nian vojaĝsakon, por povi ilin puŝadi. Ekironte plu, ni rimarkis, ke la sako malaperis. La sekvaj tagoj fariĝis iom tedaj. Mi kaj kun mi ankaŭ Marta, iradis de distrikta polico al sekreta polico, de la ĉambro numero 54 al la numero 43. Oni pridemandis min, faris protokolon. Mi klarigis al Marta, kio estas fingrospuroj, mankateno, detektivoj kaj polichundo, kiel oni serĉas la ŝtelintojn, kial estas grave, ke ni havu, se ne pasporton, do provizoran dokumenton por elpatriiĝi, kiel estos, kiam venos la limgardistoj ktp. Reveninte hejmen, ŝi volis rakonti nian aventuron, sed evidente mankis al ŝi vortoj: ŝi demandadis, kiel tion kaj tion oni diras hungare. En tiu okazo estas memkompreneble, ke la dua vorto kroĉiĝas al la koncepto, kiun kovras la unua, jam konata, alilingva vorto. Simile estas pri multaj vortoj lernataj en la lernejo: novaĵo aperas kiel hungara vorto, kies proksimuman ekvivalenton Esperantan la „persono respondeca pri Esperanto" encirkuligas nur poste.

Ŝajnas, ke kompundiĝo, se ne malhelpata, povas progresi pro konstanta restrukturigo de la lingvoscio. Ju pli malgranda estas la infano, des pli ĝi parolas pere de paneloj: unue ĝi uzas frazovortojn kaj pretajn frazojn, poste pretajn sintagmojn, poste pretajn frazelementojn, vortformojn. Dum iu komplekso ne analiziĝas en la infana psiko, la elementoj de tiu komplekso ne estas varieblaj: eventuala fremda skemo validiĝi ne povas. Tiel estis eble, ke mia filino nur post plurjara senerara uzado de la formo *en necesejo* nur lastatempe ekuzis la hungarismon *sur necesejo*. Post tiaj okazoj, se la modeloj de la ĉirkaŭaĵo sufiĉe rimarkigas kaj konfirmas la diferencon, la infano relernas la ĝustan formon verŝajne laŭ alia analiz-nivelo.

Kompreneble, la preciza konsisto de la lingvostistemo, kiun spegulas la Esperanta parolo de la infano, ne dependas nur de elekto el tiuj du traktad-manieroj. Iuj „mistransferecaj" formoj povas aperi ankaŭ ĉe koordiniĝa sistem-organiziĝo, kondiĉe, ke la parolo de la koncerna plenkreskulo donas tian modelon.

Esperanto enhavas relative multe da fakultativaĵoj. Oni povas rimarki iomete da diferencoj ĉe la esperantistoj-gepatroj koncerne selektadon. Kvankam ekz. Esperanto permesas ĝis nun, ekzemple, multajn paralelajn intonaciajn skemojn, kaj multaj esperantistoj bone distingas intonaciojn fakultativajn, kiuj diferencas plejparte laŭ devenlingvo, mi supozas, ke nur malmultaj gepatroj strebas al pli vasta eluzo da intonacia skalo.

Ankaŭ rilate sintakson oni povas distingi gepatrojn, kiuj strebas uzi la komunan sintakson de la du lingvoj, kaj aliajn, kiuj volonte uzas la riĉajn rezervojn de la Esperanta sintakso. Tion oni rimarkas ankaŭ en la lingvaĵo de la malgranduloj: tamen similaj diferencoj en la parolo de infanoj kun la tempo malpliiĝas, interalie pro la striktaj kontaktoj. Antaŭ ol fermi ĉi tiun pensoserion, mi citas laŭsence s-ron Tišljar, kiu prave asertis, ke la apero de morfologiaj kaj sintaksaj kategorioj en Esperanto ne estas signifike pli rapida, ol ĉe alia lingvo – eĉ se la korekteco de la formoj povas aperi kelkfoje pli frue. La esenco de tiu prava rimarko kuŝas en la rekono de tiu fakto, ke la simpleco kaj unuformeco de finaĵoj ne igas nenecesa la ellaboron de la semantikaj kategorioj de temo kaj similaj.

Literaturo

Osgood, Ch. - Ervin, S.: Psycholinguistics, A surveg of Theory and Researchproblems. London 1965
Suprun, A.E.: Dva tipa dvujazyčia, perenos i interferencija. Lingvističeskije osnovy izučenija russkogo jazyka v belorusskoj škole. Minsk 1974
Ščerba, L.V.: Vostočnoluzičkoje narečije. Petrograd 1915

Esperanto kiel lingvo heredata[3]

(1990)

Vivas rimarkinda kvanto da infanoj, kiuj regule uzas esperanton en sia hejmo; kaj la plejparto de tiuj infanoj aŭdas esperanton ekde siaj unuaj tagoj en la mondo. Por iel paroli pri tiuj infanoj la esperantista socio ekbezonis terminon: anstataŭ uzi longajn ĉirkaŭfrazojn nun oni nomas la infanojn, dekomence edukatajn en la lingvo esperanto, denaskaj esperantistoj [aŭ denaskuloj]; konsekvence la pensmanieron, strebadon, kiu produktas tiajn infanojn, oni pli kaj pli ofte nomas denaskismo.

Denaskismo ne estas la sola formo de la familia uzado de esperanto, tamen ĝi estas speciale atentinda. Ĝi certe estas interesa por esperantistoj, sed verŝajne ĝi meritus la atenton ankaŭ de psikologoj kaj psikolingvistoj, studantoj de pli ĝenerala dulingveco.

En mia referaĵo mi intencas nur supraĵe prezenti kelkajn aspektojn de la spontana, enfamilia alproprigo de la lingvo kaj de la rezultanta vivopraktiko. Enkonduke mi diros kelkajn frazojn pri la stato de la denaskismaj movadoj entute, sed mi esperas, ke Zlatko Tišljar, Renato Corsetti aŭ aliaj baldaŭ tion kompletigos kaj ĝisdatigos. Surbaze de magnetofonaj registraĵoj mi iom karakterizos lingvajn kapablojn de denaskaj esperantistoj. Mi diros mian opinion pri la speco de dulingveco, kiun denaskaj esperantistoj posedas, sen pretendi nepran kompetentecon pri tiu temo. Mi donos ekzemplojn de individua lingva evoluo de infanoj proksimaj al mi; en tiu parto temos do pri miaj infanoj kaj pri infanoj de miaj amikoj-esperantistoj. La ekzemplojn oni kompreneble povus ŝanĝi, sed la ĝeneralaj impresoj kaj observoj verŝajne restus tre similaj. Kelkloke mi tuŝos la rilaton inter la denaskisma apliko de esperanto kaj la lingva sistemo mem: ĉu la infanoj detruas, modifas ĝin, kaj se jes, do kun kiaj konsekvencoj.

Denaska esperantisto estas, kiel aludite, persono alpropriginta esperanton en sia infanaĝo kiel hejman lingvon, en spontana maniero. Al tia infano oni heredigas la zamenhofan lingvon simile al etna gepatra lingvo, do simple per tio, ke iu el la gepatroj aŭ ambaŭ interparolas kun li ekskluzive, plejparte aŭ ĉe difinitaj cirkonstantoj regule, en tiu lingvo. Per tio mi estas espriminta, ke la lingvaj cirkonstancoj de la denaskuloj tamen estas diversaj. La samon oni povas diri pri la du motivoj, kiuj igas la gepatrojn procedi tiel: ofte esperanto estas la komuna lingvo de gepatroj diversnaciaj; en aliaj okazoj la gepatroj konscias, ke ili povas partoprenigi sian infanon en la internacia, societa vivo, kiun ili mem partoprenas, nur, se la infanoj posedas la rimedon por tio; denove aliaj vidas en la hejma apliko kaj heredigo de esperanto unu el la ebloj puŝi antaŭen la lingvon. La historion kaj esencon de la denaskismaj ideo kaj praktiko detale studis kaj studas Aleš Bednařik kaj Ernő Csiszár, la konstruiĝon de la gramatikaj modeloj de esperanto kaj de la paralele alproprigata etna lingvo dum la infana evoluo esploras precipe Zlatko Tišljar. Pluraj fontoj verŝajnigas, ke la unuaj denaskaj esperantistoj estis la gefiloj de la anglo Butler, kiu mem estis esperantisto de la jaro 1905. La plej gravajn indikojn resumis kaj komentis Ernő Csiszár en Literatura Foiro n-ro 98, po. 13-18, kaj Hungara Vivo, 1987/3, p. 108-10. Citinte la opinion, ke la nombro de la denaskuloj estas inter 200 kaj 300, Csiszár emfazas, ke la movadeto, kvankam disa, havas regionajn centrojn kaj nodojn. Tiaj estas laŭ li Okcidenta Eŭropo kaj en la lastaj jaroj la landoj de Centra Eŭropo. Al la nuna evoluo multe kontribuis la familioj Csiszár – Tišljar – Bednařik-Pochanke per organizado de renkontiĝoj de esperantistaj familioj. Menciindaj estas ankaŭ la infankongresetoj, aranĝataj dum la Universalaj Kongresoj; kvankam la karaktero de tiuj infankongresetoj laŭdire de tempo al tempo varias.

Denaskismo kaj familia apliko de esperanto, kiel dirite, estas nocioj proksimaj; tamen, evidente, la dua estas pli vasta. Ekzistas familioj, kie esperanto estas lingvo lernita en kurso, lernejo aŭ individue per lernolibro, tamen poste ankaŭ uzata inter la familianoj; ekzistas familioj, kie la infanoj estas lernintaj la lingvon de unu el la gepatroj aŭ geavoj, kaj ĝi restas daŭre la ekskluziva lingvo inter tiuj du personoj; oni konas familiojn, en kiuj post iom da jaroj, kiam oni povis konstati, ke la lingvo praktike estas alproprigita, oni transiris al perioda, laŭokaza uzado de esperanto. Mi ne havas pri tio indikojn, sed mi supozas, ke al ĉesigo de la konstanta uzado de esperanto povas konduki ankaŭ ekstera premo, eĉ se nur psika, kaj kompreneble ankaŭ laciĝo de la gepatroj, kies izola strebado kutime postulas nemalgrandan fortostreĉon.

[3]La artikolo unue aperis en: Literatura Foiro, jk. 21, 1990/1, 37-46.

Antaŭ ol paroli pri specifaj demandoj de la dulingveco de infanoj-esperantistoj, kaj pri la spontana kaj konscia edukado en familioj de denaskuloj, kaj antaŭ ĉio, oni verŝajne bezonus iel sentigi la nivelon de la lingvoscio de averaĝa denaska esperantisto. Metodoj mezuri lingvan evoluon ekzistas kaj estas proponataj; da efektivaj mezuroj koncerne la hungaran lingvon estas malmulte kaj ne pri ĉiu aĝo; pri aliaj lingvoj mi ne orientiĝis. Tiel la indikoj de la malgranda mezurado, kiun mi faris por tiu ĉi okazo, havas la celon vere nur sentigi, kun apogo sur spertoj kaj imagopovo de la aŭskultantoj, kiel kapablas sin esprimi en esperanto infano kvinjara. La teksto karakterizas frazoj diritaj de mia filino Marta antaŭ kelkaj jaroj dum komuna ludado; parton de la registraĵo mi publikigis en Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko III. Kvankam ni ludis duope, mi prilaboris kompreneble nur la frazojn de la infano. La konsiderata tekstoparto konsistas el 115 frazoj. La averaĝa longo de la frazoj estas 4,25 vortoj; la averaĝa nombro de la frazelementoj estas 3,09. La frazelementoj estas 3,09.

La teksto abunde liveras ekzemplojn de ĉiuj vortkategorioj kun preskaŭ kompletaj paradigmoj tiel, ke oni apenaŭ povas dubi pri posedo de la morfologio de esperanto. Kvankam la teksto estas ne de rakonta karaktero kaj la dialogoj okazas nur inter du personoj, estas reprezentataj preskaŭ ĉiuj formoj de la verbo: indikativo, volitivo, preterito, prezento, futuro, infinitivo, pasiva participo preterita, la helpverboj *povi, devi, voli, havi*. Pronomoj personaj, posedaj, demandaj, ktp: *mi, vi, ni, ĝi, min, kiu, kion, tion, ĉiuj, oni, iu*. La substantivoj sume aperas en ĉiu ebla formo, sen kaj kun prepozicioj; aperas adjektivo kaj adverbo en superlativo, rolas numeraloj bazaj *(unu, kvar, dek, cent)*, ordaj, frakciaj *(dek-dua, duon-horo)*; konjunkcioj abunde kaj ankaŭ subjunkcioj *(do, sed, kaj, ke, ĉar)*. Sufiĉe oftaj estas ankaŭ interjekcioj kaj modale uzataj adverboj, partikuloj: *oj, do, nu, a, ha-ha, ho jes, eble*. Oni renkontas en la teksto la afiksojn *mal-, -iĝ-, -il-, -eg-, -et-, -ĉj-, el-, trans-, kun-*. Evidente porokaze estas derivitaj la vortoj *desegnilo, ĵetiĝi, transveni, kunkroĉi,* aliajn verŝajne ŝi prenis pretaj: *eliri, eniri, elrigardi, flaĝoleti, kunhavi, elporti, demeti, Palmeto*. Kelkfoje ŝi uzas tradiciajn, pretajn kunmetaĵojn: *flugmaŝino, Ĉeĥoslovakio, plenkreskulo, fiŝhoki*. Aperas substantivoj supozeble oftaj aŭ almenaŭ ordinaraj kiel: *domo, aŭtobuso, ĉambro, somero, aŭtuno, vintro,* sed ankaŭ pli specialaj kiel *fontano aŭ pantofloj*. La akcento, tute laŭ la normo, ĉiam trafas la antaŭlastan silabon, sen ia ajn spuro de ĉi-rilata misinfluo de la hungara lingvo. Aliflanke, influate de la hungara, ŝi uzas erare **kun** anstataŭ **per** en la frazo: *Sed mi iros supren kun lifto*.

Estis unu okazo, kiam mankis al ŝi esperanta vorto. Por demonstri kiel ŝi kondutas en simila okazo, mi citos la frazon kun antaŭaj kaj postaj:

Marta: *Ho, mi trovis biciklon.*
Patro: *Tre bone… ankaŭ mi havas mian propran biciklon kun mi.*
Marta: *…ni havos… kiel estas esperante „csónak”?*
Patro: *Boato.*
Marta: *Boaton.*

Poste, kiam ŝi ludis, ke ŝi remas, el la verbo *remi* ŝi, forlasante la vortigan finaĵon, kreis onomatopeon. Jen la frazo, kun la kunteksto:

Ni fiŝhokos… Sed ankoraŭ ni ne komencis. Rem… – vi povas fiŝhoki – rem rem rem… ni jam estas ĉi tie.

En la teksto de Marta estas oftaj la emociplenaj frazoj: *Rigardu, kiel rapide mi grimpis!* (ŝi denove grimpas) *Kaj! Plej alten! Ĉi tie oni povas ankaŭ sidi! Oj! Eble ĉi tie mi transvenos! Ha, mi demetos la pantoflojn!*

Kvankam la aĝo, en kiu Marta tiam estis, verŝajne estas la plej favora por esperanto, la evoluo ne ĉesas en tiu fazo. Teksto de Nora, kiun mi registris en 1986, kiam ŝi aĝis dek du jarojn, konsistas el frazoj kun multe pli da frazelementoj averaĝe, ol la teksto de Marta kvinjara. La teksto estas simile longa, ol tiu de Marta en la antaŭa ekzemplo, ĝi nome konsistas el 492 vortoj. La averaĝa nombro de la vortoj en unu frazo estas 9,87 (proksimume 5 vortoj pli multe ol ĉe la kvinjarulino). Aldoninde, inter la frazoj troviĝas eĉ frazoj kun 27-30 vortoj.

Mi petis Noran rakonti pri siaj ferioj. Eble valoras citi kelkajn ŝiajn frazojn ne nur por demonstri la gradon de kompleksecо de ŝiaj frazoj, sed ankaŭ ĉar ŝia rakonto montras, kiel denaskulo povas utiligi en internacia komunikado sian kapablon paroli esperante:

Ĝis nun en la somero mi estis en Veszprém… Venis hungaraj esperantistoj kaj ankaŭ el Jugoslavio. Venis ankaŭ niaj amikinoj, Maja kaj Danka. Ni kune pasigis tie tri tagojn. Ni vizitis la bestĝardenon kaj ekskursis en la ĉirkaŭaĵo. Poste ni hejmenvenis, ni estis hejme kelkajn tagojn, ĉe unu esperantisto, de tie ni veturis al la Adriatika maro, tie ni renkontiĝis kun la aŭstra familio kaj kun

Maja kaj Danka; ni multe baniĝis. La vetero estis tre bona. Ĉiutage ni ludis en la akvo, nur unufoje estis malbona vetero, kiam pluvegis. Ni ankaŭ vizitis urbon Pag, kie foje ni rigardis… vespere, sur la ĉefa placo, prezentadon de kantaj grupoj… Ni rigardis muzeon, kaj skulptaĵojn, kaj la unuan preĝejon de la kroatoj. Nun ni alvenis al Pollando, sabate, posttagmeze. Ni ĉi tie tre bone fartas. Ni loĝas ĉe familio (…), ankaŭ Marta kaj Borinjo loĝas en la najbara ĉambro… Ni vizitis Krakovon. Al mi tre plaĉas, ke ni loĝas ĉe familio kaj ne en hotelo, ĉar mi tre ŝatas la bestojn, kaj la vilaĝetojn, la kreskaĵojn… Hieraŭ ni estis en salminejo, en groto, tie ni pasigis sub la tero du horojn. Ni iris unue sur tre longa ŝtuparo, en 74 metrojn sub la teron. Poste ni rigardadis skulptaĵojn, ankaŭ pri unu legendo, de princino Kinga… La rakonto temas pri tio, ke la princino ricevis minejon en Hungario sed ne povis ĝin uzi, kaj ĵetis tien la ringon, por ke tio estu la ŝia. Kaj ŝi eksentis, ke ankaŭ en Pollando devas esti ia minejo, do ŝi diris al la ministoj, ke ili fosu. Kaj en la unua peco de la salo enestis ŝia ringo…

Mi mencias, ke Nora ne nur *rakontis* en esperanto, sed same en esperanto ŝi estis *aŭdinta* la indikojn kaj la legendojn pri la salminejo. Ŝi povis rememori evidente pli multe, ol mi, kiu same ĉeestis kaj aŭdis la rakontadon de nia ĉiĉerono. La atento de denaskulino estas pli konstanta, eĉ, oni povus diri, kontraŭvola, dum mi malpli facile dividas mian atenton inter pluraj observindaĵoj aŭ okazaĵoj, kaj ekzemple, se parolas pluraj personoj samtempe, iun el la paroloj mi preteratentas…

Tamen, ĉe ĉiu okazas, ke pri koncepto esprimata en la alia lingvo je aparta vorto aŭ iel en konstantiĝinta maniero li/ŝi ne havas, kvankam momente bezonus, ekvivalenton. Kiel ni vidis, Marta en simila okazo simple demandis min, kiel tion oni diras esperante. Alia knabino, Palmeto, en supozeble simila situacio iom paŭzis, kaj ĉirkaŭfraze reformulis sian diraĵon. Tio estas konjektebla nur laŭ malgranda modifo. Verŝajne ŝi estis dironta ian sinonimon de la vortoj **benkaro, benkovico,** sed ekhezitinte, ŝi elektis pluralon de **benko** ŝanĝante per tio ankaŭ la strukturon de la frazo: *(dum la instruhoro de desegnado) mi sidas en la* (paŭzeto) *benko, kiu estas apud la fenestro, ĉar mi ne bone vidas kaj mi havas okulvitrojn. En la gimnastika horo mi sidas en la meza…* (modifo) *mezaj benkoj, en la tria.* Ĉe Nora, pli aĝa, se entute okazas simila anstataŭigo, ĝi ne aperas rimarkeble. Oni povas nur supozi, ke en la hungara ŝi uzus oftan esprimon en la senco: „klaso kun intensa instruado de la rusa", „speciala klaso de la rusa", kiam ŝi en esperanto diris: „mi estas en klaso, kie oni pli multe lernas el rusa lingvo". Ĉu dirante tion ŝi sentis ian bezonon pri termino aŭ tiu ĉirkaŭfrazo estis la unua, tuja fazo de la esprimado, tio restas ŝia sekreto. Ĉiuokaze, ĉe infanoj pli grandaj, krom la spontanaj lingvaj kapabloj aperas ankaŭ kapablo disponi pri siaj lingvaj rimedoj. Se temas pri la riĉiĝo kaj multiĝo de kompleksaj frazoj en la infana parolo, estas sendube, ke al tio kontribuas ankaŭ senĝena pozitiva transfero: la ebloj uzi kompleksajn frazojn en esperanto kaj en la hungara estas tre similaj, kio kvazaŭ ebligas uzi „komunan subregularon" por konstrui la strukturon de la propozicioj, kun tute kontentiga rezulto. Se temas pri la vortordo, ĉe pluraj hungaraj denaskuloj mi spertis iajn preferojn en vortordo de esperantaj frazoj, kiuj en la esperanta teksto estis indiferentaj aŭ maksimume nur iom individuecaj, dum simila aranĝo en la hungara ekvivalento neprigas certan dividon de la frazo. Nora supozeble sentis la aktualan dividon de sia frazo pli stabila almetante (ripetante) la morfemon **en** ankaŭ kiel verban prefikson en la sekva frazo, cetere jam citita: *…en la unua peco de la salo* ***en****estis ŝia ringo.* Manko de ***benne*** aŭ ***ott*** (ekvivalento de la dua **en** en la hungara lingvo) igas fokusa, kontrastiga la unuan parton de la ekvivalenta frazo, do la parton „en la unua peco de la salo": *Az első sórögben volt a gyűrűje* / Ŝia ringo estis ĝuste en la unua peco da salo; *Az első sórögben* ***benne*** (aŭ: **ott**) *volt a gyűrűje* / En la unua peco da salo estis ŝia ringo.

Similaj, preskaŭ neŭtralaj transferoj estas malfacile rimarkeblaj, ja ili plejparte kaŭzas nur diferencon pri la ofteco de pli-malpli sinonimaj formoj en la alia lingvo. Krome transfero povas esti ankaŭ senpera, ne „tradukebla" de morfemo al morfemo.

Kiel ekzemplon de la lasta fenomeno mi mencias, ke Marta en la hungara uzas la formojn kiel *tanulás közben* „dum lernado" iom pli ofte ol aliaj hungaroj. Tio signifas nur, ke el la duopo *tanulás közben – mikor/miközben tanulok* „dum lernado – kiam mi lernas" ŝi preferas pli ofte la ne-propozician formon. Ĉi tion verŝajne kaŭzas aŭ subtenas mia esperanta modelo: mi, nome, utiligante la zamenhofajn eblojn de la morfologio de la esperanta verbo, relative ofte uzas particip-adverbojn. La komuna elemento de la solvo en la du lingvoj estas nur, ke kaj *lernante* kaj *dum lernado* restas en la sama propozicio, dum *kiam mi lernas* kaj *mikor tanulok* estas suborditaj propozicioj. La morfologian ekvivalenton de *lernante,* do particip-adverbon, ŝi ne uzas en similaj hungaraj frazoj, ĉar tiaj modeloj hungaraj estas ekstreme malmultaj.

Mi nur tuŝas la demandon, ĉu la dulingveco de denaskuloj estas de kompunda aŭ prefere de kunordiĝa karaktero. Verŝajne tiu distingo de Ŝĉerba spegulas la realon simplige, tamen certe ĝi helpas ion kompreni. Ĉe kompunda dulingveco la kontakto de la du lingvoj en la persono estas tiel strikta, ke oni ja povus paroli pri *unu* sistemo, en kiu ĉiu «reago-komplekso» aŭ ni diru pli simple: ĉiu enhavo havas po du formoj. La komuna ideo de certa speco de meblo elvokas en la psiko kaj la vorton «tablo» kaj la vorton *asztal*, la sama intenco voki iun jen rezultigas la formon «venu», jen la formon *gyere ide*. Ĉe kunordiĝa dulingveco ĉiu vorto havas apartan reago-komplekson, apartan signifon. La aplikebleco de la vortoj «sinjorino» kaj *néni* ne estas same ampleksaj, kaj laŭ tio estas tute eble kaj eĉ utile, ke la psika interligo inter la respektivaj signo-kompleksoj kaj reago-kompleksoj okazu tra apartaj kanaloj.

Mi pensas, ke en la psiko de la denaskaj esperantistoj funkcias ambaŭ meĥanismoj. Almenaŭ fruan kompundecon je la nivelo de vortoj neprigas tio, ke etaj infanoj komence lernas pretajn frazojn. Pruvas kompundecon ankaŭ malfacilo transiri de iu lingvo al la alia, kiam eta infano eldiras nombroserion aŭ kalkulas.

Aliflanke, pluraj faktoroj kontribuas al kunordiĝo. Unu estas, ke en la sama medio – en la familio – oni uzas ambaŭ lingvojn. Se la patrino vokas la infanojn, dirante *Gyertek ki a konyhába!* ankaŭ mi baldaŭ diras «Venu ĉiu en la kuirejon!». Alia kunordiga faktoro estas tio, ke la infanoj ofte celkonscie serĉas ekvivalentojn, kiam la koncepton en la medio de iu lingvo ili renkontas pli frue, ol en la medio de la alia. Se infano demandas, kiel oni diras en la alia lingvo «doganisto», jam la du vortoj je certa nivelo kunordiĝas.

Cetere dependas ankaŭ de la konkreta konsisto de la du lingvoj, kiom estas eble, eventuale ankaŭ oportune, kunordigi ilin. Verŝajne *a konyhába* kaj «en la kuirejon» ĉe multaj denaskuloj spegulas absolute la saman enhavon kaj eventuale ankaŭ povas elvoki unu la alian, eĉ se mi, plenkreskulo, scias, ke *konyha* estas uzata ankaŭ kiel ekvivalento de kuirarto. Samtempe ĉe *gyertek* kaj «venu» povas kunordiĝi maksimume la elekto de la leksika vorto kaj ne la elekto de vortoformo. Krome, multaj preskaŭ ekvivalentaj vortoj de la du lingvoj havas en la individua konscio tute diferencajn signifo-historiojn. Ankaŭ tio estas sufiĉa kaŭzo de la fenomeno, ke vortoj de tute proksimaj signifoj ekhavas inter si senperan asociacian rilaton ofte nur relative malfrue. En la sama tempo, kiam la vorton *apa* Marta jam uzadis en la senco „patro, Vater", la esperantan vorton «patro» kredeble ŝi uzadis ankoraŭ en la senco „iu el la gepatroj", do „patro aŭ patrino", analoge al la sen-in-aj polusoj en la vorto-paroj kiel «pedagogo-pedagogino», «vendisto-vendistino». Borinjo, mia alia filino, parolis eĉ pli individue. «Patro» en ŝia vortaro komence estis plej proksima al la vorto «plenkreskulo» de la komuna esperanto (*Patroj ne manĝas ĉokoladon!*). «Korto» por ŝi – diference de la hungara *udvar* – estis ia ajn parteto de urbo, videbla de certa loko, koncepto iom pli proksima al tiuj de «strato», «placo» kaj «certa eksterdoma loko aŭ urboparto»: ŝi diradis frazojn kiel *Ĉi tiu korto estas pli bela ol kie ni biciklis antaŭe*, sed ja ne temis pri korto komunlingva, sed pri komplekso de strato, parko ks.

Precipe en la unuaj 5-6 jaroj la infanoj produktas multe da laŭformaj individuaĵoj, pere de pli-malpli ĝusta apliko de produktivaj meĥanismoj de la alproprigata lingvo. Tio same validas pri etnaj lingvoj kiel pri la denaskula esperanto. Pluraj denaskuloj diradis – sendepende unuj de la aliaj – «malpreni» (lasi, demeti, faligi, fordoni). Borinjo nomadis haltejon de aŭtobusoj «aŭtobusejo», pli poste flughavenon «flugmaŝina haltejo». Pri konatino maldekstramana, t.e. uzanta kutime ne la dekstran, sed la maldekstran manon, ŝi diris: *Ĉi-tiu-manisto*. Lokomotivestro por ŝi estis *vagonaristo*, kaj per vagonaro – anstataŭ veturi – ŝi simple *vagonaris*. Foje ŝi diris pri si: *Mi estas granda sciisto.* Por esprimi, ke aliaj devus ŝin obei, ke la rajto decidi apartenas al ŝi, ŝi ofte diris: *Mi estas la «diristo», ne vi*. En la senco de «aspekti» (aŭ, arĥaike, la zamenhofa *elrigardi*) Borinjo iam uzadis «rigardiĝi» en frazoj kiel: *Bone ĝi rigardiĝas! Kiel ĝi rigardiĝas!* Rolando Horváth diris pri sia patro naĝinta malproksimen kaj apenaŭ videbla: *La patro jam butoniĝis*. La infanoj kelkfoje aktivigas ankaŭ antaŭ-esperantajn sufiksojn; tiel analoge al «fluida» Borinjo derivis «gluida» en la frazo *Paĉjo, sed vi scias, gluilo estas tre gluida.* Same, ili aktivigas neproduktivajn, antaŭesperantajn radikojn, kiel faris Marta pri «duk» el traduki (ŝi diris interalie *transduki, enduki)* «nonc» el anonci, prononci. Iom simpligante esperanton ŝi uzadis la formon «denonci» anstataŭ «denunci». Kelkfoje ili produktas vorton, kiu kontraŭdiras al nenia tradicio. Infanan aranĝaĵon, kiun hungaraj nomis – spegulvorte – kleriga tendaro, Marta simple sed akcepteble baptis kaj nomadis «infankurso» (*De lundo ni vizitados infankurson*).

La paroladon de Borinjo – ĉirkaŭ la aĝo de 5-6 jaroj – karakterizis, ke ŝi derivadis vortojn el sintagmoj – kion ja gramatikoj de esperanto ne malpermesas, eĉ kelkfoje mencias kiel eblon, sed kio en plenkreskula parolo kutime ne realiĝas, kaj tiel havas efekton de infaneca stilo. Tia ekzemplo estis

«ĉi-tiu-manisto», sed ja tute ne la sola. Ŝi elbuŝigis frazojn kiel: *Patrino aĉetu ĝin kiam ĝi estos;* kaj: *Kie estas mia «ĉi-tiaĵo».*

Kvankam la gepatroj kelkfoje ĝuas la infanajn proponaĵojn, la infana parolo pli kaj pli proksimiĝas al la normo koncerne ĉion, pri kio la praktiko de la esperanto-komunumo mem estas stabiliĝinta. Kelkon, kio venas el influo de alia lingvo, la infanoj enigas en sian sistemon de fakultativaj variantoj. Marta, aĝante sep jarojn, post kelktaga feriado kun denaskulinoj slavaj, kiuj uzadis la difinan artikolon malpli ofte, ol estas rekomendate, tre rapide proksimiĝis al tiu artikol-ŝpara parolmaniero, precipe parolante ĝuste al tiuj infanoj. Tio pruvas plurajn aferojn. Unue ke multo estas tre redunda, i.a. preterlaso de difinado ofte ne misinformas eĉ personon, kiu tute kutimiĝis al ĝi. Due, ke infano ekstreme rapide povas ŝanĝi siajn parolkutimojn. Trie, ke amo al la partnero, alta statuso de la kunparolanto, emigas proksimiĝi al ties esprimmaniero. Kvare, ke se leksika aŭ gramatika rimedo perdas el sia distinga povo – kio ja certe okazas, se iun elementon oni povas ĉe la sama komunikcelo kaj uzi kaj ne uzi – ĝi tre rapide povas alpreni stilajn, statusmontrajn trajtojn. Senartikoleco de la parolo ĉe Marta tiutempe portis nuancon leĝeran, samtempe memfidecan.

Spertinte la nesupozite bonajn eblojn de senpera lingvoinstruado, la gepatroj en la denaskula societo emas pensi, ke nenia pli sistema, instrueca interveno estas necesa. Tamen se oni konsideras, ke la tereno de la aplikado povas ŝanĝiĝi, kaj la infano, kiu hodiaŭ ludas esperante, morgaŭ eble serĉos fakajn kontaktojn pere de la lingvo, verŝajne ne estas sensence ankaŭ konscie vastigadi la vorttrezoron de la denaskuloj. Oni ne rimarkas, ke ankaŭ en la etnaj lingvoj konsiderindan parton de la vortostoko oni akiras pere de la sistemeca lernado, dum la instruhoroj, en interesrondetoj ktp.

Mi kun miaj infanoj ne malofte ludas ludojn, kiuj igas la partoprenantojn iel klasifiki objektojn. Mi konfesas, ke mi preparas por ili eĉ taskofoliojn, kiuj ne postulas kutime multe da pripensado, sed almenaŭ esprimadon de jam fiksaj konoj en esperanto. Por demonstri la aferon, jen kelkaj demandoj kun respondoj el la taskofolio de Marta, la 29an de julio:

Kiujn specojn de greno vi konas?

(Ŝia respondo:) *Tritiko, hordeo, aveno, sekalo, rizo.*

Kiuj el la sekvaj birdoj estas rabobirdoj (sekvas serio el dek birdonomoj).

Ŝia respondo: *Aglo, akcipitro, falko, vulturo.*

Skribu kelkajn ĝenrojn kun ekzemploj!

Romano: Timuro kaj lia taĉmento; komedio: Tartufo; fabelo: La lupo kaj la vulpo; tragedio: La tragedio de l' homo; poemo: Sonĝo de Ĝuang Dzi.

Similajn komplementajn rimedojn mi bezonas, ĉar ŝajne sufiĉe multaj estas eĉ la plej ordinaraj sciaĵoj, kiuj tamen ne aperas en familia konversacio tiom ofte, ke ili lerniĝu de si mem. En tiu kampo cetere multe helpas, se la infano ofte aŭdas konversacion de pliaĝuloj: tiel, antaŭ ol veni al la esenco de la aferoj, la vortoj, la formoj jam sonas konate. Jen, unu el la avantaĝoj de la duaj infanoj kompare al la unuenaskitaj.

Plupo kaj lia trupo

(ĉ. la jaro 1990a)

Plupo, tekste kaj bilde verkitaj de Inga Borg, tradukitaj de Malte Markheden, kaj, mi aldonu, rakontataj interalie al mia filo kvarjara. Li, kiel opinianto nepetita, alte taksis la serion.

La kvin volumoj (kun po 24 kolorbildaj paĝoj) prezentas aventurojn de eta figuro fabela, kiun oni nomas Plupo; li kapablas paroli kun bestoj kaj estas nevidebla por ordinaraj homoj.

La volumoj estas: *Plupo en grandarbaro, Plupo kaj la ursidoj, Plupo kaj la gruoj, Plupo kaj ia maro, Plupo kaj la lupo.* Plupo, se li momente ne havas ion alian por diri, diras *plup plup.* Li restas kun ni tra sezonoj kaj lokoj, ĉiam aminda, dum ni trovas nin en diversaj segmentoj de la korproksima kaj – ni, plenkreskuloj, ja scias – protektinda naturo.

Mi komencu en konvene infana maniero memori kaj prezenti la intrigojn, unue tiun de *Plupo en grandarbaro.*

Plupo renkontiĝas kun siaj amiketoj, Lemingo kaj Ermeno. Li ekscias, ke "amaso da grandaj arboj estas for". Li ekiras por esplori la okazintaĵojn kaj la sekvojn. Li vidas arbogrupojn de diversaj grandoj kaj konsistoj, li rimarkas, ke arboj nutras, kaŝas, subtenas vivaĵojn. Arboj ankaŭ pereas: kelkaj estas falintaj, evidente pro ventego aŭ maljuneco, aliaj nun estas faligataj de kastoroj. Sed tio ne ŝajnas terura. Saĝuloj povas kompreni, ke tio estas nekomparebla kun la senarbigado fare de homoj: Plupo baldaŭ ekvidas, nome, stoplojn de forsegitaj arboj, ĝishorizonte. Ĉu havas ian sencon forigo de tiom da arboj? La afero ne estas sencela. Vulpopanjo montras al Plupo homan domaron. Oni povas vidi, kiom da lignaĵoj homo uzas. Plupo kun alkofamilio trovas poste arbidejon kaj ĝojas, ke la homoj ja ne forgesas kreskigi arbojn novajn. Li esperas, ke la homoj ne tro konsumos la arbarojn.

Sekve la volumo *Plupo kaj la ursidoj.* Plupo, Ermeno kaj Lemingo kune manĝas sukan printempan supon. Ili vidas, kiel Granda Ursopatrino brosas sian felon, kiel du ursidoj ludas, luktas, kapriolas. Ankaŭ Plupo devas la ludon partopreni. Poste, la laciĝintaj idoj forveturas sur la patrina dorso.

Ni revidas la familion: ursopatrinon kaj la iom kreskintajn ursidojn Bamso kaj Mova somere, dum ili plukas sur montego mirtelojn; alian fojon, ĉe la kabano de Plupo. Poste ni vidas, kiel la ursoj preparas sin por vintra dormado. Ankaŭ Plupo, Ermeno kaj Lemingo ekvolas tradormi la vintron. Sed ve! Post nura semajno stomakbruo de Plupo vekas la triopon.

En la volumo *Plupo kaj la gruoj* la konata societo ekhavas amikajn rilatojn kun migrantaj gruoj. Certa gruo, nomata Guorgo (kaj manĝinta bongustan supon de Plupo), invitas lin en marĉolandon. Plupo, komence de la somero, vere venas al la marĉo, kie li denove ekkonas multon konindan, interalie li povas observi, kiel gruidoj elkoviĝas... kaj kiel ili estas edukataj. Plej surprize estas, ke fine de la somero, akceptante afablan inviton, Plupo surgruiĝas kaj flugrajdas kun la gruaro al la suda lando Hispanio. Tie li admiras flamengojn, li rakontas al sudaj azeneto kaj testudo pri nordaj mirakloj. Reveturante, dum ripozo, li vidas dancadon de gruoj. Baldaŭ ili ĉiuj revenas al nordaj alpoj. Li falas de grua dorso antaŭ siajn amikojn: Ermeno kaj Lemingo.

La volumo *Plupo kaj la maro* prezentas longan akvovojaĝon. Sur memfarita floso, el montara lago, tra rivero, Plupo venas al la vasta maro, poste: sur bordon de insulo. Li vidas ŝtormon; li denove observas familian vivon de akvobirdoj de certa speco. Eĉ plenkreskuloj, ne sufiĉe lernintaj biologion, povas sin ekzerci en distingado de *granda kurlo, ruĝkrura tringo, avoceto, sablokalidro.* Ne ĉiu el tiuj birdoj havas specialan rolon en la historio; sed ili ja aperas, en vasta bildo, ĉiu kun sia esperanta nomo sub si. Plupo trovas belajn ŝtonojn, fosiliojn; sed li trovas – ho ve! – ankaŭ malbelajn objektojn: vitrobotelojn, plastajn saketojn. Des pli malbone, li vidas ankaŭ oleon sur la surfaco de la maro.

Bele interrimas du vortoj en la titolo de la volumo *Plupo kaj la lupo.* Krom tiuj du bestoj kaj krom la konataj Ermeno kaj Lemingo en ĉi tiu volumo ĉefrolas Leporo, aperas neĝostrigo, linko, korvo, boaco. Plupo veturas per skioj. La lupo, kiun li renkontas, estas lupino suferanta pro soleco. Bonŝance, baldaŭ aperas granda kaj bela virlupo. *Ĉiam ni restu kune!* – diras la virlupo. La gelupoj invitas Plupon por alia fojo. Plupon oni ne bezonas inviti dufoje: li venas "iun tagon en la printempo" kaj ankaŭ "tri semajnojn poste": li vidas ĵus naskiĝintajn, iom evoluintajn, fine bele kreskintajn lupidojn.

Mi scias: mi rakontis detalojn tro abunde. Sed tio eble helpas al vi imagi la detalriĉajn kaj kolorplenajn bildojn de la serio. Tiuj vivosimilaj bildoj de amindaj bestetoj estas tre sukcese kaj harmonie dislokitaj sur la paĝoj, inter tekstopartoj, sen la troa geometriismo.

Kaj Plupo kaj bestetoj memorigas min pri infanoj. Ili estas animuloj, kiuj ne majstras frazojn kunmetitajn kaj ĉiumembre komplementitajn. Estas do klare, ke en la teksto devas troviĝi multaj elipsaj frazoj, multaj interjekcioj, onomatopeoj. Jen lingvoelementoj de simila speco, notitaj el la konversacioj de la libretoj: *aŭo, brr, brum bmm, bruhum, brumebrum, eske teske* (plej ofta aserto de Lemingo), *fi, grato grato, ha, ho, hu fi, huj, hojen plup, plup plup* (tio estas ripetaĵo ofta de Plupo), *huhu* (verbigita formo: huhui), *krre* (jen kiel blekas ridmevo), *plaŭd, pu, ŝmak, uhum.*

Permesu, ke ĉi tie mi iom ekstertemiĝu, aŭ almenaŭ mi traktu kelkon pli ĝenerale, ol la serio Plupo tion en si mem motivas.

Ne malofte oni aŭdas la opinion, ke registri, fiksi interjekciojn, onomatopeojn en esperanto estas senutile. Iuj plu imagas, ke ili estas ja absolute internaciaj sen esti fiksitaj; aliaj pensas, ke oni povas sin esprimi sen ili, en maniero pli abstrakta; denove aliaj eble opinias, ke ja instinkte oni uzas la interjekciojn de la gepatra lingvo kaj tio estas bona.

Pri tiuj ebloj oni povas konsenteti: en iu proksimumeca maniero la afero funkcias. Sed eĉ konsentante pri eblo, mi ne konsentas pri indo. Mi emfazu, ke ne estas vere, ke interjekcioj estas uzataj nur instinkte kaj nur ĉe ekstreme fortaj, «eksterlingvaj» emocioj kaj situacioj. Ili apartenas, interalie, al la ordinaraj rimedoj modifi la modalan valoron de frazoj. (Konsideru la eblojn: *Kion vi faras momente? Ej, kion vi faras? Ba, kion ili faras? Hu, kion ili faras!? Ha, karulo, kion vi faras? Fi! Kion vi faras! Ho se ni povus fari ion utilan!).* Eble onomatopeoj gravas malpli, tamen estas grave, ke ili – kiom ili estas uzataj – estu konformaj al la lingvosistemo cetera.

Frazoj kiel *Ho, mi ne vidis, Ho, kia balanciĝo, Ho ve, helpu* (PIupo kaj la maro); *Nu, nu, nun suriru* (Plupo kaj la gruoj); *Oj, plup, plup! Ne estas facile...* (Plupo kaj la ursidoj); *Ho jen, plup plup! Kio okazis tie sube?* (Plupo en la grandarbaro) estas oftaj kaj kiel mi supre diris bonvenaj en la dialogoj. Aliflanke, min impresis iom malagrable, kiom senhezite la tradukinto ĵetas al ni, kelkfoje, supersignitajn vokalojn en teksto esperantlingva, por son-imito de blekoj. Temas pri vokaloj kun komo, kies interpreto certe multe dependas de divenkapablo kaj erudicio de la leganta plenkreskulo. Se en *aŭó* la signo super *o* modifas la sonkvaliton, oni ne povas ĝin akcepti por esperanto: se ĝi indikas akcenton, mankas interkonsento antaŭa pri tio. Apartan akcenton eblus indiki ankaŭ per apartigo: *aŭ-oo.* Mi preferus ankaŭ pli unuecan bojadon tra la esperanta literaturo. Mi estis lerninta *ŭa ŭa,* el PIV, mi allernis iam onomatopean *boj,* mi evitadis (germanec)hungaran *vaŭ,* tamen nun mi ricevas iom parencajn *vuuf, uvuf, vuf, uuhvuu.* Eble tio parte estas lupaj individuaĵoj, sed eble ankaŭ svedlupaj pruntvortoj. *Eske teske,* ĉio eblas. *Oj, plup plup* ankaŭ la supersigno de e en *krrré* vekis en mi dubon.

Por grumbletadi plu, mi demandas, ĉu pro aparta intenco de la tradukinto la onomatopeo *ĉitse* (gvidvorto de Ermeno) enhavas *t* kaj *s* en apartaj silaboj (ĉit-se)? Ĉu tiu duo *ts* ne estas fremdmodela skribvarianto de *c*? Plue, mi ne vidas ian aprobindan motivon por ekuzi pro varmosufero la interjekcion *pu. Pu* ja devus esprimi naŭzon pro malbonodoro aŭ fiaĵo. Mi laŭ Plena Analiza Gramatiko preferus *fu, uf* aŭ *uff.* Mi konsentas, ke apenaŭ oni povas pri tio argumenti konvinke, ja PAG ĉi-rilate estas vortŝpara. Mi tamen opinias, ke ĉe varmego oni malpli indignas kaj naŭziĝas, ol sentas sin neelteneble senforta...

Mi povas erari, tamen mi eltajpas, ke mi ne dirus *fi, mi timas...* kiom ajn mi abomenas kaj timadon kaj timaĵon... (v. *Plupo kaj la lupo).*

Problemoj de elipsaj frazoj, koncerne esperanton, ne estas sufiĉe studitaj. Tamen, mi pensas, ili devas konstruiĝi sur frazoj kompletaj. Oni ne ŝanĝu pronomon, elipsigante. Tial ne plaĉas al mi frazoj kiel *eske teske, imagi al* ***si***. Elipsaj frazoj prezentas kelkfoje problemetojn ankaŭ pro malstabileco de la kutimoj kaj normoj en esperanto pro aktuala divido de la frazo. Ermeno – en la volumo *Plupo kaj la lupo* – trankviligas leporon, certigante, ke nek lupoj, nek li, Ermeno, estas tiom ege danĝeraj: ili ne manĝos Leporon. Ermeno interalie diras: *Ne, estu trankvilaj, mi ja promesis – neniun tuŝi. Ne ĉi tie, ĉe Plupo.* La lasta frazo permesas ankaŭ neformulitan antaŭsupozon, ke la lupo nepre manĝos la leporon, se en loko alia. Malgraŭ la nuna normomanko, oni ja povus meti komon inter *ne* kaj *ĉi tie*, aŭ uzi la PlVan vorton *nen,* kiu indikas, ke la neado senpere rilatas ne la sekvan frazelementon, sed la (neripetitan) predikaton de la antaŭa propozicio: *nen, ĉi tie.*

Pri kunmetoj kiel «grandarbaro» grumblu aliaj.

Eĉ se mi longe traktis ĉi-supre kelkajn lingvajn makuletojn kaj ankaŭ aliaj netraktitaj ekzistas ietie, tio estas bagatela. Ĉiuokaze, la meritoj de la libroj estas multe pli gravaj. La serio estas antaŭ ĉio tre bela, arte kaj profesie farita. Ĝi peras multajn konojn pri naturo – ĝi certe instruas pli, ol multaj

lemolibroj pri biologio aŭ mediokono en malsuperaj klasoj. Ke tio okazas en esperanto, tio por denaskistoj kaj denaskaj esperantistoj ne estas trotaksebla. Fine ĝi eminente edukas al naturprotektado en aĝo, kiam oni ankoraŭ povas sufiĉe impresiĝi.

Dankon kaj gratulon al Malte Markheden kaj Anna-Maria Lange pro la elekto kaj traduko, al la tuta eldonejo Progreso pro la entrepreno. Kredu, oni bezonas similajn librojn (kaj kasedojn, kiel la kortuŝe bela *Jula Lando*) por resti esperanta, kiam oni edukas infanojn en Esperanto.

A magyar nyelvnek az eszperantóra gyakorolt hatásáról

(1991)

„... luktu hom' kaj firme fidu!"
Madách-Kalocsay[4]

A magyarnak az eszperantó nyelvre való kisebb hatását minden nyelvi szinten feltehetjük. (Mert hiszen tapasztaljuk.)

Mióta Bálint Gábor orientalista, az ural-altáji nyelvek professzora, 1897-ben, tíz évvel az eszperantó közzététele után, Kolozsvárott megtartotta eszperantó-tanfolyamát, a magyarok részvétele az eszperantó nyelv használatában és művelésében mindig számottevő volt (vö. pl. Kökény Lajos: Gvidlibro por supera ekzameno [szerk. Pechan Alfonz]: La movado en Hungario, 62-82; Rátkai Árpád: A Magyar Eszperantó Szövetség és a nemzetközi nyelvi mozgalom Magyarországon, 1991, 24-40).

A magyar eszperantisták döntő többségének az eszperantó második vagy többedik, tehát tudatos módon elsajátított, tanult nyelve.

Kezdetben (1887-8-tól) az eszperantót nagyobbrészt írásban használták. 1905-től az írásbeli használatot növekvő mértékű szóbeli alkalmazás kíséri. A mai eszperantisták nem elhanyagolható hányada a nyelvtanulás időszakától eltekintve sokkal több időt tölt eszperantó nyelvű beszélgetéssel, vitával, tréfálkozással, játékkal, pletykával, vagyis beszéddel, mintsem levelezéssel, olvasással, tanulmányírással vagy egyéb vizuális jellegű nyelvalkalmazással. Az eszperantóul beszélő gyerekeknek egy kisebb része – koránál fogva – írni, olvasni nem is tud. Az eszperantisták önkéntelenül is, tudatosan is hatnak egymás nyelvhasználatára. A fentiekből adódik, hogy a magyar nyelvi sajátságok eszperantóra való átvitelének számos lehetősége van; vállfajai kimutathatók (vö.: pl. Bernard Golden: *Marĝene de lernolibro*. 1970, Budapest. Hungara Esperanto-Asocio; további irodalommal).

a) Szóljunk először arról az esetről, amikor a magyar nyelven alapuló jelenség az eszperantó nyelvnek L. L. Zamenhoftól rögzített alapvető normáit egyértelműen megsérti.

Ismeretes, hogy L. L. Zamenhof – dr. Esperanto álnéven – 1887-ben egy 40 lap terjedelmű kiadványban tárta nyelvtervezetét a világ elé: Д-ръ Эсперанто: Международный Языкъ. Предисловіе и понлый учебникъ [por Rusoj]. (Варшава, 1887).

Az eszperantista hagyomány *Unua Libro*, azaz 'Első könyv' címen tartja számon Zamenhofnak ezt a munkáját. Itt olvashatjuk az eszperantó nyelv alapvető, mindmáig mérvadónak tekintett – nagyrészt alaktani – leírását. A 16 pontból álló, alig hat lap terjedelmű nyelvtan 10. pontja a szóhangsúlyt egyértelműen a szó utolsó előtti szótagához köti. A gyengébb – netán rosszul tanított – magyar eszperantista első szótagi hangsúlyozása így hibának minősül. A *dili**gen**te* 'szorgalmasan' szó helyett mondott ***di**ligente* formát a jó tanár kezdettől fogva javítja; mégis, előfordul – különösen, ha a szó a mondat fő hangsúlyának is a hordozója – Zamenhof-adta szabálya ellen. Rejtettebb, a normát „leleplezhetően" nem sértő hatást látok abban, hogy a magyarok beszédében a szólamhangsúlyos szó hangsúlya gyakran mintegy törli néhány rákövetkező másik szó hangsúlyát *(*Eva ne ^estis ^hejme* ehelyett: *Eva ne 'estis 'hejme)*. Minthogy az eszperantóban a szóhatárok és szintagmahatárok olykor kevésbé jelöltek, mint a magyarban, az említett jelenség a hasznos szintaktikai redundancia nyilvánvaló csökkenését jelenti. – Egyértelmű normasértésről beszélhetünk, ha a magyar eszperantista – a magyar mintát követve – elhagyja az összetett állítmány igei részét *(Eva estas forta* 'Éva erős' → *Eva forta)* vagy ha nem egyezteti a jelzőt és a jelzett szót *(belaj esperoj* 'szép remények' → **bela esperoj)*. A fentiekhez hasonló, más nyelvek tanítása során gyakran tapasztalt téves átvitel ugyan itt nyilván eszperantó beszédtényt eredményez, a nyelvi rendszerre gyakorolt hatásról – a nyelv rendszerébe való beépülésről – azonban ezekben az esetekben nem beszelhetünk. (L. Barcsay Zsuzsa: *Metodiko en la praktiko* [szerk. Barcsay Zsuzsa]: Transfer-valoro de Esperanto por hungaroj en la lernado de

[4]Az írás forrása: Hajdú Mihály és Kiss Jenő (szerk.). *Emlékkönyv Benkő Loránd hetvenedik születésnapjára*. Budapest, 1991. 642-649 – A bevezető idézet Madách Imrének Az ember tragédiája c. drámájából való, Kalocsay Kálmán eszperantó fordításában (…ember, küzdj' és bízva bízzál!)

hindeŭropaj lingvoj. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1982; Szerdahelyi István: *Metodologio de Esperanto (lingvostudado kaj parolalproprigo)*. Budapest: Tankönyvkiadó, 1975.)

b) Gyakori jelenség, hogy mi, magyar eszperantisták – felületes tanulásunk eredményeképpen – nemzetközi vagy nemzetközinek vélt, főleg latin eredetű szavaknak valamely, a magyar nyelvből vett jelentést tulajdonítunk. Ez írott szövegekben is kimutatható. Példaképpen – Bemard Golden nyomán – az *akcio* 'részvény', *lektoro* kb. 'előadó, egyetemi oktató', *kolegio* kb. testület, (egyházi) vezető testület', 'angliai főiskola', 'jezsuita középiskola' főneveket említem, melyeknek a magyar *akció* (pl. 'segélyakció'), *lektor* (pl. 'könyv lektora'), kollégium ('diákotthon') mintájára való használatát sem a zamenhofi hagyomány, sem az eszperantisták széles körben használt értelmező szótára (*Plena Ilustrita Vortaro*, Paris-20, 1970), sem a nemzetközi gyakorlat nem támasztja alá. Ismétlődésük, mintául is szolgáló szövegekben való gyakoriságuk révén az ilyen jelentéskölcsönzések a nyelvközösség tudatában és használatában élő eszperantó szókincset módosíthatják; ezek az új elemek a nyelv – nem kívánatos módon való – rétegződését segíthetik elő (l. Bemard Golden: i. m.).

c) A magyar és az eszperantó párhuzamos alkalmazása során is igen gyakori a helyes átvitel, a segítő transzfer. Az alanynak és az állítmány névszói részének számban való egyeztetése mindkét nyelv minden rétegében, minden stiláris változatában és szinte minden névszóra nézve norma értékű. Pl. *La ĉevaloj <estis> lacaj* 'A lovak fáradtak <voltak>'. Az eszperantóul tanuló magyarok e tekintetben önkéntelenül, megfelelő számú minta vagy a nyelv pontos leírásának ismerete nélkül is helyes mondatokat alkotnak. – Hasonlóképpen: minden magyar eszperantista jelen idejű igealakot használna a következő mondat tárgyi mellékmondatában: „Azt mondták, hogy *esik az eső"*. <'Oni diris ke *pluvas'*>. E helyes megoldásból nem következik, hogy a beszélőnek tételes tudása is van a mellékmondatbeli igeidő-használatról. – Hasonlóan minősíthetjük a magyar eszperantista beszédének olyan általános és jellemző tényeit, mint a magánhangzó-redukció teljes hiánya (vö. *akcidento* : *okcidento*) vagy – az eszperantóban egyébként ritka – szóvégi zöngés mássalhangzók zöngés voltának következetes megőrzése (pl. a *sed* 'de, hanem' kötőszóban). A zöngésség szerinti oppozíció szóvégi helyzetben való meglétét mutatják például a következő szópárok: *bed'* 'ágyás' : *bet'* : 'cékla'; *kab'* '<hegy>fok' : *kap'* 'fej'.

d) Elég gyakoriak az olyan esetek, amikor Zamenhof, illetve a nemzetközi spontán közmegegyezés (az általános gyakorlat) két lehetőséget kínál, de a magyar minta ezek közül csak egyet erősít meg. – Zamenhof az *n* fonéma *g* és *k* előtti megvalósulásaként mind a dentális, mind a veláris változatot számon tartja (1. *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, 22; *Lingvaj respondoj*, sesa eldono, Marmande, 1962, 59-60); a magyar beszélők túlnyomó többsége ilyenkor következetesen a veláris változattal él. – E tény hozzájárulhat ahhoz, hogy a veláris allofón az adott fonetikai helyzetben túlsúlyossá, esetleg obligatorikus allofónná váljék. Erre a tendenciára támaszkodik a mesterséges beszédszintézis Magyarországon kifejlesztett megoldása is (1. Ilona Koutny-Gábor Olaszy-Katalin Kisfaludy: *Esperanto speech synthesis and its application in language learning*. Magyar Fonetikai Füzetek, 19, Bp. 1988, 47-54). Két megengedett lehetőség egyikét erősíti meg a magyar minta a nyelvi rendszer egy másik pontján: az utcanevek, térnevek, földrajzi nevek az eszperantóban szerepelhetnek köznevük után (pl. *strato Dob* : 'Dob utca'; *la rivero Marcal* 'a Marcal folyó', *urbo Karcag* : 'Karcag városa'; *en vilaĝo Velem :* '<egy> Velem <nevű> faluban'), de előfordulnak összetételi előtagként is: *Dob-strato, Meksiko-urbo*. Molnár Ferencnek *A Pál utcai fiúk* c. regényét *La knaboj el la Paŭlo-strato* címmel fordították eszperantóra. – Hasonló hatások természetesen több irányból (német, kínai, japán stb.) jönnek.

A prepozitív névhasználatnak (s hasonló kicsinységeknek) persze további – rossz esetben előre nem látott – következményei lehetnek. Az ilyen névhasználat, például, destabilizálhatja a szóhangsúlyt: *<la> rivereto* ***Tur*** '<a> Túr patak' → ***Tur-rivereto*** → ****Tur**-rivereto.*

e) Összetettebb jelenségek a következők. – Az eszperantó szóhangsúly minőségét Zamenhof nem kötötte meg. Kalocsay és Waringhien leírása szerint (közösen: *Plena Gramatiko de Esperanto*, Budapest, 1933; Kalocsay Kálmán: *Rendszeres eszperantó nyelvtan*, 1958) a szóhangsúly részben kvantitatív: a hangsúlyos magánhangzó nyílt (pl. *alfabeto, cepo, domo, kapo),* vagy ilyenből aposztrofálással kapott szótagban *(alfabet', cep', dom', kap')* hosszú; egyéb zárt szótagokban (pl. *kapti, sep)* rövid. (Koutny-Olaszy-Kisfaludy, idézett írásukban, a hosszú magánhangzók időtartamát a rövidek másfélszereseként rögzítik). A hosszú magánhangzóknak ilyen helyzethez kötött megjelenése – mint Hukaya

Sitosi és Tálos Endre (*Esperantologiaj Kajeroj*, 2, 1975) kifejtették – összefügg azzal a ténnyel, hogy az eszperantó használatának fő területe kezdetben olyan térség (area) volt, amelynek nyelveiben a magánhangzó-hosszúság vagy fonematikus, vagy hangsúlyhoz kötött, pozicionális, de valamilyen formában többnyire megvan (orosz, francia, német, magyar stb.; a szintén sok beszélővel képviselt lengyel hatás az időtartam szerepének stabilizálódása ellen hat). – A *kajo*-ból aposztrofált *kaj'* 'rakpart' és a *kaj* 'és' kötőszó Kalocsay szerint minimális párt alkot, éppen a hosszú-rövid szembenállás alapján. Az eszperantisták egy része ugyanakkor nem hozhatja anyanyelvéből a rövid-hosszú szembenállást; normaként való előírásának elvi ellenzői is vannak. Ezért is érdemes talán megjegyezni, hogy a kérdésnek nemcsak a fonológiához és a mindennapi nyelvgyakorlathoz van köze. Kalocsay Kálmán – műfordítói munkájával párhuzamosan – rendszeres eszperantó poétikát dolgozott ki (Pri la Esperanta ritmo, Klasika metriko en Esperanto: K. Kalocsay: *Lingvo Stilo Formo*. Studoj. Tria, parte tralaborita eldono. Librejo PIRATO, Oosaka, 1970; K. Kalocsay-W. Waringhien: *Parnasa gvidlibro*, 1935). Rendszerének ellenőrzéseképpen – Babits Mihály és Szabó Lőrinc magyar vállalkozásaira emlékeztető erőfeszítéssel – elsősorban kötött formájú verseket fordított. (L. pl. Madách: *La tragedio de l' homo*; Dante Alighieri: *Infero* [1933]; Baudelaire: *La floroj de l' malbono* [1957]; Shakespeare: *Reĝo Lear* [1966], *Somermeznokta sonĝo* [1967], *La tempesto* [1970]; Petőfi: *Libero kaj amo* [1970] – ebben szerepel a *János vitéz* teljes fordítása is, mely a korábbi, 1923-as fordításból nőtt ki. – Stb.) A görög-latin versformák sikeres meghonosítását jelentősen megkönnyítette számára az a mód, ahogyan a kiejtési normákat ő maga befolyásolta (1. K. Kalocsay: *Tudmonda sonoro* [szerk. Vilmos Benczik], 1-2, Serio Oriento-Okcidento, n-ro 17, Hungara Esperanto-Asocio, Budapest). – Az összefüggés egyébként fordítva is igaz: fordításai, a hagyomány szerves részeként, hozzájárulnak a norma szociális érvényének megszilárdításához.

f) Mint ismeretes, az eszperantó összetett igealakok használatáról sok vita folyt. A vita egyik sarkalatos pontja az a kérdés, hogy a múlt idejű kopula és a múlt idejű(nek nevezett) melléknévi igenév alkotta összetett igealakok pluszkvamperfektum értékűek-e, avagy (csak) aspektusukban minősítettek, befejezettek. A kérdés a passzívum körül éleződik ki, ahol egyszerű időalakok nem állnak rendelkezésre. Kalocsay Kálmán – E. Vilborghoz csatlakozva – hangsúlyozza, hogy a párhuzamos aktív mondatokban az egyszerű múlt gyakran a pluszkvamperfektum tipikus környezeteiben is használatos, feltéve, hogy az ige perfektív jellegű. Kalocsay előadja, hogy a *jam* 'már' bizonyos igékkel kapcsolódva csak a „tartam kezdetére" utal (példája: *Oni jam persekutis lin tiam* 'Ekkor már üldözték'), más igékkel viszont a cselekvés után beállt állapotra. Példája: *Li jam trovis la ŝlosilon tiam* 'Akkor <addigra> már megtalálta a kulcsot'. (A magyarra vonatkozólag vö. Fábricz Károly: *A denotatív és a pragmatikus jelentés összefüggéseiről*. Népr. és Nytud. XXIX-XXX, 107-114.) Kalocsay az aktívum egyszerű múlt idejének erre a jellemzésére is épít, amikor a szóban forgó passzív alakokat elsősorban perfektívnek minősíti. A fenti – elnagyolt – fejtegetéshez itt annyit fűznék, hogy Kalocsaynál – bár számos nyelv igeragozását ismeri és ismerteti – a háttérben ott munkálnak a magyar analógiák is. Álláspontját a *Literatura Mondo* szerkesztőjeként is érvényesíthette. Soós Éva 1976-ban diákköri dolgozatban mutatta be, miként módosította Kalocsay az első eszperantó regények francia írójának, Vallienne-nek az igeidő-használatát.

g) Az eszperantó magyar művelői részt vettek az irodalmi régiesítés eszperantó próbálkozásaiban. Kalocsay Kálmán (1. La mezepoka esperantisto [*Lingvo Stilo Formo*, 1970, 154-160]) az íráskép módosításával, részben latinosításával, hangváltozások imitálásával (visszafordított nyíltabbá válással, az eszperantó igei végződéseknek egyszerűsödöttként való feltüntetésével („vísszabonyolításával") próbálkozott:

A magyar eredeti	**Kalocsay fordítása;** ***a módosítások bemutatása***	**Az eszperantó köznyelvi megfelelő**	**<Mai magyar fordítás>;** ***az eszperantóbeli módosítások jellemzése***
Latıatuc	**Widats Wui**	Vidas vi	<Látjátok>
		<*vid-* 'lát-'>	
	<**-ats* → *-as*>	<*-as*: az ige jelen idejének végződése, kijelentő módban, minden személyben)	1) A még személyre is utaló (játékból feltett) **-ats* igei végződésnek és
	<**wuy* → *vi*>	<*vi*: 2. sz.-re utaló személyes névmás; 'you'>	2) valamiféle „korai újlatin", a mai eszperantóbelinél testesebb (talán az eszperantó névszói többesjelet [j] is tartalmazó) személyes névmások látszólagos visszaállítása; a *w* betű a magyar kódexirodalmat is idézi.
feleym	**confratruy**	gefratoj	<feleim, testvérek>
	<*con* → *ge-*>	<*ge-*: a két nemre egyszerre utaló előképző>	A germán *ge-* helyén itt még a „latinos" *con-* áll.
	<**fratr-* → *frat-*>	*frat-* 'fivér'	
	<**-u* → *o*>	<*-o:* a főnév kategorális végződése>	A főnév mai *-o* végződése helyén a zártabb *-u* áll.
mic vogmuc	**quio nui estams**	kio ni estas	<mik vagyunk>
	<*quio → kio>	*kio* 'mi' <főnévi kérdőnévmás>	Az íráskép latinosabb.
			*(*qu → k) → qu*
	<**-ams* → *-as*>		Az <*-as* helyett álló *-ams*> igei végződés az e. sz. 1. személyt (eszperantó *mi*, magyar *-m*), valamint az *-s* indogermán többesmorfémát, szerkezetében a magyar *-m-* + *-k* együttest idézheti fel. A mai végződés így (nyelvtani homonímiát eredményező) hangalaki egyszerűsödésnek tűnik. A látszólagos *nuy → ni* változás hasonló a már említett *wuy → vi* változáshoz.
	<*m+s ~ 'm+k'>		
	<**nuy* → *ni*>		
ýfa pur eſ chomuw...	**Ya pulvu kaj cindru…**	Ja polvo kaj cindro…	<Bizony, por és hamu…>
	<**pulvu* → *polvo*>		A mai *polvo* és *cindro* főneveket Kalocsay itt az *u → o* változás (nyíltabbá válás) eredményének tünteti fel.
	<**cindru* → *cindro* >		
uogmuc	**estams**	<ni> estas	<vagyunk>

Hasonló „álváltozások” a következők is: **creays* → mai eszperantó *kreis* (*kre+is*) ’odutta vola’, *Adamun → *Adamon* ’adamut’; **K a y ell omn fructuy trovibily en paradisu...* → *kaj el ĉiuj fruktoj troveblaj en Paradizo* ’Eſ mend paradıſumben uolov gımılcíctul’. – A nyelvi asszociációs hátteret egyébként mindehhez a magyar irodalomból vett Halotti Beszéd mellett a Zamenhoftól héberből fordított *Ószövetség* (*Malnova Testamento*) szolgáltatta (*La Sankta Biblio. Malnova kaj Nova Testamentoj*. Tradukitaj el la originalaj lingvoj. Londono. Brita kaj alilanda Biblia Societo. [The Holy Bible in Esperanto. 53] 1966).

Csiszár Ada és Kalocsay Kálmán lexikográfiai munkájának (*Domfabriko, 6000 frazeologiaj esprimoj Hungaraj-Esperantaj*, Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1975) eredményeképpen a magyar szóláskincs – kisebb mértékben – közvetlenül is hat az eszperantó fejlődésére.

Áttekintésem korántsem teljes.

Redundancia[5]

(1992)

„Az egyeztetés problémakörében rendkívül érdekesen fonódik össze a nyelvi jelekkel történő kommunikációnak két – egymással ellentétes – hatékony tényezője. A beszélő ugyanis egyrészt arra törekszik, hogy minél kevesebb jel felhasználásával, minél gazdaságosabban formálja meg közleményét, azaz kerülje a rendundanciát, másrészt azonban igyekszik eleget tenni annak a követelménynek is, hogy a közlemény a hallgató által könnyen felfogható, világosan áttekinthető és félreérthetetlen legyen... Az egyeztetés, tehát ugyanannak a nyelvtani kategóriának az összetartozó tagok mindegyikén való megjelölése kétségtelenül a rendundancia körébe vág... Különös jelentősége van az egyeztetésnek az ún. szabad szórendű nyelvekben" - írja RÁCZ ENDRE (AZ egyeztetés a magyar nyelvben. Budapest, 1991, 40) szakirodalmi hivatkozások gondos közbeiktatásával.

RÁCZ ENDRE az egyeztetést, s ekként a redundancia egy fajtáját különféle nyelvi szinteken vizsgálja. Az egyeztetést, mint elmondja, sokszor morfémák hordozzák; megjelenhet az egyeztetés állexémában, megjelenik lexémaszinten, álszintagma-szinten, a szintagma szintjén, a mondategységen vagy a mondategészen belül; kiterjedhet a szövegszintre is (i.m. 20–23). RÁCZ példáiban – egyeztetésről lévén szó – a redundancia valamilyen száma, jelentéselem többszöri előfordulásaként jellemezhető.

Nagyobb általánosságban – nemcsak az egyeztetésre vonatkoztatva – is igaz, hogy a redundancia a nyelv minden szintjén jelentkezik. – Az *a* rövidségét vagy labialitását redundánsnak tekinthetjük a magyar köznyelvben, hiszen a két tulajdonság bármelyike már önmagában is szembeállítja az *á* fonémával. Redundáns az *l* és az *n* zöngés volta. Redundáns a nyelvjárási *mink* : *ti* szembenállásban a *mink* névmás *-nk* szegmentumának jelenléte. Redundanciát ad a *mi megyünk*-ben a *mi* és az *-ünk* (vö. i.m. 41) együttes előfordulása. – A többességet illetőleg a *Mi öten megyünk* többszörösen redundáns, a *Mink öten megyünk* tájnyelvi mondat viszont még ennél is redundánsabb. Az *én–te* oppozíció redundánsabb, mint a *te–ti,* a *mi–ti* vagy az eszperantó *mi–vi* szembenállás; a *ti–titeket* szembenállásban magasabb fokú a redundancia, mint az *ők–őket* alakok szembenállásában. A különféle jellegű (hangtulajdonság, fonémafelhasználás, széma ismétlődésében megnyilvánuló) redundáns mozzanatok tehát összeadódhatnak. A *Tégedet magadat is láttalak* mondat **második** személyű **tárgya** sokkalta redundánsabb (mind a szémaismétlés, mind a felhasznált fonémakészlet folytán), mint a *Láttam Önt* mondaté.

„Az egyeztetés **redundáns** voltát ki lehet használni – s egyúttal a redundanciát világosan ki lehet mutatni – olyan esetben, mikor a gazdaságosságra való törekvés lesz az elsőrendű cél, így pl. a nyelvi jeleknek a gyorsírás jeleivé való átformálásakor... A beszédfokú gyorsírás egyik rövidítési eljárása az egyeztetésbeli redundancia kiküszöbölésén alapszik – írja RÁCZ ENDRE (i.m. 41), majd BIHARI MIHÁLYtól (A magyar nyelv törvényeinek érvényesülése a magasfokú gyorsírásban: Nyr. 91:132-8, 1967) idézi az alábbiakat: „Nyelvtani törvény például az, hogy bizonyos ragok ismétlődnek, és ha az egyik szóban jelzem a ragot, a másik szóban már nincsen szükség feltüntetésére: a gyorsíró elhagyja az ismétlődő ragot. Az alany és az állítmány számban megegyezik, tehát az utóbb álló szó többesragja, illetőleg -jele elhagyható. Például: *Az emberek sétál. Már elmentek a munkás.* A személyes névmás után az állítmány személyragja elhagyható. Pl.: *Én sétál. Te sétál. Mi sétál. Ti sétál. Ők sétál.* A mutató névmás után a főnév azonos (BIHARI 134).

L. L. ZAMENHOF 1887-ben tette közzé a később eszperantó néven ismertté vált tervezett emberi nyelvet. (L. D-ro Esperanto: Международный языкъ. Предисловие и польный учебникъ. Por Rusoj. Варшава, 1887). Ebben foglaltatik az eszperantó 16 pontból álló alapvető nyelvtana. A nyelvtan kidolgozása során ZAMENHOF is a gazdaságosságot, ill. az alaktannak ezzel összefüggő könnyű elsajátíthatóságát tartotta elérendőnek. A 6. pontban adja meg az ige alaktanát. A 'sétál' ige jelen ideje ennek nyomán: *promenas.* A *promenas* szóalak két morfémából áll: a *promen-* tőből és az *-as* végződésből, mely egyszerre jelöli a jelen időt és a kijelentő módot; de csak ezeket. A személynek (az alany személyének) a kifejezése a személyes névmásra vagy más névszóra marad. A jelen idő paradigmája... helyett így a következő szintagmasort tarthatjuk számon:

[5] Forrás: Kozocsa Sándor és Laczkó Krisztina (szerk.), Bankó Ágnes (műsz. szerk.) 1992: Emlékkönyv Rácz Endre hetvenedik születésnapjára. 242-249.

Eszperantó szintagma:	Magyar elemekből alkotott utánzat:
mi promenas	*én sétál*
vi promenas	*te/(ti) sétál*
li (ŝi, ĝi) promenas	*ő/az sétál*
ni promenas	*mi sétál*
vi promenas	*ti sétál*
ili promenas / oni promenas	*ők sétál / az ember sétál*
(la homoj promenas)	*(az emberek sétál.*

Magyar elemekből alkotott utánzat:

mi, vi, li…ni…	*én, te, ő…, mi…*
promenis	*sétált.*

A verbum finitivum-ok esetében tehát (melyeket nem nevezhetek személyragozott igealakoknak) ZAMENHOF a gyorsíráshoz hasonlóan – megspórolta a személy kifejezésebeli redundanciát. Minthogy az egyszerű eszperantó igealakok nem fejezik ki a cselekvő számát sem, a *Már elmentek a munkás* gyorsíró-magyar mondat köznyelvi eszperantó megfelelőjében – a szám éppen az alanyon jelenik meg, a szám iránt közömbös múlt idejű igealak *(foriris:* '(vki) elment') kíséretében: *Jam foriris la laboristoj.* Hasonlóképpen: *Doloras la piedoj*; tkp. 'fáj a lábak'; vö. a magyar népnyelvi *Fáj a lábaim* (l. PAPP ISTVÁN MNy. 46 (1950.): 15-27, 25; RÁCZ i.m. 42). – A rendszer más pontjain ZAMENHOF ugyanakkor redundáns megoldásokat is alkalmaz. Ilyen a jelzőnek és az összetett állítmány névszói részének a jelzett szóval *(bela rozo, belan rozon, belaj rozoj, belajn rozojn),* illetve az alannyal *(La rozoj estas belaj*) való egyeztetése. Ide sorolhatjuk a számbeli egyeztetés következő példáját is: *La librojn ŝi trovis interesaj* 'A könyveket érdekeseknek találta' (l. K. KALOCSAY–G. WARINGHIEN: Plena Analiza Gramatiko de Esperanto. Kvara, tralaborita, eldono, Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1980,182-3, 231, 235).

Az egyeztetésért ZAMENHOFot igen sokszor bírálták. Az 1907-ben közzétett idó (= Ido, ido) nyelvben (melyet – nagyrészt J. Baudouin de Courtenay, Otto Jespersen, L. Leau és M. W. Ostwald elvei alapján – Louis de Beaufront és Louis Couturat hozott létre, s melyet az eszperantó megreformált változatának – szinte nyelvjárásának – szokás tekinteni) nincs kötelező egyeztetés. (Erről bővebben 1. SZERDAHELYI ISTVÁN: Bevezetés az interlingvisztikába, Budapest, 1980, 120-25; VARGA-HASZONITS ZSUSZA Interlingvisztikai szöveggyűjtemény, I, 1986. Bevezetés, 19; DETLEV BLANKE Internationale Plansprachen, 1985: 194; S. N. KUZNECOV: Teoretičeskie osnovy interlingvistiki, Moskva, 1987, 131; ANDRÉ MARTINET The proof of the pudding... Introductory note; in: Interlingusitics. Aspects of the Science of Planned Languees, ed. KLAUS SCHUBERT in collaboration with DAN MAXWELL, MOUTON DE GRYTER. Berlin, New York, 4). – A jelzőt és a jelzett szót nem egyeztetik például az IALA (főleg A. Gode, I. SZERDAHELYI, i.m. 146-7) kidolgozta Interlingua (1951), az Edgar de Wahl alkotta Occidental (1922), a Jespersen-féle Novial (1928), nyelvek (nyelvtervezetek) sem.

Az igeragozás alakszegénységéről szólva ZAMENHOF így ír: *sufiĉas unu tabelo por ĉiuj verboj... sufiĉas, se ĝi enhavas sole 6 finiĝojn por la tempoj estanta, estinta kaj estonta kaj por la modoj sendifina, kondiĉa kaj ordona. Vi certe en la unua minuto ekpensos, ke dank' al tiu ĉi malgrandega tabelo de la konjugacio la lingvo perdas sian flekseblecon? Tute neniel: konatiĝu kun la lingvo arta, kaj vi ekvidos, ke ĝia konjugacio esprimas ĉiujn nuancojn... ĉar la arta lingvo forĵetas ne tion, kion la lingvo bezonas, sed nur tion, kio prezentas en ĝi superfluan balaston (190012).* – Magyarul: elegendő egyetlen táblázat – valamennyi ige számára... elegendő, ha ez csak hat végződést tartalmaz, a jelen, múlt, jövő idők, a főnévi igenév, a feltételes és a felszólító mód számára. Az első percben önök azt gondolják talán, hogy e túlontúl kicsiny táblázat okán a nyelv elveszíti hajlékonyságát. Semmiképpen. Ismerkedjenek meg a mesterséges nyelvvel, s látni fogják, hogy ez nem azt veti el, amire a nyelvnek szüksége van, hanem csak azt, ami benne fölös ballasztot jelent".

Ma a *balasto* és a *redund(anc)o* szavak az eszperantó szakirodalomban műszópárként is járatosak (1. FRANCOIS LO JACOMO: Liberté ou autorité dans 1' évolution de 1' Espéranto, Pisa, 1981. 368).

La intrefikoj koncernantaj lingvon disvolviĝas a) ene de konscio de unuopulo kaj b) interhome. La homoj, individuoj efikantaj je si reciproke reprezentas a) diversajn lingvojn, b) diversajn lektojn, c) diversajn partonormojn pro io ajn, ekz. pro la dominanta sfero de la uzado. Ĉe Esperanto la detaloj povas esti pli malsimilaj ol ĉe etnolingvoj, sed la bazaj mekanismoj estas la samaj. Ankaŭ ĉe diversaj etnolingvoj la nombro de la lektoj (dialektoj, sociolektoj), ilia ligiĝo al uzokampo kaj sekve la ebloj de ilia interefiko je detaloj estas diversaj, malgraŭ la komuneco de la bazaj mekanismoj.

Por travidi poste la eblajn interefikojn Esperanto pli konkrete, enkonduke kaj simplige oni povas diri, ke rolas similokaze du bazaj rilatotipoj: (A) rilato inter po du sistemoj kaj (B) rilato inter po du homoj. Sistemoj estas ekzemple a) gramatiko de la gepatra lingvo nekonscie abstraktata el aŭdata parolo b) skribe fiksita gramatiko, regularo de la gepatra aŭ alia lingvo konscie alpropriĝita c) sistema aŭ lemolibra gramatiko de Esperanto d) Esperanta gramatiko abstraktata el la uzo de renkontatoj e) alimaniere prenitaj reguloj aŭ skemoj el aliaj lingvoj ktp.

Homoj partoprenantaj aŭ perantaj tiujn interefikojn estas, distingite en vidpunkto-paroj: a-b) instruanto kaj lernanto sametnaj, samlingvaj; c-d) instruanto kaj lernanto diversetnaj e) esperantistoj sametnaj, parolantaj al la alpropriganto nur Esperante; f-g) esperantistoj sametnaj, parolantaj jen tiun, jen alian lingvon; aŭ esperantistoj eksterlandaj; h-i) familianoj aŭ personoj el ekster la familio; j-k) personoj pli aĝaj ol la alpropriganto – aŭ samaĝuloj plijunuloj; 1) homoj diversaj laŭ statuso kaj prestiĝo pli aŭ malpli respektataj de la lingvo-alpropriganto; m) personoj (sametnaj aŭ alietnaj)

alproprigintaj en sia medio diversajn kutimojn de kodoŝanĝado (transiro de lekto aŭ lingvo al alia lekto aŭ lingvo). La medio de certa esperantisto povas esti pli aŭ malpli homogena en certa periodo.

La elementoj diritaj en la realo kombiniĝas je ne facile sekvebla komplikeco; tamen valoras memorteni, ke iuj el la efikantaj sistemoj tre forte ligiĝas al certaj personoj (tia estas la patrina aŭ patra parolmodelo aŭ modelo de la unuaj ne-sametnaj renkontatoj); aliaj sistemoj, lingvomodeloj povas esti home diversfontaj aŭ eĉ sendependaj de senpera homa kontakto, ili povas fonti ankaŭ el libroj, diskoj, prilingvaj diskutoj aŭ tabeloj en libroj ktp.

Kvankam la respekto aŭ malrespekto al la homoj kaj rimedoj, kiuj peras Esperanton, efikas ankaŭ simple al la tuteca akcepto aŭ malakcepto (ŝato aŭ ne-ŝato) de Esperanto, oni momente preterlasu okazojn, kiam oni – malgraŭ la efikoj de la medio – simple ne alproprigas la lingvon eĉ parte.

Interefikoj estas speciale gravaj, kiam temas pri la lingva evoluo de infano.

Parolante pri infanaĝa dulingveco, parto de la fakliteraturo klasifikas la familiojn laŭ la lingvouzaj modeloj: kiu, en plurlingva familio, parolas kiun lingvon kun kiu kaj kiu kondiĉe, en kiu medio. Oni distingas la modelojn de A) Ronjat, B) de Fantini, C) de Haugen, D) de Elwert kaj E) de Saunders; se resumeti: A (Ronjat): lingvoj laŭ apartlingvaj patro kaj patrino; B (Fantini): laŭ apartlingvaj patro kaj patrino + media subteno; C) (Haugen): laŭgepatre + aparta media lingvo; D) (Elwert): laŭ apartlingvaj patro kaj patrino + aparta media lingvo; E) (Saunders): unu el la same medi-lingvaj gepatroj en fremda lingvo. Tiuj modeloj kaj priskriboj, rekomendoj unualege emigas supozi, ke plej ofte oni trovas en la familioj grandajn homogenajn blokojn de nura uzo de certa lingvo. Tuta tago aŭ tagoparto en unu lingvo, tuta tagoparto en alia; tuto de parolo inter infano kaj unu el la gepatroj en la sama lingvo; ĉiuj konversacioj en certa loko (hejmo, lernejo, geava hejmo k.s.) en iu difinita el la lingvoj.

Sekve al tio, ankaŭ mi praktikis ĝis nun tra dek naŭ jaroj unulingvan (nur Esperantan) parolon kun miaj infanoj. Marta Eva (1977) kaj mi plu interparolas ĝis nun ekskluzive en Esperanto; same pri Borijno Eva (1980) kaj Mateo Ĵolto (1985). La ĉefa avantaĝo de tio estas ilia bona evoluo en ambaŭ lingvoj; agrablaj estas ankaŭ la amikaj renkontiĝoj. La ĉefa malavantaĝo estas malkomfortaj situacioj en diversaj medioj pro lingvouzo kontrasta tiumedie; krome mia de-temp-al-tempa laciĝo (vd. Vaha 1994).

En artikoloj, kie aperas ne nur tezoj, sed ankaŭ pli-malpli abunde citiĝas frazoj, konversacioj de infanoj dulingvaj, oni vidas, ke – almenaŭ ekster la esperantistaro, sed eble ankaŭ inter ni – troveblas malmulte da konkretaj ekzemploj de la skemoj Ronjat, Fantini, Haugen, Elwert, Saunders; almenaŭ oni ne vidas ilin praktikatajn tra konsiderinda tempo. Parte oni trovas prefere aŭ a) superregon de unu el la lingvoj, aŭ b) intensan uzon de du aŭ pluraj lingvoj, sed kun konsiderinda kvanto da kodoŝanĝoj en eĉ mallonga tempodaŭro.

La esceptoj, kiuj tamen sendube ekzistas, indikas fortan konscian kultivadon de la parolataj lingvoj kaj purisman fortostreĉon, kiun subtenas kulturflegaj normoj de tiu aŭ alia komunumo, kaj kiujn subtenas ankaŭ pli aŭ malpli oficialaj institucioj. Tiel estas ĉe etnolingvaj dulingvecoj, kiuj inter si povas tre diferenci, kaj tiel estas ankaŭ en la esperantista sfero.

Suzanne Romaine en sia libro *Bilingualisme* tra pli ol 50 paĝoj okupiĝas pri ecoj kaj specoj de kodoŝanĝado. Kodoŝanĝo estas transira loko aŭ fragmento en parolo; loko, kie la parolanto transiras de certa lekto aŭ lingvo al alia lekto aŭ lingvo: kodoŝanĝo eblas ene de la sama lingvo (de lekto al lekto, stiltavolo al stiltavolo) aŭ inter lingvoj diferencaj. Asertante, ke dulingvulo ĉiam scias, en kiu lingvo li/ŝi estas parolanta, oni strebas distingi kodoŝanĝon disde pruntado: t.e. distingi a) transiron al alilingva fragmento disde b) uzo de elemento kun alilingva deveno. La unua afero (a) karakterizas okazon en dulingva parolo de individuo, la dua afero (b) karakterizas (unu certan) lingvon aŭ lekton, kiu enhavas certan pruntovorton.

Kodoŝanĝo povas aperi ĉe diversaj punktoj laŭ la organizo, hierarkio de la teksto kaj de la frazo: a) post fino de eldiro, ĉe transiro al la nova frazo de konversacio; b) post fino de la frazo; c) post fino de propozicio; d) eventuale post fino de la topiko aŭ subjekto de frazo; e) inter fraznivelaj frazelementoj; inter frazelementoj de ia ajn nivelo; f) inter radiko kaj afikso: la normoj, kutimoj en diversaj komunumoj povas esti diversaj. La kodoŝanĝo povas esti glata (neindikata) aŭ indikata. Indikata ĝi estas ekzemple a) per enmeto de mencio pri la ŝanĝo: Ekz. *Plej bona estis la hungare töltöttkáposzta*; b) referenca ripeto de frazelemento per propono, ekz. *A töltöttkáposzta, tio estis tre bongusta* c) traduka ripeto de elemento ĉe la transiro (ekz.: *c'est un – a hard boiled killer*). Kiujn tipojn de kodoŝanĝo oni uzas en difinita komunumo, tio estas ligita al tiu aŭ alia komunumo: ne estas universale. A1 kodoŝanĝo fiksiĝas interhomaj rilato-tipoj, ĝenroj, stilvaloro, kiuj ne estas koneblaj sen

la kono de la internaj normoj de la komunumo. Ekzistas lingvokomunumoj, kie la kodoŝanĝo devas esti indikata (franca-angla en Kanado), en aliaj (en la Portorika hispana, ekzemple) ĝi estas neindikata.

La observoj estas tre detalaj: en certa lingvokomunumo (kun lingvoj de tipo SVO kaj SOV, respektive) eblas kodoŝanĝo post la subjekto, sed ĝi ne plu eblas post la objekto k.s.: iom komplike efikas la diferencoj de la vortordo-reguloj de la du lingvoj. [Ekzistas lingvo-komunumoj, kie la kodoŝanĝo devas esti indikata, en aliaj (en la Portorika hispana, ekzemple) ĝi estas neindikata. Ekzistas preferoj de lingvoelekto laŭ socia stato (paroli al-supre en tiu, al-malsupre aŭ al-egale en alia lingvo); elekto de lingvo en stabile plurlingvaj komunumoj povas indiki oficialan aŭ privatan karakteron de dialogo, sociajn specojn, ecojn, karakterizojn de la parola interagado (ekz. en religiaj, kulturaj, civitanaj kunvenoj, ceremonioj; okaze de instruado, kontraktado, oficiala/fervoja,polica informado, aĉetado; festado kun parencaro, kolegaro, amikaro, respektive).

Ni vidu kelkajn tipojn de la rilato inter a) lingvosistemo b) alpropriganto de la lingvosistemo Esperanta kaj c) alia uzanto de la lingvo.

1) Unu el la tipoj de tiu rilato estas konstruado de interetna sistemo („lingvo en psiko") surbaze de ialingve (metalingve) prezentitaj reguloj, t.e. surbaze de skribita regularo kaj ĝia mensa interpreto fare de la lernanto mem – sen ekstera, aliula kontrolo kaj konfirmado. La interpretado de la reguloj kutime estas influata de alifontaj konoj; la parolanto kreas frazojn sintezante elementojn de la konscie konsiderata regularo kaj regulojn pli ĝenerale validajn aŭ nur teme proksimajn.

Tio estas la kazo de Antoni Grabowski kaj de multaj esperantistoj antaŭ la unua kongreso.

Ni scias, ke Antoni Grabowski lernis Esperanton sen esti ĝin aŭdinta; simpligante lian okazon ni povas supozi parolaĵon, kiu estas produkto de a) vole sekvata regularo kaj b) pli-malpli senvole konsiderata alilingva aŭ aligramatika regularo – sen ekstera homa (aliula) efiko. Tiu manko de ekstera homa efiko esence estas du aferoj: manko de konkretaj, personaj lingvaj ekzemploj (klišoj por imitado) kaj manko de psika konfirmo. La situacio estas simila ĉiufoje, kiam iun ajn fremdan lingvon oni lernas nur el lernolibro. Kiom ajn precize oni estas lerninta ĉion, oni restas malcerta, kaj ĉe la unua renkontiĝo kun fremdlingvano oni vole-nevole kontrolas, ĉu la lernitaĵo funkcias.

Ne hazarde skribas E. Privat kaj pri la unua kongreso kaj pri esperantistoj iom similaj al Grabowski: „Ĝi estis granda aventuro... Multaj trovis la aferon trofrua... Multaj neniam parolis Esperanton antaŭe. Ĝia facileco kaj flueco mirigis ilin en la propra buŝo".

Simila okazo estis tiu de Aleksandro Saĥarov, lerninta Esperanton aŭtodidakte en 1903, kaj uzinta ĝin la unuan fojon parole en la jaro 1906a. Li skribas: „La unuan viziton mi faris al s-ro Feyerabend. Mi havis lian ofican adreson. Antaŭ la vizito mi min sentis, kvazaŭ mi iras al ekzameno. Mi timis, ke jen tuj okazos granda skandalo. Nek li min komprenos, nek mi lin. (Saĥarov 1993, 22).

2) Efiko de sametna instruisto povas interfere influi la alproprigatan sistemon. E. Privat prezentante la Bulonjan kongreson skribas: „Ĉe Angloj kaj Francoj la lernolibroj de L. de Beaufront – forestanta pro malsano – lasis la tendencon elparoli la vokalojn tro fermite kaj longe. Oni demandis d-ron Zamenhof pri la ĝusta maniero. Li deklamigis poemojn per sinjorino Rosa Junck, kiel modelo. Ŝi estis aktorino itala de ĉeĥa deveno, kaj elparolis la vokalojn malfermite kiel Slavoj kaj Italoj. De tiam la regulo estis klara por ĉiuj, sed ĝi bezonis multajn jarojn por disvastiĝi en ĉies uzadon."

Laŭ A. Saĥarov iom malklera vortaristo Radvan-Ripinskij fiksis la ekvivalentojn skol'ko – kiom da. Dank' al lia vortaro multaj rusaj esperantistoj, uzintaj lian vortaron, skribis: „Kiom da kostas tiu ĉi libro". Tamen, eble konserviĝon de trouzo de la demandoformo kun *kiom da* povas ŝuldiĝi ankaŭ al la redundo, kiun ĝi prezentas en la opozicio *kion : kiom da*.

Laŭ diskoj de Pettyn konfirmiĝadis plusa ŝva-sono post la akuzativa -n.

Dum leciono instruisto kaj lernanto konversacias pri elektita temo en la cellingvo, sed dum aŭ post la leciono ili revenas ofte al la media lingvo – kiam la temo estas el ekster la instruplano kaj super la nivelo de la lernanto. Efiko de sametna instruisto do kutime kondukas al uzo de diverslingvaj alineoj, tekstopartoj alterne; sed ĝi kutime ne kondukas al ŝanĝo de lingvo en la sama frazo. Instruisto kutime efikas relative konfirme, la lernanto iajn lingvajn formojn konscias ĝustaj, tamen, en diversetna medio la lernanto bezonas rekonfirmon. Instruisto en esperantista medio ofte iom post iom ŝanĝiĝas je parol-partnero: tion ni traktu tamen aparte.

3) Efiko de sametna esperantisto, parolpartnero: ĉe esperantlingva interparolado ĝi principe povas kaŭzi aŭ fortigi transferon. Persono parolanta al eksterlandano laŭnorme, parolante al sametnano emas malproksimiĝi de la Esperantaj normoj: oni kvazaŭ hontas paroli tro aŭ superflue bone. Tia situacio estas konata ankaŭ el lingvoinstruado, kie instruisto en lerneja situacio parolas malpli modele, malpli,

ni diru, fremdlingvece ol kun eksterlandano, al kiu la lingvo apartenas. Oni kvazaŭ instinkte proksimiĝas al la komprenbezonoj de la partnero.

Laŭ etaj komunumoj estas gravaj diferencoj en la lingvoelekto tra iom longa unufoja kunestado – ekzemple en kluba vespero a) tute en Esperanto b) Esperante: formalaĵoj, etnolingve: gravaĵoj; c) ĉio pli-malpli en Esperanto, sed la personajn rilatojn, etoson oni fiksas en la etna lingvo d) preskaŭ ĉio en la etna lingvo, sed por fiksi la etoson kaj esprimi kunapartenon oni enigas Esperantajn pruntovortojn. Ekz.: *Na mi lesz. poeto, gvakoroljuk az akuzativót?* Ĉe longa rilato de sametnanoj nur en Esperanto povas aperi malcerteco pri la rilato-tipo inter la konversaciantoj. Homoj rakontas pri sia dilemo ĉu ci-diri aŭ vi-diri al sametnano kontaktita Esperante, sed poste alparolata hungare. Tial, laŭ mia supozo, oni iam transiras al etnolingva konversacio, por indiki plian aŭ malplian proksimecon aŭ eventuale malproksimecon de la rilatoj.

La diferencoj pri la kutimoj ĉe lingvoŝanĝado en la Esperanta socio estas malpli unuecaj ol en iuj en la etne dulingvaj komunumoj. En nia familio la nomformo *Marta, Martinjo, Borinjo* indikas komencon de Esperanta frazo; *Martå* kun labiala *a* ĉe la fino aŭ *Mārti, Borka* komencon de frazo hungarlingva. Tial la frazon de hungara gasto-esperantisto kun labiala *a* en la vorto Martå aŭ hungare sufiksita Borka niaj infanoj ŝajne perceptadis kiel signalon por transiro al la hungara. Signalo de citaĵo kutime aperas en la parolo de Nora (1974), Palma (1975), Marta (1977), sed la signaloj ne estas la samaj. Nora kaj Palma uzas individuigan tabelvorton por indiki hungarlingvan citaĵon, porokazan pruntvorton; kvazaŭ: *„Estis tie ankaŭ tiu sövény."* Marta similokaze dirus: *„Estis tie ankaŭ hungare sövény"*. – Ĉi tiuj frazoj ne estas okazintaj, mi nur imitas ilian procedon. La signaloj pri kodoŝanĝo aŭ alilingva citaĵo parte venas de modelo en la strikta medio, precipe de gepatroj, parte ili estas elformiĝintaj en la medieto; eventuale ili estas propraj inventaĵoj de la infanoj.

Versteegh en la jaro 1983 partoprenis Renkontiĝon de Esperantistaj Familioj en Sümeg; li venis kun la supozo, ke ĉe transdono de Esperanto li vidos specon de kreoliĝo. Ja iuj el la kondiĉoj, iuj el la ecoj de la gepatroj ĉe esperantista familio kaj en kreoliĝa familio – kiel li tion mem prezentas en sia artikolo aperinta en 1993. El lia artikolo praktike oni tamen povas vidi, ke la infana Esperanto ne estas kreola; sed ankaŭ, ke la indikoj pri ĉio ne estis sufiĉe detalaj.

Ŝanĝiĝo en la infana varianto kompare al la gepatra kelkfoje povas aperi pro fonetikaj malfortaj pozicioj: eventuale malaperas vortkomenca *s* pro neaŭdeblo post „verba" *s*: *„Ni manĝis pinacaĵon/spinacaĵon."* Analogie aperis almenaŭ ĉe miaj infanoj akuzativo en rekt-objektaj sintagmoj post la prepozicio da, kiel *„Ni manĝis multe da ĉerizojn"*. Sed da tiaj novaĵoj ne estas tiom multe, ke ili kvazaŭ kreus novan lingvovarianton. Oni povas supozi, ke en Esperanto parte oni kelkfoje bezonas iom pli da redundo, parte oni efektive havas tre malmulte da redundo. Tio pli ol kutime montriĝas ĉe familia apliko de Esperanto; la konscia aŭ nekonscia strebado al pliigo de redundo montriĝas tra la historio de la familia apliko. En *Gepatra Bulteno*, 1960, aperis artikolo subskribita je K.B., laŭ kiu li pro telefonaj miskomprenoj uzadis pronomvariantojn *vuj* (anstataŭ *vi*, supozeble plurala), *naj* (anstataŭ aŭ samsence kiel *ni*). En la familio Csiszár estis ofte uzataj la demandoj de la tipo *Kiaspeca ĝi estas?* Tio kontribuis al la plifortiĝo de la kontrasto *Kia ĝi estas?* : *Kie ĝi estas?* - t.e. denove oni atingis volenevole pliiĝon de redundo. Same efikadis ofta uzo ĉe demandoj pri personoj, sintagmo anstataŭ la nura tabela pronomo kiu: *„Kiu infano/kiu plenkreskulo helpos?"* Ĉio ĉi estas spontaneaj uzoj, kies motivo ne estas pruvebla. Pri la facila miskomprenebleco de la pronomoj aliflanke aperis mencioj en la fakliteraturo, interalie en *Einführung in die Interlinguistik* de Detlev Blanke, kiel problemo de Esperanto ĉe novaj aplikoj. – Tia nesufiĉo de redundo interalie influis ankaŭ min, kiam mi en eksperimentaj tekstoj uzis diversajn tiel nomatajn pronom-substantivojn, t.e. vortojn kun substantiva formo, aperantajn apozicie kun certa persona pronomo (vd. ekz. *Survoje*, n-ro 14, 1993, pp. 24-5). Por eta infano (nepre alparolata, duapersona) tia pronomsubstantivo povas esti *bumbo*: *„Kial vi bumbo ne manĝas la supon?" „Ni foriros, vi bumboj restos kun la avino."*

En familia uzo oni pli bezonas distingi unuan ordonon aŭ peton kaj urĝadon: tiun distingon tre multaj lingvoj iel faras, sed malofte tio estas konscia. En Esperanto ĝi laŭ Zamenhofe slaveca verbouzo estas konsekvence ebla: A: Manĝu vian supon: nu, manĝadu, manĝadu. B: Eliru! Nu, eliradu! – ŝajnas al mi, ke tiun distingon de „nova ordono" kaj „urĝado" aŭ „insistado" la esperantistoj kaj ankaŭ la familioj ofte aplikas, sed ja tre instinkte kaj diverse. – Ankaŭ en etnaj lingvoj oni malofte konscias pri tiaj modalaj nuancoj, praktike tre gravaj.

Estas interese, kiel diverse gepatroj-esperantistoj rilatas al la tuta esperantista komunumo. Iu patro-esperantisto longe ne aŭ preskaŭ ne partoprenigis sian infanon en publika renkontiĝo, por ke la infano

ne lernu tro da malbonaj neologismoj, ke la infano ne influiĝu de malĝusta lingvouzo: li atendis la tempon, kiam la infano jam havas sufiĉe stabilan hejme lernitan lingvouzon. Aliaj plejeble rapidas sian bebon ensocietigi.

4) Efiko de alietna esperantisto: la etno-lingvaj enmetaĵoj forestas; la interpersonaj rilatoj estas eventuale pli klaraj, ol se Esperanto estas konstanta konversacia lingvo de sametnanoj: elekto de Esperanto ne markas specialan rilaton. Estas interese, ke kelkfoje la sonkvaliton pro alilingva influo oni transprenas kun ligo leksika: ekzemple, Hungaro akceptas longan fermitan *e* en *ĉe* laŭ franc-esperantista modelo ne aplikante la sonvarianton alivorte (*ĉe: ni:* sed: *de ni* kaj ne: *de: ni*). Evidente, alietnaj esperantistoj kontribuas al vastigo de la kompren-povo, pasive regata sistemo de alofonoj de la esperantaj morfemoj.

5) Iom sendepende de la pli preciza karakterizo de la esperantistoj priparolataj oni povas rimarki, ke ili en la sama konversacio prezentas plurajn eblojn por esprimi saman nocion aŭ nuancon; poste ili, imite unuj al aliaj, kvazaŭ elektas la kredinde plej konvenan aŭ ĉefan varianton. Ekzemple, oni aŭdas ordonojn *Ni turniĝu dekstren! Dekstriĝu! Ni dekstreniĝu! Ni aldekstru! Ni turnu nin dekstren! Ĝiru dekstren! Ni turnu nin dekstren! Ĝiru la aŭton dekstren! Ni turnu nin maldekstren, liven* ktp. Post kelkminuta kuna veturado la solvoj unueciĝas; eble nur por unu veturado; eble tio estas paŝo al plia unueciĝo kaj konstantiĝo de la parolkutimoj.

Literaturo

Antal 1984: Antal, László: Bevezctés (Enkonduko). En: Antal (red.): A világnyelv. Gondolat, Budapest, 1984, 7-20.
K.B.: Ĉu mi, vi aŭ ni? Internacia Geedziĝo (1983): Internacia geedziĝo. Enketo pri 66 internaciaj geedzoj. Yokohama: Enketgrupo pri internacia Geedziĝo. (1983).
Romaine 1989: Romaine, Suzanne: Bilingualism. Language in Society 13. 1989, 1991, 1992.
Saharov 1973: Aleksandr Saĥarov: Rememoroj de centprocenta esperantisto. Impeto, Moskvo, 1973.
K. Versteegh: Esperanto as a first language acquisition with restricted input. Linguistics 31 (1993).
Vaha 1993: Tostoj de Viena lingvisto sur kabo. In: Survoje, n-ro 14,1993. pp. 24, 25.
Vaha 1994: Vaha, Blazio: Letero al Anna, Renato kaj sam-cirkulaĵanoj. Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj, Novembro 1994, pp. 1-4.

Zamenhof első szótárai és utóéletük[30]

(1997)

Többezer újabb földrajzi névnek, köztük Csernobil, Tengiz, a besszarábiai Csobrucsi nevének megetimologizálásával a „Földrajzi nevek etimológiai szótárának 1988. évi negyedik, duplájára bővített kiadása elérte és jóval meghaladta a tizenháromezres szócikkmennyiséget. Sok más kiemelkedő eredménye mellett ezért is a tudásnak, az értelemnek és a nagy munkához kellő eltökéltségnek kijáró tisztelettel köszöntőm Kiss Lajos tanár urat.

1. Az eszperantó nyelv szókészletének, morfémaállományának számontartása mindezideig nem tudja megközelíteni, ill. követni a beszélt és az írott nyelvhasználat növekvő gazdagságát és napjainkra kialakult viszonylagos rétegzettségét. Helytelen volna azonban, ha a csendben születő kezdeményekről, eredményekről és hibákról nem venne tudomást, ha a fejlődést és a visszaeséseket nem kísérné figyelemmel a nyelvtudomány egésze. Jó volna, ha a nyelvészet részdiszciplínái az eszperantó nevű szerkesztett emberi nyelvnek, e nyelv szabályozott és spontán fejlődésének (vö. Schubert 1989/b), illetőleg leírásának buktatóit és kibontakozását a maguk szempontjai szerint közelebbről is szemügyre vennék – akár azért, hogy tapasztalataikkal és bírálatukkal az eszperantó nyelv tényleges működésének a valósághoz hű és fogalmilag a lehetőség szerint pontos feltárásához hozzájáruljanak, akár pedig azért, hogy a nyelvszociológiai tekintetben is sajátos eszperantónak szinkrón és diakrón szempontú elemzése révén az általános vagy általánosnak vélt nyelvi törvényszerűségek érvényét ellenőrizzék. Lehet, hogy mindez valamelyest az emberi nyelv fogalmának pontosításához is szükséges avagy hasznos volna.

2. Szerkesztett nyelvekről, nyelvtervezésről a felvilágosodás eszmetörténetének vagy a nyelvi norma elvi tárgyalásának során nemegyszer szó esik, a nyelvészet-filozófiatörténet-kultúrtörténet mezsgyéin (nem egy helyen olvashatunk Dalgarnóról, Descartes-ról, Kalmár Györgyről stb.). Olvashatunk napjainkban sokat az ettől különböző nyelvi tervezésről, valamint a nyelvvel együttműködő jelrendszerekről (gesztus, mimika, kifejező cselekvés, közlekedési táblák, piktogramok); spontán fejlődésű és tervezett jelrendszerekről, jelrendszer-fejlesztésekről és jelrendszer-alkalmazásokról (írás- és átírásrendszerek: ábécék, intonáció- és ritmusjelek; jelelés; tipográfia; helyesírás; terminológia-tervezés, szövegszerkesztés, retorika; reklám technika). A nyelvek genealógiai és tipológiai osztályozása mellett a nyelvészek többnyire módját lelik, hogy az egyes nyelveket nyelvszociológiái jellemzőik és állapotuk szerint pidginnek, kreolnak minősítsék, vagy e tekintetbe ne sorolják be őket. Tudnak róla, hogy nem minden nyelv használatának azonosak a regiszterei.

Minderről nemcsak a specialisták, hanem az összegzők is szólnak.

A valóságosan működő szerkesztett nyelvvel, az eszperantóval ezzel szemben még mindig javarészt mi magunk, eszperantisták foglalkozunk, saját, eszperantó nyelvű, többnyire vegyes profilú lapjainkban. Nem ritkák a reflektált, olykor tudományos ambícióval és eredményekkel szolgáló önismereti erőfeszítések, de lanyha a kívülről jövő tudományos megismerés szándéka. Olykor ugyan a napilapok helyet adnak egy-egy, az eszperantót érintő rövid írásnak, de annak többnyire színesnek és főleg rövidnek kell lennie.

3. Az eszperantó nyelv szókészletének, morfémaállományának számontartása, mint mondottam, hiányos. Mindamellett 1887 óta nyomon követhető; vannak eredményei.

LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF (Lejzer Markovics Samenhof), ez a jiddis és az orosz nyelv közegében, a történelmi Litvániában született, magát orosz anyanyelvűnek valló zsidó, aki a többnyelvű Białystokban nevelkedett, hazájaként Litvániát emlegette, Puskinon és Mickiewiczen érlelődött; aki 1879-81 között jiddis írásreformmal próbálkozott; aki – a cionizmustól eltávolodva – mint a homaranizmus és a hillélizmus meghirdetője minden ország polgárának, minden felekezet követőjének és minden nemzetség *(gento)* gyermekének születéstől és dogmáktól független testvériségére vágyott,

[30] A cikk forrása: Kiss Gábor és Zaicz Gábor (szerk.) 1997: Szavak – nevek – szótárak. Írások Kiss Lajos 75. születésnapjára. A Magyar Tudományos Akadémia Nyelvtudományi Intézete. Budapest. 458-462.

s akit egyébként nem egy lexikon varsói szemorvosként azonosít, ez a Zamenhof 1887-ben adta ki, dr. Esperanto álnéven, az *Internacia Lingvo*, azaz 'nemzetközi nyelv' elnevezésű nyelvtervezetének ismertetését, egy-egy orosz (július), lengyel (szeptember), francia, német (november) könyvecskében. A következő évben, 1888-ban jelent meg a kiadvány angol nyelvű változata. Ezeknek az egymás fordításainak tekintendő könyvecskéknek a függelékeként jelentek meg az első rövidke eszperantó-orosz, eszperantó-lengyel, eszperantó-német, eszperantó-francia, eszperantó-angol szótárak, pontosabban szólva morfématárak, de volt bennük nyelvtan és voltak bennük (már eszperantó nyelvű) mintaszövegek is. A hagyományosan *Első Könyvnek* nevezett *(Unua Libro)* orosz kiadásban a mintaszövegek természetesen csupa első előfordulású szóból állnak. Egy-két eszperantó szó a francia kiadásban módosult az orosz kiadáshoz viszonyítva *(sper' → esper*' 'remény'; *tomb'* (előbb:) 'esik' (utóbb:) → 'sír' (fn.), *vaks*', (előbb) 'nő' → (utóbb) 'viasz', így az új nyelv(kezdemény) életének negyedik hónapjában már készen állt egy-két archaizmus is. Az *Első Könyv* szótára 917 egységet (eszperantó tövet, szóelemet, orosz szót vagy körülírást) tartalmazott.

Zamenhof hajlott arra, hogy az eszperantóban a *szó,* a *szóösszetételi tag* és a *szóelem* (morféma) fogalmát lényegében azonosítsa, s az el nem különítetten képzett vagy összetett szavakat, a szintagmákat és mondatokat egyaránt és szinte egynemű, produktív kombinációs szabályok termékeinek tekintse. Ennek az eszperantó szókincs alakulására mindmáig nagy hatása van. Ebből az alapállásból fakadt annak idején, 1887-8-ban az is, hogy fent említett szótáracskáiban Zamenhof jobb oldalon szófaji paradigmákhoz kapcsolható (pl. alanyesetben álló) etnikus nyelvi szavakat, azaz orosz, lengyel, német, francia, angol főneveket, mellékneveket, főnévi igeneveket, ill. igéket tüntetett fel, míg az eszperantó oldalon csak – adott formájában paradigmába nem illeszthető – elemi „szó" vagy inkább szóelem szerepel: morféma, amely többnyire tő szokott lenni, s amely – ha nem egyforma affinitással is – mind főnévvé, mind melléknévvé vagy igévé kiegészíthető: *labor* 'pracowac' (lényegében ezek helyett: *labori* 'dolgozik' *laboro* 'munka'[1], *labora* 'munka-', *labore* 'munkával, munka révén, dolgozva'), *ripet* 'potwarzać' (ezek helyett: *ripeti* 'ismétel', *ripeto* 'ismétlés', *ripeta* 'ismételt, ismétlődő, ismétléses', *ripete* 'ismételten, újra és újra').

4. 1888-ban elkészült és december 28-án megjelent Zamenhof 232 l. terjedelmű orosz-eszperantó, 1889. január 30-án pedig német-eszperantó szótára... A tízes években induló, a szóalkotási módokat érintő grammatikai viták (R. Saussure, E. Wüster stb.) normatív tendenciájú egynyelvű szótár megjelenését sürgették, s váltották ki 1934-ben (GROSJEAN-MAUPIN: *Plena Vortaro de Esperanto).* Ez lényegében már korpuszra, a közösség által klasszikusnak ítélt szövegekre támaszkodik.

Eŭgeno Lanti és Grosjean-Maupin elveit és példáját követte később GASTON WARINGHIEN is az 1970-ben megjelent, ugyancsak értelmező jellegű és ugyancsak gondosan dokumentált *Plena Ilustrita Vortaro* szerkesztése során.

Wüster (az ezerkilencszázhuszas években) már azt is megállapítja, hogy az eszperantó szókincs fejlődésében a sporadikus egyéni és testületi kezdeményezések, ezek regisztrálása, rostálása, ajánlása és a nyelvhasználat révén való állandósulása, majd az állandósult használat végső regisztrálása – egymást követik: s a szakmai nyelvhasználatban, a terminológiák fejlesztésében e folyamat gondos követésére kell törekednünk. A nehézségek és a feladatok hasonlóak a nemzeti nyelvi terminológiai munkában tapasztaltakhoz. Az 1930-as években, majd a 80-as években éles ortológus-neológus jellegű viták voltak; ezek nyilván időnként ezután is ismétlődni fognak.

Az objektív eredmény: a szókincs bizonyos stiláris rétegződése, a szójelentés konnotatív összetevőinek erősödése. Az 1980-as éveket a kifejező nyelvhasználat, az irodalom, a korábban jellemző lírára mellett az epika viszonylagos erőre kapása is jellemzi.

Nagy jelentősége van NOMURA RIHEJ 1989-ben megjelent egynyelvű szótárának (*Zamenhofa ekzemplaro).* A szerző ebben Zamenhof klasszikus szóhasználatát szövegkörnyezetekkel, rendszeres forrásjelzéssel tárja fel. RÜDIGER EICHHOLZ-nak, a Terminológiai Központ vezetőjének számítógépes gyűjteménye az együttműködők számára hozzáférhető, a felmerülő terminus technicusok rendezett menetű vitáját (a javaslatokat, érveket és ellenérveket) is követhetően rögzítik. 1988-ban Eichholz megjelentette a Duden sorozat képes szótárának eszperantó megfelelőjét.

1989-ben, Malmőben jelent meg EBBE VILBORG *Etimologia Vortaro de Esperanto* c. szófejtő szótárának első kötete (A-D). Kiadta: Eldona Socieo Esperanto. Terjedelme: 128 1. Az elsőt 1991-ben követte a második (E-J; 114 1.), majd 1993-ban a harmadik kötet (K-M; 128. 1.). A szótár csak az ún. hivatalosított eszperantó szavakat tartalmazza, azokat, amelyek – amellett, hogy többnyire sok helyről

adatolhatók volnának – szerepelnek a *Fundamento de Esperanto* c. nyelvi dokumentum (1905) hivatalosnak mondott szójegyzékében. ill. ennek valamelyik későbbi kiegészítésében. Minthogy a szó hivatalosítása előtt általában már jó ideje használatos, nem lényegtelen, hogy VILBORG a hivatalosítás forrásán kívül közli az első előfordulás helyét (locusát). Ha lehet, megadja az eszperantó fő referencianyelveinek megfelelő szavait is. L. L. Zamenhof, mint ismeretes, elsősorban a latinból, az angolból, a franciából, a németből, az olaszból, a lengyelből és az oroszból egyaránt ismert töveket szerkesztette be az eszperantó nyelv kezdeményeként 1887-ben megjelent tervezetébe. Ezek a nyelvek az eszperantó elsődleges forrásnyelvei. Innen érthető, hogy Vilborg legtöbbször ezeken a nyelveken adja meg az eszperantó szó megfelelőit, illetve hogy megadja a spanyol megfelelőt is, ha az is ugyanannak a latin, ill. indoeurópai etimonnak a származéka, mint az eszperantóban közvetlenül alapul vett neolatin – esetleg germán vagy szláv szó.

Vilborg rendszeresen utal arra, ha az eszperantó szó több átadó nyelv hasonló szavainak tulajdonságait egyesíti. Így pl. az eszperantó *akció* kapcsán az egyes nyelvek eszperantó nevét rövidítő nagybetű után közli a francia, a német, az olasz, a lengyel, az orosz, a spanyol megfelelőket (F *action,* G *Aktie...,* I *azione,* P *akcja*, R *akcija* (H *accion),* majd megjegyzi, hogy a szónak a kereskedelemből ismert jelentése (‘részvény’) a hollandból származik. A fenti formákat megelőző, közös, latin (L) etimonnak ettől elütő jelentését Vilborg ugyancsak megadja: „El L *actio* ‘apelacio, proceso, (jura) agado’, subst. de *agere* ‘agi’.”

A szótár sajnos nem tartalmazza azokat a szavakat, amelyeket – bár az Eszperantó Akadémia még nem hivatalosította őket –, az eszperantisták körében kétségtelen normaalakító hatású *Plena Ilustrita Vortaro* már regisztrált, meghatározott, s amelyek sokszor a nyelvközösség szemében már-már klaszszikus értékű művekben is előfordulnak.

1995-ben jelent meg PETER BENSON *Comprehensive English–Esperanto Dictionary* c. szótára. Simiyu Koici, a szótár japán recenzense szerint a szótár mintegy 45 000 címszót tartalmaz. PETER BENSON**,** aki a zamenhofi *Proverbaro* mellett már az utóbbi évtizedekben napvilágot látott kifejezésgyűjteményeket, ill. a Plena Ilustrita Vortaro gondosan dokumentált szócikkeit is figyelembe vehette, a korábbi kétnyelvű szótárak szerzőinél több figyelmet szentel a frazeologizmusoknak.

1996-ban jelent meg a SZERDAHELYI ISTVÁN és KOUTNY ILONA szerkesztette *Magyar-eszperantó kéziszótár.* A szótár szükségességének gondolata Haszpra Ottótól származik. HASZPRA OTTÓ a kiemelkedő nagyságú **(**15 000 szócikknyi) természettudományi és technikai szóanyag területszerkesztője is. A szótár anyagát számítógépre vitte és javította: Dudás Ildikó, Hideg Sándor, Lin Wang. A számítógépes munkákat Deák-Jahn Gábor és Bujdosó Iván végezte, Sirkó Ilona hangolta össze. A szótár főmunkatársai: dr. Fehér Miklós, Fenyvesi Ervin, Pechán Alfonz.

A szótár kidolgozásáról Koutny Ilona azt írja, hogy abban – „mintegy ötven ember vett részt (névsoruk a belső címlap hátoldalán), az általános anyagot betű szerint, a szakmai anyagot pedig szakmák szerint megosztva”.

Irodalom

I. BENSON, PETER 1995: *Comprehensive English–Esperanto Dictionary.*

EICHHOLZ, RÜDIGER 1988: *Esperanta Bildvortaro.* Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado. KOLL 1 BO. 880 1. (A *Das Bildwörterbuch der deutschen Sprache* 1958. évi 2. kiadásának alapján.)

GROSJEAN-MAUPIN, E., 1934: *Plena vortaro de Esperanto.* 1934/1971, Paris 511+63 1.

MUNNIKSMA, F.. 1975: Internacia komerca-ekonomia Vortaro en naŭ lingvoj, XVI+535 1. Antwerpen.

RIHEJ NOMURA 1989: *Zamenhofa ekzemplaro.* Nagoya Esperanto-Centro. 463 számozott lap + mutató.

SZERDAHELYI ISTVÁN - KOUTNY ILONA 1996: *Magyar-eszperantó kéziszótár.* Magyarországi Eszperantó Szövetség, Budapest. 835.1.

VILBORG, EBBE 1989, 1991, 1993: *Etimologia Vortaro de Esperanto.* 1-3. Malmö.

WARINGHIEN, GASTON 1987: *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.* Represo de la tria eldono kun suplemento. Sennacieca Asocio Tutmonda. Paris. 1303+45 l.

II. ADY ENDRE 1906: *Egy magyar probléma.* Budapesti Napló, 1906. szept. 4.

EICHHOLZ, RÜDIGER 1989: *Terminics in the Interethnic Language.* Ebben: SCHUBERT 1989b.

FAJSZI KÁROLY 1991: *Katalogo de Károly Fajszi.* Libroj. 1. parto. Országos Idegennyelvű Könyvtár. Budapest. XI+542 1.

MAIMON, N.Z. 1978: *La kaŝita vivo de Zamenhof.* Tokio.

SCHUBERT, KLAUS 1989a: *An unplanned development in planned languages. A study of wordgrammar.* Ebben: SCHUBERT 1989b.

SCHUBERT, KLAUS (szerk.) 1989b: *Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Languages.* Mouton de Gruyter Berlin – New York.

WARINGHIEN, GASTON 1980: *1887 kaj la sekvo.* Esperantologiaj eseoj IV.

Pri redundo kaj ensociiĝo de planlingvo[31]

(1997)

Esperanto estas la sola planlingvo, kies ensociiĝado nuntempe estas rekte spertebla kaj observebla; ĝi estas la sola planlingvo, kiu ebligas al ni minimume *sperti kaj intue ekkompreni;* en pli matura stadio: *kvalifiki* kaj *klasifiki observojn,* kolekti pliajn indikojn, fine, pli kaj pli *ekzakte studi,* kaj pli kaj pli *esence karakterizi procezon,* kiu cetere multon povos pliklairigi ankaŭ en evoluo de etnaj litigvoj.

Kiel konate, la aplikterenoj de Esperanto, eĉ se ili ne ampleksas la tutan homan aktivadon, estas tre vastaj kaj kontinue vastiĝantaj. Eĉ se por la makrosocio tio estas neglektebla, antaŭ ĉio pro malgrandeco de la esperantista komunumo, el la vidpunkto de la lingvo mem estas ege grave, ke ĝi iĝis regule aplikata en interpersonaj, amikaj rilatoj internaciaj; en literaturo, en scenejaj artoj; en sciencoj homaj, naturaj kaj teĥnikaj; en la kampoj de familia vivopraktiko, socia reprodukto, en religioj ktp. Ne gravas nur la temoj de tiuj aplikoj: gravas ankaŭ la pliintensiĝo de la *parola uzo, pli-variiĝo de la rilatoj inter la parolantoj, diversiĝo de nombro, spaca distanco kaj dislokiĝo de personaj interparolantaj – kelkfoje parolantaj samtempe ktp.* Evidente, en la evoluo de la lingvo, preter la bazaj fontlingvoj, Zamenhofa planado, areaj faktoroj, altemaj etnaj influoj, ekhavis kaj havas pli kaj pli da rolo la *bezonoj, kiuj manifestiĝas dum la uzado de la lingvo, dum parolado aŭ skribado.* Kaj ĉe tio mi konsideras ne nur leksikajn bezonojn.

La bezonoj plejparte estas samaj aŭ tre similaj al tiuj de parolantoj de etna lingvo; kelkfoje ili diferencas kvante kaj iam ili povas esti specifaj. Dum, ekzemple, verŝajne nek etna lingvo, nek internacie uzata planlingvo povus longe toleri, ke la vortoj 'blanka' kaj 'nigra' estu homonimoj, eble en la planlingvo oni pli sentas la bezonon havi komunan formon de alparolo ol en etna lingvo; povas esti nehazardaj diverĝoj en ofteco de vortoj, frazoformoj ktp.

Mi asertis, ke la lingvaj bezonoj de la parolantaro diversmaniere influas la lingvon jam ekzistantan; sed ja per tio mi kompreneble ne ekskludas, ke iujn specifajn lingvajn bezonojn de parolantaro diversnacia, kreantoj de planlingvoj konsideradis *anticipe.* Oni vaste konsentas, ke la supereco kaj ekvivo de Esperanto kontraste al Volapuko ŝuldiĝas interalie, eĉ ĉefe al la Zamenhofa rekono pri bazaj postuloj, kiaj estas facileco kaj nefermiteco de la lingvosistemo, aposterieco de la leksika bazo, centra rolo de la vortoderivado kaj kelkaj aliaj. Mi aldiru, ke inter multo diskutata koncerne Esperanton, estas ĝuste ĝia relativa facileco, kion akceptas ĉiu lerninta aŭ studinta ĝin. Facilecon de Esperanto oni ne nur konstatas, sed ankaŭ analizas (v. ekz. laborojn de Košecky, Lo Jacomo, Szerdahelyi), oni ĝin fruktuzas propagande; kaj de tempo al tempo oni pledas por ĝia konservado.

Tamen, tuj ni menciu, facileco de lingvo povas esti komprenata iom diverse. Plej ofte ni komprenas ĝin en la senco de *facileco alproprigi la lingvon:* en la okazo de Esperanto ĝi sendube baziĝas sur la menciitaj Zamenhofaj rekonoj, faktoroj kiel uniformeco de la konjugacio kaj de la – malvasta – deklinacio, respektive. Ĉe pli detala studado oni ekzamenas facilecon kunlige kun lingvotipologiaj trajloj kiel *izoleco, aglutineco kaj fandeco:* la facilecon de Esperanto oni ofte atribuas al ĝia kutime ne pridubata *aglutineco.* Prave oni rimarkigas ofte, ke *la facileco estas relativa,* kaj ĝia analizo, mezurado devas baziĝi sur komparo kun konkretaj etnaj lingvoj.

Preter ĉio ĉi, facileco kaj malfacileco estas supozeblaj kaj mezureblaj ankaŭ laŭ aliaj aspektoj de lingvo. Tion bone montras la citota difino de Detlev Blanke: *„La demando pri relativa aŭ absoluta facileco aŭ malfacileco estas rigardendaj en kunligo kun tiaj propraĵoj kiel precizeco, mallongeco, reguleco... kaj ekonomieco."* (lnternationale Plansprachen, Berlin, 1985. p. 86). Li aldonas, ke planlingvo devas esti kapabla – en ĉiuj kampoj – esprimi la enhavojn de la homa pensado precize kaj klare, samtempe laŭeble ankaŭ strikte, mallonge. Poste Blanke – citante la opinion de Mayehofer kaj Dressler – konstatas, ke klareco postulas antaŭ ĉio sufiĉan redundon.

Por resumi kaj kompletigi ĉion supran laŭ mia maniero, mi distingus facilecon *alproprigi lingvon,* facilecon *produkti lingvajn formojn* kaj facilecon *percepti ilin.* Dum la facileco de alproprigado dependas plejparte de la *skemeco de la morfologia sistemo,* facilo *produkti kaj percepti* dependas de la

[31] Fonto: Ilona, Koutny – Kovács Márta (red.): Struktura kaj sociolingvistika esploro de Esperanto, Budapest, 1997. - 61-71

skemeco *malpli multe.* Ĉe *perceptado kaj komprenado* de lingvaj formoj havas gravan rolon *la kvanto de la redundo.*

Kiel konate, la etnolingvistiko, kvankam ĝi longe rilatis al sia objekto prijuĝe, kvalifike, en la lastaj jardekoj preferis akcepti la lingvojn kaj lingvajn subsistemojn kiel egalvalorajn objektojn de priskribado *(laŭ Wells: deskriptado).* Oni pli kaj pli celis ne *preskribi, ne prijuĝi,* sed *priskribi*. Tiu, ni diru, objektivisma aliro nun kreskas ankaŭ en la priplanlingva fakliteraturo. Tamen, koncerne planlingvojn oni neniam estis indiferantaj al la – supozata aŭ reala kvalito de la priskribata fenomeno. Tion ni vidis laŭ la cito el Blanke, sed ankaŭ el liaj konkretaj priskriboj de diversaj planlingvoj. Ekz., pri la lingvo *Solresol* li asertas, ke la malmulteco de redundo kaj la altgrada monotoneco estas en ĝi evidenta, kaj do miskomprenoj ĉe tiu lingvo estus neeviteblaj. Li prezentas ekzemplan formoparon, kies membrojn distingas nur la lokoj de la vortolimo; li tuj prave mencias, ke la sencodistingaj silablimoj en la parolfluo estus facile preteratentataj;

famisi domido – das Universum tragen;
fami sidomido – dieser Ort
(Laŭ Blanke: 1985. p. 135)

Ankaŭ pri Volapuko li esprimas sin simile. Li skribis: „La morfologia strukturo de la morfemo kreas multnombrajn laŭsone similajn vortojn, kiuj pro tio ...antaŭ ĉio sur fonema ebeno – havas nur malvastegan redundon. (Blanke, 1985. 135, trad. Vaha.). – Fine, ankaŭ parolante pri Esperanto, Blanke mencias, ke – precipe ĉe radioelsendoj, kie gestoj ne helpas kaj ne eblas komprenkontrolaj demandoj – malhelpas manko de sufiĉa redundo. Interalie en la okazo de paronimoj kiel *pesi–pezi*, *trejni–treni*, sed ankaŭ en la – mi aldonu: certe multe pli grava – pronomserio *mi, vi, li* ktp.

Sube mi volus skize prezenti kelkajn detalojn de la praktikata Esperanto por plikonsciigi demandojn kaj por iam karakterizi evolutendencojn el la vidpunkto de redundo. Ĉe tio mi ne entreprenas ĉiurilate esprimi min ekzakte: tio restu tasko de specialistoj de ĉiu el la lingvaj niveloj.

Redunda estas trajto de lingva elemento aŭ lingva elemento mem, se ĝi estas superflua el la vidpunkto de la enhavo. Redunda elemento ne liveras novan informon, ne modifas la enhavon de la lingva unuo, al kiu ĝi apartenas, nek tiun de la tuta komunikado; tamen ĝi plie distingas unuojn jam sen tio diferencajn. Redundo estas rimarkebla ĉe ĉiu nivelo de la lingva sistemo, sed kiel ni vidos, diversnivela apero de redundo povas kunefiki.

Se paroli pri la fonologia sistemo, oni povas diri, ke pli granda kvanto de la laŭnormaj, permesataj alofonoj *ĝenerale plifaciligas la produktadon, sed povas kaj plifaciligi, kaj malhelpi la perceptadon.* Oni ne bezonas aparte pruvi, ke komencanto prononcas pli facile, se li/ŝi rajtas uzi alofonon plej proksiman al tiu en sia gepatra lingvo; aliflanke – dum, ekzemple mola varianto de *n* en poleca/rusa elparolo de *ni* pliigas la kontraston al *m* – forte fermita (preskaŭ malvasta) longa *e* de Hungaroj aŭ vortfina *ŋ* de Hispanoj (ne antaŭ *g*) *povas* malfaciligi *la komprenon (miŋ, saŋ, seŋ:* (kp. J. Wells; Lingvistikaj aspektoj de Esperanto, Rotterdam, 1978, p. 26). Se oni interesiĝas nur pri la ĝenerala tendenco, oni preskaŭ blinde povas diri, ke dum la ĝisnuna historio de Esperanto la redundo fonologia kreskadis. Por tio sufiĉas scii, ke elparolo de kleraj, bone parolantaj esperantistoj evidente fariĝis pli unueca; ja unueco ĉiam signifas, ke iom fiksiĝas ankaŭ ne distingaj trajtoj. *Sed ĉu unueciĝo nepre evoluas en direkio de plejebla distingopovo?*

Ni rememoru la konvinkajn kriteriojn de Wells pri bona kaj malbona prononcoj. Ili estas la kriterioj a) praktika, b) lingvistika, c) geografia, d) sociologia. La pli-kaj-plia validiĝo de du el tiuj, nome de la *praktika* kaj de la t.n. *lingvistika* kriterioj rekte kreskigas aŭ malhelpas malkreskon de fonologia redundo. Laŭ Wells, *praktike bona prononco* estas tiu, kiu ebligas interkomprenon inter esperantistoj de malsama etna lingvo. Tiu socie kaj historie, ni diru, diakrone funkcianta kriterio kondukis al maloftiĝo en la parolo de alofonoj, kiuj – perceptate tre diversaj fonologiaj partosistemoj – povus reprezenti diversajn fonemojn.

Ekzemplo de Wells estas alofono de *r* uzata de kelkaj Angloj, kiu pro ne klara distingeblo de *v* por reprezentantoj de aliaj etnaj lingvoj, en Esperanto iom-post-iom fariĝas periferia. Simila ekzemplo povus esti mola alofono de la fonemo *t*, kiun la esperanta komunumo emas – ne akceptante ĝin kiel prestiĝan, belan – elimini, dum moleco de *ĉ* aŭ *f* estas bone tolerata.

Kiel mi diris, ankaŭ la dua kriterio de Wells – pli kaj pli validiĝante – subtenas (ĉar konsekvence validigas) distingopovon de la Esperantaj fonemoj. Laŭ tiu kriterio, nomata de li *lingvistika,* bona prononco estas tiu, kiu spegulas la fonologian karakteron de Esperanto. Per tio li esprimas sian iom

malfavoran starpunkton rilate al *malfortaj fonetikaj pozicioj* en Esperanto. Kune kun la ĝenerala opinio, li klare trovas erara la reduktadon de vokaloj en senakcenta pozicio, kaj li – kontraste al PAG – ne akceptas ankaŭ neprecon de voĉasimiliĝo. Sekvante tiun ĉi lian kriterion, kiu nun certe validiĝas nur parte, oni venas al klara distingo de vortoj kiel *subtaso* kaj *suptaso* (Wells, 1978, p. 23-24).

Mi aldonas, ke almenaŭ „ŝajnigas" mankon de voĉasimiligo en norma Esperanto tiu fakto, ke opozicion de voĉaj kaj nevoĉaj konsonantoj oni renkontas ekzemple antaŭ *s* ankaŭ en okazo, kiam ne temas pri renkontiĝo de morfemoj okazantaj ankaŭ en aliaj pozicioj. Oni konsideru la opozicion de *absido* kaj *apsido, ekzalti* kaj *eksalti:* skribi en *absido b* kaj en *ekzalti*, *ekzakta, ekzameni, ekzekuti, ekzemplo, ekzerci, ekzorci, ekzotika – k,* tio havas nenian sinkronan motivon, se la voĉeco de *b* kaj la senvoĉeco de *k* ne estus konsideritaj kiel efektivaj. *Ja tradician, etimologian skribmanieron – escepte se temas pri propraj nomoj – en Esperanto oni ne agnoskas.*

Simile, oni devas diri, ke aŭ la voĉasimilo ne estas laŭnorma, aŭ la skribmaniero estas absolute senmotiva, pli ĝuste, kontraŭregula en vortoj kiel *asbesto, asdiko* (kun senvoĉa *s*), *azteko* (kun voĉa *z* kontraste al *s* en la vorto *astako), absceso, absciso, absinto, absolvi*^{Z}*, absorbi, abstemio*^{Z}*, abstini, abstinenco*^{Z}, *abstrakta, absurda* (kun voĉa *b* antaŭ senvoĉa *s), adsorbi, adstringi*^{Z} (kun voĉa *d* antaŭ senvoĉa *s);* konsideru ankaŭ ekzemplojn kiel *oksalido – okzalo; obscena, obsedi, observi, obskura, obstaklo, obstina, obstrukco, obturi, obtuza.*

Kompreneble, aserti, ke la vortoj *absido* kaj *apsido* laŭ siaj sonformoj diferencas, kaj do la pozicio de *b* en *absido* ne estas malforta (aŭ almenaŭ, laŭ la spirito de Wells: ne estas *devige* malforta), ĉio ĉi ne signifas, ke la alofono uzata aŭ uzenda en *absido* estas aŭ devas esti la sama, kiu aperas en *klubzorganto,* kaj pli ĝenerale: antaŭ voĉaj konsonantoj. *B* – se konsideri ankaŭ „lektajn", personajn, ne ĝeneralajn realigojn – interalie havas alofonon duonvoĉan, alofonon kun *aldona ŝva-sono,* alofonojn *pli strecan* kaj *malstrecan, mallongan.* Aliflanke, la fonemo *p,* kiu diferencas en forta pozicio je unu distinga trajto disde *b,* havas minimume alofonojn *senaspiracian* kaj *aspiracian, strecan* kaj *malpli strecan, mallongan* kaj *duonlongan,* se ne paroli pri *molaj* kaj *malmolaj.* Minimume oni povas diri, ke *ankaŭ duonvoĉeco povas distingi,* kaj ke *el la duagradaj trajtoj povas iuj fortiĝi kaj parte transpreni la distingadon.* La opozicio de la fonemoj *b* kaj *p* fonetike verŝajne povas aperi kiel:

aBsido – apsido
ab^{ə}asido – apsido
ab^{ə}sido – ap^{h}sido
apsido – ap:sido
apsido – ap^{h}sido.

Plua spontanea integriĝa prozeco kaj, ekzemple, sceneja, literatura uzo povas iun el tiuj „*opozicioj en konkretaj fonetikaj ĉirkaŭoj"* pliĝeneraligi malfavore al aliaj.

En opozicio inter kaj antaŭ vokaloj, se temas pri dulipaj oralaj sonoj, oni aŭdas kaj senaspiracian, kaj aspiracian *p,* sed preskaŭ nur senaspiracian *b.* El percepta vidpunkto – ĉar kun pli multe da redundo – estus pli facila la lingvo kun aspiracia *p,* kaj senaspiracia, tamen sendube kaj tute voĉa *b.* Nome, se la plimulto de la okazoj estus tiaj, nek perdo de la voĉeco, nek perdo de la aspiracio en apartaj okazoj difektus la distingon de vortoj kiel *pato–bato, peto–beto* ktp. – Efektive, surbaze de Zamenhofaj modelo kaj konsiloj, etnaj influoj, tradicio, modelo de Ivo Lapenna ktp. nuntempe ŝajnas esti firma la prefero al ĝenerale senaspiracia elparolo de plozivoj, dum elparolo aspiracia konsideriĝas kvankam ne rekte malĝusta, tamen regionisma. Ni do povus diri, ke – malgraŭ mia supra konstato – laŭ kriterioj de Wells, nomataj geografia kaj sociologia – aspiracio esta iom evitenda. Nome, laŭ la *geografia kriterio* oni preferu prononcon, kiu ne ebligas diveni, *el kiu lando venas la parolanto* kaj !aŭ *sociologia kriterio,* oni evitu prononcon, kiun la lingvokomunumo kredas, opinias – pro diversaj historiaj, eble hazardecaj kaŭzoj – malŝatata.

Kvankam laŭ mia scio Zamenhof ne zorgis speciale kaj konscie pri fortaj kaj malfortaj pozicioj, liaj komentoj pri *n* antaŭ *k* kaj *g* ne tuŝas la distingipovon de la pri-parolata sono – tamen grandparte li venis al formoj, kie la problemo ne aperas. Interne de radikoj – malgraŭ miaj antaŭaj ekzemploj – plej ofte aperas konsonantoj – se ili entute renkontiĝas – de simila speco: *nokto* (ambaŭ senvoĉaj) *migdalo* (ambaŭ voĉaj); ofte unu el du renkontiĝantaj konsonantoj estas likvido aŭ nazalo aŭ *v*, kiuj ankaŭ en la lingvoj de la nesta areo de Esperanto ofte ne similiĝas; aŭ eĉ ne havas senvoĉan opoziciaĵon: *inkrusti*^{Z}*, inkubo*^{Z}.

La sufiksoidoj komenciĝas je vokalo, granda parto de la vortoj en teksto finiĝas same je vokaloj (-o, -a, -i. -e) aŭ duonvokalo (-ŭ, -j), kiuj ja ne kaŭzas similajn malfacilaĵojn. Endre Tálos kaj Sitosi

Hukaya traktis la demandon pri asimiliĝo de *n* antaŭ *p (manpremo : mampremo).* Similaj karamboloj kaj demandoj povas aperi ĉe renkontiĝo de prepozicio/prefikso kaj radiko, kaj ĉe renkontiĝo de radikoj en kunmetaĵo: *sen problemo : semproblemo, en piro : empira*. Laŭ mia opinio, mankas redundo kaj perdiĝas finfine informo en ŝajne malforta fonetika pozicio pli ofte pro vortfinoj kaj vortkomencoj je *-s* kaj *-n,* kiuj pro la verbaj finitivoj kaj nomvortaj akuzativoj estas tre oftaj. Ĉe tio oni devas konsideri, ke longa konsonanto – kvankam ĝi ekzistas kaj percepteblas intervokale, ĉefe en vortkunmetoj kiel *dommuro,* nomoj kiel *Anna,* sed ankaŭ en aliaj vortoj, kiel *regatto*^{Z}*, getto, Gallo*^{Z} – certe ne validiĝas antaŭ alia konsonanto. Konsideru enfrazajn „vortopoziciojn" kiel:

Mi volis → **st**iri ĝin / **t**iri ĝin

Vi vidis → **sk**oton / **k**oton

Ĝi havis → **f**eron / **sf**eron

Ŝi tenis → **k**apon / **sk**apon

Li ĝuas → **k**andon / **sk**andon

Mi supozas, ke pozicio de *s* en vortkomenco post fina *-s* de antaŭa vorto estas ĝenerale malforta – pli unuece, ol tiu de *n* en *senproblema* aŭ de *b* en *absoluta*, pro neebleco (aŭ nekutimo) prononci longan *s* en tia pozicio. Pro necerta percepto de la vortolimoj estas ne (aŭ malfacile) distingeblaj ankaŭ paroj kun vortkomenca *s* kaj posta vokalo, kaj sen tiu *s,* almenaŭ ĉe kelkaj kondiĉoj:

Mi timis → **s**inkon / **i**nkon

timi → **s**inkon

Li karesis → **i**non / **s**inon

karesi → **s**inon

Ŝi atendis → **i**ron / **s**iron

atendi → **s**iron

Oni povas do diri, ke [tendence?] malfortaj estas la opozicioj *timis sinkon : timis inkon: timi sinkon*.

Simile estas ĉe renkontiĝo de vortfina kaj vortkomenca *n*; tio, kiel mi diris, ofte okazas ĉe uzo de akuzativo:

> Se ne plaĉas al la estro,
> ke *ni**n** **n**un* amuzas ni... [Varianto: ke *ni **n**un* amuzas nin]

Laŭ mia sperto, oni malfacile perceptas kaj distingas, ĉu tiu formo de *ni* antaŭ *nun* estas akuzativo aŭ nominativo, kaj oni ekkonscias ĝian akuzativeston nur post la dua, nominativa okazo de *ni*, do surbaze de alinivela, sintaksa informo. Pli precize, surbaze de la scio, ke amuzi postulas rektan objekton, kaj la alia *ni* ne estas tio.

Ĉi tie tamen laŭ ies prononco estas diferenco laŭ daŭro de *n*. Tio verŝajne ne validas por okazoj, kiam la akuzativa *-n* sekvas la pluralan *-j*, kaj post ambaŭ sekvas *-n* vortkomenca:

1) Knabino**jn** **n**e *timu* : *Knabino***j** **n**e *timu*
Knabino**jn** **n**e invitu knabo**j** : *Knabino***j** **n**e *invitu knabojn*.

2) a) La knabo**jn n***un knabino***j n***e vidis*.
b) La knabo**j n***un knabino***jn n***e vidis*.

3) a) Ŝi vidis amiko**jn n***iaj*n ne n*ur iaj nanoj*.
b) Ŝi vidis amiko**j n***iaj ne nur ia***jn n***anojn*.

Iuj el la frazo-paroj ĉi-supre aŭde estas praktike nedistingeblaj, almenaŭ ĉe ordinara parolritmo. Aliajn frazojn oni povas distingi nur aŭdinte la lastan sonon de la lasta vorto, kiu kvazaŭ deposte kvalifikas la antaŭan substantivan sintagmon. Se oni klare distingas (aŭdas), ke la fino de la frazo 3)a estas *j* – t.e. la nominativa vortoformo *nanoj* – oni ekkomprenas ankaŭ, ke la vortoformoj pri *niaj amikoj* estas akuzativaj (do: *amikojn niajn)*. – En simila maniero konkludiĝas, ke *amikoj niaj* en la frazo 3)b rolas nur kiel alparolo.

Ĝis nun ni vidis esence du aferojn. Unu estas: kiel pliigas redundon kaj subtenas distingon de fonemoj, se oni preferas kiel bazajn, ĉiam plejeble malproksimajn alolonojn de la fonemoj, respektive. Due ni vidis kelkajn poziciojn, kiuj aŭ estas malfortaj por certaj fonemoj, aŭ almenaŭ ekzistas prononcmaniero, ĉe kiu ili fariĝas malfortaj. Mi prezentis ekzemplojn, kiuj montras, kiel tio povas malhelpi rapidan perceptadon de frazo, konsidere ankaŭ ties sintaksan strukturon.

En pli supraj lingvaj niveloj pliigas la strukturan redundon, se certa morfemo havas malpli, aŭ eĉ nur unu eblan pozicion; male, malpliigas la distingopovon de morfemo, se ĝi estas potenciale *plurpozicia.* Tiaj potenciale plurpoziciaj morfemoj estas prepozicioj, kiuj povas roli ankaŭ prefikse. Ni rigardu (aŭ prefere: aŭskultu) la subajn ekzemplojn: (por ne helpi per la skriba formo, mi skribos ĉiun morfemon aparte):

Pri lingv a demand o → ĉiam estas interesa.
Pri lingv a demand o → ni diskutis.

Por infan a j libr o j → kostas malpli multe.
Por infan a j libr o j → oni bezonas bonan desegniston.

Ne esperant ist o j → ofte pensas, ke Esperanto estas malfacila.
Ne esperant ist o j → restu ĉi tie, sed la neesperantistoj.

El fos aĵ o → iam montriĝas trezoro.
El fos aĵ o → saltas knabo.

Antaŭ ne long e → ĉi tie staris kato.
Antaŭ ne long e → ripozinta kato nun aperas vigla muso.

Simile pri bazaj numeraloj (pli ĝuste pri la morfemoj, kiuj ilin konsistigas):

Du nokt → a foresto estas tro por ŝi
Du nokt → aj forestoj estas pli lacigaj, ol ununoktaj
Du nokt → aj forestoj en unu monato super sepdek jaroj estas tro.

(Konsideru la demandojn *Kiomnokta foresto...? Kiomnoktaj forestoj...?* kaj *Kiom da noktaj forestoj?)*

Similaj frazokomencoj, se la prefikso ne estas morfemo potenciale plurpozicia, donas strukturan redundon al la frazo:



Se do oni havas informojn nur laŭ la enhavataj morfemoj kaj ilia sinsekvo, ni trovas sintaksajn ambiguojn de la sekva tipo (komence de frazo):



La malaltan distingipovon de potenciale plurpoziciaj morfemoj iom kontraŭpezas diverseco de akcentmanieron. Disvastiĝo de longa akcent-realiĝo en malfermaj silaboj de finaĵbezonaj radikoj jam delonge pliigas redundon, en certaj kazoj.

Ĉe prepozicioj veraj – kiuj do rolas kiel prepozicioj kaj ne kiel prefiksoj – oni renkontas du bazajn prononcmanierojn: tute sonakcentan kaj „duonakcentan”. Tiu prononcmaniero duonakcenta estas karakterizata per relativa intenseco kompare al senakcentaj silaboj; tamen tion ne akompanas konsiderinda longiĝo. Ĉi tiu dua maniero – kiun eble subtenas influo de ĝermanaj lingvoj – donas iom da ŝanco ĉe la komenco kapti la ĝustan strukturan informon pri la sintagmo, kaj tio ja plifaciligas la komprenon de la tuta frazo. Por tion sentigi, en la sekva ekzempla teksto (strofeto) mi indikos la akcentojn:

Él fosáĵo
saltas knábo
sidíĝas sur la
elfosáĵo.

(La signo ´ indikas nur plian intensecon; la signo ' akcenton kun longiĝo de la vokalo; sed tiu distingo povas esti ankaŭ ne atentata).

Certe vi jam rimarkis, ke la ambigueco struktura de la supraj ekzemploj malaperas, se oni enŝovas elementon, kiu kutime komencas substantivan sintagmon:



En la supraj ekzemploj la uzo de *la, en, sur* jam komence informas, ke la sekva potenciale plurpozicia elemento rolas en sia *prefiksa* funkcio.

Antaŭ ol fni, mi volus iom trakti la personajn pronomojn, kunlige kun semantikaj kategorioj, kiuj estas gravaj ankaŭ por la tuta frazo: persono kaj nombro.

Prave atentigas Blanke, ke la redundo de personaj pronomoj estas malalta, distingiĝas de la aliaj *ili* pro sia dusilabeco, poste: *ŝi, ĝi,* pro plurtrajta distingiĝo de iliaj konsonantoj. (Nur *ŝ* estas en la tuta serio senvoĉa). *Li* bone opozicias kun *ŝi, ĝi,* tolereble kun la aliaj. *Vi* ĉe bruo malfacile distingeblas de *mi; mi* kaj *ni* estas krome tro proksimaj. Mi tuj aldonu, ke similaj proksimecoj estas bone konataj ankaŭ en aliaj lingvoj: Rusaj *my, vy*, Francaj *nous, vous,* Latinaj *nos, vos.* Ne pli diferencas ankaŭ la Hungaraj *olvas**om**, olvas**od** (’mi legas ĝin’, ’vi legas ĝin’*). Tamen oni devas konsideri, ke kutime oni trovas en la kunteksto ankaŭ aliajn indikojn, kiuj iel subtenas la personan pronomon: fleksiojn, ripetojn de la pronomo, alparolojn ks: *my id*'om, *vy id*'ot'e; *nos i*mus, *vos i*tis; *fekszel és olvasod a könyvet.*

En Esperanto la opozicion *mi-ni* subtenas la nombro de la predikativo: *mi estas gaj**a**, ni estas gaj**aj***; same ĉe kompleksaj verboformoj: *mi estis revenant**a**, ni estis revenant**aj***. La duan personon emfazas alparolo: *Vi, knabo; vi, sinjoroj; vi*, *Eva.* Ĉe Zamenhof okazis ankaŭ kunaĵo de *ĉi* kaj *mi.* Surbaze de la signifo de proksimeco de *mi.* Emfazas ofte unuan personon la adverbo *persone*: mi persone. Kiel temon de la frazo oni povas ripeti la pronomon: *Sed mi, mi prefere restos. Se temas pri mi, mi restos.*

Precipe en la literaturo oni trovas formojn, kie la duan personon reprezentas poseda pronomo de dua persono kun substantivo signifanta personon: *via moŝto, plus la persono.* Tiaj konstruoj pere de la substantivo esprimas ankaŭ la nombron de la alparolato.

Estas konate, ke – pro strebo al mallongeco – oni ekuzis kaj nuntempe tre vaste uzas kuntiritajn kompleksajn verboformojn de la tipo *Mi revenintas, vi invitatas.* Rekonante la oportunecon de tiaj formoj pro mallongeco kaj pro analogieco de la formo, oni devas rimarki ankaŭ ĝiajn malavantaĝojn: perdo de informo pri nombro kaj per tio malkresko de redundo ankaŭ rilate al la persono, kelkfoje:



Povas esti, ke prelegante oni apenaŭ bezonas klare distingi personojn: ĉio, kio estas dirata, emfazata, pruvata, tion faras la preleganto; tute ne gravas, se kelkajn pronomojn oni aŭdas nur malklare. Kiam oni kune biciklas, krias de monto al valo, vokas al infanoj tra fenestro, kiam oni tumultas en naĝbaseno, redundo ĉe esprimo de persono, fariĝas grava. Tial oni bezonus eĉ konscie eduki esperantistojn al pli konsekvenca kaj abunda uzo de pli kompleksaj strukturoj kiel *iu el vi; ĉiu el*

vi; vi infanoj, vi aliaj, vi klaso ks., kiuj ja estas konataj, sed kies uzofteco ĝis nun tre dependas de la fona etna lingvo de la parolantoj.

Precipe sceneja praktiko, recitado atentigas. ke oni – pro pli facila perceptado – devas speciale zorgi pri klareco de vortolimoj. Tio, unue, verŝajne postulas pli grandan unuecon en la akcentado de – kiel mi menciis – *prepozicioj kaj prefiksoj,* krome en la akcentado de kunmetitaj vortoj. Estus oportune pli klare distingadi kunmetitajn vortojn kaj vortgrupojn, sintagmojn el la samaj elementoj. Tio povas okazi per diferenco de la ĉefaj kaj flankaj akcentoj laŭ kvalito. Oni scias, ke parto de la parolantoj faras distingon (vole-nevole) ankaŭ laŭ la loko: la flankakcento trafas ne la antaŭlastan (vd. Rokicki 1984), sed la unuan silabon de la vortkomenca membro: fon*e*mo r*i*ĉa [de alofonoj]: f*o*nemor*i*ĉa lingvo.

Bibliografio

Deltev Blanke: *Internationale Plansprachen.* Berlin, 1985.

S. Hukaya – E. Tálos: *Fonologia sistemo de Esperanto.* In: Zsuzsanna Varga-Haszonits (red.): *Esperantologiaj kajeroj* 2., p. 81-90.

Francois Lo Jacomo: *Liberté ou autorité dans l'évolution de l' espérento* Paris, 1981, p. 39-02.

K. Kalocsay: *Esperanta elparolo.* En: K. Kalocsay: *Lingvo Stilo Formo,* 3a tralaborita eldono, Oosaka. 1970, p. 132-7.

Kalocsay Kálmán: *Rendszeres eszperantó nyelvtan.* Budapest, 1966.

K. Kalocsay – G. Waringhien: Plena Analiza Gramatiko de Esperanto. Kvara, tralaborita eldono. Rotterdam, 1980, p. 39-49.

Stanislav Košecky: *Al "facileco" de Esperanto el lingvistika vidpunkto.* En: *Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko.* IV, Poprad, 1986, p. 36-48.

Ivo Lapenna: *Faktoroj influantaj la lingvoevoluon.* En: Ivo Lapenna: *Retoriko,* Rotterdam, 1971. p. 73-90. Ryszard Rokicki: *Enkonduko en la leksemstrukturan klasifikadon de la Esperanta morfemaro.* En: Ryszard Rokicki (red.): Acta Interlinguistica, Varsovio, 1984, p. 124-41.

Ryszard Rokicki: *Vortakcento en Esperanto.* En: Ryszard Rokicki (red.): *Acta Interliguistica,* Varsovio, 1985, p. 67-91.

István Szerdahelyi: *La didaktika loko de la Internacia Lingvo en la sistemo de lernejaj studobjektoj.* En: Internacia Pedagogia Revuo, Nürnberg, I-aj. n-ro 22, p. 59-65.

István Szerdahelyi: *Az interlingvisztika mai állása.* En: István Szerdahelyi: *Bevezetés az interlingvisztikába.* Budapest, I980. p. 63-98.

J. Wells: *Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto.* Rotterdam, 1978.

Eugen Wüster: *La tri fundamentaj reguladoj. En: Esperantologiaj Studoj,* red. R. Haupenthal. Antverpeno – La Laguna. 1978, p. 27-500. (Unua apero: Esperanto Triumfonta, Horrem bei Köln 2. 1921: 55, 56. 57, 58, en daŭrigoj)

Simplaj komplikaĵoj[32]

(1997)

1. Igis niajn cerbojn funkcii kaj emigis nin pli aŭ malpli diskuti antaŭ du jaroj rekomendoj de Bernard Golden[33] kaj Johano Petik[34], ambaŭ dankindaj pro aktiva intelekta laboro. Iliaj artikoloj kaj la reagoj je tiuj artikoloj estas aperintaj tra pluraj numeroj de Internacia Pedagogia Revuo – en la revuo, kies titolon – laŭ pli ĝenerala rekomendo de Akiko Nagata – mi mallongigados je substantiveca[35], akcentebla, deklinaciebla kaj plurvokala formo: IPedRo.

Influita de Johano Petik, de Mike Sadler kaj de mia propra provemo kelkloke mi indikos novan informon en la propozicio per superstrekéto (=akcentosigno)[36], kiu do indikos né vokal-kvalíton, nék nuran akcénton de vórto, sed parton de la frazokoménto. Cetere – kiel tion tuŝas ankaŭ Johano Petik – eblas havi únu aŭ plúrajn akcentojn.

Grafika indikado de la frazofokuso eblas ankaŭ per krajóno aŭ specialaj litertípoj, sen laciga substrekádo, se oni skribas aŭ tajpas; kaj sen trouzádo de la plurfunkciaj presrimedoj, se oni printas aŭ presas.

2. Komplika transitiveco en Esperanto kaj simpligita transitiveco en IDO – estis la titolo de artikolo de Bernard Golden en la unuaj du numeroj de IPedRo en 1995.

Laŭ la zorge verkita, bone strukturita artikolo de Bernard Golden oni povas konsciigi al si, ke la esperantista komunumo kiel tuto ĝis nun né sukcésis stabile alproprigi distingadon de transitivaj kaj netransitivaj verboj.

En siaj konkludaj alineoj Golden interalie skribas: „... se oni adoptos liberalan sintenon pri gramatikaj demandoj, tiam estos eble simpligi la traktadon de transitiveco en Esperanto kaj akcepti la demotikan lingvaĵon, kiu jam nuntempe estas la interkomunikilo de granda parto de la Esperanta lingvokomunumo."

Bernard Golden, kiu pli frue kutime célis laŭnorme kaj laŭdokumente plibonígi la lingvouzon de simpluloj kaj renomuloj, nun ekpreféris modífi la direkton de la lingvo-evoluo kaj de lingvo-influado institucia: anstataŭ senespere korektadi, oni prefere akcéptu la modifojn desúbajn, spontanéajn.

La malstabileco en la rilato de la esperantistaro al transitiveco, krom al la diversaj fonaj lingvoj, rilatas al pli-kaj-plia aplikiĝo de (iel ajn komprenata) sufiĉo kaj necéso, al la malstabileco (eĉ: pli-kaj-plia malstabiliĝo) de la radikkaraktéroj aŭ kategoriaj radikpreféroj. Kiam urĝanta jam aperas nur kiel urĝa, kiam – je senco vundanta kaj vundita – multaj el ni uzas nur formojn kiel vunda (loko, punkto, tranĉilo, hundo), kiam fiksa[37] estas ekvivalenta (resume) je fiksita, fiksanta, fiksad(o)a ktp., kiam oni pli kaj pli ĝeneralígas verbígon[38] (novi, nigri, leoni, fundamenti (?), destini (?) (laste: 'esti la fundamento, esti ies destino'; ĝenerale: 'esti –o'): tiam malklariĝo de deriv-historio de vortoj estas népra; kaj iĝas nepra ankaŭ "diskompréno" kaj laŭsenca "disstabilíĝo", diversmaniera leksikiĝo de vortoj derivitaj.

Mi ne estis, ne iĝis kaj ne estas konvinkita pri oportuneco de principa kaj kompleta allaso de paralelaj formoj kiel *ligno brulas* kaj *li brulas lignon*, *akvo bolas* kaj *mi bolas akvon* kun t.n. ambaŭtransitivaj verboj. Kompreneble oni bezónus detále arguménti pri ia ajn starpunkto, konsiderante ĉiujn eblajn senperajn kaj peratajn sekvojn tra la lingvosistemo: tion faris parte alíaj, kaj mi faros ion tian sur paĝoj de Literatura Foiro. – Ambaŭtransitiveco de tiu aŭ alia difinita aŭ eventuale eĉ: nur da kreota verbo efektive estas ébla; sed, ne estas inde kaj senprobleme igi en Esperanto ambaŭtransitivecon princípa, sistéma, ĝenerála. Tia procedo estas, laŭ mi, malrekomendínda,

[32] La artikolo aperis en Internacia Pedagogia Revuo (IPR), 1997/3, 15-24.
[33] Bernard Golden: Komplika transitiveco en Esperanto kaj simpligita transitiveco en Ido. IPR, parto I-II: 1/95, p. 1-12; parto III-a: 2/95, p. 16-21.
[34] Johano Petik: Serve de altaj pretendoj. IPR, 4/95, p. 29-34.
[35] Akiko Nagata: Fremdaj elementoj de Esperanto laŭ la vidpunkto de Japanlingvano. En: Acta Interlinguistica, Varsovio, 1989, p. 103-10, precipe 109.
[36] Estas Mike Sadler, kiu en IPedRo menciis, ke kursiva presmaniero aŭ substrekado konvenas kiel rimedo de emfazado: Mike Sadler: János Petik: Serve de altaj pretendoj. IPR 2/96 p. 28.
[37] Petro Rulofido: La Malfacila Esperanto. IPR, 4/1995, p. 20-22.
[38] Hans Fechler: Petro Rulofido: La Malfacila Esperanto - IPR 4/95.

minimume pro la protektenda kontinueco de la lingvo – laŭ ideoj ekzemple de Ludoviko Lazaro Zamenhof[39] kaj Francisko Simonnet[40]. Mi asertas ĉi tion malgraŭ tío, ke Bernard Golden rájte kaj práve referencas al cedemo de L. L. Zamenhof, kiu ne konsideris ekskludinda eĉ ŝanĝiĝon de la lingvo ĝis nerekonebleco. Ŝajne L. L. Zamenhof iel sukcesis en si kunígi konservémon kaj ŝanĝémon aŭ minimume tolerémon je ŝanĝemo.

En la diskuto ĉe IPedRo estas laŭ mi prava prefere Mike Sadler[41], kiu – helpe de kelkaj ekzemploj – montras aŭ konjektigas, ke se oni konsideras ankaŭ la eblajn derivaĵojn de la verboj, ambaŭtransitiveco nova (kunekzistunta, sendepende de ies ajn intenco, kun la malnovaj opozicioj laŭ transitiveco) póvus káŭzi parte miskomprénojn, parte strecóséntojn.

Oni estus maltrankvíla pro la nepra hezitado kaj ĉe parólo, kaj ĉe aŭskulta penado kompréni. Rememoru, sen ĝen(iĝ)i, kelkajn el la ekzemploj de Mike Sadler: Maria ĝenas min, kaj: Mi ĝenas, kaj: Ĉu vi opinias, ke mi ĝenas?

Bernard Golden kompreneble estas práva pri ekzisto de demotika (neprestiĝa, subnorma, pleba) lingvovarianto aŭ tiaj lingvovariantoj. Liajn tiutemajn asertojn subtenas né nur spértoj de ĉiu ĝisbakita esperantisto, sed ekzemple ankaŭ analízoj de Francois Lo Jacomo[42]. Tamen estas inde (plu kaj insiste) distingadi lingvovarianton demotíkan, subnórman unuflanke, kiu prefere restu tía (donante eblojn ekzemple por stilbezonoj de literaturo), kaj la lingvovarianton nórman aŭ norminténcan, aliflanke: disde kiu eblu deviadi, kiam oni stile deviemas aŭ kiam oni ne kapablas ne devii.

Bernard Golden estas práva (laŭ mi) ankaŭ pri la punkto, ke alproprigon de transitivaj kaj netransitivaj verboj plifaciligas sistemo, en kiu la koncernaj verboj né éstas samradíkaj: li citas ekzemplojn de tio el la lingvoj Ido kaj Occidental. En tiurilate "Okcidentaleca" Esperanto, laŭ mia kompreno, oni 1) ion (kvazaŭ) *termínus* aŭ *fínus*; kaj kion oni terminus, 2) tio siaparte *cessus*: do ne kunekzistus aŭ ne kun-uzatus vortoj kiel *fini* kaj *finiĝi*. Tiuj ideo kaj modelo estus bónaj (kun alia radiko anstataŭ cess, en E-o paronimia), sed nur se oni ne aplikus ilin al elementoj (vortoj) jam tradicíaj: vortojn laŭ la rekomendata valenta strukturo oni havu (se oni volas, se oni bezonas) aldóne, sén ŝánĝi tion, kio jam ekzistas laŭ difinita uzmaniero. Ekuzo de vortoj novaj kun malpli strikta valentaro estas (estus) maniero "ŝánĝi sen ŝánĝi": maniero modifi la sistemon maldráste.

Tian delikatan (kaj cetere eksterplanan) manieron prezentas (per si) ankaŭ nún, spontanea kaj nerezistata apéro de vortoj kiel eki, starti. Paralele kun la malnovaj frazoj Ni (=homoj, agantoj) tuj komencos (la prezentadon)" kaj Ĝi (=la prezentado, ago) tuj komenciĝos; oni jam nún uzas "samvérbajn" frazojn kiel *Ni tuj ekos kaj La prezentado tuj ekos*.

Pláĉis al mi alparolo de Bertil Nilsson[43]; li ja né rekoméndas ŝanĝi la lingvon, tamen atentigas pri la ebloj de sentrúda modifádo iom-post-ioma laŭ Zamenhofa modelo; li atentigas ankaŭ pri la nediskutébla rájto de iu ajn kréi alían lingvoprojekton, se iu émas tion fari. Li esprimas ankaŭ, ke reformideoj devas esti (kiel ĉio ne vivodanĝera aŭ vivonoca) tolerátaj kaj rajtas esti konsiderátaj, analizátaj, eĉ se ili ŝajnas aŭ estas (ja rajtas esti) rifuzótaj.

3. Ankaŭ la ideoj de Johano Petik (pri bezonata atento al emfazo en frazo) né éstas mokíndaj: ili indikas seriozan analizémon kaj ankaŭ analizon jam farítan, kiujn ja oni devas aprézi eĉ se oni malakcéptas aŭ né túte akceptas ĉiujn liajn konkludojn kaj lian reformemeton. Johano Petik, aliflanke, devas tróvi maniéron, témpon, rítmon de prezentado, kiuj ebligas al la komunumo konsciigi kaj digesti la eséncon, la elementojn pli aŭ malpli gravajn, sendubajn aŭ diskutindajn; krome la motivojn bázajn en liaj rekomendoj. Mi scias, ke li havis rekomendojn pli diverĝajn disde la Esperanta parolkutimo, kaj kompromíse li venis al la nuna, laŭ mi pli pripensita varianto: tiela irado ŝajnas daŭrigínda. Rekomen-

[39] „Ĉiu, kiu legis la antaŭparolon de la Fundamento de Esperanto, scias tre bone, ke ĝi ne sole ne prezentas ian baron kontraŭ la evolucio de la lingvo, sed kontraŭe, ĝi donas al la evolucio tian grandegan liberecon, kiun neniu alia lingvo iam posedis eĉ parte. Ĝi donas la eblon, se tio estus necesa, iom post iom eĉ ŝanĝi la tutan lingvon ĝis nerekonebleco! La sola celo, kiun la Fundamento havas, estas nur: gardi la lingvon kontraŭ anarĥio, kontraŭ reformoj arbitraj kaj personaj, kontraŭ danĝera rompado, kontraŭ forĵetado de malnovaj formoj, antaŭ ol la novaj estos sufiĉe elprovitaj kaj tute definitive kaj sendispute akceptitaj."
El Cirkulera Letero al ĉiuj esperantistoj (18. I. 1908). En: L. L. Zamenhof: Originala Verkaro (kolekt., red. D-ro John Dietterle), Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig, Esperanto-Fako, 1929, p. 445-8, p. 446.

[40] Francisko Simonnet: Ĉu lingvoj devas evolui. Acta linguistica, Varsovio, 1984, p. 55-70.

[41] Mike Sadler: Bernard Golden: Komplika transitiveco - IPR 1,2/95. IPR, 2/96, p. 26.

[42] Francois Lo Jacomo: Liberté ou autorité dans l' évolution de l' espéranto. Thése pour le doctorat de troisiéme cykle sous la direction de M. le Professeur André Martinet. Université paris 5. René Descartes sciences humaines. Sorbonne. 1981.

[43] Bertil Nilsson: Organizita ŝanĝo de Esperanto ne havas ŝancon. IPR 3/96, p. 32-3.

dojn (la pli fruajn kaj ankaŭ ĉi tiujn) né éblas iel ajn al iu ajn trúdi, sed ili kutime estas, kaj ankaŭ ĉi-foje estis, prezentindaj.

Johano Petik, prave, atentígas, ke en la – parole aŭ skribe praktikata – ĉiutaga E-o regas emfazo-manieroj ĝéne divérsaj; ke ĉe traduko ofte multe da informoj kaj eĉ la ideo pri la esenca celo de la eldiro pro tio perdíĝas.

Li asertas práve, ke en multaj modelaj tekstoj (ankaŭ, cetere, en Zamenhofaj), la fokusa loko de la frazo tendence estas ĉe la frazofíno aŭ en frazofína blóko. Rememoru la frazojn de la Iniciatinto dum la Bulonja Kongreso: "... Ili renkontas sin reciproke *ne mute kaj surde*... Tie la reciproka kompreniĝ-ado estas atingebla *per vojo nenatura*..., hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maro kunvenis *ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj*. Estas vero, ke multaj el ni posedas nian lingvon ankoraŭ *tre malbone*,... mi estas *nur homo.* (L. L. Zamenhof: Parolado dum la I-a Universala Kongreso de Esperanto).

Johano Petik samtempe eráras opiniante, ke per kunvenigo de ia pli-malpli loka decidemularo aŭ per konvinkado de elektataj de li personoj oni povas unupaŝe véni al pli gránda konkórdo en nia lingva praktiko; ŝajnas al mi, ke li táksas tró ankaŭ la eblon de subita ŝanĝo en lingvouzo de tuta komunumo. Laŭ mi li ja hávas iom da eblo influi la lingvopraktikon (kiel ankaŭ Ido influis E-on postlonge), sed né en la rékta, túja maniero de li preferuta. Li devus konsideri ankaŭ, ke koncerne aktualan dividon[44] de la frazo (kaj do: koncerne emfazadon, reliefumon) havas rolon – krom vortordo – ankaŭ tonfortéco kaj tonaltéco: frazakcénto. Tial nek estas la Hungara[45] lingvo la lingvo sóla, kiu distíngas, laŭ informo-valoro, frazelementojn[46], nek estas en E-o ĉio perdita pro la efektiva ĥaoseteco de la vortordo praktikata nuntempe. Ĉiuokaze, estas véro, ke frazakcento perceptebla orele, en skribo restas sen-indíka. – Oni ja póvus ĝin indiki, oni ĝin indiki póvus: en la ĵusaj propozicioj mi ilin indikis per super-strekéto. Tian indikon mi trovas uzinda fakultatíve; ankaŭ por influi, pere, malrekte, la rimarkémon je vortórdo.[47]

4. Eksterkadre. – Estas edífe pripénsi la situacíon de la aŭtoroj en la Esperantista socio. Johano Petik akravide analízas frázojn de la lingvo Hungara kaj de Esperanto; li estas esperantisto relative izolíta, kiun eble ankaŭ pro tio málpli ol aliajn ĝenas la sento, ke praktike uzata lingvo né povas ŝanĝiĝi subíte, káj pro natura socia inertéco, káj pro multfaktoréco de ĉia lingvoevoluo.

Kíel efíkos al Johano Petik, al la „nelge"[48] entuziasma esperantisto, la pli aŭ malpli fortaj kritikoj kiujn li renkontis, se lia fono estas pli lingva ol homa, societa? Mi né scías.

Mi pensas, ke lia decidemo influos nin aliajn pozitíve; estus bone, se ankaŭ lí ne perdus la emon labori plu analize, tolerante niajn malkonsentojn aŭ nian konsentadon nur moderan; kaj klarigante siajn ideojn paciénce, kun kompromisémo.

Estas simile interésa la elpaŝo de Bernard Golden pri kaj por ambaŭtransitivéco. Jes, ankaŭ el la vidpunkto de éblaj róloj de multescia persono tra jardekoj en la esperantista vivo. Konante, eĉ se nur supraĵe, la historion de E-o, kun modera troigo oni póvas díri:

Jén, kíel preskaŭ ĉiu el ni ripétas kaj reripétas fazojn de la ideo-evoluo pli frúa. (Estas bone).

Jén, kíel devas, kun modifoj, ĉio reapéri en la vivo de ĉíu generacío. (Tiel estas).

---

[44] Aktuala divido de la frazo: 'divido de entekstigita frazo je parto elirpunkta, kvazaŭ antaŭkonata kaj (alia) parto kun nova/esenca informo.

[45] Fenyvesi, Ervin: János Petik: Serve de altaj pretendoj - en IPR 4/95. IPR 3/96, p. 31-2.

[46] Nek en la artikolo de Johano Petik, nek en la alparoloj estas menciíte, ke ekzistas ankaŭ sintáksa maniero emfazi – per apárta propozicío. Ekzemple: Estas li, kiu foriris unua; Estas la knabino, kiun ĉiu volas ĝojigi.
Oni ankaŭ ne menciis, ke Karolo Piĉ (Vidu ekz. en: Karolo Piĉ: Klaĉejo. Romano. Kun antaŭparolo de Henri Baupierre. Artur E. Iltis. Saarbrücken, 1987.) provis enkonduki la partikulon *ste* similfunkcie (ekzemple en Litomiŝla tombejo kaj Klaĉejo): lia glosa ekzemplo el Klaĉejo: *ste* lin mi atendas. Mi trovas malbóna la ideon, ke paralele ekzistu la vortoj *ĝuste, ĝus, (ĵus)* kaj *ste*, (tiel estas ĉe Piĉ); mi tion trovas malbonaŝanca sendepénde de la demando pri tradicio, normo, akcepto fare de aŭtoritatoj ktp. – Ankaŭ mí faris iam provon: mi provuzis la partikúlon *sa* en mia romano Adolesko finverkita en 1978. La glosa ekzemplo: Ŝi invítas *sa* lin 'estas li, kiun ŝi invitis'.
Fine mi mencias, ke ankaŭ la interna lingvo de DLT (Esperanto modifita plejparte laŭ la ideoj de Klaus Schubert kaj grupeto) havis partikulon prifokusan (= *ĵe*). (En la interlingvo de DLT oni, por emfazo, uzas la partikúlon *ĵe*, metatan ne antaŭ, sed póst la vorton emfazatan. Vd. ekz.: R. Eichholz: Esperanto kiel interlingvo en maŝina tradukado. En: Akademiaj studoj, 1985, 219-42, precipe 225/ĝ. Vd. ankaŭ: K. Schubert: A dependency syntax of Esperanto. En: D. Maxwell - K. Schubert: Metataxis in practice. Foris Publications. Dordrecht - Holland/Providence RI - U.S.A, 1989, p. 207-45, precipe 212.)

[47] Pri t. n. aktuala divido de la frazo vidu ankaŭ la artikolon de Attila Salga: Pri la Esperanto-vortordo en la spegulo de la hungara lingvo. Budapeŝta Informilo, 1982, 12, p. 20-21.

[48] Nelge: antaŭ-nelonge.

Kíel reformíntoj konservémas, kaj kiel ekreformas konservíntoj. (Kiel éstas, restos tíel). Krome: eble ni vidos, kiel reformemuloj konservémos.

Kaj krom tio: venos la tempo de reformado fare de konservemúloj. Oŭ-kej.[49] Jen, kíel ni provas ĉiamaniere kaj senĉese proksimiĝádi al nia célo, sekvante niajn idealojn. – Ja devas esti tíel.

Amen.

[49] Oŭ-kej: vorto uzata (Vidu ekz. en: Karolo Piĉ: Klaĉejo. Romano. Kun antaŭparolo de Henri Baupierre. Artur E. Iltis. Saarbrücken, 1987.) de Karolo Piĉ, kun skribo Esperanta kaj akcento, prononco fiksitaj, por esprimi viglan konsenton kaj kunagemon.

Selekto-principoj de terminoj kaj metaterminoj

(1999)

Mi tute ne parolos pri tio, kio ja estas la plej grava: havi aŭ prepari liston de tiuj difinoj (vd. ekz. Dehler, 1986, 101, II/2, Werner 1986b, 36–41), kies vorto-ekvivalentoj por la sukcesa trakto de iu fako estas nepre necesaj. Tion apenaŭ povas fari iu (sola), kiu ne konas la koncernan fakon. Sekve mi parolos pri tio, kion oni faru, kiam iuj la pli gravan laboron estos farintaj, kaj restos la *devo* (de ni) kaj la *bezono* elekti el pluraj konkurencaj "eksteraj rimedoj", el vortokorpoj pli-malpli konvenaj la plej kontentigan laŭ nure lingvoforma vidpunkto. Enkonduke mi parolos ankaŭ pri meĥanismo de ensociiĝo de lingvaj novaĵoj.

Jerzy Leyk prave substrekis, ke efektiva evoluo de lingvo okazas paralele kun komunikbezonoj. "Manko de lingvokomunumaj bezonoj pri multaj repertuarkampoj grande bremsos ekeston de novaj lingvoelementoj. Konstruo de fakvortaroj ne solvas la problemon de lingvoevoluo, se samtempe la apliko de esperanto en tiu fako ne okazas, ne okazas en la skalo ebliganta radikiĝon de la elementoj" (Leyk, 1980, 462). Estas prava ankaŭ Iván Bujdosó, dirinta dum konversacio, ke plej utila maniero evoluigi faklingvon estas aperigi prestiĝan verkon kun respondece farita traduko, kie ĉiu vorto estus ankaŭ kuntekste fiksita kaj kvazaŭ aŭtoritat-cite referencebla. Estis ĝuste motivitaj la fortostreĉoj de la rondo ĉirkaŭ la periodaĵoj *Sciencaj Komunikaĵoj* kaj *Fokuso*, kiuj celis kaj sukcesis stimuli verkadon de sciencaj tekstoj kaj sciencan interŝanĝon de ideoj. Similan celon havas certe *Scienca Revuo* kaj aliaj. Do mi esence akceptas la opinion de Leyk, laŭ kiu trarompo kaj ankaŭ firmiĝo lingva okazados ĉiam nur en kampoj, kie oni renkontas regulan uzon kaj efektivajn komunikbezonojn. Tamen estas pravaj ankaŭ Dalibor Brozović kaj aliaj, kiuj insistas, ke en momento de eventuala subita bezono aŭ eblo, Esperanto devas esti ne senrimeda por kontentigi la bezonojn – kaj kontentigi ilin je nivelo plejeble alta. Mi aldonu: la preparoj, se ne eblas alimaniere, rajtas esti farataj ankaŭ ekster la propradira komunikado (do memcele). – Werner estas laŭtendence prava, asertante, ke "faka lingva stilo" estas karakterizebla "per skribeco, monologeco, publikeco, nocieco, klareco kaj fakeco" (1986b, 4), tamen oni povus fortostreĉi, por ke Esperanta faka teksto iĝu plejeble perceptata ankaŭ ĉe rekta parola komunikado. Etnaj lingvoj ĉe tio ne povas esti ekskluzivaj modeloj.

Pli ol meditoj, pušas antaŭen terminologion laboroj kiel tiuj de Münnich (1972), Hradil (1979), Bertin (1983), Hoeg (1988,1989) Středa (1998) kaj aliaj. Tamen estu permesate ankaŭ rememori ideojn malnovajn kaj mediti.

Ĝusteco, boneco

Evidente, la plej gravaj principoj de elekto de nova termino estas konataj ekde la tempo kaj agado de Eugen Wüster.

Wüster (1923/78, 71) havas la nociojn de lingva ĝusto kaj lingva boneco, distingataj. Ĝusta li trovas lingvan formon, kiun oni uzas laŭrajte. Boneco havas pliajn kondiĉojn kaj estas laŭgrada. Ĝusteco mem povas havi du fontojn, motivojn.

1. Ĝia esenca fonto ĉiam estas konvencio, interkonsento.

2. Ĝia fonto iam estas ankaŭ dedukteblec o.

Iam, ĉe radikvortoj funkcias nur unu el tiuj du motivoj: konvencio.

Sed la du motivoj ofte kombiniĝas en tia maniero, ke unu el la dedukteblaj formoj/sencoj iĝas konvencia.

Dedukteblaj estas

1) metaforaj sencoj de radikvortoj,

2) sencoj de derivita vorto, kiuj ne kontraŭdiras la informojn prenitajn el la radiko kaj la derivaj sufiksoj.

La deduktebla parto de la efektive funkcianta vorto ne determinas la tutan signifon. Se konvencio iun ajn el la dedukteblaj signifoj stabiligas, la vorto rezultinta estas ĝusta. Tamen, eĉ se temas pri komunuza vorto, ĝi povas esti – "super ĝusteco" – bona diversgrade. Krome, se ĝi estas ne komunuza vorto, sed termino, ĝi estas kvalifikebla laŭ aldonaj kriterioj. Se rigardi ĝin nur el lingva vidopunkto, ĝi povas esti sur skalo inter nura akceptebleco kaj optimumeco. Bonecon de lingva formo Wüster trovas taksebla laŭ skriboformo, sonformo, nocioformo, rilato inter lingvoformo kaj signifo.

Wüster emfazas, ke definitiva ensociiĝo de termino pasas tra pluraj stadioj: persona aŭ centra iniciato, centra registrado de iniciatoj, selektiĝo en la uzo, zorga observado kaj registrado de la uzo, fina konfirmado.

Termino povas havi diversajn kvalitojn laŭ pure terminologia vidpunkto, t.e. laŭ vidpunkto jam ne senpere nur lingva. Termino bona laŭ terminologia vidpunkto estas ne nur bona aŭ ideala ero en la lingva sistemo (komparu: Werner 1986b, 41), sed ero kiu ankaŭ plejeble bone sekvas la strukturon de konoj ene de certa metio, sciencobranĉo, kampo de agado. Tio, iom bedaŭrinde, eventuale povas kuntreni demandon pri provizoreco, malstabileco de terminoj tra tempo, pri malstabileco de terminoj inter skoloj, inter periodoj de la scienco-evoluo kaj la ĝeneralan problemon pri tratempa ŝanĝiĝo de signifo de termino. Ĉar termino estas vorto ĝuste, laŭdifine kaj laŭpostule vorto kun strikte difinita signifo stabila, ŝanĝigo de signifo ŝajnas ĉi tie ekstertema kaj entute kontraŭdira en si mem. Tamen la fenomeno estas ofta precipe ĉe bazaj teorioj kun temoj tre ĝeneralaj. Evoluo de scienco aŭ nura ŝanĝiĝo de la realo aŭ rilatoj kaŭzas, ke trakto de sama denotaĵo ne povas okazi plu laŭ similaj rekoniloj kiel antaŭe. Se atomon oni nomus en Esperanto nedivideblaĵo sekve al ĝia koncepto antikva, nun oni havus la demandon, ĉu oni forĵetu ĝian nomon pro la ekkonsciita dividebleco, aŭ oni diru, ŝerce aŭ serioze, ke Esperanto fariĝis lingvo vere vivanta, kaj tial ĝi devas fieri pri nekonsekvencaĵoj, nekoheraĵoj de la montrita speco. Tio bone montras ankaŭ, kial estas oportune, se fundamentaj nocioj de sciencobranĉo aŭ kulturdirekto esprimiĝas je radikvortoj kaj ne je vortoj derivitaj.

Pri sonformo de vorto – kaj termino

La subaj preferoj estu komprenataj vere kiel nuraj preferoj. Mi scias, ke ili ne estas ĉiam plenumindaj; temas pri okazoj, kiam oni ja havas eblon elekti el kelkaj radikoj. Sonformo de Esperanta vorto unuagrade devas konformi kun la gramatikaj normoj de Esperanto mem, nepre; due – ĝi iom devas esti facile distingebla por plejeble multaj reprezentantoj de iu ajn lingvo; trie ĝi devas havi formon, kies limoj en parolĉeno estas facile percepteblaj, por ke oni povu aŭde apartigi eĉ vorton ne aŭditan pli frue. Kvare ĝi devas esti jam vaste konata kaj kvine ĝi devas esti konata ankaŭ en momente prestiĝa lingvo. Lastaj du postuloj estas ne laŭ esenca indeco en planlingvo, sed laŭ pli-malpli taktika konsidero. Elekti latinidajn radikojn en la tempo de Zamenhof estis avantaĝe ne pro la pliboneco de la latinaj radikoj, sed pro la vasta konateco de tiu lingvo kaj de tiuj radikoj en Eŭropo. Similan avantaĝon povas havi nun anglaj radikoj, kaj post jarcento eble denove aliaj.

1. Vorto, termino devas konsisti el *fonemoj de Esperanto*. Tion ne malhelpu eĉ deveno de la termino el propra nomo (iom diference: Werner1986b,). Pozitivaj ekzemploj estas *rentgeno*, *rentgeni, pasteŭrizi*, radikoj kaj vortoj, en kiuj oni ne konservis la vokalon ö aŭ eu. Negativa ekzemplo estas kutima priparolo de Volapuko, jam ĉe Drezen kiel *Volapük* aŭ *Volapüko*. La vokalon Zamenhof mem, Drezen kaj aliaj konservas ankaŭ en derivaĵoj, parolante pri *Volapükistoj*, *Volapüka* movado ks, kie ja ne eblas preteksti, ke ili ne estas vortoj Esperantaj. Ĉe L. L. Zamenhof oni legas pri preferinda mallongeco de vortoj: "Tio ĉi estas la sola batalilo, per kiu la *volapükistoj* povas batali kontraŭ la »Internacia«".

Principojn kaj praktikon oni devus unuecigi.

Mi mem ne nepre kontraŭstarus tian iniciaton "(radik)konserveme enkonduki" iajn novajn fonemojn, sed oni devas iel koherigi praktikon kaj priskribon. Se multaj insistas diri *volapükistoj*, do *ü* en Esperanto – ekzistas, eĉ se nur periferie, kaj do ĉiu ĝisnuna priskribo de Esperanto estas tiupartete malĝusta. Se *ü*, konforme al niaj gramatikoj, ja ne ekzistas, do oni kutimiĝu anstataŭigi ĝin en vortoj, kiuj fariĝas elementoj, vortoj de Esperanto. La dilemo estas nuntempe pli forta, ol antaŭe: kelkfoje eĉ pro komercaj manovroj oni enmondigas pli kaj pli da markonomoj, kiuj jen laŭnuance jen laŭblufe distingas varojn, realaĵojn disde proksimaĵoj avancendaj en komerca konkurso. Kutima sorto de similaj markonomoj estas: fariĝi komunaj substantivoj.

Mi sekvas ne la praktikon, sed la asertojn de la averaĝa esperantisto, insistante kaj dirante, miaflanke, jen kion: estu, kiel vi mem asertas, kaj ni zorgu pri tio, ke ĉiu Esperanta termino konsistu el Esperantaj fonemoj. Okaze de malfacilaĵo aŭ oni evitu uzi la propran nomon kiel elementon de la termino, kaj do oni uzu alian manieron de terminkreado, aŭ oni anstataŭigu la koncernan fonemon el la provizo de Esperanto. Tia anstataŭigo devas okazi surbaze de la distingaj trajtoj de la Esperantaj fonemoj, sed surbaze de kono ankaŭ de la sonsistemo de la pruntinta lingvo – konsideru studon de Golden pri Hispanaj nomoj en Esperanto. Estas avantaĝe minimume el ia taktika vidpunkto, se la

modifon de la vorto la parolantoj de la pruntinta lingvo povas facile akcepti. Tia emo akcepti dependas ne nur de fonologiaj ecoj, sed ankaŭ de la morfologia sistemo de la pruntinta lingvo.

2. La vorto, termino prefere ne enhavu fonemojn en klare malforta fonetika pozicio. Estas superflue krei, adopti vortojn kiel *absido/apsido, azteko, asbesto, frazsintakso* (vd. PAG) ks, se la plimulto de la esperantistoj preferas prononci *asteko, azbesto*; kaj se estas kreeblaj ankaŭ vortoj kiel frazosintakso.

3. Prefere oni ne estigu minimumajn parojn (duopojn de vortoj kun unu fonemtrajta diferenco, kiel ĉe *tento - dento*).

4. Se oni, tamen, minimumajn parojn estigas, ilin distingu prefere vokaloj.

5. Oni preferu silabon CV al aliaj, se oni havas alternativon.

6. Distinga vokalo prefere estu en subakcenta silabo.

Opozicio kiel *matrico - matraco* estas iom pli bona, ol opozicio *mateno - meteno*; *patrolo - petrolo; mirtelo - martelo; medalo - modalo*. Ĉi tiuj estas ja ĝustaj, kaj bonŝance, malproksimaj laŭsence, sed ekz. la opozicio *medalo - medolo* estas pli distingipova. Ĉi tiu vidopunkto povas esti konsiderata, kiam oni havas plurajn preskaŭ same bonajn eblojn.

7. Se minimuman paron distingas konsonanto, la diferenco prefere estu minimume dutrajta (*s : d* pli konvenas ol *t : d*).

Ju pli proksimaj laŭ la senco kaj gramatika karakterizo la du vortoj estas, des pli maloportune estas ne konsideri ĉi tiun punkton. La opozicio *iro : ilo* estas bone tolerebla, ĉar la primaraj vortoj estas diverskategoriaj: *ilo : iri*. Same pri *ribeli : libera*, kvankam ĉi tie la diverskategorieco iom helpas. Okaze de la nun moda verbigo (liberi) la kontrasto povas iĝi mimumuma: *liberi : ribeli.*

8. Termino ne havu parolsonon en fonetike malforta pozicio.

Per tio mi venas en kampon ne sufiĉe ekzamenitan. Kalocsay-Waringhien en PAG agnoskas voĉ-asimiliĝon. Wells diras pri ĝi, ke "ĝi eble estu tolerata – sed ne rekomendinda, precipe por angloj kaj aliaj, kiuj devus aparte lerni fari ĝin" (Wells 1978, 24)[50]. Parolante pri bona kaj malbona prononcadoj Wells asertas, ke bona prononcado devas esti interalie fonetika. "Ĝi estas tiu, kiu nepre distingas inter ĉiu paro da fonemoj..." Kvankam li ne asertas speciale, ke tio validas por ĉiu imagebla pozicio, ankaŭ liaj ekzemploj ŝajnigas, ke li minimume malpreferas, sekve ne traktas laŭleĝa neŭtraliĝon de fonemoj en iu ajn pozicio. Efektive eblas, ke iuj fonemoj neŭtraliĝu en nezorga prononco kaj ne neŭtralizo en prononco zorga, kaj do eble oni povus aserti, ke fonetika malforta opozicio en Esperanto ne ekzistas, se temas pri zorga parolformo, kaj ĝi okazas nur en neglekta parolmaniero. Tamen, mi forte supozas, ke eĉ zorgaj mezuradoj indikus neŭtraliĝon okaze de renkontiĝo de *s* kaj vokalo, *s* kaj *s*+konsonanto, *-jn* + *n* ks. Tiajn renkontiĝoj de fonemoj laŭ mia opinio, prezentas malfortan fonetikan pozicion, sekve oni prefere evitu ilin, aŭ – kiel aludis O. Haszpra en Prago la 14an de Novembro 1998, kaj iu en retforumo – oni intence-instrue liveru modelojn de paŭzo-lima prononcado. Eble aŭ demandinde – oni povas supozi aŭ rekomendi en tiaj pozicioj specialajn alofonojn kun postmeto de ŝva-sono.

Sekvas mia supozo pri ekzisto de konkrete priskribebla malforta fonetika pozicio en la suba punkto.

9. La vorto prefere ne komenciĝu je *s*, almenaŭ ne kun tuj-sekva alia konsonanto, "vortkomence dua": tia komenco, post verbofinoj je *s*, povas okazigi fonetike malfortan pozicion – pozicion, kie distinga trajto de fonemo forviŝiĝas.

Ne ekestu pliaj novaj minimumaj paroj kiel *porto : sporto*, *truto : struto*.

Ekzemploj de vortoj kaj vortkomencoj kun *s* + konsonanto estas: *spaco, spado, spadiko, spagata, spaliro, spano, spalino, sparo, sparadrapo, sparkado, sparo, sparmanio, spato, speco, speciala, specifo, specimeno, spegulo, spekti, spiro, spirala, spireo, spektro, spirtigeto, spektoralo, spelto, spiko, spireo, splitita, splito, spoko, spergulo, spermo, spezo, spico, spiko, spongo, sporo, sporto spoto, sprinto, sprono, sproso, spuro, printo, sputo, stabila, stablo, stako, stalo, stalagmito, stalaktito, stalono, stameno* (Eichholz).

Ne ĉiu komprenus tuj la frazon: *Nesciasĉiuĉevalo, kioestastalo* – multaj miskomprenus la vorton *talo* kiel *stalo*. Sed laŭ mi malhelpas ne nur efektivaj minimumaj paroj. Ĉar Esperanto por la plimulto estas lingvo dua aŭ plurea, aŭdante sintagmon kiel *aperas spireo*, multaj el ni malfacile distingas, entute ekzistas kiu el la aŭde supozeblaj Esperantaj vortoj *pireo kaj *spireo (aŭ ĉu majusklaj versioj:

[50] Vd. Zamenhof-Waringhien. 1966, p. 4, paragrafo 4.

Pireo, Spireo), ĉu la unua, ĉu la dua aŭ eventuale ambaŭ, kaj se ambaŭ, kiu el ili troviĝas en la frazo renkontata. Ekzemple: *Mi prenis **Spireon** homo, kaj prenis **pireon** loko*.

Simile, estas iom evitindaj radikoj kun komencaj fonemoj *-n*, *-j*, ja ankaŭ ili estas fonemoj, kiuj ofte fermas vortoformon en Esperanto (*Neĝulinorenkontis iujn anojn*de la klubo minista - iujn nanojn de la klubo minista**.

10. Radikfine senvoĉa konsonanto estas iom preferinda al konsonanto voĉa.

En apostrofitaj vortoparoj kiel *kuv'* kaj *kuf'*, *lav'* kaj *laf'* kaj *lad'* kaj *lat'*, *lud'* kaj *lut'*, *teg'* kaj *tek'*, *pad'* kaj *pat'*, *mod'* kaj *mot'* la opozicio – ne laŭ Esperanta normo, sed ja laŭ etnolingvaj influoj – povas perdiĝi.

Tiu malfavora ŝanco iom ripetiĝas aŭ pliiĝas, kiam oni kreas kunmetitajn vortojn kun eblo de voĉasimiliĝo: *modkomenco, motkomenco, modfino, motfino, mondsupro, montsupro, vandtego, vantego*. Simile, distingo de subpremo kaj supremo en iuj parolversioj certe estas nekontentiga. Evidente, pli opozicias formoj kiel *modo-komenco* kaj *moto-komenco*: ĉi tio ankaŭ montras, ke konservo de vortigaj finaĵoj efikas favore al konservo de distingebleco: entute estas plej simple kaj sendanĝere lasi la radiko-finajn liberaj, ne tuŝataj, por ne bezoni ĉiufoje aparte ekzameni, ĉu ili noceblas aŭ ne. Subteniĝas ankaŭ la Zamenhofa ideo preferi sintagmojn (kiel komenco de modo) al kunmetaĵoj (kiel modkomenco).

11. Oni transprenas internaciajn sufiksitajn vortojn de sama tipo, la komunan sufikson oni forme unuecigu, t. e. oni ne encirkuligu diversajn alomorfojn de ĝi.

Tio estas dirita de Werner (1986a) koncerne la novan rekomendatan sufikson *-atoro* (*-toro, -oro*). Kompreble tion oni devus apliki ankaŭ je nun neantaŭvidataj elementoj invadontaj Esperanton eventuale post jardekoj: temu do pri principo. Mia kompletigo estas, ke estonte oni tiamaniere transprenu nur jam internaciajn vortojn kaj vortogrupojn, kaj ne mem la derivrimedon: oni venu al unueca forma klaso, sed ne al nepre unueca signifostrukturo de la vortoj kaj ne al produktiveco kun devigaj signif-reguloj.

12. Pozitiva formulo pri la supra negativaĵo: se oni enkondukus novan teĥnikan sufikson, oni preferu ne-internacian, aŭ eble eĉ aprioran, ĉe kiu la apliko de la derivmaniero kaj signifo-konstruado restas kontrolebla ene de Esperanto.

Internaciajn sufiksojn aŭ ŝajn-sufiksojn oni, konforme al la ĵusa alineo, ne adaptu kiel (propre-esperantajn) sufiksojn, tiamaniere lasante ilin liberaj je okaza sencomodifiĝo laŭ eksteraj modeloj.

Mia motivo por diri ĉi tion estas jen kio. Se la sufikso estas internacia aŭ eŭrop-amerika – kiel *-ism-* kaj *-ist-*, parte *-an-*, *-iv-*, *-oz-* ks., oni pli-malpli frue trovas internacian vorton, kies derivita senco ne kongruas kun la elementoj. Ĉe tiaj sufiksoj, kiel dirite, estintus pli oportune simple transprenadi la vortojn laŭ la internacia senco, tolerante ankaŭ ilian senĉesan senco-evoluon sendependan de Esperanto, samtempe ne derivadi je ili aktive ene de Esperanto. Nun la stato estas tia koncerne *-ism-*, eble *-oz-* kaj *-iv-* kaj parte *-ist-*; pli konservis sian Esperantan memstarecon *-an-*.

Laŭ la supra konsidero la rekomendo de *-og-* fare de s-ro de Edwin de Kock principe estas preferinda al la triopo *-iko*, *-istiko*, *-ologio*, kaj do – malgraŭ la malfacila periodo de socia alkutimiĝo – mi asertas subtenindaj liajn provvortojn *birdogo* 'ornitologio' *fiŝogo* 'iĥtiologio', *homogo* 'antropologio' (de Kock, 1987, 90), ne emante forpuŝi provizore la paralelajn internaciaĵojn. Sed validas ankaŭ ĉi tie la Vustera (n. s. Wüster) koncepto pri ŝtupoj de filtrado: ĝi estas lanĉita, kaj ĝis nun konfirmita de la praktiko.

13. Tendence, nunajn mallongigojn oni devus ŝanĝi je mozaik-vortoj kun diversaj vokaloj kaj kun klaraj vortospecaj karakterizaĵoj: Vortoj kiel *ndlr* kaj eĉ *ktp* principe estas kontraŭfundamentaj. Akiko Nagata (1985/9) rekomendis preferi formojn efektive substantivecajn, kun laŭbezone pli vastaj fragmentoj, silaboj, el la konsistigaj vortoj: Pakistana Studenta Esperanta Ligo laŭ ŝi mallongigindas kiel PaSELo (1985/9, 109).

Definitiviĝo de LKK, ILEI, IPR, P.T.T, I.K.U.E, kaj similaj akronimaj mallongigoj ja enkondukus, pli precize, estas jam enkondukintaj novan vortoklason – nomvorton nedeklinacieblan, kun minimume malklara loko de la akcento. Sekvante la rekomendon de Akiko Nagata mi provas la titolon Internacia Pedagogia Revuo, mallongigi je IPedRo).

14. Simpla silabo-strukturo (ekz, CV) estu preferata al komplika. Tio preferigas pruntadon el lingvoj kun plipezo de tiaj silaboj – ekz. el la lingvoj Japana kaj Svahila.

Multe malpli gravas origino, historio de vorto, tiasenca konsekvenceco, ol la kvalito de la fina rezulto: celindas optimuma sonkonsisto de Esperanta vorto kaj ĝia ĝusta lokiĝo en la Esperanta vortaro, terminaro.

Elektebla precizeco

Wüster opinias, ke estas alta valoro, se vorto havas memorhelpon (estante metaforo aŭ vorto derivita). Ne malakceptindas, estu tolerata ĝia eventuala plursenceco. Sed ĝi devas esti facile unusencigebla ĉe bezono.

Inter liaj ekzemploj estas la vorto plumo, vorto kiu en la relative nova senco „certa speco de skribilo" estis/estas facile enmemorigebla, kaj kiu samtempe, manke de helpa kunteksto, restas facile kompletigebla je skriboplumo aŭ birdoplumo. La celo, motivo kiun li konsideras, estas plejeble malgranda ŝarĝo de la memoro. La ideo pri elektebla precizeco en Esperanto ja funkcias ankaŭ spontanee, kiam oni uzas paralele aŭ alterne vastasencajn derivaĵojn (*fritaĵo, fruktego, dolĉaĵo, kolbasaĵoj, alkoholaĵoj, piedvestoj* ks.) aŭ vastasencajn radikvortojn (*deserto, spico* ks.), jen radikvorton pri laŭnuanca variaĵo, loka specialaĵo ks: *mortadelo*, *saŭsico* 'fresh saussage', *kareo, pulko* 'agave brandy', *ŝereo* 'sherry' Hrynkiewicz, 1972, 74-79), 4, *gropo* 'la plej malantaŭa parto de felo' (Středa, 1998, 16) *brioŝo* 'brioche' Pechán, 1968a,31, sed *brioĉo* en PIV; *flekeno* 'porka spineskalopo krade rostita kun garnaĵo sur lignoplato' Pechán ,1968a, 73, *kuvaso* 'hungara korthundo' Pechán,1968a, 142, *lebenĉo* 'knedita kaj etendita farunaĵo ŝirita en pecojn kaj fritita per fumaĵita lardo dispecigita, poste trempita en supon (Pechán 1968c, 22) *perkelto* brezita raguo en paprika saŭco hungarmaniere, Pechán 1968a,199, Pechán 1968c, 22).

Tamen la ideo de elektebla precizeco povus esti utiligata multe pli konsekvence, en du manieroj:

1. Laŭcela kreo de radikvortoj kun signifo, mi diru, "meze" ĝenerala – eĉ se ne ekzistas aŭ nur sporade modelo de tiom vasta-senca vorto en etna lingvo. Pluraj vortoj kun diversaj motivoj de ĝeneraleco pri sama denotaĵo povas bone kunekzisti (kulero povas esti manĝilo kaj metalaĵo, certakaze; damo estas homo kaj ino ks.).

2. Uzo de deriviloj por nura indiko de nocia subordiĝo aŭ superordiĝo.

Ĉi tiu ideo ne estas nova, male: io kvazaŭ pendanta en la aero kaj en la nacilingvaj teĥnikaj, juraj lingvorimedoj, kie oni abunde uzas ekzemple arbitran precizigon per propradecida utiligo de la literoj de la alfabeto, sen rimarki, ke per tio oni kreas novan lingvan rimedon. Konsideru frazojn, kiel *en la kazo c, difinita supre kiel „postincendia" sed karakterizebla ankaŭ per la faktoroj g kaj h, oni procedu laŭ la subregularo f. Simile funkcias ankaŭ markonomoj de la tipo „fotokopiilo epo mil kvindek", t.e. EP-1050. Simile, kvazaŭ-individuigaj aŭ tipo-difinaj (laŭokaze konkretigaj) morfemoj estus uzeblaj eventuale ene de vorto, sufikse aŭ prefikse. skribilo, skribil-a n f-o, skribil-e m b-o, tranĉil-a n f-o ks. La tipo-difina morfemo devus esti subakcenta.

Ideo pli ĝenerala kutime tamen ekzistas, sed etnaj lingvoj havas ĝin en formo de longaj sintagmoj, priskriboj. Oni aŭ diras gimnazio, liceo, teĥnikumo, komerca mezgrada lernejo ktp, konkreteme, aŭ oni diras kvazaŭ *ĝenerale kleriga lernejo ebliganta trapasi eniran ekzamenon por universitataj studoj*. Szerdahelyi, Barcsay instruante kaj praktikante, distingadis organiz-unuojn bazgrada lernejo, mezgrada lernejo kaj superaj lernejoj, HejmaVortaro laŭ aĝo verŝajne donos klarajn kriteriojn por a) baza lernejo, b) meza lernejo kaj c) superaj lernejoj, sed ankaŭ tiuj kadroj ne ekskludas eblon de grava klasifiko ali-vidpunkta, tamen ne etne-centra. Ekzemple, oni povas insisti pri la enuniversitatiga povo de meza lernejo per termino mem, kaj temo de pedagogia studaĵo povas esti tutmonda komparo de tiaj lernejoj. Se la kriterio estas praktike grava, ofta, oni devus aŭ povus, por tio, arbitre, simile kiel ĉe nun kutimaj mallongigoj, sed celante formon kun morfologiaj trajtoj de Esperanta vorto, krei vortojn kun simile ĝeneralaj sencoj – eĉ se modelo etnolingva mankas.

Ekz. oni nomu la ĵusaĵon ĝekunso 'lernejo ebliganta ekstudi en universitato aŭ alia supera lernejo'. Poste oni povos demandi, kiaj ĝekunsoj ekzistas en Ĉeĥio, aŭ oni povos diri, ke en Hungarujo momente ekzistas minimume kvin specoj de ĝekunso. Aŭ oni povas fiksi, ke unua lernejo kiom ajn longa, estu nomata ankaŭ (kaj speciale) ŝulo, kaj oni facile distingos, ke en iuj landoj kvarjara estas ŝulo kaj okjara ĝekunso, en aliaj kvarjaraj estas ĝekunsoj kaj samtempe ŝulo estas kvar, ses, ok aŭ dekunu-jara ktp. Oni povas diri, ke ne ĉiu hungaruja meza lernejo estas ĝekunso, ĉar kelkaj ne donas eblon aŭ ŝancon ekstudi en universitato. Oni povas decidi, ke la plej longdaŭra lernejo antaŭ plenkreska aĝo, antaŭ universitato estu nomata aŝko, kaj do oni povus diri, ke nia ŝulo estas vera aŝko, kaj ĉiuj aliaj lernejoj dependas ĉe ni de la kvalito de la aŝko, kie la priparolata infano komencis lerni.

Estas grave, ke oni unue devas fari klaran tipologion de lernejoj sen konsideri iliajn nomojn, kaj poste havigi nomojn al la plej ĝeneralaj tipoj – mi uzas pluralon, ja plej ĝenerala restas lernejo. Tio, kiel vi vidas, ne ŝanĝus, ke oni havus ankaŭ la kutimajn kalkeajn nomojn, sed uzante la du sistemojn interklarige, oni ĉiusociete tre efike esprimus sin.

Oni apenaŭ povas, sekve oni devas ne eviti moviĝon inter diversaj nocio-sistemoj kaj nomsistemoj. Ĉar tio funkcias sendepende de ies ajn deklarata intenco, en Esperanto tre ofte oni aŭdas propoziciojn similajn al „kiel oni diras ĉe ni" „kiel oni diras en la lingvo franca", „kiel tion esprimas la hispana juro" ks. Tute simile funkcias ankaŭ la sintagmo „tiel nomata". Konsideru frazon kiel ĉi tiu: Tiam li lernis en tiel nomata altlernejo, sed altlernejo ne estas, kiel ĉe vi, supera lernejo, universitato aŭ io tia ktp. Sed ĝuste, ĉar oftaj, tiaj esprimoj devus esti en Esperanto pli „elementaj", nekonstruitaj: ni bezonus partikulojn, kiuj informas pri la kampo, en kiu niaj vortoj devas esti komprenataj.

Ekzemple, oni povus uzi prepozitive *kambel* por indiki, ke la uzata esprimo estas kalkea, kaj uzi *tumbel* por indiki, ke ĝi ne estas kalkea. „En la plej proksima kambel komunuma vendejo mi aĉetis litron da lakto, kaj mi ekiris hejmen". „Ŝia filo lernas en kambel popola lernejo."

Simile, ĉar en Esperanto estas baza la kontentiga funkciado de motivitaj vortoj, ankaŭ en tekstoj fakaj, indus havi informon, ĉu derivitan vorton oni konsideras kiel ĵus derivitan, eventuale rederivitan.

Prov-ekzemplo: „Ankaŭ nia ĝardeno estas, tupem lernejo, ja la infanoj tie lernas buti terpomojn" (aŭ kun la tradicia plipreciziĝo: „La infanoj plej ofte renkontiĝis tamen en la kodol lernejo").

En studoj, kie estas grava ĝuste la laboro pri nocio, oni povas bezoni distingon de nocio, kiun la sonformo de vorto tradicie elvokas, kaj la diferencan aŭ specialan sencon, kiun la aŭtoro atribuas al ĝi enkadre de sia studo.

Oni povus insisti pri uzo de vorto en la mem elektita aŭ difinita senco, uzante certan partikulon (prove: *taŝ* aŭ *pozem*).

Ekzemple: Monto, laŭ nia koncepto, estas altaĵo super mil metroj. „Taŝmontoj en Hungarujo troviĝas nur nord-oriente." Aŭ: „Pozem montoj en Hungario troviĝas nur nordoriente." La segmento *pozem* montoj signifas:`montoj, se kompreni la vorton montoj en la ĉi tie difinita senco'. Ekzemplo alia: *Pozem* adjektivoj do inkludas ordajn numeralojn, posedajn pronomojn kaj kvalit-esprimajn adjektivojn – *todol* a d j e k t i v o j n – t. e. adjektivojn en la tradicia senco de la vorto/termino. *Taŝ* adjektivo estas klaso laŭ konjugacio. Kompreneble, *taŝ* adjektivoj (aŭ *pozem* adjektivoj) ne ĉiam havas la kategorion de gradacio.

Tia partikulo ebligus revenon al similsenca uzo eĉ post konsiderinda tempo (konsiderinda nombro da frazoj), en la sama teksto. La vortoj *pozem* aŭ *taŝ* kompreneble ne estas, *pozem* aŭ *todol* a d j e k t i v o, tial ili povas, povus ligiĝi ankaŭ al verbo aŭ numeralo: difininte la vorton legi kiel 'enigi aŭtomate tekston en komputilon', samtekste mi povus diri, ke „mia aparato pozem legas tekstojn tre rapide".

Rilatojn kaj okazojn inter la objektoj de la mondo aŭ de la pensado oni tendence esprimas uzante gramatikajn, morfologiajn kaj sintaksajn rimedojn. „La kato pelas muson. Muso estas besto. Trioble du estas ses." Tamen tio ne funkcias, se la rilato ne estas delonge konata tre intense. Tial povas esti ke la nebazaj aŭ parte eĉ la bazaj matematikaj kaj logikaj operacioj ne esprimiĝas je senpere lingva maniero, kvankam aliflanke ili havas bone ellaboritan esprimsistemon grafikan: dirante „dek en la dua potenco estas cent" aŭ „du deksep sub la tria radiko estas tri", oni „spegulas" pluroeble: oni prezentas la penson per grafika signobloko (vd. Drezen 199., poste oni prezentas la grafikan signoblokon per priskribo (de loko de grafikaj signoj). Tio tute ne estas nepra, nek simpla. Oni povus esprimi rilatojn per prepozicioj aŭ interpozicioj.

Ekzemple: Tri *poteĥ* du estas naŭ. – Rakonto de *Stefan MacGill* bone montras, kion ĉiu matematikisto scias: ke la sama nombro estas plurmaniere konstruebla. Tial sama nombro povus esti ankaŭ esprimebla plurmaniere. *MacGill* lude kreas numeralojn kiel ses nig 'sep'. Mi parolis iom simile al miaj infanoj por instrui sesuman nombrosistemon: ses unu plus ses unu estas duses du. Per tio mi evitis la ĥaoson, kiu ekestas, kiam oni skribas sesume, sed prononcas la rezulton dekume, dirante: dek unu plus dek unu en sesumo...estas…dek kvar. Priparolo de ne-dekumaj kalkuloj estus pli travidebla, se pri kvadratoj oni havus radikvortajn sinonimojn: post kvinses kvin radiknumeralo sinonima je tridek ses.

Termino bona laŭ terminologia vidpunkto estas ne nur bona aŭ ideala ero en la lingva sistemo, sed ero kiu ankaŭ plejeble bone sekvas la strukturon de konoj ene de certa metio, sciencobranĉo, kampo de agado. Tio, iom bedaŭrinde, eventuale povas kuntreni demandon pri provizoreco, malstabileco de terminoj tra tempo, pri malstabileco de terminoj inter skoloj, inter periodoj de la scienco-evoluo kaj la

ĝeneralan problemon pri tratempa ŝanĝiĝo de signifo de termino. Ĉar termino estas vorto ĝuste, laŭdifine kaj laŭpostule vorto kun strikte difinita signifo stabila, ŝanĝigo de signifo ŝajnas ĉi tie ekstertema kaj entute kontraŭdiro en si mem.

Tamen la fenomeno estas ofta precipe ĉe bazaj teorioj kun temoj tre ĝeneralaj, en fiziko, psiĥologio, lingvistiko, filozofio, historio, ekzemple. Evoluo de scienco aŭ nura ŝanĝiĝo de la realo aŭ rilatoj kaŭzas, ke trakto de sama denotaĵo ne povas okazi plu laŭ similaj rekoniloj kiel antaŭe. Se atomon oni nomus en Esperanto nedivideblaĵo sekve al ĝia koncepto antikva, nun oni havus la demandon, ĉu oni forĵetu ĝian nomon pro la ekkonsciita dividebleco, aŭ oni diru, ŝerce aŭ serioze, ke Esperanto fariĝis lingvo vere vivanta, kaj tial ĝi devas fieri pri nekonsekvencaĵoj, nekoheraĵoj de la montrita speco. Tio bone montras ankaŭ, kial estas oportune, se fundamentaj nocioj de sciencobranĉo aŭ kulturdirekto esprimiĝas je radikvortoj kaj ne je vortoj derivitaj aŭ estas derivitaj en maniero ne plu klara: laŭ tio pruntovorto *onso* el la lingvo Japana eble havus avantaĝon kontraŭ la termino fonemo (komparu Akiko Nagata 1989).

Nemalofte okazas, ke oni internacie uzas diverslingvajn vortojn, kiuj estas ordinare ekvivalentoj unu de la alia, sed en la faka kunteksto ekhavas terminecajn fakajn sencojn (kiel ekz. *beszéd* kaj franclingva *parole*, ankaŭ en artikolo hungarlingva, *Sprache* kaj franclingva *langue*, ankaŭ en teksto germanlingva). Tiu parolmaniero faka impresas kiel lingvoŝanĝo pro momenta bezono, ene de parolago de la sama persono. Oni povus en Esperanto eviti tiajn lingvoŝanĝojn dum parolo, samtempe konscie uzi la eblon kaj akcepti forme adaptitajn ekvivalentojn de sama vorto kiel plenrajtajn Esperantajn terminojn. Ekzemple, apud plursenca komunlingva *parolo* oni povus havi la terminon *muvo* por la nocio de F. Saussure, simple, per interkonsento.

Literaturo

Akiko Nagata 1989: Fremdaj elementoj de Esperanto – laŭ la vidpunkto de japanlingvano. En: 13-a Scienca Interlingvistika Simpozio. Varsovio 27.04.-01.05.1985. Akademickie Centrum Interlingwistyczne. 103-110 pp.

D-ro Albaut, André 1986: Kial Jidiŝo sed ne "La Jida. En: Eichholz, Rüdiger,51-54 p.

Arnaudov, Petko – Araudova, Ljudmila 1984, 99: Amuza matematiko por gelernantoj. Scienca Eldona Centro. Budapest 99 p.

Bednařík, Aleš 1986: Ĉu Ĥ denove moderna; EN: Košecký 1986, 13-23.

Peter Benson 1995: Comprehensive English-Esperanto Dictionary. Esperanto. League for North America, P. O. Box 1129, El Cerrito, CA 9453, U.S.A.

Bertin, Christian 1983: Angla–Esperanta telekomunika vortaro. 70 p.

Blanke 1995a: Detlev Blanke–Wera Blanke: Esperanto – Dokumente 2. pp.3-21.

Blanke, Detlev: 1995b: Esperanto kaj lingvistiko – sciencpolitikaj aspektoj En 1995a. pp. 22-32.

Blanke, Wera 1995cb: Fakvortoj en Esperanto. En: Blanke 1995a.

Dehler, Wera 1986: Rilatoj inter planlingvoj kaj internacia terminologia normigo. En Eicholz, Rüdiger (red.) 1986

Di Censo, Janus: Trasermo. Laser Edizioni. 389 p.

Csiszár, Ada 1994: In Memoriam Dr. Kalocsay Kálmán (1891-1976). 100 p. > Az eszperantó nyelvész En: Csiszár Ada 1994a, 50-53.

Dehler, Wera 1985/86: Terminologiaj principoj de Esperanto. Eichholz, Rüdiger red. 1986, pp. 100-3.

Dresen, E. 1931/1972: Analiza Historio de Esperanto-Movado. l'omnibuso. 95 p.

Dresen, E.: 1935/1983: Pri problemo de internaciigo de science-teknika terminaro. Kun postparolo de Alfred Warner, Artur E. Iltis, Saarbrücken 92.

Gecső, Tamás–Varga-Haszonits, Zsuzsa–Golden, Lariko: Memorlibro Kolekto de la prelegoj dum la solena internacia konferenco organizita okazede la tridekjariĝo de la universitata fako Esperantologio. (Budapeŝto, 17/18-04-1997). 495 p.

Golden, Bernard 1987: Terminologia kaoso: komputilo, komputero, komputoro. En: Mattos, Geraldo, 1987, pp. 105-141.

Gulyás, István (eld.)–Szegedi, Mihály (resp. red.:) 1992: FervojaTerminaro en Esperanto. Suplemento al Lexique Général des Termes Ferroviaires (UIC). Esperanto-Hungara, I, 165 p., Hungara-Esperanta 194 p.

Eichholz, Rüdiger (red.) 1986: Akademiaj Studoj 1986. Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL 1 BO, 298 p.

Halvelik, Manuel: Nova Nomsistemo por Lingviko. Eldonejo Sonorilo–Doornstraat 22-B-2610 B-2610) Belgio. 248 p.

Halvelik, Manuel 1986: Lingvonormiga reformo de Manuel Halvelik. Projekto de Esperanto. Parto II. Terminfarado kaj fremdvortoj. En Eichholz, Rüdiger (red.) 1986, pp. 213-292.

Haszpra, Ottó 1988: Az eszperantó térhóditása a természettudományokban és a technikában. Magyar Eszperantó Szövetség. Budapest. 15 (+1) pp.

Høeg, Tom Arbo 1988: Mineralnavn. Oslo. Universitetsbibliotek etshustrykkeri. 264 p.

Høeg, Tom Arbo: Geologia vortaro. Oslo. 117 p.

Hrynkiewicz, Adán, magistro (kompilis): 1972: Laŭtema vortaro Esperanto–Angla–Franca–Hispana. ERGOTO. Buenos Aires (Bonaero). 234 p.

D-ro Hradil, Josef (ĉefa kompilinto): Esperanta medicina terminaro. Universala Medicina Esperanto-Asocio. 63 p.

Kalocsay, K(olomano) 1985a: Dek prelegoj. Red. Vilmos Benczik, 126 p.

Kalocsay, K(olomano) 1985b: Pri la vortosistemo de Esperanto. En: Kalocsay, K(olomano) 1985a, pp. 9-37.

Knappert, Jan 1983: Vortaro de Esperanto kaj Svahila – Kamusi ya Kiesperanto na Kiswahili Kimetungwa na. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam. 130 p.

Kock, Edwin de: Principoj por la takso de neologismoj. En: Centjara Esperanto. Fonto. Chapecó-SC (Brazilo) pp. 76-.
Košecký, Stanislav, red. 1985: Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko. III., SlovakiaEsperanto-Asocio, Poprad. 79 p.
Košecký, Stanislav, red. 1986: Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko IV., Slovakia Esperanto-Asocio, Poprad. 79 p.
Lapenna, Ivo 1950/1971a: Retoriko. Kun aparta konsidero al esperanlingva parolarto. Rotterdam. Tria eldono (korektita), 294 p.
Lapenna, Ivo 1950/1971b: (Ĉapitro IV:) Faktoroj influantaj la lingvoevoluon. En: Lapenna, Ivo 1950/1971a, pp. 73-90.
Lloancy Marie-Thérese 1995: Esperantistoj kaj normo. Socilingvistika enketo pri parola Esperanto-normo. 1992-1995. 171 p. + I-XIII.
Leyk, Jerzy 1980: Problemoj de la evoluo de Esperanto. En: Szerdahelyi, István, 1980, pp. 458-64.
MacGill, Stefan 1988a: La laŭta vekhorloĝo kaj aliaj atento-kaptiloj. Ilustrita de Pavel Rak. Budapest. 200 p.
MacGill, Stefan 1988b: La unua vek-horloĝo. En: MacGill, Stefan 1988a, pp. 57-90.
Mattos, Geraldo, 1987: Centjara Esperanto. Fonto, Chapecó-Sc (Brazilo). 237 pp.
Mikelo Rizo 1993: Etimologiaj duoblaĵoj en Esperanto. En Zhang Quicheng, enkonduko kaj red., 1993, pp. 208-12.
Münnich, Antal (red.) 1972: A válalatirányítási és számítógép-alkalmazás fogalmainak többnyelvű szótára. Magyar, német, angol, orosz, eszperantó. Számítástechnikaui Oktató Központ, Budapest. 464 p.
Pechán Alfonz 1968a: Magyar-eszperantó útiszótár, Terrra, Budapest, 288+2 p.
Pechán Alfonz 1968b: Eszperantó-magyar útiszótár, Terra, Budapest, 256 p.
Pechán Alfonz 1968 c: Függelék - Suplemento. En: Pechán 1968a, post p.288.
Pilger, Wouter 1993: Bakaĵoj en Nederlando. En: Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj, n-ro 20, majo 1993, pp. 2-3.
Révész, Sándor 1984: Radikkarakteroj kaj elementaj vortstrukturoj. En: Rokicki, Ryszard, 1984, pp 103-25.
Rokicki, Ryszard red. 1984: Acta Interlinguistica. 11a Scienca Interlingvistika Simpozio, Varsovio, 9-13.04. 1983. 160 p.
Rybar, Jan 1982: Terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj. Ĉeĥa EsperantoAsocio. Red. Jan Werner. pp. 52.
Středa, Lubomír: Terminaro de feloj. KAVA - PECH, Anglická 878, CZ 25229 Dobřichovice, 95 p.
Szerdahelyi, István 1980: Miscellanea Interlinguistica, Tankönyvkiadó, Budapest, 513 p.
Vaha, Blazio (n. s. Wacha) 1994: La Zamenhofa koncepto de lingvo-evoluo. Literatura Foiro, 151, pp. 257-67.
Vaha, Blazio (n..s. Wacha) 1998: Faktoroj de lingvoevoluo tra historio de lingvoj, planlingvoj, Esperanto. En: Gecső, Tamás– Varga-Haszonits, Zsuzsa 1998, pp. 202-66.
Waringhien, Gaston (red.) 1987: Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Represo de la tria eldono kun suplemento. Sennacieca Asocio Tutmonda,7502 Paris. 1303. + 45 p.
Wells, John 1978a: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto. Univesala Esperanto-Asocio. Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo. Rotterdam. 76 p.
Wells, John 1978b: (2.2.): La Esperanta fonemsistemo. En: Wells, John,1978a, pp. 17-26
Wells, John, 1978c (2.7): Procezoj. En Wells, John, 1978a,b: pp. 23-24.
Werner, Jan 1985: Stabiligo kaj normigo de terminaro. Slovakia Esperanto-Asocio, Poprad. 79 p.
Werner, Jan 1986q: Antinomio de termina hejmeco kaj internacieco. En: AkademiajStudoj, pp. 131-7.
Werner, Jan 1986b: Terminologia kurso. Manlibro eldonita por la kurso okazigata de Esperanto-rondeto de la sindikata klubo en Roudnice nad Labem kaj de la sciencteĥnika sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1986-09-1/5.Sdruzeny klun ROH, Roudnice n. L. 88 pp.t
Wüster Eugen 1921: La tri fundamentaj reguladoj. Esperanto Triumfonta, n-ro 55, p.1, n-ro 56, p. 1. n-ro 57, p.1-2. n-ro 58, p. 1-2. (Vd. ankaŭ sube).
Wüster, Eugen 1921/1978: La tri fundamentaj reguladoj. En: Wüster, Eugen,27-50.
Wüster, Eugen 1923a: Enciklopedia vortaro Esperanta-Germana. Kun speciala elmontro de la Zamenhofa lingvouzo.
Wüster, Eugen 1923b/1978: Esperantologiaj principoj. En: Wüster, Eugen1978, 71-115.
Wüster, Eugen 1923/78c: (Esperantologiaj principoj.) A. Ĝusto kaj boneco de esprimo. En: Wüster, Eugen 1923b, 27-66, repr. Wüster, Eugen 1978,71-76.
Wüster, Eugen 1923/78d: (Esperantologiaj principoj) B. Lingva evolucio centripeta kaj centrifuga. 77–81. Repr. En: Wüster, Eugen 1978, p. 77-81.
Wüster, Eugen 1923e: (Esperantologiaj principoj) C. Lingvekonomia vortara principo. Repr. En: Wüster, Eugen 1978, p. 81-83.
Wüster, Eugen 1936: Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko. El la germana originalo esperantigis: D-ro Emil Pfeffer. Literatura Mondo, Budapest.. 123 pp.
Wüster, Eugen 1978: Esperantologiaj Studoj. Memor-Kolekto Editorita de R. Haupenthal. Antverpeno – La Laguna. 254 p.
Zamenhof, L. L.: 1929/1983a: Originala verkaro. Antaŭparoloj – gazetartikoloj – traktaĵoj, paroladoj – leteroj – poemoj. Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig. Esperanto-fako. Kolektitaj kaj ordigitaj de d-ro Joh. Dietterle. Foterproduktita en 1983 de Oriental-libro, Kobaicho 4-5, Kitaku, Osaka 530, Japanujo. 604 pp.
Zamenhof, L.L.: 1929/1983b Esperanto kaj Volapük. En: L. L. Zamenhof: 1929/1983a, 258-75.
D-ro Zamenhof (aŭtoro), L.L–G. Waringhien (red.) 1962: Lingvaj respondoj, konsiloj kaj opinioj pri Esperanto. Editoris: G. Waringhien, sesa eldono Esperantaj Francaj Eldonoj. 11. rue P.- Vergnes, Marndem – Francujo 130 p.
Zeman, Jiří 1985: Al la problemo de silabo en Esperanto. En: Košecký 1985,pp. 5-17 Zhang Quicheng (enkonduko, red.) 1993: Studoj pri Esperanto. Pekino. 225 p.
Vd. Haszpra, Otto: Esperanto – fine de la dua jarmilo. Tempo, 1997, kongresa n-ro, pp. 3-6. Silabo CV: silabo el du parolsonoj: konsonanto kaj vokalo. Pri eventuala bezono de lingve specialaj konjunkcioj de logiko parolis dua Mediteranea Konferenco iam en 1984 Nunez.
Drezen skribis: La sistemo de matematikaj simboloj estas tiomgrade kompleta kaj harmonia, ke ni emas konsideri ĝin kiel plenvaloran grafikan lingvon – ideografion, adaptitan al kontentigo de ĉiuj bezonoj esprimi ideojn en ĉi tiu fako... Efektive, karaktera trajto, de la *lingvo*... konsistas en ebleco konstrui frazojn. Kaj simbolo (,(,(kaj formuloj similaj al x(((y) prezentas tiun eblon plengrade (Drezen 1935/1983, pp. 34-35. Mi mem opinias, ke oni povus trovi pli kontentigajn parol-ekvivalentojn al tiuj grafikaj formoj, ol estas la nunaj.

Antaŭ-sosurumo:
Fragmentoj el verkata studo pri René de Saussure[51]

(2001)

Mi aranĝis plenan dismembriĝon de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas nur el senŝanĝaj vortoj.

*Ludoviko Lazaro **Zamenhof** (1887/1903)*[52]

La unua, kiu estus povinta science analizi Esperanton, estis Louis Couturat (1908). Bedaŭrinde, li nur patris Idon, novan sistemon plene fremdan al Esperanto: efektive, surbaze de sia logistiko, li apriore kreis vortfaran sistemon, en kiu ĉefa karakterizo estis lia fama "renverseblo".

André **Albault** (1982)

Malforta punkto de la juna esperanto estis la manko de vortfarada teorio. Ido estis multflanke reago al tia situacio: en sia studo pri la derivado en la Lingvo Internacia, kiu aperis 1907 en franca lingvo, Couturat vaste kaj funde kritikis la esperantan vortfaradon per sia "principo de renversebleco" kaj metis samtempe la teorian fundamenton de Ido. Ni estis tre bonŝancaj, ke tiutempe troviĝis en niaj vicoj René de Saussure, kiu kreis la formulon de neceso kaj sufiĉo akceptotan en 1913 far nia Lingva Komitato. La Saussure-studo ne estis nur defendo de la esperanta sistemo, sed samtempe klariga verko por la esperantistoj. Granda parto de la idista kritiko al esperanto hodiaŭ ne plu validas, simple pro la fakto, ke la Saussure-tezoj atentigis pri malkongruaĵoj kaj plibonigis per tio la lingvouzon.

Herbert **Mayer** (1987: 6)

Vielmehr bemühen wir uns zu verstehen, wie das Esperanto, so wie es ist, funktioniert. Glücklicherweise wird an dieser Frage schon sehr lange gearbeitet.

Klaus **Schubert** (1997: 129)

Die *Esperantologie* wurde von ... dem Mathematiker René de Saussure, und Eugen Wüster begründet.

Detlev **Blanke** (1985: 195).

W. A. Verloren van Themaat en 1977 komparis produktivecon de vortfarado en ses lingvoj, du el kiuj estis planlingvoj. Detlev Blanke (1980: 383) resuminte la rezultojn de tiu esploro, konkludas, ke la vortostruktura produktiveco de Esperanto (5,2 %) estas duoble pli alta ol tiu de la germana (2,24), kaj superas tiun de la rusa, angla kaj Interlingua preskaŭ dekoble. Neniel do estas mirinde, ke manierojn de vortfarado ne nur Zamenhof kaj ĉiuepokaj bonaj aŭtoroj, E-instruantoj, sed ankaŭ la esplorantoj de Esperanto kaj kreantoj de novaj lingvoprojektoj opinias demando speciale grava kaj esplorinda (vd. ekz. Blanke 1985: 87, 156, 179, 253-73).

Ludoviko Lazaro Zamenhof diris, ke lia lingvo esence konsistas el senŝanĝaj vortoj **(**1903/1992a: 234), tamen praktike li instruadis akcenti eĉ longajn derivaĵojn unuvortece, krome li senĝene instrukciadis pri vortospecoj plej diversaj[53]. Aktivulo de la Delegitaro por Alpreno de Lingvo Internacia kaj membro de la Komitato, Wilhelm Ostwald, aludante al derivado, diris, ke en arta lingvo devas regi unusenceco. Regnar Ström en 1905 atentigis, ke pro diferencoj en vortaroj estas malklare, ĉu *spiono* estas homo aŭ ago. Laŭ-ideale, kaj laŭ Ström, „la komprenaĵo, estas fiksita en la trunko kaj sendependa de la finiĝo". Zamenhof en 1907 skribis: "'Stamp' povas esti egale bone tradukata per verbo *(stampi)* kaj per substantivo *(stampo),* se vi trovas, ke estas necese doni por ĉi tiu radiko en ĉiuj lingvoj tradukon egalan, tiam mi preferus doni por ĉiuj lingvoj la tradukon per verbo ..." (L. Zamenhof 1962: 3).

[51] Jen la fonto de la artikolo: Sabine Fiedler / Liu Haitao (Red./Hrsg.), 2001: Studoj pri interlingvistiko / Studien zur Interlinguistik. Festlibro por / Festschrift für Detlev Blanke. Dobřichovice (Praha), 2001, KAVA-PECH, 547-564.

[52] En la Zamenhofa Antaŭparolo al la *Unua Libro* (1887: 11) (Kp. Zamenhof 1903/1992a: 234).

[53] Vd. ekz. Pri la akuzativo post verboj de movo (1908/1962: 71).

Couturat pensis kaj skribis (France en 1907, Ide en 1910), ke derivado en planlingvo devas havi unusencajn regulojn, ne nur koncerne formon, sed ankaŭ – semantikajn: oni observu ilin ankaŭ ĉe senpera derivado (dérivations immédiates). Boirac atentigis pri „trikategorieco de 1' Universala Vortaro" (vd. Albault 1982). René de Saussure asertadis (ĉefe inter 1910 kaj 1916), ke por havi la nepran klarecon, postulatan de Couturat, en Esperanto sufiĉas scii, kion propre ĉiu el la vortoj signifas. Li insistis, ke ĉiu vorto principe povas porti (individuan, leksikan, ne-gramatikan aŭ ne speciale gramatikan) propran signifon: inter la vortoj li konis kaj volis agnoskigi ankaŭ finaĵajn vortojn (kiujn aliaj kaj kelkfoje ankaŭ li simple nomas finaĵoj). Li aldonis, ke nenion oni bezonas diri (indiki) dufoje. Signifo de aro da vortoj konkludiĝas el signifo de la elementoj.

Eugen Wüster (1921) kvazaŭ diris: ho jes, Saussure pravas, ni sciu, kion ĉiu el la elementaj vortoj signifas, sed ni atentu, ke la signifo de neniu vort(element)o perdiĝu ĉe la pluderivado, kune kun la forlasata elemento. Tio ne estas simple solvebla en la fakta, iom neperfekta Esperanto ... Wüster provis parte kvazaŭ rimarki, konsciigi, firmigi laŭ li ekzistantajn *(-ec-, -ad-)* kaj parte liveri novan *(-ent-)* pluformadilojn, meteblajn en lokon de forfalinta finaĵo, por memorigi pri derivo-paŝoj ne plu evidentaj: *igi ion (ekz. movoenergion) varmo* kaj *igi* ion *varma* ne estu sendistinge *varmigi.*

V. Varankin (1929), Fruictier, ŝajne pludonis la Sosurajn instruojn. Fruictier (1930: 83-4) citas radikojn ne kiel adjektivajn, verbajn, substantivajn, sed kiel adjektivon *(bel),* substantivojn *(hom, hund, dom),* verbojn *(kur, am, sid),* superante Zamenhofon kaj Sosuron je memstarigemo priradika.

Ĉe aliaj aŭtoroj radikoj aperas ne kiel – ekzemple – verboj, sed kiel nur rilatantaj al la vortkategorioj: verb-a-j, substantiv-a-j, adjektiv-a-j (Blanke 1985: 239; Mattos 1987: 176). Kolomano Kalocsay kaj aliaj volis ensistemigi plus kompletigi la plejparton de la Sosura tradicio, kaj ambiciis instrui la tuton al ni aliaj (Kalocsay 1931/1970; Kalocsay/Waringhien 1985: 525-528; Csiszár 1994: 51-52). D. Blanke, P. Janton, I. Szerdahelyi, W.A. Verloren van Themaat, R. Rokicki, G. Blázquez, D. Weidmann, G. Mattos kaj aliaj analizis kaj analizas plu, kvante, kvalite, nocie. Janton iam atentigis, ke ne eblas en Esperanto difini vortospecon sen konsideri deklinacion kaj konjugacion, „fleksiojn" (Janton 1973: 62[54]), alifoje li konkludis interalie, ke en Esperanto ekzistas nur kvin verboj: AS, IS, OS, US, U (Janton 1987: 82).

Szerdahelyi (1974, 1975, 1976b), simile al Janton (1973) kaj diference de Janton (1987), atentigadis pri neceso pli zorge distingi vorton kaj vortelementon (morfemon), kaj per tio ankaŭ vorto-specon (disde eventuala morfemo-speco, vd. ankaŭ ekz. Lindstedt 1983: 11). Wüster kaj Révész volis, krom analizi la faktan lingvostaton, iom ankaŭ influi la pluan evoluon de la lingvo. Wüster volis videbligi la antaŭan ŝtupon almenaŭ de la duagradaj derivoj (ekz. kaj ĉefe per enŝovo de *-ad, -ec-, -ent-),* ekzemple distingi *ankradejon*, kie oni ankras (el *ankri*), disde *ankrejo*, kie oni tenas ankrojn (ankro). Révész (1984) deziris tion streĉi ĝis maksimumo, tra pluraj ŝtupoj kaj disbranĉiĝoj, krome li antaŭvidis entute pli krean, malpli imitecan kaj ne etnolingvecan (ne kliŝo-sekvan) uzmanieron de la lingvo kaj de la derivosistemo fare de la estonta esperantistaro.

Rokicki (1987: 102) tre zorge distingas diversajn morfemtipojn laŭ eblo (aŭ ne-eblo) ilin kombini en vortoformo, sed li trovas por si provizore troa la taskon efektive subdividi morfemojn nesintaksajn kiel JOHAN, TRINK, LAKT. Tamen, laŭ liaj parolaj asertoj ŝajne li trovas objektiva kriterio kutiman kunokazadon de certaj radikoj, ekzemple kun *-ec-*, de aliaj radikoj kun *-ad-*: tio ebligas formisman-strukturisman aliron, sen konsidero de signifo.

Blanke (1980: 384; 1985: 239) (malakceptante identigon de vorto kaj morfemo kompare kaj konfronte-kalkule pruvis, ke la kombiniĝemo de la efektive funkciantaj Esperantaj morfemoj multe malpli dependas de morfofonologiaj kondiĉoj, ol tiu de la germanaj: lin interesis la evidente uzataj derivaĵoj, kunmetaĵoj (1985: ĉ. 255, 282), kun konsidero de grado de la individua (po-vorta) specialiĝo en la vortosignifo.

Weidmann (1988: 28) neas Esperantajn vortospecojn, tamen li starigas vorto*klasojn* kiel *objektoklaso, eventoklaso, kvalitoklaso*. La menciitoj plejparte devis iel rilati ankaŭ al sosuraĵo (vd. komentojn de Gledhill 1998: 32 kaj ankaŭ de Schubert 1997: 129), same kiel Sosuro mem ekde la jaro 1907 evidente ne povis esti sendependa de certaj, ankaŭ de mi memorigotaj konstatoj de Couturat.

Vorto estas minimuma libera formo – estas dirinta Bloomfield (1926/1987). Libera formo povas roli kiel eldiro, kiel aktuale funkcianta frazo[55], tial eblas la ĵusaĵon praktikeme mallongigi jene: vorto estas minimuma (ebla) frazo. Minimuma libera formo, minimuma frazo (eldiro) tamen ŝajnas esti

[54] „En rélalité, il et impossible de définir verbes et noms en dehors de leur flexion."
[55] Mattos (1987: 169) en sia *Vortanalizo en Esperanto* uzas la terminon sentenco je la senco frazo en mia uzo ĉi tie.

prefere kaj efektive ne vorto, almenaŭ ne leksemvorto, sed vorto**formo**, kiu ja siaflanke tamen reprezentas leksemvorton. (*Kion vi vidis? – Domon.*) Vortospecon difinas ĝiaj morfologiaj kategorioj, ekz. tenso aŭ kazo – tiu opinio estas esence trovebla jam ĉe stoikoj – tre klare ĉe Dionysios Thrax (1a jc. a.K.)[56]. Do substantivo en lingvo kun deklinacio estas tio, kio havas la vortoformojn de tiulingva substantivo. Kiel oni diras la akuzativon de *dom-*? Kaj: la akuzativo de kio, propre, estas la formo *domon*, ĉu de *dom-* aŭ de *domo* – oni povas demandi, por pli kompreni, kial ne por ĉiu estas evidenta, ekzemple, substantiveco (eble pli precize: *substantivesto* aŭ *substantiv-estado*, proksimume laŭ la spirito de Révész (1984: 116), kiu ja neniel konfuzus ĉi tion ĵusan kaj deadjektivan *substantivecon*) de tiu aŭ alia radiko …

Grava aspekto estis la stato de la esperantista komunumo, komence. – Kiam Zamenhof, poste instruantoj de la lingvo skribis, parolis pri afiksoj, la gelernantoj renkontis formojn, vortojn, lingvoelementojn semantike karakterizatajn fare de la instruanto. Ekz. *-ul-* indikas personon, *-ej-* indikas lokon, *-er-* parteton, *-aĵ-* objekton. Verŝajne ne estis klare, ĉu la prezentataj formoj, deriviloj a) kvalifikas, konfirmas, enklasigas, kvazaŭ sankcias antaŭe pretan signifon de vorto, pri kiu preta, fiksa signifo sufiĉas nur atentigi, montrante ĝiajn pli vastajn kadrojn, aŭ prefere ili b) modifas la signifon de la derivbazo laŭ la donita semantika kriterio. Tiu baza neklareco de la funkcio kaŭzis multe da spontanea ŝanceliĝado en la parolpraktiko, malstabila supozeble ankaŭ pro aliaj kaŭzoj kiel: etnolingvaj influoj, manko de senperaj parolmodeloj kaj de praktiko (vd. Kuznecov[57] 1987: 135; Privat 1927; Saĥarov 1993: 21-22).

Kompare al la posta kaj ankaŭ nuna lingvopraktiko la parolatan Esperanton de la komenca periodo karakterizis troafiksado[58], kiun jes aŭ ne subtenis etnolingvaj influoj.

En la romano *Jaĉjo Holm* de W. G. Van de Hulst, en traduko de H. C. Vableuwen, oni povas renkonti la vortoformon *infanaĵuloj.* Miaj subaj ekzemploj eble iom superos eĉ la efektivan tiutempan troigadon, tamen mi riskas diri: ne estis tre malverŝajnaj formoj kiel: *Franclandujanulo, Amerikejaĵanulo, segadilaĵo, infanidaĵulo.* Por produkti tiajn vortojn la parolantoj havis aŭ supozis havi sufiĉe da motivoj, dirante ekzemple: mi pensis pri persono *(-ul-),* kiu ja estas *an-o* de tia lando, kaj kiu ja estas konkretaĵo siaspeca (*-aĵ-*) kaj do por ĉio ĉi oni havas po unu specialan indikilon en nia „logik-aĵ-ar-ec-a“ lingvo: kiom da eblaj kvalifikoj, tiom da eblaj afiksoj. Cetere, ankaŭ priskriboj de René de Saussure, eĉ se nur provizore, ĝis atingo de sekva ŝtupo de la sintezo, ebligas formojn kiel *Rusgentanujo, ŝipaĵano, potujo, diplomatiartisto, sablaĵujo, Amerikejo, ĉambroloko aŭ ĉambrejo,* por kompreniĝi ’Rusujo’, ’ŝipano’, ’poto’, ’diplomato’, ’sablejo’, ’Ameriko’, ’ĉambro’ – ĉiu el la ĵusaj vortoj nur post forĵeto de la superfluaĵoj akiras sian formon kutiman (vd. René de Saussure 1915/1969: 12-14). La plena riĉo de la ideo kaj vortosignifo ’homo’ laŭ Sosura ekzemplo aspektas jene: *(vertebrul)(ul)(konkretaĵ)(o).* Saussure traktas tiajn formojn kiel rajte bazajn por la ĝusta analizo, kaj (kontraŭe) kiel ne-celindajn ĉe sintezo, kie li instruas forlasi la (por analizo alprenitajn) superfluaĵojn.

Homonimio pli aŭ malpli ofte, sinonimio tre ofte aperas kaj devas aperi en ĉiu lingvo. Al la bazaj faktoj de la lingvo apartenas la polisemio: ĝi estas unu el la esprimoj de la lingva ekonomio, konsiderata ankaŭ ĉe planlingvoj, ofte ankaŭ pro metaforiĝo surbaze de unuagradaj signifoj. (vd. ekz. Blanke 1979; 1985: 76; 265-73; Nourmont 1989: 115; Horváth 1996; 1997).

„Ne estas necese, eĉ ne eble, ke la vortoj en planlingvo estu unusignifaj ... Gravas difini la limojn inter necesa kaj balasta polisemioj” – skribas Blanke (1980: 384). Ström, Couturat, de Saussure, la diskutantoj komence de la jarcento, eble supozis, ke plursignifeco estas lasebla tute ekster planlingvo, krome Couturat certe ekskludis akcepteblon almenaŭ de struktura homonimio ĉe vorto-derivado.

Iom pri la Eŭropa lingvistika tradicio. Vortkategoriojn oni provadis difini, unue, "semantike", kiel supozeble plej larĝajn klasojn laŭ signifo, due, laŭ eblaj sintaksaj pozicioj de la supozataj vortkategorioj, trie laŭ la havataj duagradaj kategorioj (kazo, tenso, modo, nombro). La unua aliro iom favoras, plifaciligas (ĉu prave, ĉu malprave) proksimigon aŭ identigon de vorto kaj morfemo. Tiaokaze ankaŭ

[56] Robert Henry Robins: *A short history of linguistics*. (2nd ed.) (1979), p. 57.

[57] Kuznecov (1987:135) asertas: "La esperantistoj de la novaj generacioj perceptadis kaj transprenadis la modelojn de la lingvouzo de siaj antaŭuloj, kaj ili ne konis tiujn ŝanceliĝojn, iam turmentajn, kiujn la sorto prezentis al la pioniroj de la movado. Transdonado de la lingvo, de generacio al generacio, funkciigis tiun senkonscian imitadon, kiu certigas la stabilecon ankaŭ de la naturaj lingvoj.” (mia traduko)

[58] „La Akademio opinias, ke multaj aŭtoroj trouzas sufiksojn, tio estas preskaŭ neevitebla en parolado, sed tio estigas la skriban lingvon nenecese peza", skribas Antido alie René de Saussure (1910). Vidu en la represo de Saussure (1914/1982.)

vortkategorio kaj karaktero de radiko povas ne aŭ ne tre distingiĝi. La du aliaj aliroj necesigas distingon kaj diferencojn en la klasado de vortoj kaj vortelementoj, respektive.

La verkon de L. Couturat (1907) la posteuloj traktas kiel kritikon de la Esperanta vortofarado. Couturat enkondukas sian laboron ja kiel analizon – kriliko lia koncernas, komence, nur la fakton, ke esperantistoj ne estis entreprenintaj analizon kaj en siaj priskriboj ili ne atentis pri la flanko de la signifo. Tamen, poste, pli kaj pli li enmetas siajn rekomendojn modifi kaj precipe aldoni al la jama inventaro de Esperanto. Menciindas, ke oni povas retrovi inter la ekzemploj de Couturat preskaŭ ĉiun ekzemplon de samtempa kaj posta ŝanceliĝado en la uzo kaj evoluo de Esperanto. Aparte li ekzamenas la derivo-rilaton inter verbo kaj substantivo, poste inter substantivo kaj adjektivo, fine inter verbo kaj adjektivo. Speciale li traktas plurajn afiksojn: *ek-, -ad-, -ig-, -iĝ-, -um-* k.s.

En sia Enkonduko *(Introduction)* Couturat (1907) emfaze agnoskas, ke la sukceso, logikeco, klareco kaj precipe la facileco de Esperanto grandparte ŝuldiĝas al la sukeesa derivosistemo: tio sama faras Esperanton interesa ankaŭ por teoria esploro.

Le système de dérivations del' Esperanto est sans contredit le trait le plus caractéristique de cette langue, et il contribue plus que tous les autres à lui donner un caractère de simplicité et de clarté logiques qui ne le rend pas seulement très séduisant pour le théoricien, mais très facile à apprendre et à monier mêm pour les personnes médiocrement instruites ...

Kvankam multaj meze instruitaj personoj ne kapablas mem derivadi en maniero spontanea, sed surprizitaj de la reguleco de la derivitaj vortoj, ili pli facile alproprigas la derivaĵojn aŭdatajn en la kurso aŭ rimarkatajn en libro ktp. Couturat emfazas ankaŭ la produktemon de la derivsistemo Esperanta, kontraste al derivosistemoj en naturaj lingvoj. La vortgrupoj de tiu aŭ alia radiko en Esperanto estas aŭ povas esti kompletaj.

Couturat rimarkas, ke iuj esperantaj vortoj estas derivataj sen uzo de afikso, aliaj dank' al uzo de afikso. Tial ĉe li aperas du specoj de derivado: senpera derivado (dérivations immédiates: Couturat 1907: 6; 9-34) kaj nesenpera derivado *(dérivations médiates,* vd. Couturat 1907: 7; 35-56, praktike temas pri: afiksado). La senpera derivado konsistas en simpla anstataŭigo de finaĵo per alia finaĵo.

La esprimmaniero, kiun li mem atribuas al la Esperantaj fontoj kiel ĝeneralan, ne kontentigas lin: laŭ li ne estas sufiĉe aserti, ke al iu ajn radiko oni povas meti iun ajn el la finaĵoj *-o, -a, -i, -e.* Ĉi tia esprimmaniero montras, ke la aŭtoroj-esperantistoj ne konscias la gravecon de la procedo anstataŭigo. Couturat emfazas, ke priskribo devas enhavi ankaŭ la priskribon de la signifo-rilatoj: ne estas sufiĉe vicigi la elementojn kaj klarigi ilian sinsekvon. Krome: la semantika rilato inter, unuflanke, la signifo de la bazo de la derivado kaj, aliflanke, la signifo de la derivaĵo devas esti renversebla, inversigebla. Lia ekzemplo – certe, por ke ĝi estu sendube kaj facile komprenebla – ne estas pri anstataŭigo, sed pri afiksado. Li priparolas la inversigadon, mi sube montros sage ambaŭ direktojn.

Objekto de okupiĝo	⌫	persono kun tiu okupiĝo
muziko	⌫	muzikisto
?	←	artisto

Evidente, ne nur el *muziko* oni povas konkludi pri la signifo de la vorto *muzikisto* aŭ *artisto,* sed ankaŭ el tiu de *muzikisto* aŭ *artisto* oni povas konkludi pri la signifo de la elirbazo ('muziko', 'arto'), t.e. se oni aŭdas/vidas nur la vorton artisto, oni sukcese divenas la signifon de la vorto arto. Kaj tia cirkonstanco devus esti koncerne derivitajn vortojn.

La regulo de renversebleco, inversigeblo estas tute ĝenerala – opinias Couturat – tamen, ĝi sekvigas interesajn fenomenojn, se oni aplikas tion je senpera derivado. El tio, ke oni same libere povas pasadi de substantivo al verbo, kaj de verbo al substantivo aŭ adjektivo, sekvas, ke la radiko ne povas havi per si mem gramatikan kategorion, tio estas ĝi ne plu estas per si mem pli substantivo ol verbo aŭ adjektivo. (En la lingvo franca oni legas:... *que la racine ne doit avoir par elle-même aucun caractère grammatical, c'est-à-dire ne être pas plu substantif que verbe ou adjectif* (Couturat 1907: 7). La franca vorto *verbe* estas substantivo: ĝi signifas ne 'verba', sed 'verbo'). Tio, ke la radikoj ne havas gramatikan kategorion, kaj do ne estas substantivoj, verboj ktp., estas preskaŭ evidenta laŭ Couturat ankaŭ cetere, ja ne ili, sed ĝuste la finaĵoj *-o, -a, -i, -e* determinas la gramatikan kategorion de ĉiu vorto (!), tute kaj individue. En la sekva paŝo li trovas kontraŭdiron. Kvankam la radiko, laŭ ŝajna konsento de ĉiu ĝis tiam ne havas gramatikan kategorion (ni diru elaste: ĝi estas nek substantivo, nek

substantiva, nek verbo, nek verba), tamen la *Universala Vortaro* liveras ekvivalentojn kun fiksita kategorio (diras Couturat, sed tiel estas ne nur en la *Universala Vortaro,* sed jam fine de la *Unua Libro)* kaj ankaŭ la manlibroj (ni diru: instruhelpiloj, lernolibroj) liveras, por klarigi la esperantajn radikojn, nacilingvajn vortojn kun klara gramatika kategorio kun klara vortospeco.

Couturat konstatas, ke tio estas kontraŭ la principo de renversebleco, sed li aldonas du ŝajnajn pozitivaĵojn: unu estas, ke la solvo el metodika vidpunkto estas defendebla, la dua estas, ke tio fakte konformas kun la aktuala stato de Esperanto (ĝi konvenas kiel priskribo en la momenta lingvostato), en kiu ja derivado vere ne estas renversebla, ĉar la (leksika) senco de la derivaĵoj dependas – bedaŭrinde – de gramatika kategorio. Ĝi ja devus ne dependi: ĝuste tial Couturat volas ŝanĝi la aferon. Ĉu vorto estas substantivo aŭ verbo – tio en si mem ne ŝanĝu ĝian leksikan signifon.

Por demonstri la dusencaĵojn, kiujn la malklareco de la radikkaraktero povas kaŭzi, Couturat prezentas la derivaĵojn *kulturigi*, *alkoholigi* kies kutima senco klariĝas laŭ rilato al supozata deveno elde la vorto *kultura* ('cultive'), *alkohola*, kaj malkoheras kun supozata deveno elde *kulturo, alkoholo.*

Ni ja vidas, ke oni bezonus scii, ĉu la vorto estas derivita elde substantivo aŭ adjektivo, sed ja nenio tion indikas. Jen la punkto en la pensoserio, al kiu poste Eugen Wüster aliĝas, skribante pri la tri fundamentaj reguladoj (Wüster 1921/1978: 30-43): forigo de gramatika hibrideco … finaĵa pluformado ..., „kompenso de manko de atributa sufikso de enteco".

Oni povas demandi, ĉu ĉiu vorto kun vortiga finaĵo *(-o, -a, -e, -i*) estas derivita? Ja principe ili povas esti derivitaj: la vortoj *tuja, via, dua* estas derivitaj el la vortoj *tuj, vi, du,* Do eble ankaŭ la vorto *bela* povas aŭ povus esti derivita el la radiko *bel*? Laŭ la priskribo de Couturat pri tio ne temas, tiel la afero ne statas. Parolante, enkonduke, pri rilato de verbo kaj substantivo, li diras, ke radikoj, kiuj kunhavas verban sencon (*sens verbal),* povas senpere liveri verbon *(fournir immédiatement un verb): esperi, enui, fondi, legi, pagi.* El verboj ĉi tiaj oni povas (poste) senpere derivi substantivon, kaj – jen sekvas la aserto grava por Couturat mem – tia senpere derivita substantivo *(le substantif immédiatement dérivé)* signifas la agon aŭ la staton esprimatan de la koncerna radiko. Oni devas atenti la vortuzon: oni ne derivas el la radikoj *(esper, enu* ks.) la vortojn *esperi, enui, fondi, legi, pagi,* sed ja oni senpere derivas la vorton *espero* el la vorto *esperi* – kiel ni scias, per anstataŭigo.

Szerdahelyi dirus, ke *esperi* estas primara vorto, *espero* estas sekundara. Couturat sen malaprobo konstatas, ke la signifo de ago, stato per preskaŭ neevitebla vastiĝo povas (ek)signifi la rezulton de la koncerna ago. Kelkaj el liaj ekzemploj: *difekto, diferenco, diro, dono, donaco, fino (!), komisio, koncepto, rikolto, signifo, solvo, takso, pluvo, neĝo(!), hajlo.* Tamen, la malaprobo sekvas poste.

Li trovas substantivojn (same derivitajn senpere el verbo), kiuj markas nur la rezulton, kaj kie la konforman agadon oni povas esprimi nur uzante sufikson: *amalgamo, apanaĝo, faldo, fendo, makulo, ploro(!), skizo, verko* – komparu: *faldado, fendado, verkado* ktp.

Couturat poste konstatas, ke ĉe parto de la derivaĵoj la interna interrilato estas aŭ povas esti ankaŭ kontraŭa: la senperan derivaĵon oni traktas (almenaŭ okaze) kiel agsubstantivon kaj oni speciale derivas (almenaŭ okaze) la nomon de la rezulto: *pakaĵo, rikoltaĵo.* En ĉi tiu parto Couturat rekomendas, kondiĉe, ekuzon de la sufikso *-ur-* por indiki produkton de ago, kiun li trovas distingenda kaj de la ago, okazo mem, kaj de la pasivaĵo (objekto) de la ago: *imita – imituro – imitaĵo* : ~ 'ago imiti' – 'bildo' – ekz. 'pridesegnato, io pridesegnata.

La rilatojn inter vortospecoj en derivado li traktas poste en jenaj subĉapitroj:

I. Verboj senpere derivitaj el substantivo: *ori, arĝenti, sali, sukeri, gudri, sabli, vitri, vuali:* ankaŭ ĉi tie la elirbazo estas ne la radikoj, sed la substantivoj *oro, arĝento* ktp. Li prezentas ekzemplon ankaŭ de participoj, kiuj iam estas uzataj sen la konforma verbo: *dentita, pintita.* Li trovas sinonimajn paralelaĵojn kiel *kolori* kaj *kolorigi, loki* kaj *lokigi, ombri* kaj *ombrumi, pensii* kaj *pensiumi.* Li kritikas la derivaĵojn kiel *elektrigi, limigi, ordigi*: oni asertas, ke la derivbazo estas *elektra, orda, lima,* respektive, sed – kiel li diras – nenio indikas, ke la verbo estas derivita de adjektivo (!) kaj ne elde substantivo ... Estas memkompreneble, liadire, ankaŭ ke oni ne povas derivi agsubstantivon per simpla ŝanĝo de la infinitiva finaĵo *-i* je la substantiva *-o: Naturellement, le substantif verbal (désignant l' action) ne peut etre formé par le simple changement de* i *en* o, *tial oni uzas similokaze -ad-: krono – kroni – kronado.* Li konfirmas la rekomendon pri la desubstantiva sufikso *-iz-,* sekve al Verax: *bitumizi, gumizi, gelatenizi, nikelizi, sulfizi, talkizi.* Couturat kaptas la okazon por montri, ke

krom la preciziĝo de la signifo de la verbo (vd. *nikeli : nikelizi*), per simpla substantivigo de infinito je ”izi” oni, bonŝance, ne reekhavus la bazan formon: *nikelizi >nikelizo ≠ nikelo.*

Couturat pensas trovi eĉ pli grandan malkonsekvencecon ĉe paroj kiel *bridi – senbridigi, seli - senseligi.* Li rekomendas kiel pozitivan poluson *kunbridigi* (kio ja vere ne ekskludiĝas). Ne akordiĝas, kiel li konstatas, ankaŭ *armi* kaj *armilo.* Traktas Couturat en aparta grupo la verbojn senpere derivitajn el „instrumentalo” de frazo: (per kio oni -as: *bastono, broso, funelo, kanono, pioĉo, veneno, vipo*): *bastoni, brosi, funeli, kanoni, pioĉi, veneni, vipi.* Li trovas nekonsekvenca solvo, ke rimedon de la ago oni jen esprimas derive (surbaze de konvena verbo), jen per sendependa substantivo *kombilo – broso, rastilo – pioĉo.* Li ne forgesas prezenti verbojn, kiuj estas senpere derivitaj el nomo de plenumanto de laboro, portanto de ofico, rango, eco, aŭtoro, aganto: *bigoti, ĉefi, filozofi, dandi, gasti, nomadi* (‘esti nomado’), *piloti, profeti, avari, malĉasti*, *egali, rapidi, sati, verdi* ktp. Li ankaŭ prezentas ekzemplojn de senpera derivado de verbo (infinitivo) el prepozicio kaj adverbo: *antaŭi, superi.* La baza morfologia skemo ĉi tie diferencas de la antaŭaj: kiam temas pri derivado elde substantivo kaj adjektivo, tiam temas pri anstataŭigo – kiel Couturat tion estis rimarkinta. – Ĉe prepozicioj (mi aldonu) temas pri vera aglutinado, aldono: *super+i.* Por derivi verbon elde adjektivo, Couturat, ne akceptante simplan verbigon, trapasas substantivon je *-ec-:* al la ordinara *avari* respondas lia rekomendo de *avareci.* La rekomendo havas ian sian postvivon ĉe Wüster (1921/1978: 32) kaj Révész (1984: 115). Couturat atentigas, ke liaj priskriboj ne devigas uzi kun certa radiko nepre nur certan sufikson, nur ke oni devas konsideri la funkcion. Oni rajtas elekti el vortoj kiel *filozofii* ’okupiĝi pri filozofio’ kaj *filozofeci* ’esti filozofo’.

II. Li ekzamenas detale rilaton de substantivo kaj adjektivo. Li trovas subgrupon, en kiu la interrilato ŝajnas al li klara kaj akceptinda: po du vortoj havas saman sencon, kaj diferencas nur la gramatikaj roloj *(fraŭla*, *fraŭlo, vidva, vidvo, invalida, invalido, laika, laiko, parazita, parazito, suverena, suvereno, katolika, katoliko, franca, franco, verkinta, verkinto;* simile: *festa tago, dia infano, reĝa moŝto, responda letero, kritika artikolo > festo, dio, reĝo, respondo, kritiko.* Kiel ni vidas, la adjektivo kaj la substantivo laŭ leksika signifo ŝajnas identigeblaj: *festa* estas *festo, kritika* estas *kritiko.* Pli ofte – diras Couturat – la adjektivo derivita senpere indikas nuran rilaton: *ama kanto, dolora krio, muskola fibro* ktp.

Li trovas, ke intenseco, konkreteco, abstrakteco, objekteco, personeco indikiĝas kontraŭdire, ne proporcie, kaj li konkludas pri manko de *-oz-:* kritike li ekzamenas la rilatojn inter adjektivo kaj substantivo kun *-ul-* kaj *-ec-* aŭ sen ili (komparu: *ambicio : ambicia : ambiciulo, ŝtono : ŝtona, kolero : kolera, ĝojo, gajeco).*

Li trovas plurajn rilatospecojn inter verbo kaj adjektivo. Li starigas subgrupon, en kiu la adjektivoj havas nek klare aktivan, nek klare pasivan sencon: *konsoli – konsola, paroli – parola, esperi – espera.*

Sekvas subgrupo, en kiu la adjektivo esprimas eblon, kapablon agi. *Adstringa, ĉarma, instrua, interesa, konsola, konvinka, morda.* Oni vidas, ke pluraj el ĉi tiuj adjektivoj konservas ian spuron de "nemanifestiĝanta" transitiveco. Laŭ atentigo de Couturat pluraj instruiloj avertas ne konfuzi tiajn adjektivojn kun participoj, sed laŭ li ĝuste la avertoj mem atentigas pri malekvilibro, malcerteco. Li parolas ankaŭ pri *-em-* kaj rekomendata *-iv-* en la transira zono de signifoj. Couturat kritikas multe da aliaj detaloj, plej grava, tamen, estas lia aserto, ke ŝanĝo de vortospeco devus ne kunŝanĝi la vortosignifon: oni nepre povu ŝanĝi vortospec-apartenon, kategorian valoron, sen ŝanĝi leksikan signifon. Lia kritiko estas resumebla je tio, ke konserviĝo de la leksika signifo ĉe ŝanĝo de vortospeco en Esperanto ne estas regula. Kelkfoje paro kiel *kuro – kuri* aŭ *promeno – promeni* liveras la saman signifon, kun (nur) diversaj gramatikaj informoj. Alifoje la infinitivo esprimas agon, tamen la paralela substantivo ne estas agsubstantivo en vortoparoj kiel *martelo – marteli*, *boato – boati;* ĉe similaj vortoparoj la leksika signifo de la du vortoj devus esti, laŭ postulo de Couturat, ĉiam la sama, kaj do sistemo ideala ne povas esti kiel la Esperanta.

3.17. Bonifacio SOTOS OCHANDO ĉ. 1845 havas aposterioran sistemon, kun verbo kaj konjugacio: *ucerarb-e, ucerarb-a, ucerarb-i:* 'mi skrib-as', 'mi skrib-is', 'mi skrib-os' (Duliĉenko 2006, 81).

3.18. Volapuko de Johann Martin SCHLEYER, 1879, havas la unuagradajn kategoriojn de artikolo, substantivo, adjektivo, numeralo, persona pronomo, rilatpronomo, verbo, adverbo, prepozicio. Duagradaj kategorioj estas nombro kaj kazo, gradacio, tenso, modo, voĉo de verbo. Prepozicio kunokazas kun nominativo kaj kelkfoje kun akuzativo (L. Couturat - L. Leau, 1903, 129-359). – Laŭ **Roberto Troseldi** Volapuko supozeble efikis al Esperanto. Li atentigas, ke prezenco en Volapuko ,,montratas per vokalo *-a* (kutime ĝi falas); imperfekto per *-ae*, preterito per pasinta preterito per *-i;* futuro per *-o,* preterita futuro per *-u* ktp". ,,Nu, oni rimarkas, ke almenaŭ kelkaj tempoindikaj vokaloj de Volapuko (prezenco en *-a,* unu el la preteritoj en *-i*, la futuro en *-o*). – ne retroviĝas en pra-Esperanto 1881-1882, sed retroviĝas en Esperanto 1887". Tio montras laŭ li eventualan efikon de Volapuko al Esperanto (Roberto Tresoldi, Ipernitio).

3.19. La Unua Libro de Zamenhof (1887, 1903) informas pri artikolo, substantivo, adjektivo, numeraloj, personaj pronomoj, verbo. Duagradaj kategorioj (kazo, nombro, tempo) aperas kune kun la unuagradaj. Ĉe la artikolo aperas alomorfoj. La dislokigo laŭ paragrafoj, proksimume – artikolo: *la, l':* (1, 16); substantivo: *-o, -on, -oj, -ojn* (de/al-o(j)n) (2); adjektivo *-a, -an, aj, -ajn*...(3); numeralo: *unu, du, tri, dektri, tridek tri*...(4); personaj pronomoj *mi, vi*... (5): verbo *-as, -is, -os, -us, -u* (6); infinitivo, participoj (6); adverboj (7); prepozicioj (2, 8, 14). Ekzistas vortoj eble ne sufiĉe konsiderataj unuapaŝe, ekz. oni ne atentas pri artikolecaj ecoj de adjektivoj kaj tabelpronomoj kiel *certa, iu, ia,* tabelvortoj ne estas sufiĉe atentataj (tamen konsideru la Ekzercaron).

La verbo ne havas duagradan kategorion de persono, sed pro la kompleksaj verboformoj oni povas atribui al ili kategorion de nombro *(vi estas leganta: vi estas legantaj).* Verboformoj kiel *konatas, sciintus* aperas en la posta evoluo. – Mi ne konsideras morfemojn, vortelementojn *(sid-, mur-, flav-, -i, -as, -a, -j* ktp.) kiel efektivajn, memstarajn vortojn, verbojn, substantivojn, adjektivojn, tamen valoras fiksi diferencojn de ekzemple de primara, nederivita verbo *(sidi, kuri, legi)* kaj verboj derivitaj el substantivo *(ŝofori, diplomi, asfalti),* adjektivo *(diligenti, blui, grizi);* krome verbojn baze transitivajn

(ligi, tiri soni) kaj netransitivajn *(kuŝi, labori, iri)*. Vortospecoj laŭ PAG (IV, 1980, 53-54): substantivo, pronomo *(mi, oni, ĉiu, ĝi, io),* adjektivo *(bela, homa, ioma, mia),* numeralo, verbo, adverbo *(noble, alte, ie, tuj, hodiaŭ),* prepozicio, konjunkcio, subjunkcio, interjekcio : tio estas dek vortospecoj, sed ĉi tie *mia* aperas kiel adjektivo; tabelvortoj rolas ĉe pronomoj, adjektivo, adverboj, dise. Bertilo Wennergren en PMEG distingas O-vortojn, A-vortojn, E-vortojn, difinilojn, pronomojn, rolvortetojn, tabelvortojn (je *-u, -o. -a, -es),* kunligajn vortojn, ekkriajn vortetojn, sonimitojn.

3.20. Latino sine flexione (Giuseppe PEANO, 1903) ne havas artikolon. Vortospecoj: substantivo, adjektivo, persona pronomo, numeralo, verbo, prepozicio. Mankas duagradaj kategorioj de persono, kazo kaj nombro, almenaŭ komence (nombro poste aperas).

3.21. Ido (Louis COUTURAT, Louis BEAUFRONT, 1907) havas la vortospecojn: artikolo, komuna nomo, propra nomo, personaj pronomoj, bazaj numeraloj, ordaj numeraloj, verbo, adjektivo. Dum ĉe Esperanto propra nomo apartiĝas en maniero spontanea dum la evoluo (ne laŭ preskribo), ĉe Ido diferenco de komunaj nomoj kaj propraj nomoj estas laŭplana. Estas menciinda la sinteza pasivo *(legesas),* kiu supozeble forte influis je Esperanto, kie iom post iom oftiĝis la sintezaj formoj *legatas* ks. Estas atentinda la kontribuo de Couturat al Ido. Se liajn analizojn de vorto-derivado oni pli konsiderus, ol faris tion René de Saussure, supozeble nuntempaj esperantistoj malpli eraradus pri transitiveco, ekzemple: derivitaj vortoj pli spegulus sian deriv-historion, afiksoj pli ofte indikus mem transitivecon, dum ĉe Esperanto ofte tio ŝarĝas onian memorkapaciton. – Sendube la pronomsistemo de Ido estas pli bona ol tiu de Esperanto, ĉar multe pli redunda, sed la lingvopolitiko, kiel oni provis dum la ido-skismo kunligi parolantaron kaj projekton, fiaskis.

3.22. Occidental (1922) Edgar de WAHL havas la vortospecojn substantivo, adjektivo, personaj pronomoj, montraj ktp. pronomoj, numeraloj, helpverboj, verboj, prepozicioj.

3.23. Novialo (1928) de Otto JESPERSEN havas jenajn vortospecojn: du artikoloj, substantivo, adjektivo, personaj pronomoj, posedaj pronomoj, numeraloj. Novaĵo estas kompare al Esperanto kaj Ido, ekz. *infinitiva prepozicio.* Oni povas distingi verbon kaj helpverbon. Estas grave, laŭ mi, ke eblas verboformoj funkcie paralelaj. Ekzistas kaj sinteza kaj malsinteza versioj de preterito. Ĉu tio estas retropaŝo kompare al absoluta skemismo?

3.24. Interlingvao de IALA, Alexander GODE (Interlingua 1951, 1952) havas la vortospecojn: substantivo, numeralo, verbo, helpverboj (modaj, tempaj), pronomoj (personaj, posedaj, montraj), *esque* (demanda partikulo).

3.25. Informojn pri **Loglano** mi prenas plejparte de Lluís, kiu prezentis artikolon ĉe Ipernitio (http://www.ipernity.com/blog/viric/84322, krome de Fellmann (2001). Loglano estas kreaĵo de James COOKE BROWN 1955/1960. Surbaze de, aŭ sekve al, Loglano aperis nova, simila sistemo: Loĵbano de Bob LECHEVALIER, en la jaro 1987. En ambaŭ projektoj la vortospecoj ne rilatas rekte al vortospecoj de etnaj lingvoj, almenaŭ ne laŭ la klasika priskribo-maniero. Loglanon karakterizas ekzemple, ke la Esperanta aŭ etnalingva kopulo havas plurajn ekvivalentojn, konforme al diversaj rilatoj en ensemblo-teorio. Loglano havas plurajn partajn ekvivalentojn ankaŭ de la konjunkcio *kaj* (Fellmann 2001). Ne temas pri rekta influo, tamen similaĵoj aperas ankaŭ ĉe kjalosko kaj pjaspo.

3.26. Atentindaj vortospecoj de **Loĵbano** estas: *selbrioj,* kun argumentlokoj; *sumtioj,* kiuj povas roli kiel argumentoj, *sumti-limvortoj* ambaŭflankaj: *le* N..P. X…*ku*, selbri-konfirma vorteto, sumtiiga vorteto; *cmavoj (ŝmavoj).* Kiel Vikipedio konstatas, Loĵbano similas predikatan logikon, ne etnajn lingvojn. Iuj elementoj de pjaspo ŝajnas similaj aŭ similbazaj al specialaĵoj de Loglano kaj Loĵbano, kvankam pjaspo estas klare aposteriora kaj pli simila al etnaj lingvoj ol Loglano kaj Loĵbano.

3.27. La **Interna Lingvo de DLT,** kies detalojn mi konsideras laŭ stato en la jaro 1989, enhavas dek du vortospeco-klasojn (!). Ili estas: 1) verbo, 2) substantivo, 3) pronomo (io, iu, mi ktp., lo), 4) adjektivo, 5) adverbo, 6) numeralo, 7) artikoloj, 8) prepozicio, interjekcio, 10) fiksliga modifa vorto *(ĉi, ajn)* – mia provizora termino, Schubert uzas anglaĵon; 11) subjunkcioj, 12) konjunkcioj. Ekzistas,

praktike, dek-tria vortospeco tie, la limvorto ,,duspaco". Temas pri sintagmo-lima kvazaŭvorto, distinganta suplementon de substantivo disde adjekto de frazo.

Eblojn de sintaksa malambiguigo traktas pli ĝenerale MEIER (1985) kaj SCHUBERT (1989) kaj aliaj, diverscele: multloke aperas la ideo pri subklasifikado de vortospecoj kaj frazelementoj de etnaj lingvoj aŭ de Esperanto.

La interna lingvo, ILo de DLT estas konstruita kiel dependosintakso. La vortospecojn determinas ilia morfemkonsisto kaj listigo (do interkonsento), sed estas fiksite ankaŭ, en kiu sintaksa pozicio ili povas aperi, regante kiun, kiu-vortospecan frazelementon, regate de kiu elemento. Substantivo interalie povas esti subjekto de verbo, kiu rolas predikate. Klaus SCHUBERT [ŝubert], A. P. WITKAM [ŭitkam] kaj iliaj gekolegoj celis – vortospecojn, kiuj helpas konstrui frazojn sen sintaksa ambigueco. La solvojn de ILo ni konsideris ĉe analizo de la hungara (Prószéky – Koutny – Wacha 1989).

La sistemo de DLT iom influas precipe je kjalosko sed ankaŭ je pjaspo. ILo de DLT enhavas ne nur novajn vortospecojn, sed ankaŭ novajn elementojn de vortospecoj (ekz. la artikolon *lo),* kaj novajn specojn de vort-elementoj. Tiaj estas la segmentoj, kiuj malambiguigas prepoziciojn *iam-en, ie-en* (iam-en Februaro, ie-en Londono). Vortospeco por simila fakultativa malambiguigo aperas ankaŭ en kjalosko, tamen tie la nivelo estas klare vorta, ne subvorta.

3.28. Tokipono venas de Elena KISA, Kanada tradukisto, lingvisto. La projekto estis preta en 2001. Vortospecoj de tokipono: 1) leksemvaloraj, densenhavaj vortoj, kiuj plenumus funkciojn de verbo, adjektivo, substantivo, kiujn tamen karekterizas ĝuste, ke ne limigas ilin la devigaj sintaksaj roloj de la respektivaj vortospecoj menciitaj; 2) pronomoj, 3) partikuloj, 3) lim-vortetoj *li* kaj *la*. – *Li:* por apartigi subjekton kaj predikaton (por distingi nuran sintagmon kaj frazon). *La:* por marki finon de adjekto (adverba komplemento). Por tokipono estas karakteriza la fonemaro kaj la principoj de la leksiko, sed mi ne okupiĝos pri tio.

4. Kelkaj ideoj pri lingvoprojektoj, pli ĝenerale

Esperanto kritikatis jam en la komencaj jaroj (1888, 1892-4), ankaŭ kadre de la Delegitaro kaj Ido (post 1900), sed kritikoj aŭ almenaŭ hezitoj ankaŭ nuntempe aperadas, ripetiĝadas, ekzemple pri kelka manko de redundo ĉe pronomoj, uzo de artikolo, speco, uzo kaj formo de akuzativo, precipe plurala (Courtinat 1966:44-48, Blanke 1985:236, Pokrovskij 2008). Ido mem ne gajnis amasan subtenon ne pro tio, ke ĝi aperigis novaĵojn (ekz. oni povis ne akordigi epiteton kaj ĝian substantivon), sed per tio, ke devigante pri novaĵoj, kvazaŭ devigis ankaŭ forlasi malnovaĵojn. Mankis lingvosociologia konsidero de tio, kiel parolkomunumo povas formiĝi kaj kian ritmon de modifoj kaj modifiĝoj parolkomunumo povas toleri.

5. Miaj provoj pli frue

Mi lingve eksperimentis en *Survoje* 1993, sen reagoj. Iom el miaj ideoj pri pronom-substantivoj aperis ankaŭ en artikoloj (1992, 1998, 1999). Poste mi preferis provadi en retpaĝoj de Donald Harlow, Kreado, Karapaco-Panoramo (http://karapacopanoramo.blogspot. com/search?q=b)azio+vaha). – Dankon, parte tro malfruan, precipe al Cezar, alie Hans-Georg Kaiser, Valentin Melnikov, Donald Harlow, sed ankaŭ al aliaj tolerintoj bonvoleme.

Mi intencis krei tri lingvoprojektojn (ili estas *tenko, kjalosko, pjaspo),* inter si kongruajn, kaj kongruajn kun Esperanto, kiuj do 1) ne malpermesas malnovaĵojn, fiksajn formojn kutimajn en Esperanto, tamen ebligas pli da redundo, pli facilan percepton fare de konantoj de la sistemo. Tenko kaj pjaspo 1) devus ebligi pli facilan trakton de la tempo, pli elastan parol-planadon fare de la parolanto (rapidigon, malrapidigon de la parolritmo kaj informad-ritmo). 2) Ili kaj kjalosko devus ebligi pli senperan sekvadon de diversfakaj kaj specialaj esprimmanieroj, pensadmanieroj. 3) Ili ebligas pli variajn sintaksajn strukturojn (ekz. frazojn sensubjektajn), kaj pli liberan trakton de semantikaj kategorioj (ekz. laŭvolan konsideron de tempo kaj aspekto) ankaŭ por ebligi fari bonajn krudajn tradukojn. 4) Ili, ĉefe kjalosko, ebligas laŭbezonan sintaksan unusencigon (ekz. por maŝina tradukado). Pjaspo ebligas pli facilan sukcesan diktadon, pro pli granda kovraĵo de skriba kaj parola sintaksoj, ol estas tradicie.

La projektoj prezentos ŝtupojn, inter kiuj oni povas moviĝi laŭelekte, t.e. pjaspo povas ĉerpi elementojn el kjalosko, se certaj kondiĉoj estos plenumiĝintaj. Simile al tio, ke oni povas paroli kaj ne skribi, eventuale skribi kaj ne paroli, tamen skribado ne forprenas pli fruan parolkapablon. Jam tenko

havas plurajn novajn vortospecojn kompare al Esperanto, sed kjalosko kaj pjaspo havas kaj havos pli da elementoj de la novaj vortospecoj. Ĉiuj tri projektoj havas ekzemple pronomsubstantivojn (vd. Vaha n.s. Wacha 1991, 1995, 1998: 214, Wacha 2006:404), sed pjaspo nuna-stata havas da ili pli multe ol la aliaj du projekto-skizoj.

Difina artikolo ne estas uzenda ĉe miaj projekto-nomoj, skribi eblas jene: *Tenko aŭ tenko.* Difiniteco kuŝas en la atribuota signifo leksika. – Ambicio de la projekto *tenko* estas faciligo por percepto. *Kjalosko* estu interlingvo por tradukado, pli rekta reprezentado de sintaksaj rilatoj, fakaj skemoj; kruda tradukado. Kjalosko havas rimedojn aludi al stilaj diferencoj de tradukataj tekstoj. Pjaspo celas faciligon de percepto, vastigon de kategoria fono, kun utiligo de elementoj de tenko kaj kjalosko

6. Tenko

Tenko uzas kiel bazon la alfabeton de Esperanto kaj INKA-alfabeton de Otto HASZPRA [haspra], kome modifitan IPA-alfabeton fakultative, sed ene de la sama ordinara teksto kohere. La vokalo *ŭ* kun konsonanto povas konsistigi ultramallongan silabon. – Literoj *ö, ü* en tenko-fremdaj nomoj estas uzeblaj kaj elparoleblaj kiel *ö, ü* aŭ *jo, ju,* eventuale *e, i.* – La litero *y* estas uzata por indiko de velara ekvivalento de *y.* La litero *ə* estas uzata por indiki mezan redukto-vokalon, kiu estas enhavata, sed sen sencodistinga funkcio (apəsido ‘apsido’, abŭsido ‘absido’; ekəzemplo ‘ekzemplo’). La literoj kaj sonoj *ə* kaj *ŭ* ne povas okazi en akcentata silabo.

La vort-akcento estas sur la antaŭlasta silabo. La akcentata silabo estas pli sonforta, ĉe verboj, substantivoj, adjektivoj kaj derivitaj adverboj iom ankaŭ pli longa. Akcentatajn silabojn de frazovortoj, prepozicioj oni ne plilongigas (speciale). – Kvankam tenko havas aliajn rimedojn por emfazi partojn de la frazo, eblas ankaŭ esprimi emfazon per akcentosigno (vertikala streko) super la akcentata silabo de la emfazata vorto: *La knabo diris, ke estas agrabla vetero.* - *Vi eraras! Tion diris la knabíno!*

6.1. Vortospecoj de tenko

6.1.1. Tenko distingas frazojn, kiuj konsistas en sola frazo-vorto, kaj struktur-frazojn, kiuj povas konsisti el minimume unu aŭ pluraj fraz-elementoj. Frazo-vortoj, se uzataj, mem estigas sian modumon. Aliaj vorto-specoj ekhavas modumon nur en struktur-frazo. – Struktur-frazoj utiligas ĉiujn vorto-specojn de Esperanto. La artikolo *la* estas fakultativa (difinitecon ĝi nur neprigas), substantivo fmiĝas je *-o,* verbo je *-as, -is, -os, -u, -us* (laŭ tenso kaj modo), adverbo je *-e, -aŭ* ktp.). Signifo de struktur-frazoj estas grand-parte (kvankam ne absolute) komponata el la elementoj. Ekz. la signifo de la frazo *Mi nun ne havas tempon* aperas kiel rezulto de operacio pri la signifoj de la kvin vortoj *mi, nun, ne, havas, tempon,* laŭ la frazostrukturo.

La funkcioj de la morfemoj kaj pseŭdomorfemoj *-el-, -am-, -om-, -al-* en tenko estas individue leksemdependaj, do ne konstantaj. *Tiel* ‘tiel’, *semel* ‘je certa difinita, identigebla fojo, iam, sed ne iam ajn’. *Huzel* ‘Mi ne scias, kaj volonte scius, kiu tiu videbla, aŭdebla, sensebla, proksima persono estas’. – Konjunkcioj kunordigaj estas, fakultative, jenaj: *untom* (inter propozicioj), *e* (inter nomvortaj sintagmoj), *flom, folom* (samiga, inter epitetoj); *fle* (distinga, inter epitetoj); ĝenerala: *kaj.*

6.1.2. Vorto-frazoj el unu frazo-vorto havas blokan signifon. Unu vorto samtempe rolas (ne nur kiel vorto, sed) ankaŭ kiel frazo kaj havas certan modum-valoron, t. e. ĝi senplie povas rilati al la situacio, en kiu la parolanto ĝin uzas. – Iom da vorto-frazoj ekzistas ankaŭ en Esperanto, kvankam tia termino ne estas tre uzata. Ĝi aperas ekzemple kiel interjekcio. *Ehe!* signifas proksimume ‘Mi komprenas la aferon, la ruzaĵon’. kaj *Ve!* ’Mi sentas nun doloron’ estas pli-malpli ekvivalentoj, kvankam la interpreto de *Ve!* povas esti ne nur unu strukturfrazo. La frazoj *Estas al mi dolore, Mi suferas pro doloro, Io doloras al mi,* kvankam tre diversstrukturaj, povas roli kiel ekvivalentoj de la sama frazovorto. Simile rolas *Aj* ĉe Zamenhof: „pingloj, je kiuj oni pikiĝas: *aj!* Oni ekkrias” (laŭ NPIV, 2002:57). Rimarku, ke iuj frazovortoj estas tre ĝeneralaj, do tre frue uzeblaj fare de lingvo-lernantoj, aliaj ebligas insisti pri detaloj. Iuj el la frazovortoj estas „sencoriĉaj", kio povas helpi personon, kiu konas nur parton de la lingvo.

6.2. Situaciaj frazovortoj en tenko:

Sampal! Mankas al mi ia informo, mi volus, ke vi diru al mi certan aferon. Permesu al mi demandi vin pri certa afero.

Kintel! Koncerne la sekvan aferon mi ne komprenas ian detalon, sed mi ne povas, aŭ ne volas demandi pli precize. Ekz. *Kintel, la infano malaperis...*? 'La infano malaperis... mi ne tute komprenas, pri kio temas... kien... kiam, ĉu oni povus informi kompletige?
Vesel! Ves! Ion aŭ iun sensatan mi ne povas identigi, iu diru, kio aŭ kiu tio aŭ tiu estas!
Kalep! Senseblan objekton mi ne povas identigi, kio estas tiu objekto. Bonvolu diri al mi, kio tiu afero estas? Diru, kio estas tiu aĵo, tiu objekto?
Huzel! Iun/tiun personon mi ne sukcesas identigi, bonvolu helpi min, kiu estas tiu persono?
Kutam! Mi volus ekscii, kiu vi estas, identigu vin iel, diru vian nomon aŭ ion gravan pri vi! (Eblaj reagoj: Mi estas la leterportisto. Mi estas Karlo. Ktp.)
Tekim! Mi volus ekscii vian nomon, kiel vi nomiĝas, bonvolu diri vian nomon.
Masmuk! Diru, mi petas, kiu vi estas, kie vi loĝas, kiujn adreson, telefonnumeron, faksnumeron vi havas, „donu viajn koordinatojn".
Cotaĥ! Mi ne komprenas la situacion, kiun mi spertas ĉirkaŭ mi.
Esam! Ni priparolu la kvalitojn! Ni priparolos la kvalitojn. Ni vidu, kia tiu afero estas, kiaj tiuj aferoj estas. Temos, temu pri kvalito.
Lajkom! Ni priparolu la kvaliton laŭ valoro, karakterizu mi petas, laŭ valoro, jen kion!
Sutal! Ni priparolas, priparolu eksteran aspekton! Nun temos pri la ekstera aspekto. Nu, kio koncernas tion, kia li/ŝi/ĝi estas, jen kion mi diros.
Vejŝukam! Mi havas problemon pri loko, mi ne orientiĝas, mi ne trovas ion.
Simbel! Temas, temu pri loko kaj tempo! Mi (ekz.) volus scii la lokon kaj tempon de la afero, pri kiu temas, kiam kaj kie tiu afero okazis aŭ okazos?

La diversaj vortospecoj kaj frazospecoj kunfunkcias. Nenio malhelpas, ke oni uzu en la sama parolago ambaŭ rimedojn. Ekzemple: ***Ve!*** *Kiom doloras min la kapo!* (*Ve* + stukturfrazo). – ***Tekim!*** *Mi denove forgesis vian nomon, rediru ĝin, mi peta! Kiel vi do nomiĝas! (Tekim!* + strukturfrazo). – ***Cotaĥ!*** *Mi tute ne komprenas, kio okazas ĉi tie! (Cotaĥ* + strukturfazo). ***Esam!*** *Kia finfine estas via nova aŭto? (Esam!* + strukturfrazo).

6.3. Dialogumaj frazovortoj helpas teni la kontakton kaj kontroli la interkompreniĝon de dialogantoj.
Doĥ ! 'Mi havas diferencan opinion.'
Doĥ! Jes! 'Laŭ mi vi malprave neas ion. La baza aserto estas konforma al la vero!'
Doĥ! Ne! 'Laŭ mi vi malprave jesas ion. La baza aserto estas malvera.'
Fjandam. 'Se vi komprenas la aferon, kiel mi ĝin komprenas, mi konsentas, sed eble oni devus certan aferon precizigi, reciproke klarigi.'
Haj! Hajal! 'Mi aŭskultas vin, atentas vin, kun bonvolo. Daŭrigu, mi aŭskultos vin plu!' (Laŭ japana semantika modelo.)
Lankam! 'Iam (ankaŭ) mi volus poste ekparoli, se vi ĉi tion estos findirinta, allasu min paroli.'
Lembel! 'Mankas al mi vorto, esprimo, mi devas pripensi, kiel mi ion diru!'
Palank! 'Nun eble ni ĉesu interparoli, ni daŭrigos alifoje.'
Pulank! 'Kvankam vi evidente volus ĉesi interparoli kun mi, vi volus, ke mi ĉesu paroli, vi eble rapidas tamen ion mi ankoraŭ diros al vi'.
Tak! 'Mi konsentas pri via aserto, pri via jesa aŭ nea opinio.'
Tak, jes! 'Vi pravas, tiel estas, kiel vi diras,'
Tak, ne! 'Vi pravas, ke ne estas tiel, kiel oni povus supozi, vi prave neas.'

6.4. Fokus-anoncaj frazovortoj (aŭ tiaj „propozicio-vortoj") en tenko. Tiu ĉi parto de la frazovortoj estas pli dependa de la postsekva kunteksto. Fokusanonca frazovorto kvazaŭ preparas sekvan frazon. Ĝi (fakultative) atentigas, kiu parto de la sekva frazo estas esenca, direktas la atenton de la aŭskultanto al la fokuso. (Kvazaŭ: 'atentu bone, tuj ni precizigos... jen kion.')

6.4.1. La fokusanonca frazovorto ***Aŝkam!*** atentigas, ke en la sekva frazo la grava informo estas (estu) identigo de persono; la informo pri persono eble aperos kiel subjekto, sed ne nepre. ***Aŝkatn,*** *la aferon aranĝos* ***Evinjo,*** *oni petis ja Evinjon.* Similaj frazovortoj *bjaŝkam* aŭ *sabjakŝkam* (kun fakultativa formvariado) neprigas fokusan subjekton.

6.4.2. La fokusanonca frazovorto ***Dokol!*** atentigas, ke la sekva frazo enhavas/enhavu gravan informon pri loko. ***Dokol,*** kie okazos la kunveno? *[**Aŝkam**,* kiuj prelegos, al kiuj? ***Sabjaŝkam,*** kiuj venos?]

6.4.3. La fokusanonca frazovorto ***Dobaĥ!*** preparas frazon kun fokuso pri tempadjekto. ***Dobaĥ,*** *kiam ni komencos la ludon?* Aŭ: ***Dobaĥ,*** *la koncerto komenciĝos* ***je la sepa horo****.*

6.4.4. La fokusanonca frazovorto ***Nolam! aŭ Nalam!*** preparas frazon kun fokuso pri efektiva aŭ ebla fonto de informo, scio, kono. ***Nolam, kie*** *oni povas trovi la formulon de akvo?*

6.4.5. La fokusanonca frazovorto ***Pilaĥ!*** preparas frazon kun fokuso pri direkto, loka finpunkto. Oni atentu la adjekton pri loka finpunkto. ***Pilaĥ,*** *ni veturos ne al Parizo, sed al* ***Prago.***

6.4.6. ***Utom****:* la fokuso estas pri itinero. Oni atentu la adjekton pri itinero! Ekzemple: ***Utom****, ni veturos al Varsovio* ***tra*** *Prago.*

6.4.7. Lengom: la fokuso estas pri celo. **Lengom**, ni faras tion **por klerigi la infanojn.**

6.4.8. Babuĥ, sababuĥ: la fokusaĵo estas kaŭzo: **Babuĥ**, tio okazis nur **pro la milito.**

6.4.9. ***Sambeĥ:*** ĉi tiu anonca frazovorto preparas frazojn kun gravaj informoj en lokadjekto kaj tempadjekto. ***Sambeĥ,*** *la prelego okazos* ***je la dua horo en la salono Ivo Lapenna.***

6.5. Pronomsubstantivoj en tenko

Tenko havas ankaŭ pronom-substantivojn, kiuj riĉigas la eblojn referenci parte je nivelo pli ĝenerala (se temas pri tria persono), parte pli riĉe (se temas pri la unuaj du personoj). – En Esperanto estas multege (kaj daŭre pli kaj pli multe da) substantivoj, regulaj (kiel *tablo, universo)* kaj neregulaj (kiel *ESF, LEA, LKK, LM, PIV, UEA, IS, ISO),* kaj tio ŝajnas memkomprenebla eĉ al malŝatantoj de neologismoj. Substantivo en Eŭropaj lingvoj estas „malferma vortoklaso", kun multaj miloj, dekmiloj, centmiloj da elementoj, „sen ies ajn protesto": neniu skandaliĝas, ke pri oficiro (ia) oni povas diri *majoro, generalo, marŝalo,* nek pro ke oni povas multelemente precizigi substantivon en frazo *(tiu treege simpatia, plej memorinda serĝento).* – Kun preskaŭ deviga tria-personeco, kiun plejparte sen speciala klarigo (almenaŭ preferece) atribuas al substantivoj. („la vendisto ", se la vorto aperas kiel subjekto en frazo, baze estas – *li*, ne *mi* aŭ *vi.*)

En Esperanto, kiel Eŭropa lingvo, ankaŭ vortoj kiel *avo, onklo, klubano* indikas plej grave trian personon, ne facile ili aplikiĝas je la unua kaj dua personoj. 'Aperis la vendisto' apenaŭ povas esti samsenca je 'aperis mi', malgraŭ tio, ke mi ja povas esti vendisto. Personaj pronomoj, do kutimaj esprimiloj de unua kaj dua personoj ankaŭ epiteton ordinaran ne akceptas.

Aliflanke en Esperanto oni havas (kaj oni facile akceptas tion) nefermitajn seriojn kiel *militisto, batalanto, batalulo, armeano, oficiro, serĝento, ulo, knabo, knabeto, junulo, junuleto, viro, libro, oceano, benko, longa benko, tre longa benko* ktp.; multe pli ofta referenco je la parolanto kaj alparolato *(mi, vi)* povas okazi en relative tre malmultaj manieroj. Tiu proporcio de elementoj tendencaj je tria persono kaj ne je aliaj du, ne estas „apriore" aŭ „aposteriore" nepra, nur sekvas skemon de hind-eŭropaj eŭropaj kaj aliaj lingvoj. Se oni en tenko uzos pronomsubstantivojn, oni oportune kaj multredunde povas indiki diferencojn laŭ gramatika persono, emfazante jen pli precizan referencon (ekz. 'kiuj ni', 'kiom da vi'), jen iom pli precizan karakterizon, rilatnuancon (ekz. 'kia vi').

6.6. Pronomsubstantivoj estas vortoj kun morfemstrukturo de la Esperanta substantivo (radiko + vortiga finaĵo, plus eblaj kategoriaj finaĵoj) kaj pronomecaj referenc-reguloj.

6.6.1. Ligendaj pronomsubstantivoj fiks-personaj en tenko. Ligendaj pronom-substantivoj devige kunokazas kun certa kaj nepre ne alia persona pronomo: *mi enko, mi apto, mi mujko, mi lajgo, mi vataŝjo, mi vacakŝo, mi manvo, vi tumo, vi teŝko, vi paŭko, vi usto, vi vevo, vi teto, vi gondo; ĝi tamo, ŝi tamo, ĝi tamo; li kjando, ŝi kjando, ĝi kjando; (ni) sunko, ni sanko, ni zenko, ni vjumo, ni vamo, ni vamelto, ni uksolto; ni manvoj; vi tumoj, vi ustoj, vi vevoj, vi tetoj; ili tamoj, ili kjandoj.*

Jen ekzemploj de signifoj: *mi enko* 'mi kiel individuo'; *mi apto* 'mi kiel reprezentanto de firmao, organizo ks. *mi mujko* 'mi, virino' *mi lajgo* 'mi, viro'; *vi tumo* 'vi, alparolato'; *vi teŝko* 'vi virino, [kun ŝato]; *vi paŭko* 'vi viro [kun ŝato]' *vi gondo* 'vi kiel reprezentanto de firmao, organizo ks; *ni sunko* 'ni duopo'; *ni sanko;* 'ni pluropo'; *ni vjutno* 'mi kun vi, sola'; *ni vamo* 'mi kun vi pluraj', *ni vamelto* 'mi kun pluraj el vi' *ni zenko* 'ni sen vi'; *ni uksolto* 'mi, vi kaj multaj aliaj'; *ĝi tamo* 'li aŭ ŝi, tria persono, homo, sen indiko de sekso'; *li tamo* 'li (viro)'. Gravas la ligiteco al certa persono. Ne konvenas do la vorto *sunko* pri duopo, kiu ne estas samtempe 'ni ', ekzemple. Ne konvenas la vorto *mujko,* se la virino

ne estas ‘mi’ (sed ‘vi’ aŭ ‘ŝi’). – Se tiu personligiteco ne ekzistus, la celata grado de redundo ne aperus.

Tiaj fakultativaj pronomsubstantivoj 1) pliigas percepteblon, redundon 2) aldonas nuancon, riĉigas la enhavon de la persona pronomo 3) plifaciligas tradukon, kelkfoje, el ne-eŭropaj lingvoj aŭ jur-esencan esprimmanieron. *Mi enko farus tion, sed mi apto ne rajtas.* ‘Mi persone farus tion, sed kiel reprezentanto de certa jura persono min komisiinta, mi ne rajtas’. *Ni vjumo manĝos, ni zenko pagos.* ‘Ni, mi kaj vi manĝos, kaj ni, mi kun aliaj, sen vi pagos’. *Vi paŭko foriru, vi teŝko restu!* ‘Vi [viro] foriru, vi [ino] restu!’

6.6.2. Ligendaj pronomsubstantivoj **liberpersonaj.** Ekzistas ligendaj pronom-substantivoj, kiuj devige kunokazas kun tabelvorto aŭ persona pronomo, sed kiuj povas referenci je iu ajn el la tri personoj: *bodo* ‘persono’, *tojo* ‘modesta persono’, *ĉemno* ‘ĉeestanta persono’ *okno* ‘forestanta persono’. Ekzemplaj sintagmoj: *kiu bodo, mi bodo, vi bodo, vi bodoj, vi ĉemno, vi oknoj* (kiu, mi vi ktp. kiel natura persono). *Kiu zando, mi zando, vi zando* (kiu, mi, vi kiel reprezentanto). Mi pli detale klarigos ilin aliloke. Ligendaj pronomsubstantivoj estas preskaŭ-substantivoj, kiuj funkcias nur kun pronomo, kvazaŭ apozicie. La liberpersonaj pronomsubstantivoj *bodo, tojo, ĉemno, okno, zando* povas rilati al iu ajn persona pronomo, sed ne povas aperi sen persona pronomo: *mi bodo scias, vi bodo scias. Vi bodoj scias.* Uzo kun tabelpronomo: *Kiu bodo scias?*

6.6.3. Duonliberumoj. Ekzistas „relative ” liberaj pronom-substantivoj, kiuj okazas kun aŭ sen pronomo: *ipso* ‘la ĵus menciita persono (ne dependa gramatika persono: mi, vi, li, ŝi, ĝi, laŭ la persono en la antaŭfrazo). *Vi estas saĝa.* ***Ipso*** *estas forta.* ‘Vi estas saĝa. Vi estas forta’. Sed eblas (eblu) diri ankaŭ: *Vi estas saĝa. Vi* ***ipso*** *estas forta. Vi estas viglaj. Vi* ***ipsoj*** *povus kuri en la vendejon. Li estas kuranta. Li* ***ipso*** *volas atingi la aŭtobuson.* Sed eblas ankaŭ *mi ipso, apso* aŭ *mi apso, apso* aŭ *ŝi apso, apsoj* aŭ ili *apsoj, bjenvo* ‘iu el mi kaj ci’; *mi bjenvo* ‘mi, el ni du’; *vi bjenvo* ‘vi el ni du’.

7. Kjalosko

Kjalosko havas ĉion el tenko, sed ĝi havas pli da rimedoj de redundo kaj ankaŭ sintakse-konfirmajn rimedojn. kiuj povas plifaciligi „maŝinan ” prilaboron de tekstoj.

7.1. Vortospecoj en kjalosko

7.1.1. Artikoloj

7.1.1.1 Ekzist-artikolo en kjalosko estas la vorto *impal.* Ekzemple: *Impal dika maljunulo havas nigran hararon.* ‘Ekzistas (minimume unu) dika maljunulo, kiu havas nigran hararon.’ *Impal dumil infanoj malsatas en Hungarujo.* ‘Ekzistas (minimume) dumil infanoj en Hungarujo, kiuj malsatas’.

7.1.1.2. Certum-artikolo en Kjalosko estas *kopom.* Ekzemple: *Kopom malriĉulo iris en vendejon, kaj diris.... Kopom tri fratoj iris alpaĥtel reĝo.* ‘Principe identigebla, konebla, sed de vi supozeble ne konata malriĉulo ekiris...’

7.1.1.3. Resend-artikolo en kjalosko estas *tiĥtel. Kopom knabo ekiris. Tiĥtel knabo baldaŭ laciĝis.* ‘[Certa] knabo ekiris. La [menciita] knabo baldaŭ laciĝis.’

7.1.1.4. Diven-artikolo en kjalosko estas *paĥtel.* Ekzemple: *Kopom knabo rompis paĥtel nazon.*

7.1.1.5. La artikolo ***la*** povas anstataŭi resend-artikolon kaj diven-artikolon.

7.1.1.6. Neniu artikolo estas devige uzata, senartikola substantivo povas esti komprenata kiel nedifinita, duondifinita aŭ difinita: *Dika maljunulo havas nigran hararon. Dika maljunulo ĝojas.* La artikoloj ne akordiĝas, ne estas deklinaciataj.

7.2. Trajto-partikuloj

7.2.1.1. Trajto-prepozicioj. Iam povas nomvortojn trajto-partikuloj antaŭi.

7.2.1.1.1. Nombrovortoj sendifinaj: *Soĥtal* aŭ *soĥ* estas trajto-partikulo antaŭmetata, kun funkcio pluraliga, kiu povas rilati konfirme al pronomo aŭ al substantiva sintagmo: *soĥtal vi, soĥ vi* ‘vi, pluraj’. Simile: *soĥtal ni, / soĥ ni;* ‘ni’ (redunde). Okaze de uzo de *soĥtal* aŭ *soĥ* principe akordigo de la postaj nomvortoj estas fakultativa (do forlasebla). Konservo de akordigo liveras stilon pli formalan. Paralele eblas formoj kiel: *soĥ* ***rapidaj, belaj*** *cervoj; soĥ* ***rapida, bela*** *cervoj;* ***soĥtal*** *rapidaj, belaj cervoj; soĥtal* ***rapida, bela*** *cervo;* ***kun*** *soĥtal* ***rapidaj, belaj*** *cervo(j);* ***pro*** *soĥtal rapida,* ***bela*** *cervo(j);* ktp. Pli bonstila estu formo kun ankaŭ fina indiko de pluraleco.

7.2.1.1.2. *Vengem* ‘3-6’, ‘kelkaj’, ‘pluraj’, *balim* ‘5-20’ ‘kelkaj’, ‘pluraj’ estas nedifinaj nombrovortoj, numeraloj. Simile: *vengem-balim* ‘iom inter tri kaj dudek’. Ili povas esti uzataj tute

simile al *soĥ,* kiu tamen havas pli vastan uzokampon: *Vengem tre laca(j) kaj malsata(j) soldatoj aperis ĉe la stratofino*.

7.2.1.1.3. *Sujom* estas **nombro-neŭtraliga** partikulo: „Se *sujom* infano venos, oni devos ĝin helpi ”. ‘Se infano aŭ infanoj venos, oni devos ĝin aŭ ilin helpi’.

7.2.1.2. Prinombraj postpozicioj. - La vorteto *suĥ* estas *postpozicia.* trajto-partikulo pri nombro ‘pli ol unu’ (‘kelkaj’, ‘pluraj’). La vorteto *saĥ* estas postpozicia trajt-partikulo pri nombro ‘pli ol du’. (‘pluraj’).

7.2.1.3. Ĉirkaŭpozicioj prinombraj. La supraj nombrodifiniloj estas uzeblaj ankaŭ samtempe: nombron oni povas kunindiki ĉe komenco kaj fino de sintagmo, interne la nombroindikado restas fakultativa: ***Soĥ*** juna, simpatia knabino(j) ***suĥ***. – Simile: ***Soĥ*** juna, simpatia knabino(j) ***saĥ***. – *Vengem* ***juna, simpatia*** *studento(j)* ***suĥ***. – *Vengem* ***junaj, simpatiaj*** *studentoj* ***suĥ***. – *Balim* ***juna, simpatia*** *fraŭlinoj* ***saĥ***. **– *Balim*** *juna, simpatia knabinoj* ***sah***. – Tiaj aranĝoj 1) ebligas facilan aŭtomatan trovon de sintagmo-limoj, 2) pliigas utilan redundon en parola uzo, (nur) laŭdezire, 3) malŝarĝas „personojn sen kategorio de nombro en la gepatra lingvo”.

7.3. Ligopartikuloj

La „mezeca ” ligopartikulo *zju* indikas, ke la antaŭa vorto estas substantiva sintagmo kun propra nomo aŭ komuna nomo, je kiu la sekva vorto, kiu povas esti persona partikulo, kunreferencas. La ligopartikulo *ĝa* indikas, ke la antaŭa vorto estas persona pronomo: *vi* ***ĝa*** *tuntol* ‘vi [unu]’, ‘ci’. La antaŭmetata ligopartikulo nepre-kunsintagmigas du sekvajn vortojn: ***loĥ*** *bentol mi* ‘mi’, *loĥ tuntol vi* ‘ci’ sed ĝi estas forlasebla: *tuntol vi; bentol mi.*

7.4. Baze-subtenaj personaj partikuloj aldonas *(knabino bentol)* aŭ konfirmas *(mi bentol,* eventuale *bentol mi)* gramatikan personon atribuatan al substantivo aŭ pronomo.

Pro kelkfoja homonimeco oni havu la eblon indiki, ĉu la ligata vorto estas substantiva sintagmo aŭ persona pronomo: *Knabino* ***zju*** *bentol ekiris* ‘mi ekiris (kaj mi estas knabino)’; *mi* ***ĝa*** *bentol ekiris* ‘mi ekiris’. *Mi zju tantol ekiris; Mee zju bentol ekiris; Lee (Li) zju bentol ekiris* ‘la persono, kiun oni nomas *Mi (Mee), Lee (Li)* ekiris’ *(Mi. Lee* ks.... ĉi tie ne estas personaj pronomoj!). La serio estas: *Mi (ĝa) bentol, vi (ĝa) tuntol, li tantol, ŝi tantol, ĝi tantol, ĝi zontol; ni bizmel, vi tumel, ili tejmel (ŝajmel, lujmel, gemel, zojmel)*. Eblas kombini diversajn elementojn kun sama referenco: *Vi amiko tuntol diris, ke vi venos*. – Baze-subtenaj personaj partikuloj estas prefere iel postmetataj, ĉefe kun intermeto de ligopartikulo *(knabo tuntol, knabo zju tuntol, vi ĝa tuntol),* sed ili ja povas antaŭi pronomojn *(tuntol vi; tumel vi; bizmel ni),* aŭ sekvi verboformon *(Ni vivas bizmel)*.

7.5. Nuance-subtenaj personpronomaj, „meze-prepozitivaj ”, pluraligaj trajto-partikuloj estas ***ĉoj*** kaj ***noj***. *Ĉoj* estas eksluziviga, *noj* estas inkluziviga. *Ĉoj ni iros* (‘ni iros [vi ne iros]’). *Noj ni iros* (‘Ni iros, ankaŭ vi estas konsiderata, ankaŭ vi iros’).

7.6. Infinitivo-partikuloj. Infinitivaj fakultativaj partikuloj estas antaŭmetataj aŭ postmetataj (infinitva prepozicio, infinitiva postpozicio).

7.6.1. La **verb-infintivaj kategoriaj** prepozicioj povas esprimi sintaksan rilaton al reganta helpverbo: *li volas* ***klem*** *skribi,* sed ili povas aperi ankaŭ antaŭ finitivo: *mi klem skribas*. – La verbo-infinitivaj kategoriaj prepozicioj *klem, plom* kaj *luj* krome konfirmas, ĉu la infinitivo aŭ verbo estas „radikverbo” *(mi volas klem skribi* ’mi volas skribi’, ĉu ĝi estas desubstantiva (*li volas plom parfumi ŝin)* aŭ de-adjektiva: *Ŝi denove luj diligentas. Kial ŝi volas ĉiam luj diligenti?* La formoj *klem skribi, plom parfumi, suj diligenti* estus ankaŭ vortaraj formoj de la koncernaj infinitoj.

7.6.2. La **subjekt-infinitiva** prepozicio ***to*** subjektigas infinitivon. *To helpi estas bela* ‘Helpi estas bele’. *To helpi bone estas bela.* ‘Helpi bone estas bele’. Enkonduko de *to* estas sekvo de konsidero de iaj ideoj de Johano PETIK pri avantaĝo de klareco de subjekta infinitivo (Petik 2004), tamen en speciala maniero. Konsideru: *To helpi bone plem skribi ĝuste estas tre utila, klare.* ‘Helpi bone skribi ĝuste estas tre utile, klare’. – Verbo-infinitiva kaj subjekt-infinitiva prepozicioj memkompreneble povas roli en la sama frazo: *To labori povas klem eduki la individuon. To helpi povas suj beli.*

7.6.3. Infinitivaj postpozicioj *(lem, lom, les, som)* ebligas formi frazon el infinitivoj sen precizigo de iuj aŭ ĉiuj imageblaj duagradaj verbaj kategorioj.

7.6.3.1. La infinitiva postpozicio ***lem*** formas infinitivan entemigan propozicion: *Skribi lem leteron.* ‘Temos pri tio, ĉu oni skribis, skribas, skribos, skribu, skribus leteron aŭ ne skribus, temos pri leterskribado, temu pri leterskribado. Jen io koncerne leterskribadon’.

7.6.3.2. Infinitiva postpozicio ***lom*** formas sensubjektan vastmoduman frazon el infinitivo + *lom.* Ekzemploj: *Skribi lom.* ‘Iu skribis aŭ skribas aŭ skribos, skribus aŭ skribu’ (laŭ la kunteksto, sen aparta subjekto).

7.6.3.3. La infinitiva postpozicio ***les*** formas je-subjektan frazon, sen klara modumo: La strukturo „infinitivo + *les”* do postulas indikon de la subjekto: „iu *iri les”* ‘iu iris, iras, iros, irus, iru’; laŭkuntekste: *Hieraŭ ŝi iri les kinejon* ‘hieraŭ ŝi iris aŭ irus en kinejon’, ‘oni parolas pri tio, ke ŝi hieraŭ iris en kinejon’.

7.6.3.4. La infinitiva postpozicio ***som*** formas je-subjektan frazon, kun klara aserta modumo: La strukturo infinitivo + *som* do postulas indikon de la subjekto: „iu *iri som”* ‘iu iris, iras, iros’; laŭkuntekste: *Hieraŭ ŝi iri som en kinejon* ‘hieraŭ ŝi iris en kinejon’. – Kiam oni uzas la postpozicion *som,* estas valida ankaŭ la postpozicio *les,* sed tion oni ne povas inversigi. „Ŝi iri *les,* jes, certe ŝi iri *som”* ‘Ŝi iris aŭ volis aŭ devis iri aŭ irus… jes, ŝi iris”. Trajtopartikuloj kaj infinitivaj partikuloj plifaciligas la uzon de kjalosko supozeble ekzemple por orient-azianoj, sed ili estas facilaj ankaŭ por eŭropanoj.

7.7. Kjalosko havas fakultativajn postverbajn/frazofermajn **partikulojn aspektecajn,** por nuanci la signifon/aplikon de verboj: *pje* – imperfektiva, ĝenerale; *pajol* – imperfektiva, statika; *pjum* – imperfektiva, statika; *li trinkis lakton pje;* proksimume ‘li estis trinkanta lakton’; *le* – perfektivo kun rezultatingo, unufoja aŭ kutima; *imel* – perfektivo, sendepende de rezultatingo; *talem* – ago ripeta, kutima kun rezultatingo, perioda fino; *tulem* – unufoja, kun rezultatingo; *imol* – unufoja, sendistinge pri rezulto *tamol* – periode unufoja, sendistinge pli rezultatingo; *dostom, nastol, fjastal* – partikuloj pri multeco, troeco. Ekzemploj: *Li manĝis dostom* ‘li manĝis sufiĉege, multe’. *Ŝi ridis nastol* ‘Pli ol sufiĉe, bone, kun kontento ŝi ridis’; *Li drinkis fjastal:* ‘pli ol sufiĉe, malaprobinde, pejorative’. Kjalosko krom *jam* havas partikulojn *jamfeĥ* ‘iam ajn antaŭe, minimume unufoje’ kaj *jampoĥ* ‘jam, ĉi-foje, antaŭnelonge, kun rezultato, freŝa valido nuna’. *Johano, kiu estas okjara infano* ***jamfeĥ*** *trinkis vinon. Elinjo* ***jampoĥ*** *trinkis kafon, sed por mi preparu porcion.*

7.8. Markado de frazofino. – Aspektecaj partikuloj povas indiki ankaŭ frazofinon, sed eblas marki frazofinon ankaŭ je demanda ***ka,*** depende-demanda ***lakal,*** konfirma ***tonk,*** aŭ ŝvebiga ***kaspaĥ***.

7.9. Kjalosko havas kelkajn versiojn de la verbo esti por impresi kvazŭ dialektaĵoj orientaj, okcidentaj, sudaj, nordaj, mezaj: ***kjazdi, pjozdi, kjanti*** ks.).

7.10. Fakultativaj sufiksoidoj

7.10.1. La sufiksoido ***-aml-*** konfirmas, ke la antaŭa radiko aŭ radikalo estas verbradikalo netransitiva. Tio ja estas leksike fiksita afero, do la sufiksoido nur helpas memori: mi naĝas, naĝankas; la konforma agosubstantivo estas *naĝamlo* ‘naĝo aŭ naĝado’. Aldono de *-ad-* eblas, sed ne estas nepra. *(naĝamlado* ‘ada naĝo’). Eblas ankaŭ: *Ni baniĝamlas.*

7.10.2. La sufiksoido ***-omp-*** konfirmas (!), ke verbo estas transitiva. *Mi ĉiutage aĉetompas lakton kaj panon.* Konforma agsubstantivo estas ebla: *Aĉetompo (de lakto) estas tre grava.* Simile: *Kiu hodiaŭ banompos la infanon? Oni vundompis ŝin.* Eblas ankaŭ: Mi *kurigompis la infanon en la vendejon*; *-omp-* do konfirmas ian ajn transitivecon, sed pro sufiĉo ĝi povas esti forlasata. Tamen ĝi neniam devas esti forlasata). Komparu: *Petro ofendompis Paŭlon.* Aŭ ni diru: *Paŭlo ofendiĝamlis.*

7.10.3. La sufiksoido ***-enf-*** konfirmas, ke verbo estas baze transitiva, sed estas uzata sen indiko de la rekta objekto en konkreta frazo. *Vespere, je la sepa ni banenfas.* ‘Vespere je la sepa ni banas iun, ekzemple, la infanon, aŭ ni banas nin’.

7.11. La sufiksoido ***-eng-*** kaj la vorto ***engo*** signifas ‘konkreta lingv(o)’, ***ezo*** signifas ‘norma, teatra lingvo’, ***iŝo*** ‘neprestiĝa lekto, strata lingvo’. Oni povas konstrui sintagmojn kiel *paroli anglezon aŭ prefere angliŝon, regi germanengon: germanezon kaj germaniŝon de certa loko* (pri *anglezo* vidu ankaŭ Albault 2009).

7.12. Prepozicioj: ***gom, lugom, vegom*** estas fakultative neprigaj prepozicioj pri homa subjekto *vegom* pri konscia, vola aganto, *lugom* pri subjekto de ekz. mediala verbo ks. *Gom li laboras. Vegom li laboras, lugom li laciĝas.*

7.13. Sintagmaj postpozicioj. - Kjalosko havas sintagmajn postpoziciojn, kiuj sekvas tuton de sintagmo. Ekzemple, sintagma postpozicio *subjel* fakultative markas finon de (eble tre longa) subjekta sintagmo. Ripetinde por emfazo: ĝi ne estas post la baza parto de la subjekta sintagmo, sed post la tuta sintagmo. *La reĝo de la lando subjel deklaris militon. Li, la kompatinda infaneto, la malforta knabeto subjej postulis tujan ekiron.*

7.14. Novaj prepozicioj. La prepozicio ***na,*** se uzata (MAKKINK 1995), povas neprigi rolon de rekta objekto kaj marki la komencon de sintagmo kun tia valoro tre frue: *Na tri aŭ kvar tre simile gajaj(n) tagoj(n) objel gom tre strange kondutantaj tajloroj subjel pasigis tie en tiu jaro.* Ekzistas pli specialaj objekto-prepozicioj, ekzemple *hon* kaj *pe.*

7.15. Kjalosko ebligas paroladon je diversaj **nombro-sistemoj.** En duumo la egal-valoro de la dekuma ‘dek naŭ (19)’ estas *vun cej vjan* (10011), el simplaj duumaj numeraloj *vun* ‘dek ses’ (10000) *cej* ‘duuma du’ (10), kaj *vjan* ‘duuma unu’. *Duses unu* (sesuma) egalvaloras je *dek tri* (dekuma).

7.16. Super-prepozicioj. Kjalosko enhavas nuanckonfirmajn superprepoziciojn, uzatajn antaŭ tiuj aŭ aliaj frazelementoj: *pajnal, mestom, tajmol, venĉel, vebal.* Superprepozicio kvalifikas ekzemple adjekton, kiu eble, sed ne nepre, enhavas ordinaran prepozicion. *Li kuras mestom tie, Li kuras mestom en la stadiono. Tajmol kiam li venos, kiutempe?* ’Kiam li venos?’ *Venĉel kiam ŝi venos?* ‘Kiam, kiu-kondiĉe ŝi venos?’.

7.17. *Pajnal* neprigas komprenon pri nocia spaco, *mestom* – komprenon pri efektiva loko, *vebal* – pri elektronike-metafora senco: *mestom kie li estas, vebal kie li estas* ‘Kie li estas, proprasence, kaj kie oni povas trovi lin en interreto?’ *Pajnal kie vi supozas tion solvebla? Pajnal en geometrio.*

7.18. Konfirma postpozicio primitiva *(subjel, objel, adjel)* markas la finon de (plurelementa) sintagmo, kiu estas senpera konstituanto de la frazo: „La nigran, timeman, malantaŭ kurteno kuŝantan katidon *objel* la tre simpatia, kaj multe vojaĝinta, inteligenta sinjorino *subjel* ĉi-foje ne rimarkis ”.Superpostpozicio: *cu, kej, tul, ful, fom, pjal, sjom, sjul, bajm, fjum* kvazaŭ striktigas komprensferon de adjekto, ene de tio eble rolon de prepozicio. *La knabo iris al sia patrino cu kaj diris al ŝi kej* (Atentu pri la uzo de la prepozicio: *al* pri direkto, *al* „dativa”).

7.19. Supersubjunkcioj: *pjol* por eksplikaj ***(pjol*** *ke…,* ***pjol*** *ĉu...). ta* por epitetaj propozicioj ***(ta*** *kiu).*

7.20. Kjalosko enhavas limvortojn diversnivelajn: *lol, klom, ulom, delom, calom, miltam, kvinal, sesal, sepjul.* Ekzemplofrazo: *Ĉu en* ***lol*** *skribo kaŝiĝas* ***klom*** *enskribo, aŭ en* ***klom*** *enskribo kaŝiĝas* ***lol*** *skribo?*

8. Pjaspo

Pjaspo enhavas ĉion el Esperanto, ĉion el tenko kaj parton de kjalosko. Ĝi enhavas krome diversajn metaparolajn partikulojn. Surbaze de mia sento de bezono pri ioma variado en tekstoj, mi enkondukis kelkajn verbo-sinonimojn. Kopulo prezence estas en pjaspo krom *estas* (prezenca indikativo) ankaŭ *pjas (pji, pjis, pjas, pjos, pjus).* Fikse-perfektiva ligverbo por kompleksaj verboformoj estas *ajti,* iom sekve al DLT.

Imperfektiva ligverbo por kompleksaj verboformoj estas *anti.* Oni do povas diri *La libro antis legata, ajtis legita, poste jam estis kaj estas, restas plu legita.* La plurfunkcieco de Esperanta *esti* restas valida. La verbo *dondi* estas sinonimo de la serio *esti, situi, troviĝi, esti lokita (ie).* La verboj *gipti, imji, ilji* estas stil-sinonimoj de la serio ‘esti, ekzisti, haviĝi’ (la bezonon pri tia verbo mi ĉerpis el laboroj de Johano Petik). Sinonime je *estas* kaj *pjas* oni povas uzi ankaŭ la transitivajn verbojn *nadi, podi* kaj la ambaŭtransitivan *sunti. (Budapeŝto podas urbon. Urbo nadas Budapeŝton. Budapeŝto suntas la ĉefurbo(n) de Hungarujo).*

8.1. Stil-nuancaj personaj partikuloj speciale pjaspaj estas la postmetataj, sendistancigaj *tuĥ* kaj *tel: vi tuĥ* 'vi amiko, amikino, samsocietano, vi unu'; *vi tel* 'vi pluraj'. La partikuloj *mjaĥ, tuĥ* kaj *tel* kombineblas kun pronomoj, pronomsubstantivoj, substantivoj kaj baze-trajtaj personaj partikuloj, por emfazo kaŭ stilefiko: *vi tumel, vi tel tumel, vi tumoj tel tumel* 'vi pluraj (persone)'. *Mjaĥ mi enko* 'mi (sola, persone, individue)'.

Diversaj person-esprimiloj, mi ripetas, povas multmaniere kombiniĝi: *vi tumo tuĥ, vi tumo tuntel. Vi tumo tuntel tuĥ,* kun senpere-konversacia nuanco. Tio ofte povas ankaŭ liveri pripenso-tempon al la parolanto. (Komparu: *Nu, kara mia kolego, mia kara malnova amiko, kiel vi scias, kio koncernas min, mi donacos al vi, kara amiko, la poŝtranĉilon, kun ĝojo, tamen mi, vi komprenas, devas tion ankoraŭ pripensi).* Uzo de tiaj kombinoj povas pozitive influi, helpi glatan, senstumblan konversacion, psike bonan komunikadon.

8.2. Modumaj metaparolaj partikuloj estas, ekzemple *telam, dajlom, talom, jompal, palsam,* kiuj precizigas nuancon de demando. Ankaŭ tio povas faciligi komunikadon.
Telam kie ĝi estas? Efektiva postulo respondi.
Dajlam kie ĝi estas? Poezia demando, kun nuanco de demando al la demandanto mem.
Tundom kie ĝi estas? Enkonduka, temiga demando (ankaŭ por gajni tempon).
Talom kie ĝi estas? Rezigna demando.
Jompal kie ĝi estas? Insista demando.
Palsam kie ĝi estas? Kvazaŭ-scia demando, ripetiga demando, (kvazaŭ-)ripetata demando, por redemandi ekz. pri io jam pridemandita, sciita, sed reforgesita.

8.3. Valido-partikuloj influas modumvaloron de verbaj modoj:
Jozefo povis iri lonel. 'Jozefo povis iri (kaj li iris). Jozefo iris, ĉar li povis' (simile al hungareca uzo de *povis). Jozefo povis iri tanel.* 'Jozefo povis iri kaj li ne iris, Jozefo havis la eblon iri'. (Iom simile al slaveca uzo de *povis) Se Jozefo povus iri tilem.* 'Se Jozefo povus iri (kaj oni ne scias, ĉu li povas)'. Se Jozefo povus iri *lunkem.* 'Se Jozefo povus iri (kaj oni scias, ke li ne povas)'.

8.4. Frazovortoj en pjaspo, kiuj mankas en tenko:
Fagel! 'Mi ne komprenas vin, tion, ial ajn.'
Fomal! 'Mi ne komprenas ion. Mankas al mi precizigo pri informo aŭ detalo pri ideo, diru, kio estas ĉi tio'. [Temos pri kardiologio.]
Fomol! 'Diru, kio estas kardiologio, mi ne komprenas klare ĉi tion!'
Fogol! 'Mi ne komprenas tion koncepte'.
Haĝol! 'Mi ne povas rilatigi la dirajon al la situacio.'
Jakol! 'Mi ne komprenas pro neaŭdo'.
Pumjank! 'Mi ne povas nun liberigi min, mi ne havas tempon'.
Teŝal! 'Mi ne komprenas pro malfacilaj partoj, lingve'.
Moliĥ! 'Faru al mi tion, kion vi devas laŭ via laboro/servo (ekz. Donu unu veturbileton!)'.
Limbal 'Faru al mi, donu al mi, laŭ via devo, la malpli valoran version, el
(Melimbal!) la du kutimaj (ekz. ĉe vendisto)!)'.
Lombal, pjalombal! 'Faru al mi, laŭ via devo, la pli valoran version (ekz. donu ankaŭ deserton)'.
Deĥtal! 'Faru al mi specialan, aldonan servon (Ekz. Ne nur donu bileton, sed ankaŭ informu min pri la ekvetur-tempo).'
Lipjaĥ! 'Mi sentas al vi serenan amon'.
Labjuĥ 'Mi sentas amon al vi! Mi amas vin!'
